

Karlo Markso

La mizero de la filozofio

***Respondo al Prudono: „Filozofio de la
mizero”***

Kun antaŭparoloj
de Frederiko Engelso
kaj Henri Mougín

Pri J. P. Prudono

Letero al J. B. v. Schweitzer

Karlo Markso

La mizero de la filozofio

***Respondo al Prudono: „Filozofio
de la mizero”***

**Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso
kaj de Henri Mougin**

Pri J. P. Prudono

Letero al J. B. v. Schweitzer

Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso

La mizero de la filozofio

Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”

Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso
kaj de Henri Mougin

Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer)

Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Embres-et-Castelmaure, 2009

ISBN 978-2-918300-08-3

Enhavo

Henri Mougín: Antaŭparolo	9
Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la unua germana eldono de la verko de Karlo Markso „La mizero de la filozofio”]	25
Frederiko Engelso: Pri la hispana eldono	43
Frederiko Engelso: Pri la dua eldono	45
Antaŭparolo	46
UNUA ĈAPITRO	47
§ 1. Kontraŭeco de uzvaloro kaj interŝanĝvaloro	47
§ 2. La konstituita aŭ sinteza valoro	59
§ 3. Apliko de la leĝo de proporcieco de la valoro	93
a) La mono	93
b) La laborkromaĵo	104
DUA ĈAPITRO	116
La metafiziko de la politika ekonomio	116
§ 1. La metodo	116
Unua rimarko	117
Dua rimarko	122
Tria rimarko	123
Kvara rimarko	124
Kvina rimarko	127
Sesa rimarko	129
Sepa kaj lasta rimarko	134
§ 2. Labordivido kaj maŝinoj	139
§ 3. Konkurenco kaj monopoloj	155
§ 4. La grundproprietaro aŭ la rento	164
§ 5. Strikoj kaj laboristkoalicioj	177
Karlo Markso: Pri P. J. Prudono	
[Letero al J. B. v. Schweitzer]	187
La tradukinto: Pri tiu ĉi eldono	197

(Elgermanigo de la eldonklarigoj de la germana eldono, Stutgarto 1885:)

Karlo Markso

La mizero de la filozofio

Respondo al Prudono: „Filozofio de la mizero”

Germanigita de E[duard] Bernstein kaj K[arl] Kautsky

Kun antaŭparolo kaj notoj de Frederiko Engelso

Verkita inter fino de decembro 1846 kaj komenco de aprilo 1847.

Aperis 1885 unuafoje en germana eldono prizorgita de Karl Kautsky kaj Eduard Bernstein, kiu estis kontrolita kaj provizita je antaŭparolo de Frederiko Engelso.

Engelso faris ĉe la reviziado de la teksto de la germana traduko vicon da ŝanĝoj, pri kiuj li raportas en sia antaŭparolo. Tiuj ŝanĝoj estis konceptitaj de Engelso ankaŭ por nova franca eldono. La bazon por tio konsistigis ekzemplero de la franca originalo de Karlo Markso dediĉita al Natalja Utina en la jaro 1876 (en niaj piednotoj mallonge nomata „dediĉekzemplero”), kiu entenas vicon da plibonigoj kaj kompletigoj faritaj de Markso.

Krome ekzistas listo kunmetita de Engelso evidente por la jam 1884 planita franca eldono de „notes et changements” [notoj kaj ŝanĝoj] (en niaj piednotoj mallonge nomata listo de Engelso, kiu plejgrandparte kovriĝas kun la enskriboj en la dediĉekzemplero.

Ni prezentas la senŝanĝan tekston de la unua eldono en germana traduko. Nur ĉe la reliefigoj ni tenis nin je la franca originalo. Krome ni distingis la reliefigojn devenajn de Markso (en nia teksto kursive) kaj

tiujn de aŭtoroj cititaj de li (en nia teksto substrekitaj).¹ Reliefigoj de aliuloj, kiujn Markso ne transprenis, restis ne konsideritaj.

Piednotoj de la Esperanta tradukinto estas markitaj per ties siglo (-vl).

¹Tiujn reliefigojn per substrekoj la Esperanta versio tute preterlasas. -vl

Henri Mougín: Antaŭparolo

Markso skribis tiun verkon dum la vintro 1846–1847, kiam li loĝis en Bruselo. Ĝi estas respondo al studaĵo kiun Prudono aperigis en oktobro 1846 sub la ĝenerala titolo: *Contradictions économiques, ou Philosophie de la misère* [Ekonomiaj kontraŭdiroj, aŭ Filozofio de la mizero]. Kiel videblas el lia korespondado kun Engelso, Markso konceptis sian respondon al Prudono unue kiel broŝuron; poste, redaktante, tiu broŝuro fariĝis vera volumo. Markso skribis ĝin en la franca; la eldonaj malfacilaĵoj estis grandaj kaj oni scias el la korespondaĵoj kun Engelso pri certa nombro da incidentoj kiuj akompanis ĝin: malfacilaĵoj kun la eldonisto, malfacilaĵoj aperigi raportojn en la tiamaj gazetoj kaj revuoj, ktp ...

Prudono, kiu, jam en tiu epoko, rilatis kun la gravaj personoj, silentis pri la verko de Markso. Tio estis lerta; Markso estis tiam en Parizo nekonatulo. (La gazeto *Le Journal des économistes*, de aŭgusto 1846, opiniis lin ŝuisto: „S-ro Markso estas ŝuisto”, skribis ĝi.) La silento de Prudono estis do lerta, sed de mallongvida lerteco. Ĉi tie, kiel alie, la historio eldiris sian juĝon; en letero kiu datiĝas verŝajne je novembro 1847, Engelso raportas [al Markso] pri konversacio kiun li havis kun Louis Blanc:

Mi estis skribinta al li ke mi venos kun formala mandato de la londona, brusela kaj rejnlanda demokratio kaj kiel agento de la ĉartistoj... Mi pentris al li la situacion de nia partio kiel tre brilan; mi diris al li ke vi estas nia ĉefo: vi povas konsideri s-ron Markso kiel la ĉefon de nia partio, do de la plej avancinta frakcio de la germana demokratio, kaj lian ĵusan libron kontraŭ s-ro Prudono kiel nian programon.

Engelso pravis. Cetere, Prudono certe antaŭsentis tion, li kiu ekstere silentis pri la verko de Markso, sed kiu private tre zorge prinotis ĝin.

Mizero de la filozofio estas en la tuta verkaro de Markso etapo de granda graveco, ĝi estas verko samtempe de transiro kaj de matureco. Ĝi estas ĉe li la unua sintezo inter metoda filozofio kaj politika ekonomio

samtempe objektiva kaj konkreta. Ĝis tiam, Markso havis la tendencon pritrakti tiujn du fakojn dise; temis por li alĝustigi ilin. La pli ĝenerala sperto kiun li akiris post sia foriro el Germanio, en Parizo kaj Bruselo, lia partopreno en la organizado de la laborista movado en Parizo, poste liaj unuaj internaciaj laboristaj rilatoj, kaj ankaŭ certe la pensadoj pri la eraroj de Prudono ebligis al li, por la unua fojo, skribi verkon en kiu la marksisma klarigado aperceptas la plej kompletan realon kaj montriĝas decida kaj totala, ĉar, por la unua fojo, ĝi ne prokrastas al posta tempo la prilumadon de aliaj aspektoj. La marksisma metodo manifestiĝas; ĝi povas komenci aplikiĝi al la realo, en la reala batalo kiel en la klarigo de la reala vivo.

La verko havas krome apartan intereson por ni, francoj. Ĝi estas propradire hejma verko por ni; kaj la fakto ke ĝi estis verkita nialingve estas nur la simbolo de ĝia graveco por la franca movado. Efektive, sub la daŭra nomo prudonismo oni konstante eltiris de ĉe ni la doktrinon kiu, de jarcento, servis kiel ŝirmo kaj rekomendo por ĉio kio devojiĝis de la revolucia laborista movado al vana aventuro kaj al la negacio de si mem. Prudonistoj estis tiuj kiuj partoprenis kiel francaj delegitoj en la starigo de la unua Internacio (kun la komplezo de Napoleono la 3-a), sed kiuj, kun Tolain ĉekape, tenis sin poste for de la Komunumo². Prudonistoj estis tiuj kiuj, en la Komunumo, malebligis fari la tujajn decidojn kiuj solidigintus la movadon. Prudonistoj estis tiuj kiuj, antaŭ la unua mondmilito, volis fortenti la laboristan movadon de ĉia politika agado. Prudonistoj, sekve, estis tiuj kiuj, en la sama epoko, volis doni al la „Action française” laboristan teorion. Lagardelle³, konsilisto de Mussolini kaj ministro pri laboro de Pétain. Prudonistoj, la redaktistoj de la Ĉarto de Laboro⁴. Prudonistoj, la „laboristaj” gazetoj de la hitlera okupado. Ĉu la subskribinto de Munkeno, en sia deklaroj al la radikala kongreso printempe de 1946, ne deklaris sin ankaŭ prudonisto?

La defendantoj de Prudono asertas ke li ne respondecas pri tiuj kiuj deklaras sin liaj adeptoj. Sed fine, ili deklaras sin liaj adeptoj en sia

²La Pariza Komunumo. Vd Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871) - La Pariza Komunumo; kun enkonduko de Frederiko Engelso; tradukis Vilhelmo Lutermano, 2005, Mondial, Novjorko, ISBN 1-59569-025-5 (137 paĝoj). -vl

³Membro de la Socialista Partio antaŭ la milito de 1914, anarĥi-sindikato, Lagardelle poste fariĝis ideologo de la faŝisma korporaciismo.

⁴Charte du Travail. -vl

batalo kontraŭ la laboristaj organizaĵoj ja ĝuste ĉar Prudono donas al ili la rimedojn fari tion.

Tio montras la fundamentan gravecon, por la franca movado, de tiu verko de Markso. Post pli ol cent jaroj, ĝi estas daŭre la plej bona doktrina defendo kontraŭ la prudona konfuzo; kaj la legado de la rilatoj inter Prudono kaj Markso estas daŭre same historia kiel persona sperto el kiu oni povas tiri la plej grandan utilon.

*

En letero, aperinta la 24-an de januaro 1865 en la *Sozial-Demokrat*, kaj kiu troviĝas ĉi tie anekse⁵, Markso rakontas pri siaj unuaj rilatoj kun Prudono. Tio estis en Parizo en 1844 kaj, diras Markso,

ĝis certgrade mi respondecas pri lia „sophistication”, vorto kiun uzas la angloj por signi la falsadon de varo. En niaj longaj diskutoj, ofte dum la tuta nokto, mi injektis al li la hegelismon.

Prudono plurfoje esprimis sin pri Hegelo; kaj, se oni konsideras la datojn, oni povas mezuri kia estis la influo de tiuj konversacioj kun Markso. Antaŭ ol havi, pere de Markso, kontakton kun la hegela dialektiko, li skribis:

Mi tute ne lasas min misuzi de la metafiziko kaj la formuloj de Hegelo... Tio por mi, mia kara, estas knabaĵo, tio ne estas scienco. (Letero de la 23-a de majo 1842)

La 20-an de decembro 1843, sendante sian *Création de l'ordre dans l'humanité*⁶ al la sama korespondanto, li diras al li:

Vi trovos en tiu ĉi volumo tutan metafizikon multe pli simplan, klaran kaj fekundan ol tiun de viaj germanoj.

kaj tiu verko mem montras sufiĉe esceptan nescion pri la doktrino de Hegelo.

Sed, en 1844, post la renkontiĝo kun Markso, Prudono ŝanĝis komplete sian opinion. En letero de la 4-a de oktobro al la sama korespondanto li indignas pro la malfruiĝo „en kiu troviĝas la franca publiko koncerne la filozofiajn studojn” kaj li donas al si nun la taskon „popularigi la metafizikon”. „Por tio, aldonas li, mi uzas la plej

⁵Karlo Markso: Pri P. J. Prudono [Letero al J. B. v. Schweitzer] -vl

⁶„Kreado de ordo en la homaro”. -vl

profundan dialektikon, tiun de Hegelo.” La 19-an de januaro 1845, en letero al Bergmann, li prezentas la verkon kiun li preparas kaj al kiu Markso devis respondi, tiel:

Mi esperas, fine, instrui al la franca publiko kio estas dialektiko... Laŭ la novaj konoj kiujn mi akiris ĉi-vintre, mi estis tre bone komprenata de granda nombro da germanoj kiuj admiris la laboron kiun mi faris por atingi mem tion kion ili asertas ke ĝi ekzistas ĉe ili. Mi ankoraŭ ne povas juĝi pri la parenceto inter mia metafiziko kaj la logiko de Hegelo, ĉar mi neniam legis Hegelon; sed mi estas konvinkita ke tio estas la logiko kiun mi uzos en mia venonta verko; nu, tiu logiko estas nur ia aparta kazo aŭ, se vi volas, la plej simpla kazo de la mia.

Du monatojn post la apero de sia *Filozofio de la mizero*, la 13-an de decembro 1846, li esprimas daŭre la saman opinion:

La logiko de Hegelo, tia kian mi komprenas ĝin, kontentigas senfine pli mian racion ol ĉiuj malnovaj maksimumoj per kiu oni ŝtopis al ni la kranion por konsciiĝi pri certaj akcidentoj de la racio kaj de la socio.

Sed, ekde junio 1847, dato en kiu Markso publikigas sian respondon, Prudono faras pri sia verko unuan rezervon:

Mi faris kritikon, nenion pli; kritikon metodan, estas vere, kaj kiu entenas ĉiujn elementojn de mia sintezo, kvankam tiu sintezo ne malkovriĝas. (Letero de la 4-a de junio 1847)

Kaj, se sekvi lian korespondadon en la sama epoko, pri tio kion li diras pri la sintezo, oni rimarkas ke li estas ankoraŭ malproksima de la kompreno: la hegela sintezo estas por li „la universala repaciĝo per la universala kontraŭdiro” (Letero de la 7-a de novembro 1846) kaj:

por tiu, kiu komprenis min, jam ne akcepteblas adopti ekskluzivan opinion, tiu estus ridindulo. (Letero de la 24-a de oktobro 1844)

Por li la sintezo estas repaciĝo, maniero konservi, repacigi, sen ajna escepto, ĉiujn asertitajn antinomiojn.

Poste li rifuzis tutsimple la hegelan sintezon:

La hegela formulo estas triopo nur pro la plezuro aŭ la eraro de la majstro, kiu nombras tri esprimojn tie kie vere ekzistas nur du, kaj kiu ne vidis ke la antinomio solvas neniel, sed ke ĝi indikas

osciladon, aŭ antagonismon kapablan nur je ekvilibro.

Kaj, revenante al sia *Filozofio de la mizero*, li precizigas:

Laŭ Hegelo, mi alprenis la ideon ke la antinomio devas solviĝi en supera esprimo, la sintezo, malsama ol la du antaŭaj, la tezo kaj la antitezo; eraro de logiko, same kiel de sperto, kiun mi hodiaŭ estas forlasinta. La antinomio ne solviĝas; jen la fundamenta difekto de la hegela filozofio. La du esprimoj, el kiuj ĝi konsistas, balanciĝas... Balanciĝo tute ne estas sintezo, tia kian Hegelo komprenis ĝin kaj kian mi supozis post li.

Prudono provis cetere, de longa tempo, trovi esprimon kiu priskribus tiun tute apartan operacion per kiu,

por ke la socia potenco agu en sia pleneco, necesas ke la regantaj fortoj, el kiuj ĝi konsistas, estu en ekvilibro... Tiu ekvilibro devas rezulti el la balanciĝo de la fortoj, kiuj agas unu sur la aliaj en tuta libereco kaj kiuj reciproke ekvacias sin.

Ekvacio troviĝas jam en la *Filozofio de la mizero*; Prudono volis tie fari „ĝeneralan ekvacion de ĉiuj niaj kontraŭdiroj”. *Balanciĝo* kaj *kontraŭpezo* troviĝis jam en *La Kreado de la ordo*⁷ en 1843. Prudono proponas transformi la hegelan kontraŭdiron en balanciĝon de ŝuldo kaj bonhavo; cetere li proponas la nocion de „mutuum”; la ekzistantaj sociaj fortoj, balanciĝante, en ekvilibro, estas tiel en stato de mutuala⁸ subteno; ankaŭ aliie, en 1858, li faris el la sintezo mezumon inter la kontraŭdiraj esprimoj, prezentataj kiel maksimumo kaj minimumo.

Oni vidas kion li serĉas: al la hegela dialektiko, kiu eliminis la kontraŭdirojn, por kiu la antitezo estas la negacio de la tezo kaj la sintezo la negacio de tiu negacio, substitui konformisman sistemon, kie, kiel diras Markso, la kontraŭdiro eterniĝas kaj alvenas al ekvilibro, al perfekte akceptebla *kompromiso*, al stato de egaleco kaj de reciproka subteno.

La dua instruinto de Prudono pri hegeliismo, Grün, kiu daŭrigis la lecionojn post kiam Markso estis elpelita el Francio, povis ja skribi:

Tiu kolosa vero [de la hegeliismo] ĉe kiu mil francaj kranioj trovis

⁷Originale: La Création de l'ordre. -vl

⁸reciproka. -vl

sian Waterloo⁹... tiun veron Prudono plene kaptis.

La opinio de Markso estis tute malsama. En sia letero de 1865 al la *Sozial-Demokrat*, li skribas:

La naturo de Prudono portis lin al la dialektiko. Sed, ĉar li neniam komprenis la sciencan dialektikon, li atingis nur la sofismon. Fakte, tio devenis de lia etburĝa vidpunkto. La etburĝo diras ĉiam: unuflanke kaj aliflanke... li estas la vivanta kontraŭdiro: se li estas krome, kiel Prudono, sprita homo, li scias baldaŭ ĵongli per siaj propraj kontraŭdiroj kaj ellabori ilin laŭ la cirkonstancoj kiel frapantajn, skandalajn, ofte brilajn paradoksojn. Scienca ĉarlatanismo kaj politikaj adaptiĝoj estas nedisigeblaj de tia vidpunkto.

Pro tio, Markso povis, en la *Komunista Manifesto*¹⁰, klasi Prudonon en la kategorion de konservativa aŭ burĝa socialismo:

La burĝaj socialistoj volas la kondiĉojn de la moderna socio sen la bataloj kaj la danĝeroj kiuj nepre rezultas el ĝi; ili volas la nunan socion post eliminado de la elementoj kiuj revolucias kaj diserigas ĝin. Ili volas la burĝaron sen la proletaron.

Kaj, en maniero „malpli sistema kaj pli praktika”, ili klopodas

por malemigi la laboristan klason je ĉia revolucia movado, demonstrante al ĝi ke tio kio povas utili al ĝi ne estas tia aŭ alia politika ŝanĝo, sed nur ŝanĝo de la materiaj ekzistadkondiĉoj, de la ekonomiaj kondiĉoj. Sed sub ŝanĝo de la materiaj ekzistadkondiĉoj, tiu socialismo tute ne komprenas la forigon de la burĝaj produktadkondiĉoj, forigo kiu realigeblas nur revolucie, sed administrajn reformojn kiuj plenumiĝas en la kadro de tiuj produktadkondiĉoj, kiuj do neniel modifas la rilaton inter kapitalo kaj dunglaboro, sed, plibonigante la aferojn, malpliigas al la burĝaro la regadkostojn kaj simpligas la ekonomian mastrumadon.

⁹„sian Waterloo”, aludo al la loko de la definitiva malvenko de Napoleono, do: „sian definitivan malvenkon”. -vl

¹⁰Vd Karl Marx; Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, tradukita de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5, kaj rete, en aranĝo de Franko Luin, sub: <http://www.omnibus.se/inko> -vl

La malamikoj de Markso ege emociiĝis pro tiu „kontraŭdiro”: Markso klasas Prudonon inter la etburĝoj kaj la socialismon de Prudono en la burĝan aŭ konservativan kategorion!

Kiel, skribas Charles Andler, tiu, kiun Markso traktas kiel etburĝon, estas vicigita inter la subtenantoj de la granda kapitalismo?

Sed li ja devas poste paroli pri:

tiu aparta politika transformiĝo per kiu la deduktado de la kapitalismo [ĉe Prudono] fariĝis apologio de la kapitalistoj.

Kaj eĉ memoriĝi pri tio la frazon de Markso en la antaŭparolo al la *18-a Brumaire*, montrante kiel ĉe Prudono lia „historia konstruado de la ŝtatrenverso transformiĝis en apologion de Bonaparte”.

Ne estas sekreto en la fakto ke Prudono, etburĝo, proponis burĝan aŭ konservativan socialismon. Se estus sekreto, tiam ĝi kuŝus en la volo ne kompreni tion kio troviĝas malantaŭ la prudona pseŭdodialektiko. Fronte al la kontraŭdiro inter burĝaro kaj proletaro, Markso elektis la revolucion solvon: la dialektikan sintezon, tiun kie la kontraŭdiraj esprimoj klariĝas kaj, post negado de la negado, estas anstataŭataj de la kolektivisma kaj senklasa socio. La etburĝo Prudono elektas la ekvilibron, la reciprokan subtenon de la antagonismaj esprimoj: ne estas neeblo de la burĝaro, sed ekvilibro atingita per klasa kunlaborado. Pro tio ekzistas en la dialektiko bona kaj malbona flanko: la malbona flanko estas la revolucia flanko. La ekvilibro estas certigata per tio ke oni persvadas la proletaron ke ne ekzistas revolucia movado nek forigo de la burĝaj produktadkondiĉoj. Konduki la laboristan klason al rezigno pri siaj revoluciaj taskoj, tio estas konservi la ekvilibron per forigo de la malbona flanko.

*

Krome, Markso kaj Engelso ekde 1846 konstatis praktike la absolutan kontraŭecon kiu montriĝis inter la prudona pozicio kaj la revolucia agado. Ili troviĝis ambaŭ en plena organizad-laboro, unu en Parizo, la alia en Bruselo. Ili klopodis por organizi, ĉirkaŭ utila doktrino, ĉiujn grupojn kiuj, ĝis 1845, troviĝis en aventureca kaj sekreta situacio. En ĉiuj ĉi grupoj la plej bonaj membroj sentis samtempe kiaj politikaj eraroj estis faritaj kaj kia nova politika situacio konturiĝis, tiu kiu rezultis en 1848. Markso kaj Engelso konsideris necesa laboron de purigo de la partio, de eliminado de ĉia sentimentaleco, kaj la likvidadon

de ĉiaj pseŭdodoktrinoj kiuj malarmis la laboristan avangardon en la agado kiun ĝi devis fari. Ilia firma kaj justa sinteno devis rezulti printempe de 1847 kiam, post fino de la doktrina kaj praktika laboro de purigado, ili povis akcepti la proponon de kongreso kiu okupiĝis pri la politika reorganiziĝo ĉirkaŭ praktika agaddoktrino. Tiu kongreso devis okazi dum la somero de 1847. Markso kaj Engelso estis taskitaj redakti la manifeston de la Partio.

Dum tiu laboro de reorganizado, Markso skribis el Bruselo por peti Prudonon partopreni en la internacia informoficejo:

En la momento de ago, skribis li, ĉiu havas certe grandan intereson esti informata pri la stato de la aferoj, eksterlande same kiel hejme.

Prudono respondis al li el Liono la 17-an de majo 1846; li akceptis, diris li, fariĝi unu el la ricevantoj” de via „korespondado”. Sed li faris tuj gravajn rezervojn:

Mi tamen ne promesas al vi skribi multe nek ofte, miaj ĉiaspecaj okupiĝoj, ligitaj kun natura pigreco, ne permesas al mi tiujn leterajn klopodojn. Mi prenos ankaŭ la liberecon fari kelkajn rezervojn kiujn sugestis al mi diversaj teksteroj de via letero.

Jen en kio konsistis tiuj rezervoj.

1. Kvankam miaj ideoj pri organizado kaj de realigado estas, en ĉi momento, tute haltigitaj, almenaŭ koncerne la principojn, mi kredas ke estas mia devo, devo de ĉia socialisto konservi por ankoraŭ kelka tempo la antikvan aŭ duban formon, – unuvorte, mi deklaras kun la publiko preskaŭ absolutan ekonomian kontraŭdogmismion.

2. Ni serĉu kune, se vi volas, la leĝojn de la socio, la manieron en kiu tiuj leĝoj realiĝas, la progreson laŭ kiu ni sukcesas malkovri ilin, sed, pro Dio! post detrui ĉiujn apriorajn dogmismojn, ni ne pensu niavice fivarbi per doktrino la popolon... ni ne preparu por la homa specio novan taskon per novaj fuŝaĵoj... Ĉar ni estas ĉekape de la movado ni ne fariĝu la ĉefoj de nova maltoleremo... Ni akceptu kaj subtenu ĉiujn protestojn... Ni neniam rigardu demandon kiel elĉerpitan kaj, kiam ni eluzis eĉ nian lastan argumenton, ni rekomencu se necese per elokvento kaj ironio. Sub tiu kondiĉo mi plezure eniros vian asocion, se ne, ne.

Jen fine la plej grava rezervo

3. Mi devas fari ankaŭ kelkajn observojn pri jena vorto de via letero: en la momento de la ago. Eble vi havas ankoraŭ la opinion ke aktuale neniam reformo eblas sen atako, sen tio kion oni iam nomis revolucio, kaj kio estas tutsimple nur skuo. Tiu opinio kiun mi komprenas, kiun mi pravigas, pri kiu mi volonte diskutus, ĉar mi mem longtempe dividis ĝin, mi konfesas al vi ke miaj lastaj studoj revenigis min komplete al ĝi. Mi kredas ke ni ne bezonas tion por sukcesi; kaj ke sekve ni tute ne devas starigi la revolucionan agadon kiel rimedon de sociala reformo, ĉar tiu tielnomata rimedo estus tutsimple alvoko al forto, al arbitro, mallonge: kontraŭdiro. Mi formulas la problemon jene: venigi en la socion, per ekonomia rimedo, la riĉaĵojn kiuj eliris el la socio per alia ekonomia rimedo... Nu, mi kredas scii la rimedon por solvi tiun problemon en mallonga tempo.

Prudono aldonis:

Mia venonta verko, kiu en tiu ĉi momento estas duone presita, diros al vi pli pri tio.

Tiel Prudono anoncis sian *Filozofio de la mizero*.

Markso ricevis do, el la mano mem de Fauteur, la konfeson ke la reformistaj utopioj pri ekonomio, kiujn Prudono estis propononta, estis faritaj por nei la atingopovon „de la revolucia agado kiel rimedo de sociala reformo”. Al li sufiĉis tiam montri, kiel li faras en la *Mizero de la filozofio*, ke la ekonomiaj projektoj de Prudono estas vere utopiaj. Li faras tion per majstra mano. Prudono, fine de sia letero, aldonis:

Escepte se mi trompiĝas kaj, se estas kialo, ricevas severan kritikon de via mano, al kiu mi submetas min volonte, atendente mian venĝon!

La severa kritiko estis al li aplikita. Sed tiom ke li preferis definitive silenti ol fari sian venĝon.

*

Engelso siavice, kiu en la sama epoko daŭrigis en Parizo la metodan laboron de revolucia organizado kiun Markso komencis antaŭ sia forpelo, povis ankaŭ mem konstati al kio la prudonismo servas: li vidis ĉiujn likvidantojn de la movado kaj de la organizaĵo fuĝi al Prudono, en la momento en kiu la plej evidentaj necesoj igis ilian pozicion netenebla; la 19-an de septembro 1846, li skribis al la komitato de Bruselo:

En sia nova laboraĵo, ankoraŭ en manskriba stato, kiun Grün interpretas, Prudono elmetas la genian planon fari monon el nenio kaj meti la paradizon je atingopovo de la laboristoj. Neniu sciis ĝis nun kiel statas la afero. Grün montriĝis tre rezervita, sed tre laŭdis lian filozofan ŝtonon. La atendo estis ĝenerala: fine paĉjo Eisermann troviĝis ĉe la lignaĵistoj samtempe kiel mi, kaj iom post iom, la maljuna belulo komencis tre naive konfesi la tutan sekreton. S-ro Grün konfidis al li la tutan planon. Admiru do la grandecon de tiu projekto destinita emancipi la mondon: temas nek pli nek malpli nur pri laboristaj bazaroj aŭ laboristaj merkatoj kreitaj de longa tempo en Anglio kaj dekoble ruiniĝintaj: asocio de ĉiuj laboristoj de ĉiuj branĉoj, granda stokejo, ĉiuj laboraĵoj liveritaj de la asocioj taksitaj precize laŭ la prezo de la malneta produkto, plus la laboro, kaj pagataj per aliaj produktoj de la asocio, ankaŭ taksitaj. Kio estos produktata super la bezonoj de la asocio estos vendata sur la mond-merkato kaj la mono distribuata al la produktantoj. Tiamaniere, spekulante la ruzulo Prudono, li kaj liaj asocioj evitas la profiton de la interulo. Sed ke li evitas samtempe la profiton el la asocia kapitalo; ke tiu kapitalo kaj tiu profito devas esti precize egalaj al la kapitalo kaj al la profito de la forigitaj interuloj, ke li donas do per la dekstra mano tion kion li ricevas de la maldekstra mano, pri ĉio ĉi nia ruza kompano ne pensis. Ke tiuj laboristoj povos neniam kunigi la kapitalon necesan, ĉar alie ili povus ĉiuj establi sin memstare; ke la eventuala ŝparaĵo, rezultanta el la asocio, troviĝas pli ol kontraŭbalancita per la eksterordinara risko; ke la tuta kombinaĵo fine, per ĵonglaĵo, malaperigas la profiton de la nuna mondo kaj lasas plu ekzisti ĉiujn produktantojn de tiu profito; ke ĉio ĉi estas nur idilio kiu unue ekskludas ĉian grandindustrion, ĉian laboron pri konstruaĵo, ĉian terkulturadon ktp...; ke tiuj metiistoj devos elteni nur la perdojn de la burĝoj sen partopreni en iliaj gajnoj; ĉion ĉi, kaj cent pliajn kontraŭargumentojn kiuj okulfrapas, li forgesas en la ebrieco de sia komprenebla iluzio... Prudono ridindigas sin por ĉiam kaj kun si la francajn socialistojn kaj komunistojn, en la okuloj de la burĝaj ekonomikistoj, se li publikigas tiun laboraĵon. Jen pro kio tiuj larmoj, tiu polemiko kontraŭ la revolucio: li havis sekrete en si pacan rimedon!

La libro de Prudono laboris do kontraŭ aganta laborista movado eĉ antaŭ ol esti eldonita.

*

Fine necesas rapide laŭspuri la serion da juĝoj kiujn Prudono esprimis pri la politikaj eventoj de sia tempo kaj pri la diversaj historiaj intervenoj de la laborista klaso. Oni povas tiel konstati kiagrade la prognozo de Markso kontraŭ Prudono ekde 1847 estis perfekte objektiva.

En 1847, Prudono, antaŭvide al la eventoj kiuj maturiĝis, volis havi tribunon. Oni trovas en liaj taglibroj¹¹ jenan noton:

Provi interkompreniĝi kun la *Moniteur industriel*, gazeto de la mastroj, dum *Le Peuple* estos la gazeto de la laboristoj.¹²

Komence de 1848, Guizot suspendas la lecionojn de Michelet, kiel li estis suspendinta tiujn de Mickiewicz kaj de Quinet; Prudono gratulas sin ke oni silentigis tiujn „naivegulojn”¹³, kaj kiam la studentoj protestas, li notas:

Kiam oni enkazernigas tiun junularon diboĉan kaj bruegan? kuraĝon, Guizot!

La revolucia etoso dum februaro 1848 inspiras al li jenan solan noton:

La tumulto kaj skandalo kreskas. Francio, se ĝi ne forpelas sian opozicion, estas perdita.

En gazetartikolo de la 19-a de februaro 1849, Prudono cetere rakontis sian „ardan angoron” vide al la eventoj:

Mi ribelis kontraŭ la irado de la eventoj... Mia animo estis agonianta. Mi portis anticipe la pezon de la doloroj de la Respubliko kaj la ŝarĝon de la kalumnioj kiuj estis frapontaj la socialismon. La 21-an de februaro vespere, mi admonis ankoraŭ miajn amikojn ne batali.

Li aldonas ke la pafado de la 23-a „ŝanĝis” liajn „inklinon tuj”. Bonege dirite. Malbonŝance tio ne ĝustas, ĉar la 24-an de februaro li notis en sia taglibro:

La malordo estas nun komplikega... Mi havas nenion por fari en tio... Tio estas terura...

¹¹Ĉi tie kaj en la sekvo, „taglibro” aŭ „taglibroj” por „carnets intimes”. -vl

¹²Kursivigoj de la tradukinto. -vl

¹³Laŭvorte: „empaumeurs de niais”. -vl

kaj ĉar li skribis la 25-an:

Mia korpo estas meze de la popolo, sed mia pensado estas aliie. Mi venis al la punkto, per la evoluo de miaj ideoj, ke mi havas jam preskaŭ neniajn komunajn ideojn kun miaj samtempuloj.

La 26-an de septembro 1848, li vizitis Louis-Napoléon Bonaparte kaj trovis lin „bonintenca: kapo kaj koro kavaliraj”. La indiferenteco pri politiko igis lin skribi kelkajn semajnojn post la ŝtatrenverso: „En neniu loko de la tero, la spirito kiu estas la tuta homo estas tiom libera kiel ĉe vi.” (Temas pri Francio). Kaj plie:

Louis-Napoléon estas, same kiel lia onklo, revolucia diktatoro; sed kun tiu diferenco ke la unua konsulo fermis la unuan fazon de la revolucio, dum la prezidanto malfermas la duan.

La 12-an de januaro 1853, li petas la princon Napoléon pri interveno por la koncesio de la fervojo de Bezançon¹⁴ al Mulhaŭzo. Se la koncesio estas akirita, li konfesas ke li trovas la okazon fari studaĵon pri jena temo: „kontentigi la pravajn postulojn de la proletaro sen tuŝi la rajtojn akiritajn de la burĝa klaso”. Tiu formulo estis proponita al li de la princo dum la interparolado, ĝi ja respondis perfekte al la volo de la imperiestro. Ne tre gravas, en tiuj kondiĉoj, ke li notis samtempe, en sia taglibro, ke Louis-Napoléon estas

malnobla aventuristo, bastardo de princino, diboĉa, kanajla... detruanto de la publikaj liberecoj, uzurpanto de la potenco, ŝtelisto de la ŝtataj financoj, trompisto de la popolo,

ĉar samdate, kiel li diras mem en letero,

Mi estis en la Tuileries, en la Senato, ĉe la Prefektejo, por vidi kelkajn konatulojn kiujn mi havas inter la amikoj de Louis-Napoléon. (10-a de novembro 1852)

Ne multe gravas ke li estis kondamnita al malliberejo pro sia verko pri la *Justeco en la revolucio kaj en la eklezio*¹⁵, malliberejo kiun li ne eniris, kaj je kiu li estis pardonita du jarojn poste, verko kiun li prezentis al la princo Napoléon kiel klarigo de nova principo: „la enkarniĝo en familio elektita de la homrajto aŭ de la racia pensado de la Revolucio”.

¹⁴En la franca: Besançon. -vl

¹⁵Originale: La justice dans la révolution et dans l'Église. Kursivigo de la tradukinto. -vl

Koncerne lian realan sintenon pri la proletaro, „mi predikis la repaciĝon de la klasoj, simbolon de la sintezo de la doktrinoj” (letero de la 18-a de majo 1850); „apogita sur la repacigo de la klasoj” (instrukcioj por la redakto de la gazeto *La Voix du Peuple*), ĝi troviĝas en lia korespondado kiel en lia taglibro:

Mi tediĝas de la malnobla homamaso kaj de la demagogoj... la plej malriĉa klaso, per tio mem ke ĝi estas la plej malriĉa, estas la plej sendanka, la plej envia, la plej malmorala kaj la plej malkuraĝa. (Letero de la 26-a de aprilo 1852)

Kio estas plej postrestinta, plej malprogresema, en ĉiuj landoj, tio estas la amaso, tio estas kion vi nomas demokratio.

Li eĉ iras ĝis riproĉi al la registaro de Napoleono la 3-a „subteni sekrete la laboristojn kontraŭ la mastroj” (16-an de majo 1853); li difinis la tendencojn de la registaro en jena formulo:

Se ni ne povas fondi novan socian hierarĥion per tio ke ni akceptigas nin de la pastroj, de la burĝoj ktp, ni ĵetos la burĝaron kiel voraĵon al la plebo. (27-a de novembro 1853)

Ni juĝis utila memori tiujn faktojn. Ni neniel interpretis: ni lasis Prudonon atesti strikte pri si mem. Ni ne volis malestimigi la homon, sed montri precize kie li poziciigis, kaj forviŝi la legendon laŭ kiu li neniel respondecas pri la agoj kontraŭ la normala disvolviĝo de la laborista movado fare de tiuj kiuj poste deklaris esti liaj disĉiploj. Efektive montriĝas en la korespondaĵoj kaj la taglibro de Prudono ke li tre detale similis al tiuj kiuj inspiriĝis de li.

En sia letero de 1865 al la *Sozial-Demokrat*, Markso memorigis sian juĝon de 1847 kiu resumas ĉion kion Prudono, en sia *Filozofio de la mizero*, montras mem:

Li volas ŝvebi kiel scienculo super la burĝoj kaj proletoj; li estas nur la etburĝo ŝancelata konstante inter la Kapitalo kaj la Laboro.

Kaj Markso komentis sian juĝon de 1847 jene:

Kvankam tiu juĝo sonas akre, mi devas ankoraŭ nuntempe subskribi ĉiun vorton de ĝi. Sed samtempe oni konsideru ke tiam, kiam mi deklaris la libron de Prudono la kodekso de la socialismo kaj de la etburĝo kaj teorie pruvis tion, Prudono estis ankoraŭ akuzita kiel ultrarevoluciulo de politikaj ekonomikistoj kaj de socialistoj

samtempe. Pro tio mi poste neniam partoprenis en la kriaĉado pri lia „*perfido*” de la revolucio. Ne estis lia kulpo, se li, miskomprenata de aliaj kiel komence de li mem, ne plenumis malpravajn esperojn.

Henri MOUGIN.

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la unua germana eldono de la verko de Karlo Markso „La mizero de la filozofio”]

Laŭ: Karl Marx: „Das Elend der Philosophie”, Stutgarto, 1885.

Tiu ĉi verko estiĝis dum la vintro 1846/47, en tempo kiam Markso jam estis gajninta klarecon pri sia nova historia kaj ekonomia koncepto. La ĵus aperinta skribaĵo de Prudono: „Sistemo de la ekonomiaj kontraŭdiroj, aŭ filozofio de la mizero”¹⁶ donis al li la okazon disvolvi tiujn trajtojn esencajn kaj en kontraŭdiro al la opinioj de tiu homo kiu de nun estis okuponta inter la vivantaj francaj socialistoj la plej eminentan rangon. De la tempo, dum kiu la du en Parizo ofte tutajn noktojn tradiskutis pri ekonomiaj demandoj, iliaj vojoj pli kaj pli disiĝis; la verko de Prudono pruvis ke jam nun troviĝis netranspontebla abismo inter la du; tiam maleblis ignori tion; kaj tiel Markso konstatis la neripareblan disiĝon en sia respondo.

La ĉioma juĝo de Markso pri Prudono troviĝas en la eseo sekvanta al tiu ĉi antaŭparolo¹⁷, aperinta en la berlina „Social-Democrat”, n-roj 16, 17 kaj 18 de 1865. Tiu estis la sola artikolo kiun Markso skribis en tiu gazeto; la rapide aperintaj provoj de s-ro von Schweitzer, direkti ĝin en la feŭdan kaj registaran kurson, devigis nin publike anonci la ĉesigon de nia kunlaborado jam post kelkaj semajnoj.

Por Germanio tiu ĉi verko havas ĝuste en la nuna momento gravecon kiun Markso mem neniam antaŭsentis. Kiel li povintus scii ke, farante baton kontraŭ Prudono, li trafis tiun Rodbertus, kiun li eĉ laŭ la nomo ne konis, la dion de la nuntempaj strebuloj?

Ne estas ĉi tie la loko detali la rilaton de Markso kaj Rodbertus; pri tio prezentigis certe baldaŭ okazo al mi. Ĉi tie nur tiom, ke, kiam

¹⁶Originale Proudhon: „Système des contradictions économiques, ou philosophie de la misère”. -vl

¹⁷Ĝi aperas en Esperanta traduko en tiu ĉi libro p. 187–195. -vl

Rodbertus akuzas Markson ke tiu „prirabis” lin kaj tre bele uzis lian verkon „Zur Erkenntniß [Pri la ekkono]” „en sia «Kapitalo» sen citi” lin, li ne povis reteni sin je kalumnio kiu nur klarigeblas per la afliktiĝo de la miskonata multjarulo kaj per la notinda nescio pri aferoj kiuj okazas ekster Prusujo¹⁸, kaj nome pri la socialista kaj ekonomia literaturo. Markso neniam vidis tiujn akuzojn nek la menciitan verkaĵon de Rodbertus; li konis de Rodbertus entute nur la tri „Sociajn leterojn”, kaj antaŭ tiujn tute ne antaŭ 1858 aŭ 1859.

Kun pli da praveco Rodbertus asertas en tiuj leteroj ke li estis malkovrinta la „konstituitan valoron de Prudono” jam antaŭ Prudono; ĉe kio li tamen erare flatas sin esti la unua malkovrinto. Ĉiukaze li do estas kune kritikita en nia verko, kaj tio devigas min mallonge pritrakti lian „fundamentan” verketon „Pri la ekkono de nia ŝtat-ekonomia situacio”¹⁹, 1842, nome laŭ tio ke ĝi aperigas, krom la ankaŭ en ĝi (ree senkonscie) entenata Weitling-a komunismo ankaŭ anticipaĵojn de Prudono.

Tiu parto de la moderna socialismo, egale de kia tendenco, kiu eliras el la burĝa politika ekonomio, daŭrigas preskaŭ senescepte la valorteorion de Ricardo. La du teoremojn kiujn Ricardo deklaras en 1817 jam komence de siaj „Principles”: 1. ke la valoro de ĉia varo estas determinata sole nur de la laborkvanto necesa por ĝia produktado, kaj 2. ke la produkto de la ĉioma socia laboro estas dividata inter la tri klasoj de terposedantoj (rento), kapitalistoj (profito) kaj laboristoj (salajro), tiuj du teoremoj estis jam ekde 1821 en Anglio uzataj por socialismaj konsekvencoj, kaj parte kun tia akreco kaj decidemo ke tiu preskaŭ malaperinta literaturo grandparte remalkovrita nur de Markso restis nesuperita ĝis la apero de la „Kapitalo”. Pri tio alian fojon. Se Rodbertus do siavice 1842 tiris socialismajn konsekvencojn el tiuj teoremoj, tio estis por tiama germano certe tre granda paŝo antaŭen, sed povis validi kiel nova malkovro, se entute, nur por Germanio. Ke tiaj aplikoj de la teorio de Ricardo estis tute ne novaj, tion Markso pravas kontraŭ Prudono, kiu suferis je simila fantazio.

„Kiu nur iom sufiĉe konas la evoluon de la politika ekonomio en Anglio, tiu scias ĉiukaze ke preskaŭ ĉiuj socialistoj de tiu lando, je diversaj epokoj, proponis la *egalecan* (t.e. socialisman) aplikon de la

¹⁸(en Germanio) -vl

¹⁹Originale: „Zur Erkenntniß unsrer staats-wirthschaftlichen Zustände”. -vl

teorio de Ricardo. Ni povus citi al s-ro Prudono: «La politika ekonomio» de Hopkins, 1822; William Thompson: «An Inquiry into the Principles of the Distribution of Wealth, most conducive to Human Happiness», 1824; T. R. Edmonds: «Practical, Moral and Political Economy», 1828, ktp ktp kaj ankoraŭ kvar paĝojn da kromaj kajtielploj. Ni lasu paroli nur unu anglan komuniston: Bray, en sia notinda verko «Labour's Wrings and Labour's Remedy», Leeds 1839.” Kaj jam nur la ĉi tie donitaj citaĵoj el Bray forigas bonan parton de la antaŭrangeo pretendata de Rodbertus.

Tiam Markso ankoraŭ neniam eniris la legoĉambron de la Brita Muzeo. Krom la parizajn kaj bruselajn bibliotekojn, krom miajn librojn kaj eltiraĵojn, dum sessemajna vojaĝo al Anglio kiun ni faris kune en la somero 1845, li trarigardis nur la librojn haveblajn en Manĉestro. La koncerna literaturo estis do en la kvardekaj jaroj tute ne same nealirebla kiom nuntempe. Se ĝi restis tamen nekonata de Rodbertus, tio estis ŝuldata nur al lia prusa lokbariteco. Li estas la vera fondinto de la specife prusa socialismo kaj nun estas fine agnoskita tia.

Tamen ankaŭ en sia amata Prusujo Rodbertus ne restis neĝenata. 1859 aperis en Berlino de Markso „Zur Kritik der Politischen Ökonomie, erstes Heft [Pri la kritiko de la politika ekonomio, unua kajero]”. En ĝi li emfazas inter la objetoj de la ekonomikistoj kontraŭ Ricardo la duan kontraŭargumenton:

„Se la interŝanĝvaloro de produkto estas egala al la labortempo entenata en ĝi, tiam la interŝanĝvaloro de labortago estas egala al ties produkto. Aŭ la salajro devas egali al la produkto de la laboro. Nu, la malo estas la kazo.” Al tio la sekva noto: „Tiu kontraŭargumento farita de la ekonomika flanko²⁰ kontraŭ Ricardo estis poste uzata de la socialista flanko. Kondiĉe ke la la formulo teorie ĝustas, oni akuzis la praktikon esti kontraŭdira al la teorio kaj oni petis la burĝan socion tiri praktike la supozatajn konkludojn de sia teoria principo. Tiel almenaŭ la anglaj socialistoj turnis la formulon de Ricardo pri la interŝanĝvaloro kontraŭ la politikan ekonomion.” En la sama noto oni referencis la Marksan „Misère de la philosophie [Mizero de la filozofio]”, kiu tiam ankoraŭ haveblis ĉie en la librokomerco.

Rodbertus havis do sufiĉe da okazo por certiĝi mem ĉu liaj

²⁰Ĉe Markso: „de la burĝa ekonomika flanko”.

malkovroj de 1842 estis vere novaj. Anstataŭ tio li ĉiam ree anoncas ilin kaj konsideras ilin tiom senkomparaj ke eĉ ne venas al li la ideo ke Markso povintus fari siajn konkludojn el Rikardo same bone kiel li, Rodbertus, mem. Tute malebla! Markso „prirabis” lin – lin, al kiu la sama Markso donis ĉian eblecon certiĝi kiom longe antaŭ ili ambaŭ tiuj konkludoj, almenaŭ en la kruda formo, kiun ili havas ankoraŭ ĉe Rodbertus, estis jam elparolitaj en Anglujo!

La plej simpla socialisma praktika apliko de la teorio de Ricardo estas ja la supre menciita. Ĝi kondukis en multaj okazoj al kompreno de la origino kaj de la naturo de la plusvaloro kiuj iris multe pli antaŭen ol Ricardo; tiel interalie ĉe Rodbertus. Aparte de tio ke li tiurilate liveras nenie ion novan kio ne estus dirita jam antaŭ li almenaŭ same bone, lia prezentado kiel tiu de liaj antaŭuloj suferas je tio ke li transprenas senkritike la ekonomiajn kategoriojn – laboro, kapitalo, valoro ktp – en la kruda formo gluanta ĉe la eksteraĵo, kian li heredis de la ekonomikistoj, sen priesplori ilian enhavon. Per tio li ne nur fortranĉas al si ĉian vojon por plia evoluo – male al Markso, kiu unue el tiuj teoremoj nun 64 jarojn ripetatajn faris ion –, sed li ankaŭ malfermas al si la rektan vojon al utopio, kiel montriĝos.

La supra praktika apliko de la teorio de Ricardo, ke al la laboristoj, ĉar solaj realaj produktantoj, apartenas la tuta socia produktaĵo, *ilia* produktaĵo, kondukas rekte en la komunismon. Sed ĝi estas, kiel Markso ankaŭ aludas en la supre menciita teksto, ekonomie formale malĝusta, ĉar ĝi estas simple apliko de moralo al la ekonomio. Laŭ la leĝoj de la burĝa ekonomio la plej granda parto de la produktaĵo ne apartenas al la laboristoj kiuj produktis ĝin. Se ni nun diras: tio estas malĝusta, tio devas ne esti, tiam tio unue tute ne koncernas la ekonomion. Ni diras nur, ke tiu ekonomia fakto kontraŭdiras nian moralan senton. Markso pro tio neniam bazis siajn komunismajn postulojn sur tio, sed sur la nepra, antaŭ niaj okuloj ĉiutage pli kaj pli okazanta disfalo de la kapitalisma produktadmaniero; li diras nur ke la plusvaloro konsistas el nepagata laboro, kio estas simpla fakto. Sed kio estas ekonomie formale malĝusta, povas tamen esti mondhistorie ĝusta. Se la morala konscio de la amaso deklaras ekonomian fakton, kiel siatempoj la sklavecon aŭ la servuton maljusta, tiam tio estas pruvo ke la fakto mem jam malaktualiĝis, ke aperis aliaj ekonomiaj faktoj pro kiuj tiuj fariĝis neelteneblaj kaj neteneblaj. Malantaŭ la formala ekonomia malĝusteco povas do kaŝiĝi tre vera ekonomia enhavo. Pli detaliĝi la gravecon kaj

historion de la plusvalor-teorio ne estas ĉi tie taŭga loko.

Sed apud tio eblas tiri el la valorteorio de Ricardo ankoraŭ aliajn konkludojn kaj oni tiris ilin. La valoro de la varoj estas determinata de la laboro necesa por ilia produktado. Sed okazas ke en tiu ĉi malbona mondo la varoj estas vendataj jen super, jen sub sia valoro, kaj tio ne nur pro fluktuo de konkurenco. La profitkvoto havas same la tendencon kompensiĝi por ĉiuj kapitalistoj sur la saman nivelon, kiel la varprezoj havas la tendencon, pere de postulo kaj propono, reduktiĝi sur la laborvaloron. Sed la profitkvoto kalkuliĝas laŭ la ĉioma kapitalo investita en industria entrepreno. Ĉar en du diversaj komercaj branĉoj la jarprodukto povas enkorpiĝi samajn laborkvantojn, do prezenti samajn valorojn, ankaŭ la salajro en ambaŭ povas esti esti same alta, sed la pruntitaj kapitaloj en unu branĉo duoble aŭ trioble altaj, kaj ofte estas tiaj, ol en la alia, pro tio la valorleĝo de Ricardo, kiel Ricardo mem jam malkovris, eniras en kontraŭdiron kun la leĝo de la sama profitkvoto. Se la produktoj de ambaŭ branĉoj estas vendataj je siaj valoroj, tiam la profitkvotoj ne povas esti samaj; sed se la profitkvotoj estas samaj, tiam la produktoj de ambaŭ branĉoj ne vendeblas ĝenerale je siaj valoroj. Ni renkontas do ĉi tie kontraŭdiron, antinomion de du ekonomiaj leĝoj; la praktika solvo laŭ Ricardo (ĉap. I, sekcioj 4 kaj 5) fariĝas ĝenerale favore al la profitkvoto surkoste de la valoro.

Sed jen la valordeterminado de Ricardo, malgraŭ siaj suspektaj ecoj, havas flankon kiu fariĝas al la brava burĝo tre kara. Ĝi alvokas kun nerezistebla forto lian justecosenton. Justeco kaj egaleco de la rajtoj, tio estas bazaj pilieroj, sur kiuj la burĝo de la dekokaj kaj deknaŭa jarcento ŝatus konstrui sian socian konstruaĵon sur la ruinoj de la feŭdaj maljustoj, malegalecoj kaj privilegioj. Kaj la determinado de la varvaloro pere de laboro kaj libera interŝanĝo de la laborproduktoj inter samrajtaj varposedantoj, kiu okazas laŭ tiu valormezuro, tio estas, kiel Markso jam pruvis, la realaj fundamentoj, sur kiuj konstruiĝis la tuta politika, jura kaj filozofia ideologio de la moderna burĝaro. Post kiam estas donita la ekkono, ke la laboro estas la mezuro de la varvaloro, ankaŭ la pli bona sento de la brava burĝo devas senti sin profunde vundita de la malboneco de mondo kiu ja agnoskas la bazan leĝon de justeco laŭ ĝia nomo, sed laŭ la fakto ŝajnas ĉiunmomente senĝene ŝovi ĝin flanken. Kaj nome la etburĝo, kies honesta laboro – eĉ se ĝi estas nur tiu de liaj lernantoj kaj submajstroj – estas ĉiutage pli senvalorigata pro la konkurenco de la amasproduktado kaj de la maŝinoj, nome la

etproduktisto devas sopiri socion en kiu la interŝanĝo de la produktoj laŭ ilia laborvaloro fariĝas fine plena kaj senescepta vero; alivorte: li devas sopiri socion, en kiu unuopa leĝo de la varproduktado validas senescepte kaj komplete, sed en kiu la kondiĉoj estas forigitaj, sub kiuj ĝi povas validi entute, nome la ceteraj leĝoj de la varproduktado kaj plue de la kapitalisma produktado.

Kiom profunde tiu utopio estas fundita en la pensmaniero de la moderna – vera aŭ idea – etburĝo, tion pruvas la fakto ke ĝi estis jam 1831 sisteme disvolvita de John Grey, en la tridekaj jaroj en Anglio praktike provita kaj teorie priparolaĉata larĝe kaj detale, 1842 de Rodbertus en Germanio, 1846 de Prudono en Francio proklamita kiel plej nova vero, ankoraŭ 1871 de Robertus refoje anoncita kiel solvo de la sociala demando kaj kvazaŭ kiel lia socia testamento, kaj 1884 trovas denove adeptojn ĉe la strebularmeo, kiu kun mencio de la nomo Rodbertus pretas ekspluati la prusan ŝtatsocialismon.

La kritikon de tiu utopio Markso liveris tiom elĉerpe kontraŭ Prudono kiel kontraŭ Grey (vidu la suplementon de tiu ĉi verko), ke mi povas limiĝi ĉi tie je kelkaj rimarkoj pri la specife Rodbertus-a formo de ĝia argumentado kaj elpentrado.

Kiel jam dirite: Rodbertus transprenas la tradiciajn ekonomiajn difinojn tute en la formo en kiu ili estis transdonitaj al li de la ekonomikistoj. Li faras eĉ ne la plej etan provon ekzameni ilin. Valoro estas por li

„la valido de aĵo kontraŭ la ceteraj laŭ kvanto, tiu valido komprenata kiel mezuro”.

Tiu, milde dirite, ekstreme malzorga difino donas al ni en la plej bona kazo imagon pri tio kiel la valoro proksimume aspektas, sed absolute ne diras kio ĝi estas. Sed ĉar tio estas ĉio kion Rodbertus scias diri al ni pri la valoro, estas nekompreneble ke li serĉas valormezurilon ekster la valoro. Post kiam li sur tridek paĝoj, per la forto de abstrakta pensado de la sinjoro Adolph Wagner, tiom senfine admirata, pelmele kunmiksas uzvaloron kaj interŝanĝvaloron, li venas al la rezulto ke ne ekzistas reala mezuro kaj ke oni devas kontentiĝi per surrogata mezuro. Tian povas doni la laboro, sed nur tiam kiam produktoj de sama laborkvantoj interŝanĝiĝas ĉiam kun produktoj de samaj laborkvantoj; ĉu per tio ke tio „estas jam per si la kazo aŭ ĉu disponoj estas farataj” kiuj certigas tion. Valoro kaj laboro restas do sen ia ajn konkreta

interrilato, kvankam la tuta unua ĉapitro estas uzata por klarigi al ni ke kaj kial la varoj „kostas laboron” kaj nenion ol laboron.

La laboro siavice estas senkritike transprenita en la formo en kiu ĝi aperas ĉe la ekonomikistoj. Kaj eĉ ne tio. Ĉar, kvankam li atentigas per du vortoj pri la intensodiferencoj de la laboro, la laboro estas tamen tute ĝenerale menciita kiel „kosta”, do valormezuranta, sendistinge ĉu ĝi estas aŭ ne elspezata sub la normalaj sociaj mezumaj kondiĉoj. Ĉu la produktantoj aplikas dek tagojn por produktado de produktoj kiuj produktblas en unu tago, aŭ nur unu tagon, ĉu ili aplikas la plej bonajn aŭ la plej malbonajn ilojn, ĉu ili uzas sian labortempon por produktado de socie necesaj artikloj kaj en la socie necesa kvanto, aŭ ĉu ili pretigas tute nedeziratajn artiklojn aŭ deziratajn artiklojn super aŭ sub la bezono – pri ĉio ĉi li ne parolas: laboro estas laboro, produkto de sama laboro devas interŝanĝi kontraŭ produkto de sama valoro. Rodbertus, kiu alie ĉiam, ĉu oportune aŭ ne, pretas meti sin sur la nacian starpunkton kaj el la altaĵo de la ĝenerale socia observejo superrigardi la kondiĉojn de la unuopaj produktantoj, timeme evitas tion ĉi tie. Kaj nur pro tio, ĉar li jam ekde la unua linio de sia libro rekte alstiras la utopion de la labormono kaj ĉia ekzamenado de la laboro en ĝia valoriga eco devus lanĉi al li nepaseblajn rokblokojn en la vojon. Lia instinkto estis ĉi tie signife pli forta ol la forto de la abstrakta pensado, kiu cetero malkovreblass ĉe Rodbertus nur per la plej konkreta senpripenseco.

La transiro al la utopio estas farita kvazaŭ per manturno. La „dispozicioj” kiuj certigas la varvaloron laŭ laborvaloro kiel senescepta regulo, ne faras malfacilaĵojn. La ceteraj utopiistoj de tiu tendenco, de Gray ĝis Prudono, ĝislace penadas elsagaci sociajn instituciojn kiuj plenumu tiun celon. Ili almenaŭ provas solvi la ekonomian problemon ekonomie, per agado de la interŝanĝantaj varposedantoj mem. Rodbertus havas multe pli facilan ludon. Kiel bona pruso li alvokas la ŝtaton: dekreto de la ŝtatpotenco ordonas la reformon.

Per tio la valoro estas nun feliĉe „konstituita”, sed tute ne la antaŭrangeo de tiu konstituado pretendita de Rodbertus. Male, Gray kiel Bray – apud multaj aliaj – ĝissate ripetis ofte kaj longan tempon antaŭ Rodbertus tiun ideon: la pian deziron je disponoj per kiuj la produktoj en ĉiuj cirkonstantoj kaj ĉiam interŝanĝigu nur je sia laborvaloro.

Post kiam la ŝtato tiamaniere konstituis la valoron – almenaŭ de

parto de la produktoj, ĉar Rodbertus estas modesta –, ĝi elspezas sian laborpapermonon, donas el tio al la industriaj kapitalistoj antaŭpagojn, per kiuj ili pagas la salajron al la laboristoj, kiuj, per la ricevita laborpapermono aĉetas la produktojn kaj tiel peras la refluron de la papermono al ĝia elirpunkto. Kiom mire bele tio okazas, tion ni aŭdu de Rodbertus mem.

„Koncerne la duan kondiĉon, la necesa dispono, ke la en la slipo atestita valoro vere ekzistu en la cirkulado, estas farata per tio ke nur tiu, kiu reale liveras produkton, ricevas slipon en kiu la laborkvanto estas precize indikita, per kiu la produkto estas farita. Kiu liveras produkton de du tagoj da laboro, ricevas slipon sur kiu staras „du tagoj”. Per la preciza observado de tiu regulo ĉe la eldono, ankaŭ tiu dua kondiĉo devas esti nepre plenumata. Ĉar pro tio ke laŭ nia antaŭkondiĉo la reala valoro de la havaĵoj ĉiam kongruas kun tiu laborkvanto kiun ilia produktado kostis, kaj tiu laborkvanto posedas sian mezurilon en la kutima tempodivido, tial iu kiu liveras produkton al kiu du tagoj estas aplikitaj, se li ricevas la ateston de du tagoj, li ankaŭ ne ricevas ateston aŭ atribudadon de pli aŭ malpli da valoro ol li fakte liveris; – kaj ĉar krome *nur* tiu ricevas tian ateston kiu reale liveris produkton en la cirkuladon, tial estas ankaŭ certa, ke la valoro indikita sur la slipo ekzistas por kontentigo de la socio. Se oni imagas nun la etendiĝon de la labordivido kiom ajn granda, tiam, se tiu regulo estas precize observata, *la sumo de la ekzistanta valoro devas esti precize egala al la sumo de la atestita valoro*. Sed ĉar la sumo de la atestita valoro estas ankaŭ la sumo de la atribuita valoro, tial ankaŭ tiu devas nepre kongrui kun la ekzistanta valoro, ĉiuj pretendoj kontentigataj kaj la likvidado ĝuste perata.” (p. 166, 167)

Se Rodbertus havis ĉiam la malbonŝancon tro malfruiĝi kun siaj novaj malkovroj, li havas almenaŭ ĉifoje la meriton je *unu* speco de originaleco: En tiu infanece naiva, travideb la, mi emus diri pomereneca²¹ formo, neniu el liaj konkurantoj havas la malsaĝecon elparoli la malsaĝaĵon de la utopio de labormono. Ĉar por ĉiu paperslipo liveriĝis al ĝi kongrua valorobjekto kaj neniu valorobjekto estas donita krom kontraŭ kongrua paperslipo, tial la sumo de la paperslipoj devas esti ĉiam kovrita per la sumo de la valorobjektoj; la kalkulo ĝustas sen la plej eta resto, ĝi precizas ĝis la laborsekundo, kaj neniu registar-ĉefkasa-

²¹de Pomero, regiono en nordorienta Germanio, tiam konata pro sia socia postrestinteco. -vl

rentofic-kalkulisto griziĝinta en la servo povas pruvi la plej etan kalkuleraron. Kion oni volas plu?

En la hodiaŭa kapitalisma socio ĉiu industria kapitalisto produktas memdecide, ion, kiel kaj kiom li volas. Sed la socia bezono restas al li nekonata grando, koncerne la kvaliton, la specon de la bezonataj objektoj kaj ties kvaliton. Tio, kio hodiaŭ ne sufiĉe rapide liverblas, morgaŭ proponas multe super la bezono. Malgraŭ tio, la bezono estas fine, tiel aŭ alie, bone aŭ malbone, kontentigata, kaj la produktado fine laŭas ĝenerale la bezonatajn objektojn. Kiel okazas tiu kompensado de la kontraŭdiro? Per la konkurenco. Kaj kiel la konkurenco sukcesas tiun solvon? Simple, per tio ke ĝi malplivalorigas tiujn spece aŭ kvante por la momenta socia bezono neuzeblajn varojn sub ilian laborvaloron kaj per tiu ĉirkaŭvojo sentigas al la produktistoj ke ili produktis aŭ entute neuzeblajn produktojn aŭ en si mem uzeblajn artiklojn en neuzebla, superflua kvanto. El tio sekvas du punktoj:

Unue, ke la konstantaj devojigoj de la varprezoj for de la varvaloroj estas la nepra kondiĉo sub kiu kaj pro kiu sole la varvaloro povas estiĝi. Nur per la fluktuado de la konkurenco kaj per tio de la varprezoj la valorleĝo de la varproduktado trudiĝas, la determinado de la varvaloro per la socie necesa labortempo fariĝas realo. Ke ĉe tio la aperformo de la valoro, la prezo, ĝenerale aspektas iomete alie ol la valoro kiun ĝi aperigas, tiun sorton la valoro dividas kun la plej multaj sociaj rilatoj. La reĝo aspektas plej ofte ankaŭ tute alie ol la monarĥio kiun li reprezentas. En socio de interŝanĝantaj varproduktantoj voli estiĝi la valordeterminadon per la labortempo, per tio ke oni malpermesas la konkurencon, estiĝi tiun valordeterminadon per premo sur la prezon en la sola maniero en kiu ĝi entute estigeblas, signifas do nur pruvi ke oni alproprigis al si la kutiman utopiisman malrespekton de la ekonomiaj leĝoj almenaŭ sur tiu kampo.

Due: Per tio ke la konkurenco ene de socio de interŝanĝantaj varproduktantoj trudas la valorleĝon de la varproduktado, ĝi ĝuste per tio trudas la sub la cirkonstancoj sole eblan organizadon kaj ordon de la socia produktado. Nur pere de la malplivalorigo aŭ trovalorigo de la produktoj la unuopaj varproduktistoj puŝiĝas per la nazo sur la respondo kion kaj kiom da ĝi la socio bezonas aŭ ne bezonas. Sed ĝuste tiun solan regulilon la utopio kunreprezentata de Rodbertus volas forigi. Kaj se ni demandas nin nun, kian garantion ni havas ke de ĉiu produkto produktiĝas la necesa kvanto kaj ne pli, ke ni ne suferas malsaton je

greno kaj viando, dum ni sufokiĝas en betsukero kaj dronas en terpombrando, ke ni ne havas sufiĉe da pantalonoj por kovri nian nudajon dum la pantalonbutonoj svarmas milionope – tiam Rodbertus montras al ni triumfe sian belan kalkulon, laŭ kiu por ĉiu superflua pundo da sukero, por ĉiu nevendita barelo da brando, por ĉiu nealkudrebla pantalonbutono la ĝusta papero estas eldonita, kalkulon kiu precize ĝustas sen resto, laŭ kiu „ĉiuj pretendoj estas kontentigataj kaj la likvidado ĝuste perata”. Kaj kiu ne kredas tion, tiu turnu sin al la registar-ĉefkaso-rentoficejkalkulisto X en Pomerio, kiu kontrolis la kalkulon kaj deklaris ĝin ĝusta kaj kiu, ĉar neniam kaptita ĉe kaseraro, estas tute kredinda.

Kaj nun oni rigardu la naivecon per kiu Rodbertus volas forigi la industriajn kaj komercajn krizojn pere de sia utopio. Ekde kiam la varproduktado alprenis mondmerkatajn dimensiojn, la kompensado inter la unuopaj produktistoj produktantaj private²² kaj la laŭ kvanto kaj kvalito de la bezono pli aŭ malpli nekonata merkato, por kiu ili produktas, foriĝas per mondmerkata fulmotondro, komerca krizo.²³ Se oni malpermesas al la konkurenco komuniki al la unuopaj produktistoj, per kresko aŭ malkresko de la prezoj, la staton de la mondmerkato, tiam oni komplete vindas al ili la okulojn. Aranĝi la varproduktadon tiel ke la produktistoj povas jam nenion ekscii pri la stato de la merkato por kiu ili produktas – tio estas ja kuraco por la krizmalsano pri kiu la doktoro Ferbarbo²⁴ envidus Rodberton.

Oni komprenas nun kial Rodbertus determinas la valoron de la varo simple per „laboro” kaj allasas maksimume diversajn intensogradojn de la laboro. Se li esplorintus per kio kaj kiel la laboro kreas valoron kaj pro tio ankaŭ determinas kaj mezuras, li malkovrus la socie necesan

²²zwischen den für Privatrechnung produzierenden Einzelproduzenten ... – laŭvorte: inter la unuopaj produktistoj produktantaj je privata fakturo. – vl

²³Almenaŭ tiel okazis ĝis antaŭ nelonge. Ekde kiam la mondmerkata monopolito de Anglio estis pli kaj pli rompita per la partopreno de Francio, Germanio kaj ĉefe Usono en la mondmerkato, nova kompensadformo ŝajnas trudiĝi. La periodo de ĝenerala prospero, kiu antaŭas la krizon, daŭre ne volas veni. Se ĝi tute restas for, tiam la kronika stagnado devus fariĝi la normala stato de la moderna industrio, kun nur malgrandaj flukтуаĵoj.

²⁴La doktoro Ferbarbo (Doktor Eisenbart) estas en Germanio konata kiel eminenta fuŝkuracisto. –vl

laboron, necesan por la unuopa produkto, rilate aliajn samspecajn produktojn kiel ankaŭ rilate la socian ĉiombezoon. Per tio li venas al la demando: kiel okazas la adaptiĝo de la produktado de la unuopaj varproduktistoj al la socia ĉiombezono; kaj per tio lia tuta utopio fariĝus neebla. Li ĉifoje preferis efektive „abstrakti”, nome tion kio estis ĝuste la ĉefaĵo.

Fine ni nun venas al la punkto en kiu Rodbertus proponas al ni vere ion novan: ion kio distingas lin inter liaj multnombraj kamaradoj de la labormon-interŝanĝ-ekonomio. Ili ĉiuj postulas tiun interŝanĝ-reĝimon cele al forigo de la ekspluatado de la dunglaboro per la kapitalo. Ĉiu produktanto ricevu la plenan laborvaloron de sia produkto. En tio ili ĉiuj unuanimas, de Gray ĝis Prudono. Tute ne, diras Rodbertus. La dunglaboro kaj ĝia ekspluatado restu.

Unue la laboristo en nenia pensebla socistato povas ricevi la tutan valoron de sia produkto por konsumado; el la produktita fonduso ĉiam kovrendas ankaŭ vico da ekonomie neproduktivaj, sed necesaj funkcioj, do ankaŭ la koncernataj homoj devas esti kunprizorgataj. Tio ĝustas nur tiom longe kiom la nuna labordivido validas. En socio kun devo je ĝenerala produktiva laboro, kiu ja ankaŭ „penseblas”, tio forfalas. Sed restus la neceso de socia rezervo- kaj akumulad-fonduso, kaj pro tio ankaŭ tiam la laboristoj, t.e. ĉiuj, restus en posedo kaj ĝuo de sia ĉiomprodukto, sed ne ĉiu individua ĝuus sian „plenan laborprodukton”. La ceteraj labormon-utopiistoj ne pretervidis la konservadon de ekonomie neproduktivaj funkcioj el la laborprodukto. Sed ili igas la laboristojn imposti sin mem tra la kutima demokratia vojo, dum Rodbertus, kies tuta socialreformo de 1842 estis konceptita por la tiama prusa ŝtato, metas la tutan aferon en la bontrovon de la burokratio kiu determinas por la laboristo lian parton je lia propra produkto desupre kaj moŝtfavore venigas ĝin al li.

Sed due ankaŭ la grundrento kaj la profito restu senŝanĝaj. Ĉar ankaŭ la grundposedantoj kaj industriaj kapitalistoj plenumas certajn socie utilajn aŭ eĉ necesajn, eĉ se ekonomie neproduktivajn funkciojn kaj ricevas en formo de grundrento kaj profito kvazaŭ salajron por tio – opinio, kiel konate, eĉ 1842 tute ne nova. Envere ili ricevas nun multe tro por la malmulto kion ili, kaj sufiĉe malbone, faras, sed Rodbertus ja bezonas, almenaŭ por la venontaj 500 jaroj, privilegiitan klason, kaj tial la nuna kvoto de la plusvaloro, por esprimi min ĝuste, devas resti, sed ne rajtas kreski. Tiun nunan kvoton de plusvaloro Rodbertus taksas je 200

elcentoj, t.e. ĉe dekduhora laboro tage la laboristo ricevu la ateston ne de 12 horoj, sed nur de 4, kaj la valoro produktita en la ceteraj 8 horoj estu dividita inter grundposedanto kaj kapitalisto. La laboratestoj de Rodbertus mensogas do rekte. Oni devas tamen esti posedanto de pomera kavalirbieno por iluzii ke laborista klaso toleros tion: labori dum dek-du horoj por ricevi la ateston de kvar laborhoroj. Se oni tradukas la artifikon de la kapitalisma produktado al tiu naŭva lingvo, en kiu ĝi aperas kiel malkaŝa rabo, tiam oni malebligas ĝin. Ĉiu slipo donita al la laboristo estus rekta instigo al ribelo kaj estus kazo por la § 110 de la germana punleĝaro. Oni devas esti neniam vidinta alian proletaron ol la tagsalajran proletaron ankoraŭ fakte kaptitan en duona servuteco de pomera kavalirbieno, kie bastono kaj vipo regas kaj kie ĉiuj belaj virinoj de la vilaĝo apartenas al la haremo de la moŝto, por imagi ke oni povas proponi tian impertinentaĵon al la laboristoj. Sed niaj konservativuloj estas ja niaj plej grandaj revoluciuloj.

Sed se niaj laboristoj estas sufiĉe mildanimaj por kredi la blufon ke dum la tuta dekduhora peza laboro ili laboris reale nur kvar horojn, tiam ili ricevu kompanse la garantion ke ilia parto je ilia propra produkto estu eterne ne sub triono. Tio estas efektive estontomuziko sur infantrumpeto kaj ne inda perdi vorton pri tio. Laŭ tio ke Rodbertus pri la labormon-interŝanĝ-utopio proponas ion novan, tio nova estas simple infaneca kaj staras multe sub la laboraĵoj de liaj multnombraj kolegoj antaŭ kaj post li.

Por la tempo en kiu „Zur Erkenntniß ktp” de Rodbertus aperis, ĝi estis nepre grava libro. Lia daŭrigo de la valorteorio de Ricardo en unu direkto estis promesplena komenco. Eĉ se ĝi estis nova nur por li kaj por Germanio, ĝi staras tamen ĝenerale sur la sama nivelo kiel la laboraĵoj de liaj pli bonaj anglaj antaŭuloj. Sed ĝi estis ja nur komenco, el kiu nur per ĝisfunda kaj kritika plia laboro atingeblus vera gajno por la teorio. Sed tiun daŭrigon li fortranĉis mem per tio ke li tuj komence aliris la daŭrigon de Ricardo ankaŭ en la dua direkto, la direkto de la utopio. Per tio li perdis la unuan kondiĉon de ĉia kritiko – la senpartiecon. Li eklaboris direkte al antaŭdifinita celo, li fariĝis tendencekonomikisto. Jam kaptita de sia utopio, li baris al si ĉiajn eblecojn de progreso en la scienco. De 1842 ĝis sia morto li turnas sin en rondo, ripetis ĉiam la samajn jam en la unua laboraĵo eldiritajn aŭ aluditajn pensojn, sentas sin miskomprenata, opinias sin prirabita, kie estis nenio rabebla, kaj fine baris sin ne senintence kontraŭ la kompreno ke li envere malkovris ja

nur ion jam delonge malkovritan.

* * *

Ĉe kelkaj teksteroj la traduko devias de la presita franca originalo. Tio baziĝas sur la manskribaj ŝanĝoj de Markso, kiuj eniros ankaŭ en la preparatan novan francan eldonon.

Apenaŭ necesas atentigi ke la esprimmaniero uzata en tiu ĉi verko ne tute kongruas kun tiu de la „Kapitalo”. Ekz-e ĉi tie la aŭtoro parolas ankoraŭ pri *laboro* kiel varo, pri aĉeto kaj vendo de la laboro, anstataŭ la *laborforto*.

Kiel aldonajo en tiu ĉi eldono krome troviĝas: 1-e tekstero el la Marksa laboraĵo „Pri la kritiko de la politika ekonomio”, Berlino 1859, pri la unua utopio de labormon-interŝanĝo de John Cray, kaj 2-e traduko de la Brusela parolado (1848) de Markso pri la liberkomerco, kiu apartenas al la sama evoluperiodo de la aŭtoro kiel la „Mizero”.²⁵

Londono, la 23-an de oktobro 1884

Frederiko Engelso

²⁵La du menciitaj verkoj de Markso ne estas aldonitaj al tiu ĉi Esperanta eldono; la dua aperis aparte ĉe MAS:

Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-02-1 (7,50 €). -vl

Frederiko Engelso: Pri la hispana eldono de Karlo Markso: „Mizero de la filozofio” [Letero al José Mesa]

Laŭ: „Miseria de la filosofia”, Madrido 1891.

El la hispana.

Esperantigo el la germana teksto.

Londono, la 24-an de marto 1891

Kara Mesa!

Kun granda plezuro ni eksciis el via letero de la 2-a de tiu ĉi monato ke la publikigo de via hispana traduko de la „Mizero de la filozofio” de Markso estas proksima. Kompreneble ni donas al tiu entrepreno volonte nian konsenton. Ĝi ne maltrafos tre favore efiki al la evoluo de la socialismo en Hispanio.

La Prudona teorio ĝisfunde detruita de la Marksa libro sendube malaperis el la scenejo post la disrompo de la Pariza Komunumo. Sed ĝi konsistigas daŭre la grandan arsenalon el kiu la burĝaj radikaluloj kaj la pseŭdosocialistoj de Okcidenteŭropo depruntas siajn frazojn por endormigi la laboristojn. Kaj ĉar la laboristoj de ĝuste tiuj landoj heredis de siaj antaŭuloj similajn Prudonajn frazaĵojn, ĉe multaj el ili la frazeologio de la radikaluloj daŭre trovas resonon. Tio estas la kazo en Francio, kie la solaj prudonistoj, kiuj tie ankoraŭ ekzistas, estas la burĝaj radikaluloj aŭ respublikanoj kiuj nomas sin socialistoj. Kaj se mi ne eraras, ankaŭ vi en viaj Cortes kaj via gazetaro havas tiajn respublikanojn kiuj nomas sin socialistoj, ĉar ili vidas en la prudonaj ideoj tute taŭgan rimedon por kontraŭmeti al la aŭtenta socialismo, al la

racia kaj konciza esprimo de la streboj de la proletaro falsitan, burĝan socialismon.

Kun frateca saluto

F. Engelso

Frederiko Engelso: Pri la dua eldono [de la germana eldono de Karl Marx' „Elend der Philosophie”]

Pri la dua eldono mi rimarkigu nur ke la en la franca teksto miskskribita nomo Hopkins (paĝo 45) estas anstataŭigita per la ĝusta Hodgkin kaj tie ankaŭ la jarnombro de la verko de William Thompson korektita al 1824. Per tio la bibliografia konscienco de s-ro Profesoro Anton Menger estas espereble trankviligita.

Londono, la 29-an de marto 1892

Frederiko Engelso

Antaŭparolo

S-ro Prudono ĝuas la malbonŝancon esti miskonata en aparta maniero. En Francio li havas la rajton esti malbona ekonomikisto, ĉar oni konsideras lin respektinda germana filozofo; en Germanio, male, li rajtas esti malbona filozofo, ĉar li estas konsiderata unu el la plej fortaj francaj ekonomikistoj. En mia duobla eco kiel germano *kaj* ekonomikisto mi vidas min instigita protesti kontraŭ tiu duobla eraro.

La leganto komprenos ke ĉe tiu sendanka laboro mi devis plurfoje margĉnigi la kritikon de s-ro Prudono pri tiu de la germana filozofio kaj preterpase permesi al mi kelkajn rimarkojn pri la politika ekonomio ĝenerale.

Bruselo, la 15-an de junio 1847

Karlo Markso

La verko de s-ro Prudono estas ne tutsimple eseo pri politika ekonomio, ordinara libro, ĝi estas biblio: „misteroj”, „sekretoj, elŝiritaj el la sino de Dio”, „revelacioj”, nenio tia mankas. Sed ĉar nuntempe la profetoj estas pli zorge ekzamenataj ol la profanaj aŭtoroj, la leganto devas ja akcepti tramigri kun ni la sekan kaj malluman klercon de la „genezo”, por poste leviĝi kun s-ro Prudono en la eterajn kaj fruktodonajn regionojn de la supersocialismo (vd Proudhon, „Philosophie de la misère”, antaŭparolo, p. III, linio 20).²⁶

²⁶ <Tiu ĉi enkonduko ne troviĝas en la unuaj kvar eldonoj de la germana eldono.>

UNUA ĈAPITRO

§ 1. Kontraŭeco de uzvaloro kaj interŝanĝvaloro

„La eco de ĉiuj produktoj, ĉu industriaj aŭ naturproduktoj: servi al la vivteno de la homo, estas aparte nomata *uzvaloro*, ilia eco reciproke interŝanĝiĝi, *interŝanĝvaloro* ... La estigo de la ideo de interŝanĝ-²⁷valoro estas signita de la ekonomikistoj kun ne sufiĉa precizeco, ni devas do halti ĉi tie. Ĉar nome inter la aĵoj kiujn mi bezonas, granda nombro da ili troviĝas nur en modera kvanto aŭ eĉ tute ne en la naturo, mi estas devigata zorgi pri la produktado de tio kio mankas al mi, kaj ĉar mi ne povas mem prilabori tiom multajn aĵojn, mi faros al aliaj homoj, al miaj kunlaborantoj en diversaj agadbranĉoj, la *proponon*, cedi al mi parton de siaj produktoj *interŝanĝe* kontraŭ la mia.” (Proudhon, vol. I, ĉap. 2 [p. 33–34].)

S-ro Prudono intencas klarigi al ni antaŭ ĉio la duoblan naturon de la valoro, „la distingon de la valoro en si” [I, p. 34], la deveniĝon de la interŝanĝvaloro el la uzvaloro. Kun s-ro Prudono ankaŭ ni devas halti ĉe tiu transsubstanciga²⁸ ago. Ni vidu kiel tiu ago okazas laŭ nia aŭtoro.

Tre granda nombro da produktoj ne troviĝas en la naturo, sed estas produktenda de la industrio. Ekde kiam la bezonoj superas la libervolan produktadon de la naturo, la homo estas devigata rifuĝi al industria produktado. Kio estas tiu industrio en la imago de s-ro Prudono? Kiu estas ĝia origino? Unuopa homo, kiu sentas la bezonon je granda nombro da aĵoj, „ne povas prilabori tiom da aĵoj”. Tiom da kontentigendaj bezonoj antaŭkondiĉas tiom da produktendaj aĵoj. Nenia produkto sen produktado. Sed tiom da produktendaj aĵoj antaŭkondiĉas jam pli ol la helpantan manon de unuopa homo. Sed ekde tiu momento,

²⁷<interŝanĝ-: enmeto de Markso>

²⁸transsubstancigo estas nocio de la kristana eklezio por ago kiu ŝanĝas la substancon de pano kaj vino en karnon kaj sangon de Jesuo Kristo sen ŝanĝo de la formo, dum la „sankta manĝo”. -vl

en kiu pli ol unu mano helpanta al la produktado estas antaŭkondiĉita, oni premisas jam tutan produktadon bazitan sur labordivido. Tiel la bezono, kiel s-ro Prudono supozas, premisas la labordividon komplete. Kun la labordivido kiel premiso, ni havas la interŝanĝon kaj sekve ankaŭ la interŝanĝvaloron. Same bone ni povintus premi la interŝanĝvaloron kiel dekomence donitan.

Sed s-ro Prudono preferis kuri en rondo; ni sekvu lin do sur liaj ĉirkaŭvojoj, kiuj ĉiam rekondukas al lia elirpunkto.

Por eliri el la stato, en kiu ĉiu ermito produktas por si mem kaj atingi tiun de interŝanĝo, „mi turnas min”, diras s-ro Prudono, „al miaj kunlaborantoj en diversaj produktadbranĉoj”. Mi havas do kunlaborantojn, kiuj ĉiuj okupiĝas pri diversaj agadoj, sen ke ni pro tio, mi kaj la aliaj – daŭre laŭ la premiso de s-ro Prudono – elirintus el la soleca kaj malmulte socia pozicio de Robinsono. La kunlaborantoj kaj la diversaj agadbranĉoj, labordivido kaj interŝanĝo, kiun labordivido entenas, estas tie falintaj el la ĉielo.

Ni resumu: Mi havas bezonojn kiuj baziĝas sur labordivido kaj interŝanĝo. Per tio ke s-ro Prudono premisas tiujn bezonojn, li premisis ankaŭ jam la interŝanĝon kaj la interŝanĝvaloron, „kies estiĝon” li intencas „signi ĝuste kun pli da zorgemo ol la ceteraj ekonomikistoj”.

S-ro Prudono povintus same bone inversigi la vicon de la sinsekvaj okazaĵoj sen malutili al la ĝusteco de siaj konkludoj. Por klarigi la interŝanĝvaloron, necesas la interŝanĝo. Por klarigi la interŝanĝon, necesas la labordivido. Por klarigi la labordividon, necesas la bezonoj, kiuj necesigas la labordividon. Por klarigi tiujn bezonojn, oni devas ilin simple „premi”, kio tute ne signifas nei ilin, kontraŭe al la unua aksiomo en la prologo de s-ro Prudono: „Premisi Dion signifas lin nei” (Antaŭparolo, p. I).

Kiel s-ro Prudono pritraktas nun la dividon de la laboro, kiun li premisas kiel konatan, por klarigi la interŝanĝvaloron, kiu restas por li ĉiam la nekonato?

„Homo” ekas „proponi al aliaj homoj, siaj kunlaborantoj en diversaj agadbranĉoj” estigi la interŝanĝon kaj fari distingon inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. Kun la akcepto de tiu proponita distingo, la kunlaborantoj lasis al s-ro Prudono nenian alian „zorgemon” ol tiun konstati tiun fakton, noti ĝin en sia eseo pri politika ekonomio, „signi”

ĝin. Sed li devas daŭre klarigi al ni la „estiĝon” de tiu propono, fine diri al ni, kiel tiu unuopa homo, tiu Robinsono, subite ekhavis la ideon fari „al siaj kunlaborantoj” proponon de la *konata* speco, kaj kiel tiuj kunlaborantoj sen ia ajn kontraŭargumento akceptis ĝin.

S-ro Prudono ne traktas pri tiuj genealogiaj detaloj. Li donas simple al la fakto de interŝanĝo ian historian trajton, per tio ke li prezentas ĝin sub la formo de propono, kiun faris iu tria, enkonduki la interŝanĝon.

Ĉi tie ni havas etan ekzemplon de „*la historia kaj priskriba metodo*” de s-ro Prudono, kiu montras tiom suverenan malestimon por la „historia kaj priskriba metodo” de Adam Smith kaj Ricardo.

La interŝanĝo havas sian propran historion. Ĝi trairas diversajn fazojn.

Ekzistis epoko dum kiu, kiel en la mezepoko, oni interŝanĝis nur la superfluaĵon de la produktaĵo super la konsumado

Ekzistas krome epoko, en kiu ne nur la superfluaĵo, sed ĉiuj produktoj, la tuta industria estaĵo estis transirintaj en la komercon, kie la tuta produktado dependis de la interŝanĝo. Kiel klarigi tiun duan fazon de interŝanĝo, la interŝanĝvaloron en ĝia dua potenco?

La respondo de s-ro Prudono tuj pretas: Oni supozu, ke homo „*proponis* al aliaj homoj, al siaj kunlaborantoj en diversaj agadbranĉoj”, altigi la interŝanĝon al ĝia dua potenco.

Fine venis tempo, kie ĉio, kion la homoj ĝise konsideris kiel nevendebla, estis vendata kiel objekto de interŝanĝo, de ŝakrado. Tiu estas la epoko, en kiu eĉ aferoj, kiuj ĝis tiam estis kundividataj, sed neniam interŝanĝataj, donataj, sed neniam vendataj, akirataj, sed neniam aĉetataj: virto, amo, konvinko, scio, konscienco ktp, kie, per unu vorto, ĉio fariĝis komercaĵo. Ĝi estas la epoko de ĝenerala korupto, de la universala aĉeteblo aŭ, por uzi la ekonomian esprimmanieron, la epoko, en kiu ĉiu aĵo, ĉu korpa aŭ morala, surmerkatiga kiel komerca valoro por esti taksata je sia ĝusta valoro.

Kiel nun klarigi tiun novan kaj lastan fazon de interŝanĝo – la interŝanĝvaloron en ĝia tria potenco?

La respondo de s-ro Prudono tuj pretus: Supozu ke persono „*proponis* al aliaj personoj, al siaj kunlaborantoj en diversaj agadbranĉoj” fari el virto, amo ktp komercan valoron, altigi la

interŝanĝvaloron al ĝia tria kaj lasta potenco.

Oni vidas ke „la historia kaj priskriba metodo” de s-ro Prudono estas bona por ĉio, respondas ĉion, klarigas ĉion. Se temas pri klarigi historie „la estiĝon de ekonomia ideo”, li premisas homon kiu proponas „al siaj kunlaborantoj en diversaj agadbranĉoj” plenumi tiun agon de estigo, kaj jen ĉio pretas.

De nun ni akceptas la „estigon” de la interŝanĝvaloro kiel faritan agon; nun restas nur klarigi la rilaton de la interŝanĝvaloro kun la uzvaloro. Ni aŭdu s-ron Prudono:

„La ekonomikistoj tre bone reliefigis la duoblan karakteron de la valoro, sed kion ili ne esprimis kun la sama klareco estas ĝia en si mem kontraŭdira naturo – ĉi tie komencas nia kritiko ... Estas malmulte signifa atentigi ĉe la uzvaloro kaj interŝanĝvaloro pri tiu surpriza kontrasto, ĉe kiu la ekonomikistoj kutimas vidi nur ion tre simplan, necesas montri ke tiu supozata simpleco kaŝas profundan misteron, kiun trafenetri estas nia devo ... Por esprimi nin teĥnike, uzvaloro kaj interŝanĝvaloro staras unu al la alia en inversa rilato.” [I, p. 36 kaj 38]

Se ni ĝuste kaptis la penson de s-ro Prudono, li volas konstati la sekvajn kvar punktojn:

1. Uzvaloro kaj interŝanĝvaloro faras „surprizan kontraston”, staras en kontraŭdiro unu al la alia.

2. Uzvaloro kaj interŝanĝvaloro staras en inversa rilato unu al la alia, ili kontraŭdiras sin reciproke.

3. La ekonomikistoj vidis aŭ ekkonis nek la kontraŭecon nek la kontraŭdiron.

4. La kritiko de s-ro Prudono komencas per la fino.

Ankaŭ ni komencas per la fino, kaj por malŝarĝi la ekonomikistojn je la akuzoj de s-ro Prudono, ni paroligu du sufiĉe gravajn ekonomikistojn.

Sismondi: „La komerco reduktis ĉiujn aferojn al la kontraŭeco inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro, ktp” („*Etudes*”, vol., II, p. 162, Brusela eldono.)

Lauderdale: „Ĝenerale la nacia riĉaĵo uzvaloro²⁹ malpliĝas en la proporcio en kiu la individuaj havaĵoj kreskas pro la kresko de la interŝanĝvaloro; en la proporcio, en kiu tiuj malkreskas pro la falo de tiu valoro, la unua ĝenerale kreskas. („*Recherches sur la nature et l'origine de la richesse publique*”; traduit par Lagentie de Lavaïsse, Parizo 1808 [p. 33].)

Sismondi bazis sur la kontraŭeco inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro sian ĉefan teorion, laŭ kiu la enspezo malkreskas en la proporcio en kiu la produktado estas kreskigata.

Lauderdale bazis sian sistemon sur la inversa rilato de la du valorspecoj, kaj lia teorio estis tempe de *Ricardo* tiom populare ke tiu rajtis paroli pri ĝi kiel pri io konata:

„Per konfuzo de la nocioj de interŝanĝvaloro kaj riĉaĵo uzvaloro³⁰ oni venis al la aserto ke oni povas pliigi la riĉaĵon per malpliigo de la amaso da aĵoj necesaj, utilaj aŭ agrablaj por la vivo. (Ricardo, „*Pricipes d'économie politique*”, traduits par Constancio, annotés par J.-B. Say”, Parizo 1835, vol. II, ĉapitro „*Pri valoro kaj riĉaĵo*” [p. 65].)

Ni vidas ke la ekonomikistoj antaŭ s-ro Prudono „atentigis” pri la profunda mistero de kontraŭeco kaj kontraŭdiro. Ni vidu nun, kiel s-ro Prudono post la ekonomikistoj siavice klarigas tiun misteron.

La interŝanĝvaloro de produkto falas en la proporcio kiel la propono kreskas, se la postulo restas sama; per aliaj vortoj: Ju pli produkto *en rilato al la postulo* ekzistas tro abunde, des pli malalta estas ĝia interŝanĝvaloro aŭ prezo. *Inverse*: Ju pli malfortas la propono en rilato al la postulo, des pli altiĝas la interŝanĝvaloro aŭ prezo de la produkto; per aliaj vortoj: Ju pli grandas la malabundeco de la proponataj produktoj en rilato al la postulo, des pli grandas la prezaltiĝo. La interŝanĝvaloro de produkto dependas de ties abundeco aŭ de ĝia malabundeco, sed ĉiam en rilato al la postulo. Oni prenu ion pli ol malabundan, eble en ĝia speco unikan produkton – ĝi fariĝas pli ol abunda, fariĝas superflua, se ne ekzistas postulo por ĝi. *Inverse*, oni prenu milionoble obligitan produkton, ĝi estos ĉiam malabunda, se ĝi ne kovras la postulon, t.e. se estas tro da postulo por ĝi.

²⁹<uzvaloro: enmeto de Markso>

³⁰<uzvaloro: enmeto de Markso>

Tio estas, mi emus diri, preskaŭ banalaj veroj, kaj tamen ni devis prezenti ilin ĉi tie, por klarigi la misterojn de s-ro Prudono.

„Tiel ke, se oni volus sekvi la principon ĝis en ĝiajn lastajn konsekvencojn, oni devus veni al tiu plej logika el ĉiuj konkludoj, ke la aĵoj kies uzado estas necesa kaj kies kvanto senlima, haveblas senpage, kaj tiuj, kies uzvaloro estas nula kaj kies malabundeco eksterordinara, devus havi senfine altan prezon. La pinton de la konfuzo faras ke en la praktiko tiuj du ekstremoj ne aperas: Unuflanke nenia homa produkto povas iam kreski al senlima kvanto; aliflanke la plej malabundaj aĵoj devas esti ĝis certa grado utilaj, alie ili povus tute ne havi ajnan valoron. Uzvaloro kaj interŝanĝvaloro estas do nepre ligitaj unu kun la alia, kvankam laŭ sia naturo ili konstante strebas ekskludi unu la alian.” (Vol. I, p. 39)

Kio faras la pinton de la konfuzo de s-ro Prudono? Tutsimple ke li forgesis la *postulon* kaj ke aĵo estas abunda aŭ malabunda laŭ ĉu ĝi estas postulata. Post preterlasi la postulon, li egaligas la interŝanĝvaloron al la *malabundeco* kaj la uzvaloron al la *abundeco*. Efektive, se li diras ke la aĵoj „kies uzvaloro estas nula kaj kies malabundeco eksterordinara, havas senfine altan prezon”, li diras simple ke interŝanĝvaloro estas nur malabundeco. „Ekstrema malabundeco kaj utileco nula”, tio estas tutsimple malabundeco. „Senfine alta prezo”, tio estas la maksimumo de la interŝanĝvaloro, estas la pura interŝanĝvaloro. Tiujn du esprimojn li metas en ekvacion. Interŝanĝvaloro kaj malabundeco estas do samsignifaj esprimoj. Per tio ke li alvenas al tiuj pretenditaj „plej ekstremaj konsekvencoj”, s-ro Prudono ja ekstremigis la vortojn, sed ne la enhavon, kiun ili esprimas, kaj li uzas per tio pli da retoriko ol da logiko. Tie, kie li kredas esti trovinta novajn konsekvencojn, li retrovas nur siajn originajn premisojn en ilia tuta nudeco. Danke al la sama metodo li kapablas prezenti uzvaloron kaj puran superfluron kiel samsignifajn.

Post egaligi interŝanĝvaloron kaj malabundon, uzvaloron kaj abundon, s-ro Prudono estas tute mirigita ke li trovas nek la uzvaloron en malabundo kaj interŝanĝvaloro nek la interŝanĝvaloron en abundeco kaj uzvaloro; kaj ĉar li krome komprenas ke tiuj ekstremoj ne ekzistas en praktiko, restas al li nenio alia ol kredi je mistero. Li konas prezon kiu estas senfine alta, ĝuste ĉar ne ekzistas aĉetantoj por li, kaj aĉetantojn li trovos neniam, tiom longe kiom li pretervidas la postulon.

Aliflanke la abundeco de s-ro Prudono ŝajnas estiĝi el si mem. Li tute forgesas ke ekzistas homoj kiuj produktas ĝin kaj ke estas ilia intereso neniam perdi la postulon el la vido. Se ne, kiel s-ro Prudono venus al la aserto ke la aĵoj kiuj havas tre grandan uzvaloron devas esti tre malmultekostaj aŭ kosti neniom? Li devintus male veni al la konkludo ke oni devus limigi la superfluan, la produktadon de la tre utilaj aĵoj, se oni volas altigi ilian prezon, ilian interŝanĝvaloron.

Kiam antaŭe la francaj vinberkulturistoj postulis leĝon kiu malpermesu la estigon de novaj vinberejoj, kiam la holandanoj forbruligis la spicaĵojn de Azio, ekstermis la kariofilarbojn en la Molukoj, ili volis simple malpliigi la troabundon por altigi la interŝanĝvaloron. La tuta mezepoko sekvis la saman principon, kiam ĝi leĝe limigis la nombron da submajstroj kiujn ĉiu individua majstro rajtis okupigi, la nombron da iloj, kiujn li rajtis apliki. (Kp Anderson, „*Geschichte des Handels*“.)

Post kiam li nun abunde prezentis abundecon kiel uzvaloron kaj malabundecon kiel interŝanĝvaloron – nenio pli facilas ol la pruvo ke abundo kaj malabundo rilatas inter si reciproke –, s-ro Prudono identigas la uzvaloron kun la propono kaj la interŝanĝvaloron kun la *postulo*. Por aperigi la antitezon ankoraŭ pli akra, li subŝovas alian esprimon kaj metas „*opinivaloron*” anstataŭ *interŝanĝvaloro*. Tiel la disputo estas transigita al alia kampo, kaj ni havas ĉe la unua flanko la *utilecon* (uzvaloron, proponon), ĉe la alia la *opinion* (interŝanĝvaloron, postulon).

Kiel pacigi tiujn inter si kontraŭdirajn faktorojn? Kion fari por harmoniigi ilin? Ĉu almenaŭ troveblas punkto kiu estas al ili komuna?

„Certe”, elkrias s-ro Prudono, „ekzistas iu: la *libera volo*. La prezo, kiu rezultas el tiu batalo inter propono kaj postulo, inter utilo kaj opinio, ne povas esti la esprimo de la eterna justeco.”

S-ro Prudono disvolvas tiun antitezon plu:

„En mia eco kiel libera *aĉetanto* mi estas juĝisto pri mia bezono, juĝisto pri la laŭceleco de la objekto, juĝisto pri la prezo kiun mi *volas* elspezi por tio. Aliflanke vi kiel *libera produktanto* estas mastro pri la *produktadrimedoj* kaj sekve kapabla malpliigi viajn kostojn.” (Vol. I, p. 41)

Kaj ĉar la postulo aŭ interŝanĝvaloro estas identa kun la opinio, tial

s-ro Prudono vidas sin instigita diri:

„Estas pruvite ke estas la libera volo kiu alkondukas la kontraŭdiron inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. Kiel solvi tiun kontraŭdiron, tiom longe kiom ekzistas la libera volo? Kaj kiel oferi la liberan volon sen fordoni la homon?” (Vol. I, p. 41)

Ĉi tie do ne eblas atingi rezulton. Ni havas batalon inter du por tiel diri nekunmezureblaj povoj, inter utilo kaj opinio, inter libera aĉetanto kaj libera produktanto.

Ni rigardu la aferojn iom pli detale.

La propono ne prezentas ekskluzive la utilon, la postulo ne nur la opinion. Ĉu tiu kiu postulas ne proponas mem ankaŭ ian produkton aŭ la reprezentan signon de ĉiuj produktoj: monon, kaj ĉu li ne reprezentas kiel proponanto laŭ s-ro Prudono la utilon aŭ uzvaloron?

La proponanto, aliflanke, ĉu li ne samtempe postulas ian produkton aŭ la reprezentan signon de ĉiuj produktoj: monon? Kaj ĉu per tio li ne fariĝas reprezentanto de la opinio, de la opini- aŭ interŝanĝ-valoro?

La postulo estas samtempe propono, la propono samtempe postulo. Tiel do la antitezo de s-ro Prudono, kiu indentigas proponon kaj postulon simple kun utilo kaj opinio, baziĝas nur sur senenhava abstraktaĵo.

Kion s-ro Prudono nomas uzvaloro, tion aliaj ekonomikistoj nomas samrajte opinivaloro. Ni citu nur Storch-on. („*Cours d'économie politique*”, Parizo 1823, p. 48 kaj 49.)

Laŭ li, la aferoj pri kiuj ni sentas bezonon, nomiĝas *bezonoj*; *valoroj* tiuj al kiuj ni atribuas valoron. La plej multaj aferoj havas valoron nur ĉar ili kontentigas la bezonojn kreitajn de la opinio. La opinio pri niaj bezonoj povas ŝanĝiĝi, kaj tiel ankaŭ la utileco de la aferoj, kiu esprimas nur la rilaton de tiuj aferoj kun niaj bezonoj. Eĉ la naturaj bezonoj ŝanĝiĝas konstante. Efektive, kia diferenco ekzistas ekz-e inter la objektoj, kiuj servas ĉe la diversaj popoloj kiel ĉefa nutraĵo!

La batalo ne okazas inter utilo kaj opinio: Ĝi okazas inter la komerca valoro, kiun la proponanto postulas, kaj la komerca valoro, kiun la postulanto proponas. La interŝanĝvaloro de la produkto estas ĉiam la rezultanto de tiuj inter si kontraŭdirantaj pritaksoj.

Lastinstance propono kaj postulo kontraŭmetas la produktadon kaj la konsumadon unu kontraŭ la alian, sed kun produktado kaj konsumado baziĝantaj sur interŝanĝo inter unuopuloj.

La produkto kiun oni proponas ne estas la utilo por si mem. Nur la konsumanto determinas ĝian utilon. Kaj eĉ se oni atribuas al ĝi la econ de utilo, ĝi ne reprezentas la utilon kiel tian. Dum la produktado ĝi estis interŝanĝataj kontraŭ ĉiuj produktadkostoj, kontraŭ krudmaterialoj, salajroj ktp, ĉio aĵoj kiuj havas komercan valoron. Tiel do la produkto reprezentas en la okuloj de la produktanto sumon de komercaj valoroj. Kion li proponas, estas ne nur utila objekto, sed ankaŭ, kaj pli precize antaŭ ĉio, interŝanĝvaloro.

La postulo siavice estas nur efika en la mezuro laŭ kiu ĝi disponas pri interŝanĝrimedoj. Tiuj rimedoj mem siavice estas produktoj, interŝanĝvaloroj.

En propono kaj postulo ni trovas do unuflanke produkton kiu kostis interŝanĝvalorojn kaj la bezonon vendi; aliflanke rimedojn kiuj kostis interŝanĝvalorojn kaj la deziron aĉeti.

S-ro Prudono konfrontas la *liberan aĉetanton* kun la *libera produktanto*. Li atribuas al ambaŭ pure metafizikajn ecojn. Pro tio li povas diri: „Estas pruvite ke la libera volo de la homo estas tio kio estigas la kontraŭdiron inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro.” (I, p. 41)

Tiom longe kiom la produktanto produktas en socio kiu baziĝas sur labordivido kaj individua interŝanĝo – kaj tio estas la premiso de s-ro Prudono –, li estas devigata vendi. S-ro Prudono faras la produktanton mastro de la produktadrimedoj; sed li koncedas al ni ke la posedo de tiuj produktadrimedoj ne dependas de la *libera volo*. Eĉ pli: Tiuj produktadrimedoj estas grandparte produktoj kiujn li venigas el eksterlando, kaj en la moderna produktado li estas eĉ ne libera produkti la kvanton kiun li volas; la respektiva evolustato de la produktadrimedoj devigas lin produkti sur tiu aŭ alia certa nivelo.

La konsumanto ne estas pli libera ol la produktanto. Lia opinio dependas de liaj rimedoj kaj de liaj bezonoj. Ambaŭ estas determinataj de lia socia situacio, kiu siavice mem dependas de la ĝenerala socia organiziteco. Tamen, la laboristo kiu aĉetas terpomojn, kaj la pagata amorantino kiu aĉetas puntaĵojn, ambaŭ sekvas nur sian respektivan opinion; sed la diverseco de iliaj opinioj klariĝas per la diverseco de ilia

pozicio kiun ili okupas en la mondo kaj kiu siavice estas mem produkto de la socia organiziteco.

Ĉu la sistemo de la bezonoj en sia tutaĵo baziĝas sur la opinio aŭ sur la ĉioma organiziteco de la produktado? En la plej multaj kazoj la bezonoj fontas el la produktado aŭ el ĝenerala stato bazita sur la produktado. La mondkomerco turniĝas preskaŭ ekskluzive ĉirkaŭ bezonoj – ne de la individua konsumado, sed de la produktado. Por elekti alian ekzemplon, ĉu la bezono je notarioj ne antaŭkondiĉas donitan civiljuron kiu estas nur la esprimo de certa evoluo de la proprieto, t.e. de la produktado?

Al s-ro Prudono ne sufiĉas elimini el la rilato inter propono kaj postulo la elementojn pri kiuj ni parolis. Li pelas ĝis ekstremo la abstraktadon, per tio ke li kunveldas ĉiujn produktantojn en unu solan produktanton, ĉiujn konsumantojn en unu solan konsumanton kaj lasas la batalon elbataliĝi inter tiuj du ĥimeraj personoj. Sed en la reala mondo la aferoj disvolviĝas alie. La konkurenco inter la proponantoj same kiel la konkurenco inter la postulantoj konsistigas necesan elementon de la batalo inter aĉetantoj kaj vendantoj, kies rezulto estas la interŝanĝvaloro.

Post kiam li eliminis produktadkostojn kaj konkurencon, s-ro Prudono povas laŭplaĉe redukti ĝis absurdo la formulon de propono kaj postulo.

„Propono kaj postulo”, diras li, „estas nenio alia ol du *ceremoniaj formoj* kiuj servas por konfronti uzvaloron kaj interŝanĝvaloron kaj instigi al ilia paciĝo³¹. Estas la du elektraj polusoj kiuj, interligite, devas sekvigi la fenomenon de elektoparenceco, nomata interŝanĝo.” (Vol I, p. 49)

Same bone direblus ke la interŝanĝo estas nur „ceremonia formo” por kunigi konsumantojn kaj la konsumobjekton. Same bone direblus ke ĉiuj ekonomiaj rilatoj estas nur „ceremoniaj formoj” por peri la senperan konsumadon. Propono kaj postulo estas rilatoj de donita produktado, ne pli kaj ne malpli ol la individua interŝanĝo.

En kio do konsistas la tuta dialektiko de s-ro Prudono? En tio ke por

³¹<(1847) circulation [cirkulado], en la tajperar-korekto de la franca unua eldono korektita en conciliation [repaciĝo]; (1885, 1892 kaj 1895) erare: cirkulado>

uz- kaj interŝanĝ-valoru, por propono kaj postulo li metas abstraktajn kaj inter si kontraŭdirajn nociojn, kiel malabundeco kaj abundeco, utileco kaj opinio, *unu* produkanton kaj *unu* konsumanton, ambaŭ *kavaliroj de la libera volo*.

Kaj kion li celis per tio?

Rezervi al si la rimedon, pli aŭ malpli frue enkonduki iun el la eliminitaj elementoj, la *produktadkostojn* kiel *sintezon* inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. Kaj tiel en liaj okuloj la produktadkosto konsistigas la *sintezan* aŭ *konstituitan valoron*.

§ 2. La konstituita aŭ sinteza valoro

„La interŝanĝvaloro³² estas la angulŝtono de la ekonomia konstruaĵo.” [I, p. 32] La „konstituita” valoro estas la angulŝtono de la sistemo de la ekonomiaj kontraŭdiroj.

Kio estas do tiu „konstituita valoro”, kiu faras la tutan malkovraĵon de s-ro Prudono en la politika ekonomio?

Se oni premisas la utilecon, la laboro estas la fonto de la valoro. La mezuro de la laboro estas la tempo. La relativa valoro de la produktoj estas determinata per la labortempo kiun oni devis elspezi por ilia estigo. La prezo estas la en mono esprimita relativa valoro de produkto. Fine, la *konstituita* valoro de produkto estas tutsimple la valoro kiu estas konstituita de la en ĝi entenata labortempo.

Kiel Adam Smith malkovris la labordividon, tiel s-ro Prudono asertas esti malkovrinta la „konstituitan valoron”. Tio ja ne estas „io neniam aŭdita”; tamen oni devas koncedi ke en neniun malkovro kuŝas io neniam aŭdita. Tamen s-ro Prudono, kiu antaŭsupozas la tutan gravecon de sia malkovro, provas malfortigi la meriton pri ĝi, „por trankviligi la leganton pri liaj pretendoj je originaleco kaj por repacigi la spiritojn, kies timemo malmulte favoras novajn ideojn”. Sed laŭ la mezuro laŭ kiu li atribuas al siaj antaŭuloj la parton kiun ĉiu el ili havis ĉe la eltrovo de la valoro, li alvenas devige al tio, laŭte anonci ke al li apartenas la plej

³²<(interŝanĝ-): enmeto de Markso>

granda, la leona parto.

„La sinteza valorteorio estis komprenita de Adam Smith en malcerta maniero ... Sed tiu valorideo estis ĉe Adam Smith tute intua: La socio tamen ŝanĝas siajn kutimojn ne laŭ nuraj intuoj, ĝi sekvas nur la aŭtoritaton de la fakto. La antinomio devis esti reliefigita en pli impresa kaj pli preciza maniero: J.-B. Say estis ĝia precipa tradukinto.” [I, p. 66]

Jen ni havas la historion de la malkovro de la sinteza valoro tute pretan: al Adam Smith apartenas la malklara intuo, al J.-B. Say la antinomio, al s-ro Prudono la konstituanta kaj „konstituita” vero. Kaj oni ne trompiĝu: Ĉiuj aliaj ekonomikistoj, de Say ĝis Prudono, moviĝis sur la reloj de la antinomio.

„Estas nekompreneble ke tiom da inteligentaj homoj de kvardek jaroj rompas al si la kapon kontraŭ tiom simpla ideo. Sed ne, la komparo de la valoroj estas plenumata sen ke inter ili ekzistas ia ajn kompara punkto kaj sen mezurunuo: – tion la *ekonomikistoj de la 19-a jarcento*, anstataŭ kompreni la revolucionan teorion de la sameco, decidis aserti kontraŭ ĉiuj kaj ĉiun. *Kion la posteularo diros pri tio?*” (Vol. I, p. 68)

La tiom bruske alvokita posteularo unue ekdubos pri la tempa sinsekvo. Ĝi devas nepre demandi sin: Ĉu Ricardo kaj lia skolo ne estas ekonomikistoj de la 19-a jarcento? La sistemo de Ricardo, kiu starigis la principon „ke la relativa valoro de la varoj baziĝas ekskluzive sur la laboro necesa por ilia produktado”, datas de la jaro 1817. Ricardo estas la kapo de tuta skolo kiu antaŭregas ekde la restaŭro en Anglio. La instruo de Ricardo reprezentas krude, senkompate la tutan anglan burĝaron, kiu mem siavice estas entute la tipo de la moderna burĝaro. „Kion la posteularo diros pri tio?” Ĝi ne diros ke s-ro Prudono ne konis Ricardo-n, ĉar li longe kaj larĝe parolas pri li, li ĉiam denove revenas al li kaj fine diras ke lia sistemo estas senvalora. Se la posteularo iam ajn enmiksiĝos, ĝi eble diros ke s-ro Prudono, el timo vundi la anglofobion de siaj legantoj, preferis roli kiel respondeca eldonanto de la ideoj de Ricardo. Sed kiel ajn, ĝi trovos tre naŭva ke s-ro Prudono prezentas tion kiel „revolucionan estontec-ideon” kion Ricardo science pruvis kiel la teorion de la nuna burĝa socio, kaj ke li tiel supozas kiel solvon de la antinomio inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro tion kion Ricardo kaj lia skolo longe antaŭ li starigis kiel sciencan formulon de la unua flanko de

la antinomio, de la interŝanĝvaloro. Sed ni lasu la posteularon unufoje por ĉiam kaj konfrontu s-ron Prudono kun lia antaŭulo Ricardo. La sekvaj teksteroj el tiu verkisto resumas lian valorteorion:

„Ne la utileco estas la mezuro de la *interŝanĝvaloro*, kvankam ĝi estas nepra elemento de ĝi.” (Vol. I, p. 3 de „*Principes de l'économie politique* etc.”, traduit de l'anglais par F.-S. Constancio, Parizo 1835.)

„La aĵoj, ekde kiam ili estas agnoskataj kiel utilaj, tiras sian interŝanĝvaloron el du fontoj: el sia malabundeco kaj el la laborkvanto necesa por ilia akiro. Ekzistas aĵoj kies valoro dependas nur de ilia malabundeco. Ĉar neniu laboro povas pliiĝi ilian nombron, tial ilia valoro ne povas malpliigi³³ pro ilia pli granda abundeco. Al tio apartenas steleoj, multekostaj pentraĵoj ktp. Tiu valoro dependas sole nur de la havaĵo, de la gusto kaj de la kaprico de tiuj kiuj sentas emon posedi tiajn objektojn.” (Vol. I, p. 4 kaj 5, saml.) „Ili tamen konsistigas nur etan kvanton de la varoj kiuj estas ĉiutage interŝanĝataj. Ĉar la plej granda nombro da objektoj kiujn oni deziras posedi estas produktaĵoj de la industrio, oni povas, ekde kiam oni volas elspezi la por tio necesan laboron, multobligi ilin ne nur en unu lando, sed en pluraj landoj en preskaŭ senlima kvanto.” (Vol. I, p. 5, saml.) „Se ni parolas do pri varoj, ilia interŝanĝvaloro kaj la principoj laŭ kiuj ilia prezo reguliĝas, ni celas nur tiujn varojn kies kvanto per homa laboro laŭplaĉe obligeblas, kies produktado estas subtenata pro la konkurenco kaj kiu ne renkontas malhelpojn. (Vol. I, p. 5)

Ricardo citas Adamon Smith, kiu laŭ li „disvolvis la unuan fonton de la interŝanĝvaloro kun *granda precizeco*”, (Smith, I, ĉap. 5 [p. 9], kaj aldonas:

„Ke tio (nome la labortempo) estas envere la bazo de la interŝanĝvaloro de ĉiuj aĵoj, escepte de tiuj kiuj ne multigeblas per homa laboro, estas ege grava teoremo de la politika ekonomio: Ĉar el nenias fonto fluis tiom da eraroj, tiom da disopinioj en tiu ĉi scienco kiom el la supraĵa kaj malmulte preciza interpreto de la vorto valoro.” (Vol. I, p. 8) „Se la laborkvanto enmetita en objekton estas tio kio determinas ĝian interŝanĝvaloron, tiam sekvas el tio ke ĉia pliigo de la laborkvanto nepre devas pliiĝi la valoron de la objekto al kiu ĝi estis aplikita, kaj ke same

³³<(1847) kiel ĉe Ricardo: ne peut baisser (ne povas ... malaltiĝi); (1885) erare: nur malaltiĝi>

ĉia malpliigo de la laboro devas malpliigi ties prezon.” (Vol. I, p. 9)

Ricardo faras poste al Adam Smith la riproĉon:

1. Ke li „por la valoro starigis alian mezurilon ol la laboron, jen la valoron de la greno, jen la laborkvanton kiu kapablas aĉeti ian aĵon ktp.” (Vol. I, p. 9 kaj 10)

2. Ke li „koncedas la principon senrezerve kaj tamen limigas ĝian aplikadon al la origine kruda stato de la socio, kiu antaŭiras al la akumulado de kapitaloj kaj al la privata proprieto je grundo kaj tero”. (Vol. I., p. 21)

Ricardo provas liveri la pruvon ke la terproprieto, t.e. la grundrento³⁴ ne povas influi la valoron de la vivrimedoj kaj ke la akumulado de kapitaloj havas nur portempan kaj oscilantan influon sur la rilato de la valoroj, kiuj estas determinataj de la rilato de la laborkvanto necesa por ilia produktado. Por pruvi tiun teoremon, li disvolvas sian faman grundrentteorion, analizas la kapitalon kaj alvenas lastinstance ĉe la ekkono ke li trovas en ĝi nur akumulitan laboron. Poste li disvolvas tutan teorion pri la rilato de salajro kaj profito kaj pruvas ke salajro kaj profito kreskas kaj falas en inversa proporcio, sen influi la valoron de la produkto. Ĉe tio li ne pretervidas la influon kiun la akumulitaj kapitaloj kaj ilia diversa naturo (fiksa kaj flua kapitalo) same kiel la salajronivelo povas havi sur la relativa valoro de la produktoj. Tio estas eĉ la plej ĉefaj problemoj pri kiuj Ricardo okupiĝas.

„Nenia ŝparo de laboro”, diras li, „iam ajn maltrafas malpliigi la valoron³⁵ de varo, ĉu per tio ke tiu ŝparo koncernas la laboron kiu necesas por produktado de la objekto mem, ĉu per tio ke ĝi rilatas al la starigo de la kapitalo aplikata ĉe tiu produktado.” (Vol. I, p. 28)
„Do, tiom longe kiom unu labortago enspezigas al iu la saman kvanton da fiŝo kaj al la alia same multan ĉasaĵon, la natura alteco de

³⁴<grund-: enmeto de la tradukistoj>

³⁵Ricardo determinas, kiel konate, la valoron de varo per la „kvanto da laboro kiu estas necesa por ĝia akiro” [Ricardo, saml., I., p. 41]. Sed la interŝanĝformo reganta en ĉiu produktadmaniero kiu baziĝas sur varproduktado, do ankaŭ en la kapitalisma, sekvigas ke tiu valoro ne esprimiĝas rekte en kvantoj de laboro, sed en kvantoj de alia varo. La valoro de varo, esprimita en kvanto de alia varo (mono aŭ ne), nomiĝas ĉe Ricardo ĝia relativa valoro. *F. E.*

la tiurilataj interŝanĝprezoj restos la sama, kiaj ajn ŝanĝoj cetere okazas ĉe la salajroj kaj la profitoj kaj spite al ĉiaj influoj de la kapitalakumuliĝo.” (Vol. I, p. 32) „Ni konsideris la laboron kiel la bazon de la valoro de ĉiuj aĵoj kaj la laborkvanton necesan por ties produktado kiel la mezurilon kiu determinas la kvanton da varoj kiuj interŝanĝe kun aliaj estas fordonendaj; sed ni ne havas la intencon nei ke en la respektiva prezo de la varoj okazas hazardaj kaj provizoraj devojiĝoj de tiu origina natura prezo.” (Vol. I, p. 105, saml.) „Estas la produktadkostoj kiuj lastinstance determinas la prezon de la objektoj, kaj ne, kiel oni ofte asertis, la rilato inter propono kaj postulo.” (Vol. II, p. 253)

Lord Lauderdale estis disvolvinta la ŝanĝiĝojn de la interŝanĝvaloro laŭ la leĝo de propono kaj postulo aŭ de malabundo kaj abundo en rilato al la postulo. Laŭ li la valoro de aĵo povas kreski se ties kvanto malkreskas, sed la postulo je ĝi kreskas; ĝi povas fali, laŭ tio ĉu ĝia kvanto kreskas aŭ la postulo je ĝi malkreskas. Tiel la valoro de objekto povas ŝanĝiĝi per la efiko de ok diversaj kaŭzoj, nome de la var kaŭzoj kiuj rilatas al ĝi mem, kaj de la kvar kaŭzoj kiuj rilatas al la mono aŭ al ĉia alia varo kiu servas kiel mezuro de ĝia valoro. Ricardo refutas tion jene:

„Produktoj kiuj estas la monopolo de unuopulo aŭ de societo ŝanĝas sian valoron laŭ la leĝo kiun starigis Lord Lauderdale; ili falas proporcie al la kresko de propono kaj kreskas kun la deziro kiun montras la aĉetanto akiri ilin; ilia prezo staras en nenia necesa rilato al ilia natura valoro. Sed koncerne la aĵojn kiuj estas submetitaj al la konkurenco de la vendantoj kaj kies kvanto ĝis certa grado pliiĝeblas, ilia prezo dependas definitive ne de la stato de postulo kaj disponigo, sed de la pliiĝo aŭ malpliiĝo de la produktadkostoj.” (Vol. II, p. 259)

Ni lasas al la leganto kompari la tiom precizan, klaran, simplan lingvaĵon de Ricardo kun la retorikaj klopodoj kiujn Prudono faras por atingi la determinadon de la interŝanĝvaloro per la labortempo.

Ricardo montras al ni la realan moviĝon de la burĝa produktado kiu konsistigas la valoron. S-ro Prudono abstraktas de tiu reala moviĝo kaj turmentigas por inventi novajn procezojn kaj aranĝi la mondon laŭ formulo kiun li pretendas esti nova, kiu estas nur la teoria esprimo de la reala moviĝo kiun Ricardo tiel bele prezentis. Ricardo elektas sian elir-

punkton ĉe la ekzistanta socio, por montri al ni kiel ĝi konsistigas la valoron; s-ro Prudono elektas kiel elirpunkton la konstituitan valoron, por pere de tiu valoro konstituigi novan socian mondon. Por s-ro Prudono la konstituita valoro devas moviĝi en rondo kaj por mondo jam, surbaze de tiu valormezurilo, komplete konsistuita, fariĝi denove konstituanta. La determinado de la valoro per la labortempo estas por Ricardo la leĝo de la interŝanĝvaloro; por s-ro Prudono ĝi estas la sintezo de uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. La teorio de Ricardo de la valoroj estas la scienca prezentado de la nuna ekonomia vivo; la valorteorio de s-ro Prudono estas la utopia interpreto de la teorio de Ricardo. Ricardo konstatas la veron de sia formulo per tio ke li deduktas ĝin el ĉiuj ekonomiaj procezoj kaj tiel klarigas ĉiujn fenomenojn, eĉ tiujn kiuj unuavide ŝajnas kontraŭdiri ĝin, kiel la renton, la akumuliĝon de kapitaloj kaj la rilaton de salajroj al profitoj. Ĝuste tio estas kio faras lian instruon scienca sistemo; s-ro Prudono, kiu denove trovis tiun formulon de Ricardo pere de pure arbitraj hipotezoj, estas laŭ tio devigata serĉi unuopajn ekonomiajn faktojn, kiujn li torturas kaj falsas, por povi prezenti ilin kiel jam ekzistantajn aplikojn, kiel ĝermojn de realiĝo de lia novkreita ideo. (Vidu sube § 3, „*Apliko de la konstituita valoro*“.)

Ni transiru nun al la konkludoj, kiujn s-ro Prudono tiras el sia (per la labortempo) konstituita mondo.

Certa kvanto da laboro estas same valora kiel la produkto kiu estas kreita de tiu laborkvanto.

Ĉiu labortago valoras same multe kiel alia labortago; t.e. ĉe sama kvanto la laboro valoras de iu same multe kiel la laboro de iu alia: Ne ekzistas kvalita diferenco. Ĉe sama laborkvanto la produkto de iu interŝanĝiĝas por la produkto de la alia. Ĉiuj homoj estas dunglaboristoj, kaj pli precize, por sama labortempo same pagataj. Kompleta egaleco regas la interŝanĝon.

Ĉu tiuj konkludoj estas la naturaj kaj necesaj konsekvencoj de la „konstituita”, t.e. de la per la labortempo determinita valoro?

Se la valoro de varo estas determinata de la laborkvanto necesa por ĝia produktado, tiam sekvas el tio nepre, ke la valoro de la laboro, t.e. la salajro, estas same determinata de la laborkvanto, kiu necesas por ĝia produktado. La salajro, t.e. la reala valoro aŭ la prezo de la laboro, estas laŭ tio determinata de la labortempo kiu necesas por produkti ĉion tion

kiun la laboristo bezonas por sia vivteno.

„*Malpliigu la produktadkoston* de la ĉapeloj, kaj ilia prezo fine malkreskas ĝis ilia natura prezo, eĉ se la postulo duobliĝas, triobliĝas aŭ kvarobliĝas. *Malpliigu la vivtenadajn koston* de la homoj per redukto de la natura prezo de la vivnecesaj nutraĵoj kaj vestaĵoj, kaj vi vidos kiel la salajroj falas, eĉ se la postulo je laboristoj konsiderinde kreskus.” (Ricardo, Vol. II, p. 253)

Certe, la lingvaĵo de Ricardo estas tiom cinika kiom ebla. Meti la fabrikadkoston de ĉapeloj kaj la vivtenadajn koston de la homoj en unu saman vicon, signifas transformi la homojn en ĉapelojn. Sed oni ne tro indignu pro la cinikeco. La cinikeco kuŝas en la afero kaj ne en la vortoj kiuj signas la aferon. Francaj verkistoj, kiel la s-roj Droz, Blanqui, Rossi kaj aliaj, faras al si la senkulpan plezuron dokumenti sian superecon super la anglaj ekonomikistoj³⁶ per tio ke ili provas observi la dececon de „humana” lingvaĵo; se ili riproĉas Ricardo-n kaj lian skolon pro ilia cinika lingvaĵo, tiam nur ĉar ili ofendiĝas vidi la ekonomiajn rilatojn malkovritaj en sia tuta nudeco, la misterojn de la burĝaro perfiditaj.

Ni resumu: La laboro, kie ĝi estas varo mem, mezuriĝas kiel tia per la labortempo kiu necesas por la produktado de la varo laboro. Kaj kio necesas por la produktado de la varo laboro? Ĝuste tiu labortempo kiu necesas por produkti la objektojn kiuj estas nemalhaveblaj por la seninterrompa vivtenado de la laboro, t.e. por kapabligi la laboriston teni sin viva kaj generi idojn. La natura prezo de la laboro estas nenio alia ol la minimuma salajro.³⁷ Se la merkaptoprezon de la salajro leviĝas super ties

³⁶<(1847) économistes [ekonomikistoj]; (1885, 1892 kaj 1895) Schriftsteller [verkistoj]>

³⁷La teoremo ke la „natura”, t.e. normala prezo de la laborforto identas kun la minimuma salajro, t.e. kun la valorekvivalento de la vivrimedoj necesaj por vivteno kaj plugenerado de la laboristo – tiu teoremo estis starigita unue de mi en la „Umriss zu einer Kritik der Nationalökonomie” („Deutsch-Französische Jahrbücher”, Parizo 1844) kaj en la „Lage der arbeitenden Klasse in England”. Kiel videblas ĉi tie, Markso akceptis tiam tiun teoremon. Lasalo transprenis ĝin de ni ambaŭ. Sed eĉ se en la realo la salajro havas la konstantan tendencon proksimiĝi al la minimumo, la supra teoremo estas tamen malĝusta. La fakto ke la laborforto estas ĝenerale kaj mezume pagata sub sia valoro ne povas ŝanĝi ĝian valoron. En la „Kapitalo” Markso korektis la supran teoremon (Paragrafo: „Aĉeto kaj vendo de la laborforto”) kaj disvolvas

naturan prezon, tio okazas ĝuste pro tio ke la valorleĝo starigita de s-ro Prudono kiel principo trovas en la ŝanĝiĝo de la rilato de propono kaj postulo sian kontraŭpezon. Sed la salajra minimumo restas tamen la centro al kiu la merkaptoprezon de la salajro gravitas.

Tiel, la valoro mezurata per la labortempo estas nepre la formulo de la moderna sklaveco de la laboristoj, anstataŭ esti, kiel s-ro Prudono asertas, la „revolucia teorio” de la emancipiĝo de la proletaro.

Ni rigardu nun, en kiom da okazoj la labortempo kiel mezuro de la valoro estas nepacigebla kun la ekzistanta antagonismo de la klasoj kaj kun la malsama distribuado de la laborrezulto inter la rekta produktanto (la laboristo)³⁸ kaj la posedanto de la produkto.

Ni prenu ian ajn produkton, ekz-e la linteksaĵon. Tiu, kiel tia, entenas certan kvanton da laboro. Tiu laborkvanto estos ĉiam la sama, kia ajn fariĝas la situacio de tiuj kiuj kunefikis en la produktado de tiu produkto.

Ni prenu alian produkton: tukon, kiu, ni supozu, necesigis la saman laborkvanton kiel la linteksaĵo.

Se okazas interŝanĝo de tiuj du produktoj, tiam okazas interŝanĝo de samaj laborkvantoj. Se oni interŝanĝas tiujn samajn kvantojn de labortempo, tiam oni tute ne interŝanĝas la respektivan situacion de laboristoj kaj fabrikistoj inter si. Aserti ke tiu interŝanĝo de produktoj mezurataj per labortempo sekvigas saman pagon de ĉiuj produktantoj, signifus premisi ke la interŝanĝon antaŭis sama partopreno en la produkto. Se la interŝanĝo de tuko kontraŭ linteksaĵo estas plenumita, la produktintoj de la tuko havos tiun parton de la linteksaĵo kiu kongruas kun sia antaŭa parto en la tuko.

La iluzio de s-ro Prudono venas de tio ke li rigardas kiel konsekvencon tion kio povas validi, se entute, kiel nepruvita premiso.

Ni iru plu.

Ĉu la labortempo kiel mezuro de la valoro almenaŭ premisas ke la

ankaŭ la cirkonstancojn (ĉap. XXIII, „La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado”), kiuj ebligas al la kapitalisma produktado premi la prezon de la laborforto pli kaj pli sub ties valoron. *F. E.*

³⁸<(la laboristo): enmeto de la tradukintoj>

(labor-)tagoj³⁹ estas *samvaloraj*, tio estas ke la labortago de iu valoras same kiel la labortago de la alia? Ne.

Ni supozu ke la labortago de orlaboristo estu samvalora al tri labortagoj de teksisto, tiam ĉiu ŝanĝiĝo en la valorrilato de la juvelvaroj kontraŭ teksaĵo, se ĝi ne estas provizora sekvo de fluktuadoj de propono kaj postulo, havas kiel kaŭzon malpliigon aŭ pliigon de la labortempo aplikata por la produktado de la unua aŭ de la alia speco de produktoj. Ni supozu ke tri labortagoj de diversaj laboristoj rilatas inter si kiel 1, 2, 3, tiam ĉia ŝanĝiĝo en la relativa valoro de iliaj produktoj estos ankaŭ ŝanĝiĝo laŭ tiu sama rilato de 1, 2, 3. Tiamaniere oni povas mezuri la valoron per la labortempo, malgraŭ la malsameco de la valoro de la diversaj labortagoj; sed ni devas, por povi apliki tian mezuron, havi komparan mezurilon por la diversaj labortagoj: Tiun mezurilon liveras al ni la konkurenco.

Ĉu via laborhoru validas tiom kiom la mia? Tiu demando estas decidata de la konkurenco.

La konkurenco determinas, laŭ usona ekonomikisto, kiom da tagoj de simpla (nekvalifikita) laboro estas entenataj en unu tago de kompleksa (kvalifikita)⁴⁰ laboro. Ĉu tiu reduktado de labortagoj de kompleksa laboro en labortagojn de simpla laboro ne premisas ke oni prenas la simplan laboron por si mem kiel valormezuron? Se la kvanto de laboro per si mem, sen konsidero al la kvalito, estas prenita kiel valormezurilo, tiam tio premisas ke la simpla laboro fariĝis la ŝlosilŝtono de la industrio. Ĝi premisas ke la laboroj per la subordigado de la homoj sub la maŝinon aŭ la plej ekstrema labordivido estas samigitaj, ke la homoj malaperas malantaŭ la laboro, ke la pendolo de la horloĝo estas la preciza mezurilo por la rilato de la faroj de du laboristoj, kiel ĝi estas por la rapideco de du lokomotivoj. Do jam ne ĝustas ke unu (labor-)horu⁴¹ de homo samvalidas kiel la horu de alia homo, sed ke unu homo dum unu horu valoras same kiel alia homo dum unu horu. La tempo estas ĉio, la homo estas jam nenio, li estas plejbonokaze ankoraŭ la enkorpiĝo de la tempo. Jam ne temas pri la kvalito. La kvanto sole decidas ĉion. Horu kontraŭ horu, tago kontraŭ tago; sed tiu egaligo de la laboro tute ne estas la faro de la eterna justeco

³⁹<(labor-): enmeto de la tradukintoj>

⁴⁰<(nekvalifikita) kaj (kvalifikita): enmeto de la tradukintoj>

⁴¹<(labor-): enmeto de la tradukintoj>

de s-ro Prudono. Ĝi estas tutsimple rezulto de la moderna industrio.

En la fabriko laboranta per maŝinoj, la laboro de laboristo distingiĝas jam preskaŭ en nenio disde la laboro de alia laboristo. La laboristoj povas distingiĝi inter si nur per la kvanto de tempo kiun ili aplikas ĉe la laboro. Tamen tiu kvanta diferenco ŝajnas el certa vidpunkto kvalita, laŭ tio ĉu la tempo aplikita al la laboro dependas unuflanke de pure materiaj kondiĉoj kiel korpa konstitucio, aĝo, sekso, aliflanke de moralaj, pure negativaj cirkonstancoj kiel pacienco, nesensiveco kaj diligento. Fine, se ekzistas kvalita diferenco en la laboro de la laboristoj, tiam ĝi estas ne pli ol kvalito de la plej malbona kvalito, kiu estas tre malproksima de distinga specifeco. Tio estas lastinstance la stato de la aferoj en la moderna industrio. Kaj sur tiun jam en la maŝinlaboro realigitan egalecon s-ro Prudono aplikas sian rabotilon de „egaligo”, kiun li intencas universale realigi en la „tempo kiu venos”.

Ĉiuj „egalecaj” konkludoj, kiujn s-ro Prudono tiras el la teorio de Ricardo, baziĝas sur fundamenta eraro. Li nome konfuzas la varvaloron determinitan de la aplikita laborkvanto kun la varvaloro determinata de la „*valor de la laboro*”. Se tiuj du manieroj esprimi la valoron de la varoj esprimas la samon, tiam oni povus sendistinge diri: La valoro de ia ajn varo estas mezurata per la en ĝi enkorpigita laborkvanto; aŭ aliflanke: ĝi estas mezurata per la kvanto da laboro kiun ĝi kapablas aĉeti; aŭ fine: ĝi estas mezurata per la kvanto da laboro kiu kapablas akiri ĝin. Sed tio tute ne ĝustas. La valoro de la laboro povas same malmulte servi kiel mezuro de la valoro kiel la valoro de ĉiu alia varo. Kelkaj ekzemploj sufiĉu por proksimigi la ĵus diriton al la kompreno.

Se buŝelo da greno kostus du labortagojn anstataŭ unu solan, tiam ĝi posedus la duoblon da sia origina valoro; sed ĝi ne movus la duoblan laborkvanton, ĉar ĝi ne entenus pli da nutraj substancoj ol antaŭe. Tiel la valoro de la greno, mezurite per la laborkvanto aplikita al ĝia estigo, estus duobligita. Sed mezurite, ĉu per la laborkvanto kiun ĝi kapablas aĉeti, aŭ per la laborkvanto kiu kapablas aĉeti ĝin, ĝi estas tre malproksima de la stato esti duobliginta. Aliflanke, se la sama laboro kreus duoble da vestaĵoj ol antaŭe, tiam ties valoro falus duone; sed tamen tiu duobla kvanto da vestaĵoj per tio ne estus tiom malaltigita ke ĝi povus disponi nur pri la duona kvanto da laboro, nek tiu sama laboro estus kapabla disponi pri la duobla kvanto da vestaĵoj; ĉar la duono de la vestaĵoj farus poste kiel antaŭe al la laboristoj la saman servon.

Estus do kontraŭdira al la ekonomiaj faktoj, mezuri la valoron de la vivrimedoj per la valoro de la laboro; tio signifus moviĝi en erara cirklo, determini la relativan valoron per relativa valoro kiu siavice estas ankoraŭ determinenda.

Estas nenia dubo ke s-ro Prudono intermiksas tiujn du skalojn: la labortempon necesan por produktado de varo kaj la valoron de la laboro.

„La laboro de ĉiu homo”, diras li, „povas aĉeti la valoron kiun ĝi entenas.” [I, p. 81]

Do, laŭ li certa laborkvanto fiksita en produkto valoras same multe kiel la salajro de la laboristo, t.e. kiel la valoro de la laboro. Tiu estas ankaŭ la sama konkludo kiu permesas al li egaligi produktadkoston kaj salajrojn.

„Kio estas la salajro? La produktadprezo de greno ktp, la kompleta prezo de ĉiu aĵo. Eĉ pli: la salajro estas la proporcieco de la elementoj kiuj konsistigas la riĉaĵon.” [I, p. 110]

Kio estas la salajro? La valoro de la laboro.

Adam Smith prenas kiel mezurilon de la valoro jen la labortempon necesan por produktado de varo, jen la valoron de la laboro. Ricardo rimarkis tiun eraron, per tio ke li klare pruvis la diferencon de tiuj du mezurmetodoj. S-ro Prudono superas ankoraŭ la eraron de Adam Smith, per tio ke li identigas du aferojn kiujn tiu uzas nur apude.

Por trovi la ĝustan proporcion laŭ kiu la laboristoj disponu pri la produktoj, aŭ, alivorte, por determini la relativan valoron de la laboro, s-ro Prudono serĉas mezurilon por la relativa valoro de la varoj. Por determini la mezurilon por la relativa valoro de la varoj, li scias elruzi nenion pli bonan ol prezenti al ni kiel ekvivalenton por certa kvanto da laboro la sumon de la produktoj kreitaj de ĝi, kio supozigas ke la tuta socio konsistas el nenio ol laboristoj kiuj ricevas kiel salajron sian propran produkton. Duavice li asertas la samvalorecon de la labortagoj de la diversaj laboristoj kiel fakton, unuvorte, li serĉas la mezurilon por la relativa valoro de la varoj por atingi la egalan salajron de la laboristoj, kaj akceptas la egalecon de la salajroj kiel jam pretan fakton, por ekserĉi la relativan valoron de la varoj. Kia admirinda dialektiko!

„Say kaj la ekonomikistoj kiuj sekvis lin, rimarkis ke, ĉar la laboro mem estas submetita al taksado, mallonge, *varo* kiel ĉiu alia, estus

erara cirklo rigardi ĝin kiel principon kaj decidan faktoron de la valoro. Tiuj ekonomikistoj montris per tio, kun permeso, montran malatenton. Oni diras pri la laboro ke ĝi havas *valoron* (*valoir*), ne tiom kiel vera varo ol rigarde al la valoroj kiujn oni supozas imageble entenataj en ĝi. La valoro de la laboro estas figura esprimo, anticipaĵo de la kaŭzo antaŭ la efiko; ĝi estas fikcio de la sama speco kiel la produktiveco de la kapitalo. La laboro produktas, la kapitalo havas valoron (vaut) ... Per ia elipso oni diras valoro de la laboro ... La laboro kiel la libereco ... estas laŭ sia naturo io malpreciza, nedeterminita, kio tamen laŭ sia objekto alprenas certan formon, t.e. kiu per la produkto fariĝas realo.” [I, p. 61]

„Sed kial perdi tempon ĉe tio? Ekde kiam la ekonomikisto” (legu: s-ro Prudono)⁴² „ŝanĝas la nomon de la objekto, la veran nomon de la objektoj, li konfesas implicite sian senpovecon kaj demetas la armilojn.” (Prudono, I, p. 188)

Ni vidis kiel s-ro Prudono faras el la valoro de la laboro la „decidan faktoron” de la valoro de la produktoj en maniero ke por li la salajro, kiel la „valoro de la laboro” estas ĝenerale nomata, konsistigas la kompletan prezon de ĉiu aĵo. Pro tio la kontraŭargumento de Say konfuzas lin. Li vidas en la varo laboro, kiu estas terura realaĵo, nur gramatikan elipson. Laŭ tio la tuta nuntempa socio, bazita sur la varkaraktero de la laboro, estas de nun poeta licenco, bazita sur figurasenca esprimo. Se la socio volas „elimini ĉiujn neelteneblaĵojn” [I, p. 97] sub kiuj ĝi suferas, nu, tiam ĝi eliminu la maldecajn esprimojn, ŝanĝu la lingvon; kaj por tio ĝi bezonas nur turni sin al la akademio por postuli de ĝi novan eldonon de ĝia vortaro. Post ĉio kion ni vidis ni komprenas facile kial s-ro Prudono en verko pri politika ekonomio devas pritrakti longajn disertaĵojn pri etimologio kaj aliaj partoj de gramatiko. Tiel li diskutas ankoraŭ klare pri la arĥaiginta derivado de la vorto *servus* <*servisto*, *sklavo*> de *servare* <*servi*>. Tiuj filologiaj disertaĵoj havas profundan sencon, esoteran sencon, ili konsistigas esencan parton de la argumentado de s-ro Prudono.

La laboro⁴³ estas, laŭ tio ke ĝi estas aĉetata kaj vendata, varo kiel ĉiu alia varo kaj havas do interŝanĝvaloron. Sed la valoro de la laboro kaj la

⁴²<(legu: s-ro Prudono): enmeto de Markso>

⁴³<en la dediĉekzemplerio estis enmetitaj post la vorto „le travail” (la laboro) la vortoj „la force du travail” (la laborforto)>

laboro kiel varo produktas same malmulte kiel la valoro de greno aŭ la greno kiel varo servas kiel nutraĵo.

La laboro „valoras” pli aŭ malpli, laŭ tio ĉu la prezoj por vivrimedoj estas pli altaj aŭ pli malaltaj, laŭ tio ĉu propono de kaj postulo je laborfortoj ekzistas en tiu aŭ alia grado ktp.

La laboro ne estas io „malpreciza”, ĝi estas ĉiam certa laboro, neniam laboro ĝenerale, kiun oni aĉetas kaj vendas. Estas ne nur la laboro kies eco estas determinata de la objekto, ankaŭ la objekto estas determinata per la specifeco de la laboro.

Kondiĉe ke la laboro estas aĉetata kaj vendata, ĝi estas mem varo. Kial oni aĉetas ĝin? „Konsidere al la valoroj kiujn oni supozas en ĝi imageble entenataj.” Sed se oni diras ke ia ajn aĵo estas varo, tiam jam ne temas pri la celo por kiu ĝi estas aĉetata, do pri la utilo kiun oni volas tiri el ĝi, pri la uzo kiun oni volas fari el ĝi. Ĝi estas kiel varo objekto de la komerco. Ĉiuj elruzaĵoj de s-ro Prudono limiĝas al jeno: Oni aĉetas la laboron ne kiel objekton de senpera konsumado. Ne, oni aĉetas ĝin kiel produktadrimedon, kiel oni aĉetas maŝinon. Tiom longe kiom la laboro estas varo, ĝi havas valoron, sed ne produktas. S-ro Prudono povintus same bone diri ke absolute ne ekzistas varoj, ĉar ĉia varo estas aĉetata nur por ia certa uzcelo kaj neniam kiel varo per si mem.

Kiam s-ro Prudono mezuras la valoron de la varoj per la laboro, tiam kaptas lin malcerta sento ke maleblas ne submeti la laboron, laŭ tio ke ĝi havas valoron, la varon laboro, al tiu sama mezurilo. Li antaŭsupozas ke per tio li stampas la minimuman salajron natura kaj normala prezo de la senpera laboro, ke li do akceptas la nunan staton de la socio. Kaj do, por eskapi tiun fatalan konsekvencon, li retroiras kaj asertas ke la laboro ne estas varo, ke ĝi ne povas havi valoron. Li forgesas ke li mem prenis la valoron de la laboro kiel mezurilon; li forgesas ke lia tuta sistemo baziĝas sur la varo laboro, sur la laboro kiun oni forŝakras, aĉetas kaj vendas, kiu interŝanĝiĝas kontraŭ produktaĵoj ktp, sur la laboro fine kiu estas senpera enspezofonto de la laboristo – li forgesas ĉion.

Por savi sian sistemon, li decidiĝas oferi ĝian bazon.

„Et propter vitam vivendi perdere causas!” <”Kaj pro la vivo fordoni la kialojn por la vivo!”
(Juvenalo, „Satiroj”, 8/84)>

Ni alvenas nun ĉe nova klarigo de la „*konstituita valoro*”.

„La valoro estas la proporcia rilato (rapport de proportionnalité) de la produktoj, kiuj konsistigas la riĉaĵon. [I, p. 62]

Ni rimarkigu unue ke la simpla vorto „relativa aŭ interŝanĝ-valoru” inkludas la ideon de ia rilato, en kiu la produktoj reciproke interŝanĝiĝas. Se oni donas al tiu rilato la nomon „proporcia rilato”, tiam oni ŝanĝis neniom ĉe la relativa valoro krom la nomon. Nek la malaltigo nek la altigo de la valoro de produkto prenas al ĝi la econ troviĝi en ia „proporcia rilato” al la aliaj produktoj kiuj konsistigas la riĉaĵon.

Kial do tiu nova esprimo kiu aperigas nenian novan ideon?

La „proporcia rilato” pensigas pri multaj aliaj ekonomiaj rilatoj, ekzemple pri la proporcieco de la produktado, la ĝusta proporcio inter propono kaj postulo ktp; kaj s-ro Prudono pensis pri ĉio ĉi, kiam li formulis tiun didaktikan parafrazon de la interŝanĝvaloro.

Ĉar la relativa valoro de la produktoj estas unue determinata per la laborkvanto respondanta al la produktado aplikita al ĉiu el ili, la proporcia rilato signifas, aplikita al tiu specifa kazo, la responda kvanto da produktoj kiuj estas en donita tempo produktataj kaj sekve interŝanĝeblaj inter si.

Ni vidu nun kian uzon s-ro Prudono faras de tiu proporcia rilato.

Ĉiuj scias ke, se propono kaj postulo ekvilibras, la relativa valoro de produkto estas precize determinata per la en ĝi fiksita laborkvanto, t.e. ke tiu relativa valoro esprimas la proporcian rilaton en precize tiu senco, en kiu ni ĵus klarigis ĝin. S-ro Prudono inversigas la vicon de la aferoj. Oni komencu, diras li, mezuri la relativan valoron de produkto per la en ĝi fiksita laborkvanto, kaj propono kaj postulo senmanke ekvilibriĝos. La produktado respondos al la konsumado, la produkto ĉiam interŝanĝeblas, ĝia kuranta merkaptoprezco esprimos precize ĝian ĝustan valoron. Anstataŭ diri kun ĉiu ajn: Kiam la vetero belas, oni vidas multajn homojn promeni, s-ro Prudono promeniĝas siajn homojn por povi certigi al ili bonan veteron.

Kion s-ro Prudono prezentas kiel konkludo el la apriorie per la labortempo determinita interŝanĝvaloro, pravigeblus nur per leĝo kiu devintus teksti proksimume jene:

La produktoj estas estonte interŝanĝotaj en la preciza proporcio de la labortempo kiun ili kostis. Kia ajn estas la rilato de propono kaj postulo,

la interŝanĝo de la varoj okazu ĉiam tiel kvazaŭ ili estus produktitaj en proporcio de la postulo. S-ro Prudono transprenu la taskon formuli tian leĝon kaj trudi ĝin, tiam ni ne insistu pri pruvoj. Se por li gravas male pravigi sian teorion ne kiel leĝdonanto sed kiel ekonomikisto, tiam li devos pruvi ke la tempo necesa por produktado de varo indikas precize ĝian gradon de utileco kaj ke ĝi krome montras ĝian proporcian rilaton al la postulo kaj sekve al la sumo de la socia riĉaĵo. Tiukaze, se produkto vendiĝas je prezo egala al siaj estiĝokostoj, tiam propono kaj postulo ĉiam ekvilibriĝos; ĉar la produktadkostoj validas kiel la esprimo de la vera rilato de propono al postulo.

S-ro Prudono provas efektive pruvi ke la labortempo necesa por estigo de produkto esprimas ĝian ĝustan rilaton al la bezonoj, tiel ke la objektoj kies produktado kostas plej malmulte da tempo estas tiuj de senpera utilo, kaj tiel paŝon post paŝo plu. Jam la nura produktado de luksa objekto pravas, laŭ tiu instruo, ke la socio havas superfluan tempon kiu permesas al ĝi kontentigi luksajn bezonojn.

La pruvon por tiu aserto s-ro Prudono trovas en la observo ke la plej utilaj aĵoj bezonas plej malmultan produktadtempon, ke la socio komencas ĉiam per la plej facilaj industrioj kaj ke ĝi „iom post iom aliras la produktadon de objektoj kiuj kostas pli da labortempo kaj respondas al pli altaj bezonoj” [I, p. 57].

S-ro Prudono pruntas el s-ro Dunoyer la ekzemplon de la ekstrakta industrio – kolektado, paŝtado, ĉasado, fiŝkaptado ktp –, kiu estas la plej simpla, malplej kosta industrio kaj pere de kiu la homo komencis „la unuan tagon de sia dua kreiteco”. [I, p. 78] La unua tago de lia unua kreiteco estas priskribita en la Genezo⁴⁴, kiu prezentas al ni Dion kiel la unuan industriiston de la mondo.

La aferoj okazas tute alie ol s-ro Prudono pensas. Per la momento en kiu komencas la civilizacio, la produktado ekkonstruiĝas sur la kontraŭdiro de la profesioj, de la sociaj ordoj, de la klasoj, fine sur la kontraŭdiro inter akumulita kaj rekta laboro. Sen kontraŭdiro neniam progreso; jen la leĝo kiun la civilizacio ĝis hodiaŭ sekvis. Ĝis nun la produktadfortoj disvolviĝis surbaze de tiu regado de la klasa kontraŭdiro. Hodiaŭ aserti ke, ĉar ĉiuj bezonoj de ĉiuj laboristoj estis kontentigitaj, la homoj povis dediĉi sin al kreado de pli altrangaj

⁴⁴<la 1-a libro de Moseo en la Malnova Testamento>

produktoj, al pli komplikaj industrioj, tio signifus abstrakti la klasan kontraŭdiron kaj inversigi piedon kaj kapon de la tuta historio. Estus la samo se oni volus diri ke, ĉar sub la romiaj imperiestroj oni nutris murenojn en artefaritaj laĝetoj, oni povis nutri la tutan romian loĝantaron en superabundo; dum ĝuste male la romia popolo malhavis la plej necesan por aĉeti panon, aliflanke la romiaj aristokratoj ne mankis je sklavoj por ĵeti ilin al la murenoj kiel nutraĵon.

La prezo de la vivrimedoj kreskis preskaŭ konstante, dum la prezo de la manufakturaj kaj luksaj artikloj preskaŭ konstante malkreskis. Oni prenu la terkulturadon mem: La plej nemalhaveblaj objektoj, kiel greno, viando ktp, kreskas preze, dum kotono, sukero, kafo ktp en surpriza grado konstante preze falas. Kaj eĉ inter la nutraĵoj, luksaj artikloj, kiel artiŝokoj, asparago ktp, estas hodiaŭ relative malpli kostaj ol la plej necesaj nutraĵoj. En nia epoko la superfluaĵoj estas pli facile produkteblaj ol la necesaj. Fine, en diversaj historiaj epokoj la reciprokaj rilatoj de prezoj estas ne tiom diversaj, kiom kontraŭaj. En la tuta mezepoko la terkulturaj produktoj estis relative pli malmultekostaj ol la manufakturaj produktoj; en la moderna epoko la rilato estas inversa. Ĉu pro tio la utileco de la terkulturaj produktoj malkreskis depost la mezepoko?

La uzado de la produktoj estas determinata de la sociaj kondiĉoj en kiuj la konsumantoj troviĝas, kaj tiuj kondiĉoj mem baziĝas sur la kontraŭeco de la klasoj.

Kotono, terpomo kaj brando estas objektoj de plej ĝenerala uzado. La terpomoj produktis la skrofolon; kotono grandparte anstataŭis ŝaflanon kaj linon, kvankam lino kaj ŝaflano estas en multaj kazoj multe pli utilaj, eĉ se nur higieno. Fine la brando venkis super biero kaj vino, kvankam brando kiel frandaĵo estas ĝenerale rekonata kiel veneno. Dum tuta jarcento la registaroj batalis vane kontraŭ la eŭropa opio; la ekonomio decidis, ĝi diktis al la konsumado siajn ordonojn.

Sed kial kotono, terpomoj kaj brando estas la angulŝtonoj de la burĝa socio? Ĉar por ilia produktado necesas la plej malmulta laboro kaj ili sekve estas plej malaltprezaj. Kial la minimuma prezo decidas pri la maksimuma konsumado? Ĉu eble pro la absoluta utilo de tiuj objektoj, pro la utilo entenata en ili, pro ilia utilo se ili respondas plej utile al la bezonoj de la laboristo kiel homo kaj ne al la homo kiel laboristo? Ne – sed ĉar en socio bazita sur la *mizero*, la *plej mizeraj* produktoj havas la

nature necesan antaŭrangecon servi al la uzado de la granda amaso.

Voli aserti ke, ĉar la malplej kostaj aĵoj estas pli uzataj, ili devas esti pro tio pli utilaj, signifas aserti ke la pro ĝiaj malaltaj produktadkostoj tiom disvastiĝinta uzado de brando estas la plej konvinka pruvo de ĝia utileco; signifas provi kredigi al la proleto ke terpomo estas pli sanfavora por li ol viando; signifas akcepti la nunan staton de la aferoj; signifas fine glori kun s-ro Prudono socion sen kompreni ĝin.

En estonta socio, kie la klaskontraŭeco malaperis, kie jam ne ekzistos klasoj, la uzado jam ne dependus de la *minimuma* produktadtempo, sed la produktadtempo, kiun oni dediĉas al la diversaj objektoj, estus determinota per ilia socia utileco.

Por reveni al la aserto de s-ro Prudono, ekde kiam la labortempo necesa por produktado de objekto ne estas la esprimo de ĝia utilecgrado, la interŝanĝvaloro de tiu objekto, antaŭdeterminita de la labortempo, povas neniam esti decida por la ĝusta rilato de propono kaj postulo, t.e. por la proporcia rilato en la senco kiun s-ro Prudono ligas kun tiu vorto.

Ne estas la vendo de ia ajn produkto je ĝia kostoprezo, kiu konsistigas la „proporcian rilaton” de propono kaj postulo, t.e. la relativan kvoton de tiu produkto fronte al la ĉioma produktaĵo; estas pli ĝuste la *fluktuadoj de propono kaj postulo* kiuj indikas al la produktantoj la produktendan kvanton de donita varo por ricevi en la interŝanĝo almenaŭ la produktadkostojn, kaj ĉar tiuj fluktuadoj okazas konstante, tial regas ankaŭ konstanta moviĝo en investado kaj repreno de kapitaloj en la diversaj branĉoj de la industrio.

„Nur laŭ tiaj fluktuadoj la kapitaloj estas uzataj ĝuste en la necesa proporcio kaj ne pli por la produktado de la diversaj varoj je kiuj ekzistas postulo. Pro kresko aŭ malkresko de la prezo la profitoj kreskas super respektive malkreskas sub sia ĝenerala nivelo, kaj per tio la kapitaloj estas altirataj aŭ forlogataj de la koncerna branĉo, kiu spertis ian aŭ la alian el tiuj fluktuadoj.” – „Se ni rigardas la merkatojn de la grandaj urboj, tiam ni vidas, kun kia reguleco ili estas provizataj per ĉiaj varoj, enlandaj kiel eksterlandaj, en la necesa kvanto, kaj kiom diversa fariĝas la postulo per la efiko de kaprico kaj gusto aŭ la ŝanĝiĝo de la loĝantaro, sen ke ofte okazas blokiĝo pro tro abunda, nek troigita kareco pro mankanta provizado: kaj oni devas koncedi ke la principo kiu alfluigas la kapitalon al la diversaj industribranĉoj en precize la necesa proporcio, efikas pli potence ol

oni kutime supozas.” (Ricardo, Vol. I, p. 105 [106] kaj 108)

Se s-ro Prudono koncedas ke la valoro de la produktoj estas determinata de la labortempo, tiam li devas ankaŭ agnoski la oscilan moviĝon, kiu⁴⁵ sole el la labortempo faras la mezuron de la valoro. Ne ekzistas finkonstituita „proporcia rilato”, ekzistas nur konstituita moviĝo.

Ni vidis en kiu senco ĝustas paroli pri „proporcieco” kiel konsekvenco de la valoro determinata de la labortempo. Ni vidos nun, kiel tiu mezurado per la tempo, nomata de s-ro Prudono „leĝo de proporcieco”, transformiĝas en leĝon de *malproporcieco*.

Ĉia nova invento kiu ebligas produkti en unu horo tion kio estis ĝise produktata en du horoj, malplivalorigas ĉiujn samspecajn produktojn kiuj troviĝas en la merkato. La konkurenco devigas la produktiston vendi la duhoran produkton same malmultekoste kiel la unuhoran produkton. La konkurenco plenumas tiun leĝon laŭ kiu la valoro de produkto estas determinata de la labortempo necesa por ĝia estigo. La fakto ke la labortempo servas kiel mezuro de la interŝanĝvaloro, fariĝas tiel la leĝo de konstanta *malplivalorigo* de la laboro. Eĉ pli; la malplivalorigo etendiĝas ne nur al la varoj alkondukitaj al la merkato, sed ankaŭ al la produktadinstrumentoj kaj al tutaj metiejoj. Tiun fakton Ricardo jam aludas, kiam li diras:

„Per la konstanta kreskado de la produktiveco la valoro de diversaj jam antaŭe produktitaj aĵoj estas konstante malpliigata.” (Vol. II, p. 59)

Sismondi iras ankoraŭ pli antaŭen. Li vidas en tiu de la labortempo „konstituita valoro” la fonton de ĉiuj nuntempaj kontraŭdiroj inter komerco kaj industrio.

„La interŝanĝvaloro”, diras li, „estas lastinstance ĉiam determinata per la kvanto de laboro necesa por krei la taksatan objekton: ne per tiu kiun ĝi kostis siatempe, sed per tiu kiun ĝi kostus estonte, sekve al eble plibonigitaj rimedoj, kaj kvankam tiu kvanto estas malfacile taksebla, ĝi estas tamen ĉiam precize determinata per la konkurenco

⁴⁵<En la listo de Engelso, por tiu tekstero estis rimarkita: dans les sociétés fondées sur les échanges individuels [en la socioj bazitaj sur idividua interŝanĝo]. En la dediĉekzemplero la sama enmeto estis farita sen la vorto: individuels.>

... Ĝi estas la bazo laŭ kiu la propono de la aĉetanto same kiel la postulo de la vendanto estas kalkulata. La unua eble asertos ke la objekto kostis al li dek labortagojn; sed se la alia konvinkiĝas ke ĝi estonteprodukteblas en ok labortagoj kaj se la konkurenco liveras al ambaŭ la pruvon por tio, tiam la valoro estas malaltigata al ok tagoj kaj la negoco estas farata laŭ tiu prezo. Tamen ambaŭ kontraŭuloj estas konvinkitaj ke la objekto estas utila, ke ĝi estas dezirata, ke sen deziro je ĝi neniam vendo eblus; sed la fiksado de la prezo dependas neniel de la utilo.” („Études etc.”, Vol., II, p. 267, édition Bruxelles)

Gravas ne perdi el la vido la cirkonstancon ke tio kio determinas la valoron ne estas la tempo en kiu io estas produktita, sed la *minimuma* tempo en kiu ĝiprodukteblas, kaj tiu minimumo estas konstatata de la konkurenco. Oni supozu por momento ke jam ne ekzistas konkurenco kaj sekve neniam rimedo konstati la laborminimumon necesan por produktado de varo, kio estus la sekvo de tio? Sufiĉus apliki ses horojn al la produktado de objekto, por rajti, laŭ s-ro Prudono, ĉe la interŝanĝo postuli sesoble pli ol tiu kiu aplikis al la produktado de sia objekto nur unu horon.

Anstataŭ „proporcia rilato” ni havas malproportcian rilaton, se entute konsideri rilatojn, ĉu bonajn ĉu malbonajn.

La konstanta malplivalorigo de la laboro estas nur unu flanko, nur unu konsekvenco de la taksado de la varoj per la labortempo; troaj prezaltigoj, superproduktado kaj multaj aliaj fenomenoj de industria anarĥio trovas en tiu taksadmaniero sian klarigon.

Sed ĉu la labortempo servanta kiel valormezuro kreas almenaŭ la relativan variecon en la produktoj kiu tiom ravas s-ron Prudono?

Tute male, en ĝia sekvo la monopollo en sia tuta monotoneco alproprigas al si la produktomondon, same kiel ĉiu scias kaj vidas ke la monopollo alproprigas al si la mondon de la produktadrimedoj. Nur kelkaj branĉoj de la industrio, kiel la kotonindustrio, kapablas fari tre rapidajn progresojn. La natura konsekvenco de tiuj progresoj estas ekz-e rapida falo de la prezoj de la produktoj de la kotonmanufakturo; sed tiom, kiom la prezo de la kotono falas, la prezo de la linteksaĵo devas kreski. Kio estas la sekvo de tio? La linteksaĵo estas anstataŭata de la kotono. Tiel la linteksaĵo estis preskaŭ en tuta Nordameriko anstataŭigita. Kaj anstataŭ la proporcia variecon de la produktoj ni havas la regnon de la kotono.

Kio restas do el tiu „proporcia rilato”? Nenio ol la deziro de filistro kiu ŝatus ke la varoj estu produktataj en tiaj proporcioj ke oni povu vendi ilin je filistra prezo. En ĉiuj epokoj bonaj burĝoj kaj homamaj ekonomikistoj ŝatis elparoli tiun senkulpan deziron.

Ni donu la parolon al la maljuna *Boisguillebert*:

„La prezo de la varoj”, diras li, „devas ĉiam esti *proporcia*, ĉar nur tia reciproka interkonsento ebligas al ili ekzistadon, en kiu *ili* sin reciproke *en ĉiu momento* ree kreas” (jen la konstanta interŝanĝeblo de la s-ro Prudono). „... Ĉar do la riĉaĵo estas nenio alia ol tiu konstanta interŝanĝtrafiko inter homo kaj homo kaj negoco kaj negoco, estus terura blindigo serĉi la kaŭzon de la mizero aliloke ol en la perturbo de tia komerco kaŭzita de la disŝoviĝo de la prezproporcioj.” („*Dissertation sur la nature des richesses*”, eldon. Daire [p. 405 kaj 408])

Ni aŭdu ankaŭ monmodernan ekonomikiston:

„Granda leĝo aplikenda al la produktado estas la *leĝo de la proporcio* (the law of proportion), kiu sole povas konservi la daŭron de la valoro ... La ekvivalento garantiendas ... Ĉiuj nacioj provis, en diversaj epokoj per multnombraj komercaj regularoj kaj limigoj, realigi tiun leĝon de proporcio; sed la egoismo entenata en la homa naturo pelis ilin renversi tiun tutan sistemon de regulado. Proporcio produktado (*proportionate production*) estas la realigo de la vera soci-ekonomia scienco. (W. Atkinson, „*Principles of Political Economy*”, Londono 1840, p. 170–195)

Fuit Troja! <*Trojo jam ne ekzistas!*> Tiu ĝusta proporcio inter propono kaj postulo, kiu siavice ekfariĝas la objekto de tiom da deziroj, jam delonge ĉesis ekzisti. Ĝi transpaŝis la aĝon de kadukeco; ĝi estis ebla nur en tiuj tempoj kiam la produktadrimedoj estis limigitaj, kiam la interŝanĝo okazis en eksterordinare striktaj limoj. Kun la estiĝo de la grandindustrio tiu ĝusta proporcio devis malaperi, kaj kun naturneceso la produktado devis trairi en konstanta sinsekvo la ŝanĝojn de prospero kaj depresio, krizo, stagnado, nova prospero kaj tiel plu.

Tiuj kiuj, kiel Sismondi, revenas al la ĝusta proporcio de la produktado kaj ĉe tio volas konservi la nunajn bazojn de la socio, estas reakciuloj, ĉar ili, por esti konsekvencaj, devas strebi ankaŭ reenkonduki ĉiujn aliajn kondiĉojn de la industrio de antaŭaj tempoj.

Kio tenis la produktadon en ĝustaj aŭ preskaŭ ĝustaj proporcioj? La postulo, kiu superregis la proponon, antaŭiris ĝin; la produktado sekvis paŝon post paŝo la konsumadon. Jam per la instrumentoj, pri kiuj ĝi disponas, devigata produkti en ĉiam pli granda mezuro, la grandindustrio ne povas atendi la postulon. La produktado antaŭiras la konsumadon, la propono devigas la postulon.

En la hodiaŭa socio, en la industrio bazita sur la individua interŝanĝo, la produktadanarĥio estas la fonto de tiom da mizero, kaj samtempe la kaŭzo de ĉia progreso.

Laŭ tio, el du aferoj unu:

Aŭ oni volas la ĝustajn proporciojn de antaŭaj jarcentoj kun la produktadrimedoj de nia tempo, tiam oni estas reakciulo kaj utopiisto samtempe.

Aŭ oni volas la progreson sen anarĥio: tiam oni rezignu, por konservi la produktadfortojn, je la individua interŝanĝo.

La individua interŝanĝo kongruas nur kun la malgranda industrio de antaŭaj jarcentoj kaj kun la „ĝusta proporcio” propra al ĝi, aŭ kun la grandindustrio kaj ties tuta sekvantaro de mizero kaj anarĥio.

Fine do rezultas: La determinado de la valoro per la labortempo, t.e. la formulo kiun s-ro Prudono prezentas al ni kiel tiun kiu devas regeneri la estontecon, estas nur la scienca esprimo de la ekonomiaj kondiĉoj de la nuna socio, kiel Ricardo jam longe antaŭ s-ro Prudono tute klare pruvis.

Sed ĉu almenaŭ la „*egaleca*” aplikado de tiu formulo apartenas al s-ro Prudono? Ĉu li estas la unua kiu pretendis reformi la socion per tio ke li transformas ĉiujn homojn en laboristojn kiuj interŝanĝas senperajn, samajn laborkvantojn? Ĉu li rajtas riproĉi al la komunistoj – tiuj homoj al kiuj mankas ĉia kono de politika ekonomio, tiuj „obstine stultaj homoj”, tiuj „paradizaj revantoj” – ke ili ne trovis antaŭ li tiun „solvon de la problemo de la proletaro”?

Kiu nur iomete konas la evoluon de la politika ekonomio en Anglio, tiu scias ke preskaŭ ĉiuj socialistoj de tiu lando en diversaj tempoj proponis la egalecan aplikon de la teorio de Ricardo. Ni povus citi por s-ro Prudono:

„La politika ekonomio” de Hopkins, 1822; William Thompson, „An

Inquiry into the Principles of the Distribution of Wealth, most conducive to Human Happiness", 1824; T[homas] R[owe] Edmonds, "Practical Moral and Political Economy", 1828 ktp ktp kaj ankoraŭ kvar paĝojn da kajtielpluoj. Ni limigas nin paroligi anglan *komuniston*, s-ron Bray. Ni citu la decidajn teksterojn de lia rimarkinda verko, „Labour's Wrongs and Labour's Remedy", Leeds 1839, kaj sufiĉe longe restu ĉe ĝi, unue ĉar s-ro Bray estas ankoraŭ malmulte konata en Francio, kaj krome ĉar ni kredas esti trovintaj en lia libro la ŝlosilon por la estintaj, estantaj kaj estontaj skribaĵoj de s-ro Prudono.

„La sola rimedo atingi la veron estas klariĝi pri la unuaj bazaj nocioj. Ni unue revenu al la fonto de kiu la registaroj devenigas sin. Irante tiel ĝis la fundo de la afero, ni trovos ke ĉia formo de registaro, ĉia socia kaj politika maljusteco devenas el la nun reganta socia sistemo – la institucio de la privata proprieto, kia ĝi ekzistas nun (the institution of property as it at present exists), kaj ke oni pro tio, por ĉesigi unu fojon por ĉiam la maljustecon kaj la mizeron de nia tempo, devas fundamente renversi la nunan staton de la socio ... Per tio ke ni atakas la ekonomikistojn sur ilia propra tereno kaj per iliaj propraj armiloj, ni tiel malebligas la absurdan babiladon de la *dividistoj* ⁴⁶ kaj *doktrinuloj*, kiun ili ĉiam emas gurdi. Se ili ne neas aŭ malaprobas la agnoskitajn verojn kaj principojn, sur kiuj ili bazas siajn proprajn argumentojn, tiam la ekonomikistoj ne kapablos kontesti la konkludojn al kiuj ni venas pere de tiu metodo.” (Bray, p. 17 kaj 41) „Nur la laboro estas *kiu kreas valoron* (it is labour alone which bestows value) ... Ĉiu homo havas nedubeblan rajton je ĉio kio lia honesta laboro povas akiri por li. Se li tiel alproprigas al si la fruktojn de sia laboro, li faras nenian maljustaĵon kontraŭ la aliaj homoj, ĉar li ne obstaklas al la alia ties rajton agi same ... Ĉiuj nocioj de pli alta kaj pli malalta pozicio, de mastro kaj servisto venas el tio ke oni preteratentis la plej elementajn principojn kaj ke, sekve de tio, la *malegaleco* de posedo enŝteliĝis (and to the consequent rise of inequality of possessions). Tiom longe kiom tiu malegaleco daŭras, maleblos elradikigi tiujn nociojn kaj malfondi la instituciojn kiuj baziĝas sur ili. Ĝis nun oni daŭre flegas la vanan esperon ĉesigi kontraŭnaturan staton, kiel la nuntempe ekzistantan, per tio ke oni detruas la ekzistantan malegalecon kaj lasas daŭri la *kaŭzon* de la malegaleco; sed ni baldaŭ pruvos ke la registaro ne estas kaŭzo, sed

⁴⁶<ĉe Bray: visionaries (revistoj)>

efiko, ke ĝi ne kreas, sed estas kreata – ke ĝi per unu vorto estas la rezulto de la malegaleco de la posedo (the offspring of equality of possessions) kaj ke la malegaleco de la posedo estas nedisigebla ligita kun la nuna socia sistemo.” (Bray, p. 33, 36 kaj 37)

„La sistemo de egaleco havas ne nur la plej grandajn avantaĝojn por si, sed ankaŭ la plej altan justecon ... Ĉiu homo estas membro, kaj pli precize nemalhavebla membro en la ĉeno de efikoj kiuj eliras el ideo, por eble finkonduki al produktado de peco da tuko. Tiel, el la fakto, ke niaj emoj por la diversaj profesioj ne estas samaj, oni ne konkludu ke la laboro de iu pagendas pli bone ol tiu de alia. La inventinto ricevos ĉiam, apud sia justa pago en mono, la tributon de nia admiro kiun nur la genio povas akiri de ni ...

Laŭ la naturo mem de la laboro kaj de la interŝanĝo la plej alta justeco postulas ke ĉiuj interŝanĝantoj ricevu ne nur reciprokajn, sed samajn avantaĝojn (all exchangers should be not only mutually, but they should likewise be equally benefited). Ekzistas nur du aferoj kiujn la homoj povas interŝanĝi inter si, nome la laboro kaj la produkto de la laboro. Se la interŝanĝo okazus laŭ justa sistemo, tiam la valoro de ĉiuj objektoj estus determinata de iliaj *ĉiomaj produktadkostoj* kaj samaj valoroj interŝanĝiĝus ĉiam kontraŭ samaj valoroj (If a just system of exchanges were acted upon, the value of all articles would be determined by the entire cost of production, and equal values should always exchange for equal values). Se ekzemple ĉapelfaristo bezonas tagon por fari ĉapelon, kaj ŝufaristo la saman tempon por fari paron da ŝuoj (kondiĉe ke la krudmaterialo kiun ili uzas havu la saman valoron) kaj se ili interŝanĝas tiujn aĵojn inter si, tiam la avantaĝo, kiun ili tiras el tio, estus samtempe reciproka kaj egala. La avantaĝo kiu venas por unu el la du partoj el tio, ne povus esti malavantaĝo por la alia, ĉar ĉiu liveris la saman kvanton da laboro kaj la materialoj, kiujn ili uzis, estis samvaloraj. Sed se la ĉapelfaristo ricevintus du parojn da ŝuoj kontraŭ unu ĉapelo, daŭre sub la supra kondiĉo, tiam klaras ke la interŝanĝo estus maljusta. La ĉapelfaristo senigus la ŝufariston je unu labortago; kaj se li procedus tiel ĉe ĉiuj siaj interŝanĝoj, tiam li ricevus kontraŭ la laboro de duona jaro la produkton de tuta jaro de alia homo. Ĝis nun ni ĉiam obeis tiun interŝanĝsistemon plej altgrade maljustan: La *laboristoj* donis al la kapitalisto la laboron de tuta jaro interŝanĝe kontraŭ la valoro de duona jaro (the workmen have given the capitalist the labour of a

whole year, in exchange for the value of only half a year) – kaj el tio kaj ne el supozata malegaleco de korpaj kaj intelektaj fortoj de la individuoj devenis la malegaleco de riĉeco kaj potenco. La malegaleco en interŝanĝo, la diverseco de la prezoj ĉe aĉeto kaj vendo, povas ekzisti nur sub la kondiĉo ke la kapitalistoj restas eterne kapitalistoj kaj la laboristoj laboristoj – la unuaj klaso de tiranoj, la aliaj klaso de sklavoj ... Tiu procedo pruvas do klare ke la kapitalistoj kaj proprietuloj donas al la laboristo por la laboro de unu semajno nur parton de la riĉaĵo kiun ili ricevis de li en la pasinta semajno, tio signifas ke ili donas al li por io nenion (nothing for something) ... La interkonsento inter laboristoj kaj kapitalistoj estas nura komedio: Fakte ĝi estas en miloj da kazoj nur senhonta, kvankam *laŭleĝa ŝtelo*. (The whole transaction between the producer and the capitalist is a mere farce: ti is, in fact, in thousands of instances, no other than a barefaced though *legal robbery*.)” (Bray, p. 45, 48, 49 kaj 50)

„La profito de la entreprenisto restos tiom longe perdo por la laboristo – ĝis kiam la interŝanĝo inter ambaŭ partoj estas egala; kaj la interŝanĝo ne povas tiom longe esti egala, kiom la socio estas dividita inter kapitalistoj kaj produktistoj kaj la lastaj vivas de sia laboro, dum la unuaj grasigas sin per tiu laboro.”

„Estas klare”, daŭrigas s-ro Bray, „ke vi povas tute bone starigi tiun aŭ alian formon de registaro ..., ke vi povas tute bone prediki nome de moralo kaj fratamo ... La reciprokeco estas malkongrua kun la malegaleco de la interŝanĝo. La malegaleco de la interŝanĝo, la kaŭzo de la malegaleco de la posedo, estas la sekreta malamiko, kiu voras nin. (No reciprocity can exist where there are unequal exchanges. Inequality of exchanges, as being the cause of inequality of possessions, is the secret enemy that devours us.)” (Bray, p. 51 kaj 52)

„La konsiderado de utilo kaj celo de la socio pravigas min konkludi ke ne nur ĉiuj homoj devas labori, por ke ili venu en la kondiĉon povi interŝanĝi, sed ke samaj valoroj devas interŝanĝiĝi kontraŭ samaj valoroj. Eĉ pli: Ĉar la avantaĝo de iu devas ne esti la perdo de la alia, tial la valoro determinendas per la produktadkostoj. Tamen ni vidis ke sub la nuna socia reĝimo la profito de la kapitalisto kaj de la riĉulo estas ĉiam la perdo de la laboristo – ke tiu rezulto devas nepre okazi kaj ke la malriĉulo estas sub ĉia regadformo en la povo de la

riĉulo, tiom longe kiom la malegaleco daŭras – kaj ke la egaleco en interŝanĝo certigeblas nur per socia sistemo kiu agnoskas la universalecon de la laboro ... La egaleco en interŝanĝo iom post iom transkondukus la riĉaĵon el la manoj de la nunaj kapitalistoj en tiujn de la laboristaj klasoj.” (Bray, p. 53–55)

„Tiom longe kiom tiu ĉi sistemo de malegaleco de interŝanĝo daŭras, la produktantoj estos ĉiam tiom malriĉaj, tiom nesciaj, tiom trolaborintaj kiom ili estas hodiaŭ, eĉ se oni *nuligus* ĉiujn tributojn, *ĉiujn* impostojn ... Nur totala ŝanĝo de la sistemo, la enkonduko de egaleco de la laboro kaj de la interŝanĝo povas plibonigi la staton de la aferoj kaj certigi al la homoj la veran egalecon de rajtoj ... La produktantoj devas fari nur unu klopodon – kaj ili mem estas tiuj de kiuj devas eliri ĉia klopodo por ilia propra feliĉo –, kaj iliaj katenoj estos por ĉiam rompitaĵoj ... La politika egaleco kiel celo estas eraro, ĝi estas eraro eĉ kiel rimedo. (*As an end, the political equality is there a failure, as a means, it is there a failure.*)

Ĉe egaleco de interŝanĝo la avantaĝo de iu ne povas esti la perdo de la alia: ĉar ĉia interŝanĝo estas nur simpla transigo de laboro kaj riĉaĵo, ĝi neniel postulas oferojn. Tiel, sub sistemo bazita sur egaleco de interŝanĝo la produktisto atingos ankoraŭ per siaj ŝparaĵoj riĉecon; sed lia riĉaĵo fariĝos nur la akumulita produkto de sia propra laboro. Li povos interŝanĝi sian riĉaĵon aŭ doni ĝin al iu alia; sed estos al li malebla resti riĉa por iom pli longa tempo post kiam li ĉesis labori. Per la egaleco de interŝanĝo la riĉaĵo perdas sian hodiaŭan kapablon, por tiel diri, renovigi kaj pliigi sin mem: Ĝi ne povos anstataŭigi la perdon estiĝantan el konsumo; ĉar se ĝi ne estas nove kreata de la laboro, la riĉaĵo, konsumita, estas por ĉiam perdita. Tio, kion ni hodiaŭ nomas *profito* kaj *interrezoj*, ne povos daŭre ekzisti sub la sistemo de egala interŝanĝo. La produktisto kaj tiu kiu zorgas pri la distribuado, estos same rekompencataj, kaj la sumo de ilia laboro servos al determinado de la valoro de ĉiu produktita kaj por la konsumanto alirebligita objekto ...

La principo de la egaleco de interŝanĝo devas do naturnecese sekvi la ĝeneralan laboron.” (Bray, p. 67, 88, 89, 94 kaj 109 [1–101])

Post kiam li refutis la argumentojn de la ekonomikistoj kontraŭ la *komunismo*, s-ro Bray daŭrigas jene:

„Se ŝanĝo de la karakteroj estas nepre necesa por ebligi en sia

perfekta formo socian sistemon bazitan sur komuneco, se aliflanke la nuna sistemo donas nek la eblecon nek la cirkonstancojn necesajn por alkonduki tiun ŝanĝon de la karakteroj kaj prepari la homojn por pli bona situacio, kiun ni ĉiuj deziras, tiam estas klare ke la aferoj devas nepre resti tiaj kiaj ili estas, se oni ne malkovras kaj aplikas preparan manieron de disvolvado – procezo kiu apartenas kaj al la nuna sistemo kaj al la estonta sistemo (sistemo de komuneco)⁴⁷ – ia transira stadio, en kiun la socio povas eniri kun ĉiaj siaj eksceso kaj ĉiaj siaj frenezaĵoj, por poste forlasi ĝin, riĉa je ecoj kaj kapabloj kiuj estas la vivkondiĉoj de la sistemo de komuneco.” (Bray, p. 134)

„La tuta ĉi procezo postulus nenion ol la kooperadon en ĝia plej simpla formo ... La produktadkostoj determinus ĉiel la valoron de la produkto, kaj samaj valoroj interŝanĝiĝus ĉiam kontraŭ samaj valoroj. Se el du homoj unu laborintus tutan, la alia duonan semajnon, tiam la unua ricevus duoble da rekompenco ol la alia; sed tiu kromaĵo da pago estus donita al li ne surkoste de la alia: La perdo, kiun la dua suferintus, neniel tuŝus la unuan. Ĉiu interŝanĝus sian individuan salajron kontraŭ aĵoj de sama valoro kiel lia salajro, kaj neniakaze la gajno kiun farus iu ajn aŭ ia industrio, povus fariĝi perdo de iu alia aŭ de ia alia industribranĉo. La laboro de ĉiu individuo estus la sola *skalo* por lia gajno aŭ perdo ...

Pere de ĝeneralaj kaj lokaj oficejoj (boards of trade) oni determinus la kvanton de la diversaj objektoj kiuj necesas por la konsumado kaj la relativan valoron de ĉiu unuopa kompare kun la aliaj (la nombro da laboristoj necesaj en la diversaj laborbranĉoj), unuvorte ĉion kio rilatas al la socia produktado kaj distribuado. Tiuj listoj fareblus por nacio en same mallonga tempo kaj kun la sama facileco kiel nuntempe por privata societo ... La individuoj grupiĝus en familioj, la familioj en komunumoj, kiel sub la nuna reĝimo; oni eĉ ne rekte forigus la distribuadon de la loĝantaro en urbo kaj kamparo, kiom ajn malutila ĝi estas ... En tiu asocio ĉiu individuo ĝuus poste kiel antaŭe la liberecon, kiun li posedas hodiaŭ, akumuli tiom kiom ŝajnas al li bone, kaj fari el la akumuliĵo la uzon kiu taŭgas al li ... Nia socio estus por tiel diri granda akcisosocieto, konsistanta el senfine granda nombro de etaj akcisosocietoj kiuj ĉiuj laboras kaj produktas kaj interŝanĝas siajn produktojn surbaze de la plej perfekta egaleco ...

⁴⁷<(sistemo de komuneco): enmeto de Markso>

Nia nova sistemo de akcisosocietoj”, kiu estas nur koncedo al la hodiaŭa socio por atingi la komunismon, „kiu estas tiel aranĝita ke la individua proprieto je la produktoj daŭre ekzistas apud la komuna proprieto je la produktadfortoj, igas la sorton de ĉiu individuo dependi de lia propra agado kaj disponigas al li egalan parton je ĉiuj avantaĝoj efektivigitaj de la naturo kaj de la teknikaj progresoj. Sekve ĝi aplikeblas al la socio tia kia ĝi estas kaj povas prepari ĝin por pliaj ŝanĝoj.” (Bray, p. 158, 160, 162, [162,] 168, 170 kaj 194)

Ni havas nur malmultajn vortojn por respondi al s-ro Bray, kiu malgraŭ ni kaj kontraŭ nia volo troviĝas en la situacio esti eklipsinta s-ron Prudono, kun la diferenco ke s-ro Bray, tute ne volante diri la lastan vorton de la homaro, nur proponas tiujn disponojn kiujn li opinias taŭgaj por epoko de transiro de la nuna socio en la sistemon de la komuneco.

Unu laborhororo de Petro interŝanĝiĝas kontraŭ unu laborhororo de Paŭlo, tiu estas la fundamenta aksiomo de s-ro Bray.

Ni supozu ke Petro disponeblas pri dek-du horoj da laboro kaj Paŭlo nur pri ses, tiam Petro povas interŝanĝi kun Paŭlo nur ses kontraŭ ses. Al Petro restos do ses laborhoroj; kion li faros per tiuj ses laborhoroj?

Aŭ nenion, t.e. li laboris ses horojn por nenio, aŭ li ferios dum ses pliaj horoj, por meti sin en ekvilibro; aŭ, kaj tiu estas lia lasta rimedo, li aldonas tiujn ses horojn, pri kiuj li ne scias kion fari, al la interŝanĝo kun Paŭlo.

Kion Petro fine pli gajnis ol Paŭlo? Ĉu laborhorojn? Ne. Li gajnis nur horojn da libertempo, li estos devigita, dum ses horoj ludi la pigrulon. Kaj por ke tiu nova rajto je nenifarado estu ne nur tolerata de la nova socio, sed eĉ alte taksata, tiu socio devas trovi sian plej altan feliĉon en la pigreco kaj la laboro premi ĝin kvazaŭ kateno kiun ĝi devas ĉiapreze forigi. Kaj se almenaŭ, por reveni al nia ekzemplo, tiuj libertempaj horoj, kiujn Petro gajnis por Paŭlo, estus vera profito! Neniel; Paŭlo, kiu komencas per labori nur ses horojn, venas per regula kaj reguligita laboro al la sama rezulto kiun ankaŭ Petro atingas nur, kvankam li komencas per supermezuro da laboro. Ĉiu volos esti Paŭlo, estiĝos konkurenco pri la situacio de Paŭlo – prigrokonkurenco.

Kion alportis do la interŝanĝo de samaj laborkvantoj? Superproduktadon, malplivalorigon, superlaboron, sekvan de blokiĝo, fine ekonomiajn situaciojn kiajn ni vidas ekzisti en la nuna socio, sen la

laborkonkurenco.

Sed ne, ni trompiĝas; restas ankoraŭ rimedo kiu povas savi la novan socion, la socion de Petro kaj Paŭlo. Petro konsumos sole la produkton de ses laborhoroj kiuj restas al li. Sed ekde tiu momento, en kiu li jam ne bezonas interŝanĝi, ĉar li produktis, li jam ne bezonos produkti por interŝanĝi, kaj la tuta supozo de socio bazita sur interŝanĝo kaj labordivido neniigus. Oni estus savinta la egalecon de interŝanĝo per tio ke la interŝanĝo mem ĉesus: Paŭlo kaj Petro alvenus al la starpunkto de Robinsono.

Se oni do supozas, ke ĉiuj membroj de la socio estas memstaraj laboristoj, tiam interŝanĝo de samaj laborhoroj eblas nur sub la kondiĉo ke oni dekomence interkonsentas pri la hornombro necesa por la materia produktado. Sed tia interkonsento ekskludas la individuan interŝanĝon.

Ni venas ankaŭ al la sama konkludo, se ni prenas kiel elirpunkton jam ne la distribuadon de la produktitaj produktoj, sed la agon de la produktado. En la grandindustrio Petro ne rajtas determini mem sian labortempon, ĉar la laboro de Petro estas nenio sen la kunlaborado de ĉiuj Petroj kaj Paŭloj kiuj estas kunigitaj en laborejo. El tio klariĝas ankaŭ tre bone la obstina rezisto per kiu la anglaj fabrikistoj kontraŭis la *dekhoreleĝon*; ili sciis tre bone ke malpliigo de la laboro je du horoj, se koncedita al virinoj kaj infanoj, sekvigos saman malpliigon de la labortempo por la [viraj] plenkreskuloj. Estas en la naturo de la grandindustrio ke la labortempo devas esti egala por ĉiuj. Kio estas hodiaŭ la efiko de la kapitalo kaj de la konkurenco de la laboristoj inter ili, estos morgaŭ, kiam oni nuligas la rilaton de laboro kaj kapitalo, la efiko de interkonsento kiu baziĝas sur la rilato de la sumo de produktadfortoj al la sumo de la ekzistantaj bezonoj.

Sed tia interkonsento estas la kondamno de la individua interŝanĝo, kaj tial ni ree alvenis ĉe la supra rezulto.

En principo ne ekzistas interŝanĝo de produktoj, sed interŝanĝo de laboroj kiuj kunefikas por la produktado. La maniero en kiu la produktadfortoj estas interŝanĝataj estas decida por la maniero de interŝanĝado de la produktoj. Generale la maniero de interŝanĝo de la produktoj respondas al la produktadmaniero. Oni ŝanĝu tiun lastan, kaj la sekvo estos la ŝanĝo de la unua. Tial ni vidas ankaŭ en la historio de la socio ke la maniero de interŝanĝo de la produktoj reguliĝas laŭ la reĝimo de ilia produktado. Tial ankaŭ la individua interŝanĝo kongruas

kun certa produktadmaniero, kiu siavice kongruas kun la klaskontraŭeco; pro tio nenia individua interŝanĝo sen klaskontraŭdiro.

Sed la filistra konscienco fermiĝas al tiu evidenta fakto. Tiom longe kiom oni estas burĝo, oni ne povas alie ol vidi en tiu kontraŭdiro staton de harmonio kaj de eterna justeco kiu permesas al iu valorigi sin surkoste de la alia. Por la burĝo la individua interŝanĝo povas plu daŭri sen klaskontraŭdiro: Por li tiuj estas du tute sendependaj aferoj. La individua interŝanĝo, kian imagas la burĝo, tute ne estas la individua interŝanĝo kia ĝi reale okazas.

S-ro Bray levas la *iluzion* de la brava burĝo al *idealo*, kiun li deziras realigi. Per tio ke li purigas la individuan interŝanĝon, ke li liberigas ĝin el ĉiaj kontraŭdiraj elementoj kiujn li trovas en ĝi, li kredas trovi „egalecan” rilaton kiun oni devus enkonduki en la socion.

S-ro Bray tute ne scias ke tiu egaleca rilato, tiu plibonigidealo kiun li volas enkonduki en la mondon, estas mem nenio alia ol la reflekso de la nuna mondo kaj ke pro tio totale maleblas voli rekonstrui la socion sur bazo kiu mem estas nur la plibeligita ombro de tiu socio. Laŭ la mezuro en kiu la ombro alprenas formon, oni rimarkas, ke tiu formo, anstataŭ esti ilia revita transfiguraĵo, estas ĝuste la nuna formo de la socio.⁴⁸

§ 3. Apliko de la leĝo de proporcieco de la valoro

a) La mono

⁴⁸Kiel ĉia alia teorio, ankaŭ tiu de s-ro Bray trovis siajn adeptojn kiuj trompiĝis per la ŝajno. Oni fondis en Londono, Ŝefildo, Lidzo, en multaj aliaj urboj de Anglio Equitable Labour-Exchange-Bazaars <justajn interŝanĝbankojn>, kiuj post sorbo de konsiderindaj kapitaloj ĉiuj skandale bankrotis. Oni perdis la guston pri tio por ĉiam: averto por s-ro Prudono! [Noto de Markso]

(Oni scias ke Prudono ne atentis tiun averton. En la jaro 1849 li provis mem novan interŝanĝbankon en Parizo. Sed ĝi fiaskis jam antaŭ ol ĝi vere ekfunkciis; jura persekuto de Prudono devis servi kiel kovro de ĝia kolapso. F.E.)

„Oro kaj arĝento estas la unuaj varoj kies valoro atingis sian konstituiĝon.” [I, p. 69]

Do, oro kaj arĝento estas la unuaj aplikoj de la – de s-ro Prudono – „konstituita valoro”. Kaj ĉar s-ro Prudono konstituas la valoron de la produktoj per tio ke li determinas ĝin per la laborkvanto enkorpiĝita en ili, tial li devis nur liveri la pruvon ke la ŝanĝiĝoj okazantaj en la valoro de oro kaj arĝento trovas sian klarigon ĉiam en la *ŝanĝiĝoj* de la labortempo necesa por ilia produktado. S-ro Prudono eĉ ne pensas pri tio. Li parolas pri oro kaj arĝento ne kiel varo, sed li parolas pri ili kiel mono.

Lia tuta logiko, se entute eblas paroli pri logiko ĉe li, konsistas en tio, subŝovi la econ de oro kaj arĝento, servi kiel mono, al ĉiuj varoj kiuj havas la econ trovi sian valormezuron en la labortempo. Nenia dubo, tiu subŝovo⁴⁹ atestas naivecon pli ol malicon.

Utila produkto, post esti taksita per la labortempo necesa por sia produktiĝo, estas ĉiam interŝanĝebla (acceptable en échange). Pruvo, elkrias s-ro Prudono, ke la oro kaj la arĝento, troviĝas en la de mi volata situacio de „interŝanĝeblo”. Per tio, oro kaj arĝento estas la valoro atinginta la staton de sia konstituiĝo, la enkorpiĝo de la ideo de s-ro Prudono. Maleblas esti pli bonŝanca en la elekto de siaj ekzemploj. Oro kaj arĝento posedas krom la econ esti varo, kiu estas taksata kiel ĉiu alia per la labortempo, ankoraŭ tiun esti ĝenerala interŝanĝrimedo, mono. Per tio ke oni prezentas oron kaj arĝenton kiel aplikon de la „valoro konstituita” de la labortempo, nenio pli facilas ol la pruvo ke ĉiu varo, kies valoro estos konstituita de la labortempo, estos ĉiam interŝanĝebla, estos mono.

Simplega demando trudiĝas al la spirito de s-ro Prudono: Kial oro kaj arĝento ĝuas la privilegion esti la tipo de la „konstituita valoro”?

„La aparta funkcio, kiun la uzo atribuis al la noblaj metaloj, servi kiel peranto de la trafiko, estas pure konvencia; ĉiu alia varo povus, eble malpli komforte, sed same fidine, plenumi tiun rolon: La ekonomikistoj agnoskas tion, kaj oni citas pli ol unu ekzemplon por tio. Kio estas do la kialo de tiu privilegio ĝenerale atribuita al la metaloj servi kiel mono, kaj kiel klariĝas tiu specifeco de la funkcioj de la mono, kiu havas nenian analogion en la politika ekonomio? Nu bone, ĉu povas esti ebla *restarigi la kuntekston (série)*, el kiu la

⁴⁹En la germanlingva teksto: diese Eskamotage. -vl

mono ŝajnas esti elŝirita, kaj per tio rekonduki tiun al ĝia vera principo?” [I, p. 68 kaj 69]

Jam per tio ke li metas la demandon en tiuj esprimoj, s-ro Prudono premisas *la monon*. La unua demando kiun li devintus starigi al si, estus tiu, ekscii kial en la interŝanĝtrafiko, kia ĝi hodiaŭ elformiĝis, oni devis por tiel diri individuigi la interŝanĝvaloron per kreado de aparta interŝanĝilo. La mono ne estas aĵo, sed socia rilato. Kial la rilato de la mono estas produktadrilato kiel ĉia alia ekonomia rilato, kiel la labordivido ktp? Se s-ro Prudono ekkomprenintus tiun rilaton, li ne vidus en la mono escepton, ne membron elŝiritan el nekonata aŭ remalkovrenda kunteksto.

Li male trovintus ke tiu rilato estas nur unuopa ĉenero en la tuta interligiteco de la ekonomiaj rilatoj kaj, kiel tia, plej dense ligita kun ĝi kaj ke tiu rilato respondas en tute sama grado certan produktadmanieron kiel la individua interŝanĝo. Sed kion li faras? Li komencas per tio, elŝiri la monon el la kunteksto de la hodiaŭa produktadmaniero, por poste fari ĝin la unua membro de imaga, ankoraŭ trovenda kunteksto.

Ekde kiam oni komprenis la neceson de aparta interŝanĝrimedo, t.e. la neceson de la mono, tiam jam ne temas pri la klarigo kial tiu aparta funkcio atribuiĝis antaŭ ĉiuj aliaj varoj al oro kaj arĝento. Tiu estas duaranga demando, kiu trovas sian klarigon ne en la kunteksto de la produktadkondiĉoj, sed en la apartaj materiaj ecoj de oro kaj arĝento. Se laŭ tio la ekonomikistoj ĉe tiu okazo „eliris el la kampo de sia scienco, kiam ili uzis fizikon, meĥanikon, historion ktp” [I, p. 69], kion s-ro Prudono riproĉas al ili, ili faris nur kion ili devis fari. La demando jam ne apartenas al la kampo de la politika ekonomio.

„Tio kion neniuj el la ekonomikistoj”, diras s-ro Prudono, „ekkonis nek komprenis, tio estas la *ekonomia kaŭzo* kiu estis decida por la prefero kiun ĝuas la noblaj metaloj.” [I, p. 69]

La ekonomian kaŭzon, kiun neniuj, pro evidenta kialo, ekkonis nek komprenis, s-ro Prudono ekkonis, komprenis kaj transdonis ĝin al la posteularo.

„Tio kion neniuj rimarkis estas la fakto ke oro kaj arĝento estas la unuaj varoj kies valoro atingis la konstituiĝon. En la patriarĥa periodo oro kaj arĝento estas ankoraŭ komercataj kaj interŝanĝatej en formo de ingotoj, sed jam kun videbla tendenco al regado kaj al

evidenta prefero. Iom post iom la suverenoj akaparas ilin kaj stampas al ili sian sigelon: Kaj el tiu suvereneca konsekrado elpaŝas la mono, tio estas la tipa varo, kiu, spite al ĉiaj skuiĝoj de la merkato, konservas certan proporcion valoron kaj estas ĉie plene akceptata kiel pago ... La aparta pozicio kiun havas oro kaj arĝento estas, mi ripetas, sekvo de la fakto ke ili, danke al siaj metalaj ecoj, al ilia malfacila akiro kaj nome al la interveno de la ŝtata aŭtoritato, konkeris, kiel varoj, ĝustatempe firmecon kaj aŭtentecon.” [I, 69 ĝis 70]

Aserti, ke el ĉiuj varoj oro kaj arĝento estas la unuaj kies valoro atingis sian konstituiĝon, signifas laŭ la supra teksto aserti ke oro kaj arĝento estas la unuaj kiuj fariĝis mono. Tiu estas la granda revelacio de s-ro Prudono, tiu la vero kiun neniu malkovis antaŭ li.

Se s-ro Prudono volis diri per tiuj vortoj ke oro kaj arĝento estas varoj kies labortempo necesa por ilia produktado estis pli frue konata ol tiu de ĉiuj aliaj, tiam tio estus ree iu el tiuj supozoj kiujn li tiel volonte donacas al siaj legantoj. Se ni tenus nin je tiu prapatra klereco, ni dirus al s-ro Prudono ke oni konis tutunue la labortempon necesan por produktado de la plej necesaj objektoj, kiel fero ktp. Eĉ ne necesas la klasika listo de Adam Smith por scii tion. Sed kiel s-ro Prudono post ĉio ĉi povas ankoraŭ paroli pri konstituado de valoro, dum valoro konstituiĝas ja neniam sole por si? La valoro de produkto konstituiĝas ne per la labortempo necesa sole nur por ĝia produktado, sed en la rilato al la kvanto de ĉiuj aliaj produktoj kiujprodukteblas en la sama tempo. La konstituiĝo de la valoro de oro kaj arĝento do jam antaŭkondiĉas la konstituitecon (de la valoro)⁵⁰ de multaj aliaj produktoj.

Estas do ne la varo, kiu en oro kaj arĝento fariĝis „konstituita valoro”, sed estas la „konstituita valoro” de s-ro Prudono kiu en oro kaj arĝento fariĝis mono.

Ni esploru nun la *ekonomiajn kialojn*, kiuj laŭ s-ro Prudono donis al oro kaj arĝento la privilegion esti pli frue ol ĉiuj aliaj produktoj promociitaj al mono, danke al la konstituiĝo de la valoro.

Tiuj ekonomiaj kialoj estas: „videbla tendenco al regado”, la jam en la „prapatra periodo” „evidenta prefero” kaj aliaj parafrazoj de la simpla fakto, kiuj pliiĝas la malfacilon per tio ke ili pliiĝas la fakton per pliigo

⁵⁰<(de la valoro): enmeto de la tradukintoj>

de la kazoj kiujn s-ro Prudono citas por klarigi la fakton. S-ro Prudono tamen ankoraŭ ne elĉerpis ĉiujn laŭdire ekonomiajn kialojn. Ni elektu unu da ili de imprega, suverena forto:

„El la suverena konsekrado elpaŝas la oro: La suverenoj akaparas oron kaj arĝenton kaj stampas al ili sian sigelon.” [I, p. 69]

Tiel do por s-ro Prudono la plaĉo de la suverenoj estas la plej alta kaŭzo en la politika ekonomio!

Efektive, oni devas esti sen ajna historia kono por ne scii ke estas la suverenoj kiuj en ĉiuj tempoj devis cedi al la ekonomiaj kondiĉoj, sed ke neniam estis ili kiuj diktis al ili la leĝon. Kaj la politika kaj la burĝa leĝaro proklamas, protokolas nur la volon de la ekonomiaj kondiĉoj.

Ĉu la suvereno akaparis oron kaj arĝenton por fari ĝin ĝenerala interŝanĝrimedo per stampado de sia sigelo, aŭ ĉu pli ĝuste tiuj ĝeneralaj interŝanĝrimedoj trudis sin al la suvereno, per tio ke ili devigis lin premi al ili sian sigelon kaj doni al ili politikan konsekradon?

La stampo kiun oni donis kaj donas al la oro, ne esprimas ties valoron, sed ties pezon. La firmeco kaj aŭtenteco, pri kiuj s-ro Prudono parolas, koncernas nur la orentenon de la monero; tiu orenten-titolo⁵¹ indikas, kiom da metalmaterialo estas entenata en monero.

„La sola entenata valoro de unu marko da arĝento”, diras Voltero laŭ sia konata sana prudento, „estas duona pundo da arĝento en la pezo de ok uncoj. Pezo kaj arĝententeno sole donas tiun entenatan valoron.” Voltaire, „Système de Law”)

Sed la demando: Kiom valoras unco da oro aŭ de arĝento? tamen daŭre ekzistas. Se kaŝmiro⁵² el la magazeno je la *Granda Colbert* havas la fabriksignon *pura lano*, tiam tiu fabriksigno ankoraŭ ne donas la valoron de la kaŝmiro. Ankoraŭ esplorendas kiom la lano valoras.

„Filipo la 1-a, reĝo de Francio”, diras s-ro Prudono, „almiksis al la monpundo Tournois (pezo de Karlo la Granda)⁵³ trionon da aloj, ĉar li pretendas ke, ĉar li sola havas la monopolon de monfabrikado, li povas ankaŭ fari tion kion ĉiu komercisto faras kiu posedas la

⁵¹Titolo signifas unuflanke titolo, nomo, sed aliflanke ankaŭ, ĉe oro kaj arĝento, ĝian or- respektive arĝent-entanon. La tradukintoj.

⁵²Kaŝmiro signifas ankaŭ (kaj ĉi tie) lanŝtofon el Kaŝmiro. -vl

⁵³<(pezo de Karlo la Granda): enmeto de la tradukintoj>

monopolon de iu produkto. Kio estis fakte tiu monfalsado tiom riproĉata al Filipino kaj al liaj posteuloj? Argumentado tre prava laŭ komerca rutino, sed el vidpunkto de la ekonomia scienco tre malĝusta; nome ke, ĉar propono kaj postulo regulas la valoron, oni povas per artefarita malabundo kaj per monopolado de la fabrikado do kreskigi la pritakson kaj do ankaŭ la valoron de la aĵoj, kaj ke tio validas same pri oro kaj arĝento kiel pri greno, vino, oleo kaj tabako. Tamen, apenaŭ la trompo de Filipino konatiĝis, kiam lia mono estis reduktita al la ĝusta valoro kaj li samtempe perdis tion kion li kredis eltrompi el siaj subuloj. La sama sorto trafis en la sekvo ĉiujn similajn provojn.” [I, p. 70–71]

Unue, montriĝis tre ofte ke, kiam suvereno komencas falsi la monerojn, estas li kiu ĉe tio perdas. Kion li unufoje gajnas ĉe la unua emisio, li perdas tiom ofte kiom la falsitaj moneroj refluas al li en formo de impostoj ktp. Sed Filipino kaj liaj posteuloj sciis pli aŭ malpli bone protekti sin kontraŭ tiu perdo; ĉar apenaŭ la falsita mono estis metita en cirkuladon, ili faris nenion pli urĝan ol ordoni ĝeneralan refandadon de la mono al la malnova mezuro.

Sed tiam, se Filipino la 1-a argumentis vere kiel s-ro Prudono argumentas, tiam Filipino la 1-a ne argumentis bone el „komerca vidpunkto”. Nek Filipino la 1-a nek s-ro Prudono montras komercan spiriton se ili imagas ke oni povas ŝanĝi la valoron de la oro kiel tiun de ĉiu alia varo pro la sola kialo ke ilia varo estas determinata de la rilato de propono kaj postulo.

Se reĝo Filipino ordonintus ke maltero⁵⁴ da tritiko nomiĝu estonte du malteroj da tritiko, tiam li trompintus ĉiujn rentulojn, ĉiujn homojn kiuj ricevis cent malterojn da tritiko; li estintus la kaŭzo ke ĉiuj ĉi homoj ricevintus anstataŭ cent malterojn da tritiko nur kvindek. Oni supozu ke la reĝo estis ŝuldanto de cent malteroj da tritiko, tiam li devintus pagi nur kvindek. Sed en la komerco cent malteroj validintus neniam pli ol antaŭe kvindek. Per tio ke oni ŝanĝas la nomon, oni ŝanĝas neniom ĉe la afero. La kvanto da tritiko, la proponata kiel la postulata, estus per tiu nomŝanĝo nek malpliigita nek pliigita. Ĉar spite al tiu nomŝanĝo la rilato de propono kaj postulo restus la sama, la prezo de la greno suferus nenian realan ŝanĝon. Se oni parolas pri propono kaj postulo de la aĵoj,

⁵⁴<iam germana kaj svisa mezuro. La maltero havis en la diversaj germanaj landoj diversan enhavon: inter 182 kaj 1.248 litrojn.>

tiam oni ne parolas pri propono kaj postulo de la nomo de la aĵoj. Filipo la 1-a ne faris oron aŭ arĝenton, kiel s-ro Prudono diras, li faris nur nomojn de moneroj. Ŝajnigu viajn francajn kaŝmirojn esti hindiaj, tiam eblas ke vi trompos unu aŭ du aĉetantojn, sed ekde kiam la trompo sciiĝas, viaj ŝajnigitaj hindiaj kaŝmiroj falos al la prezo de la francaj. Per tio ke li donis al oro kaj arĝento falsan etiketon, Filipo la 1-a povis trompi la homojn tiom longe kiom la trompo ne estis konata. Kiel ĉiu alia trompkomercisto li trompis siajn klientojn per falsa nomo de la varo: tio povis daŭri certan tempon. Pli aŭ malpli frue li devis sperti la senkompatajn leĝojn de la trafiko. Ĉu s-ro Prudono volis pruvi tion? Ne. Laŭ li, la mono ricevas sian valoron de la suvereno kaj ne de la trafiko. Kaj kion li reale pruvis? Ke la trafiko estas pli suverena ol la suvereno. La suvereno ordonu ke unu marko estu estonte du markoj, kaj la trafiko ĉiam asertos ke tiuj du markoj validas nur tiom kiom unu marko antaŭe.

Sed per tio la demando de la valoro determinata de la labortempo progresis eĉ ne per unu paŝo. Daŭre estas eltrovenda ĉu tiuj du markoj, kiuj nun refariĝis la marko de antaŭe, estas determinataj de la produktadkostoj aŭ de la leĝo de propono kaj postulo.

S-ro Prudono daŭrigas:

„Restas ankoraŭ por konsideri ke, se estus en la povo de la reĝo, anstataŭ falsi la monon, duobligi ties kvanton, la interŝanĝvaloro de la oro kaj arĝento duone falintus, ĉiam surbaze de proporcieco kaj de ekvilibro.” [I, p. 71]

Se tiu opinio de s-ro Prudono kaj de aliaj ekonomikistoj estas ĝusta, tiam ĝi favoras ilian doktrinon de propono kaj postulo kaj tute ne la proporciecon de s-ro Prudono. Ĉar kia ajn estus la labortempo enkorpigita en la duobla maso da oro kaj arĝento, ĉiam ilia valoro duone falintus, se la postulo restus la sama kaj la propono duobliĝus. Aŭ ĉu hazarde la „leĝo de proporcieco” ĉifoje signifus la tiom malestimatan leĝon de propono kaj postulo? La ĝusta proporcieco de s-ro Prudono estas efektive tiom elasta, ĝi permesas tiom da variaĵoj, kombinaĵoj kaj permutaĵoj, ke ĝi eble foje povas hazarde kongrui kun la rilato de propono kaj postulo.

Aserti, ke „ĉiu varo interŝanĝeblas (ĉiumomente)⁵⁵, se ne fakte, tiam almenaŭ jure” [I, p. 71], kun la indiko de la rolo kiun oro kaj arĝento

⁵⁵<(ĉiumomente): enmeto de la tradukintoj>

ludas, signifas miskoni tiun rolon. Oro kaj arĝento interŝanĝeblas laŭjure (ĉiumomente)⁵⁶, ĉar ili estas fakte interŝanĝeblaj; kaj ili estas tiaj fakte, ĉar la nuna organiziteco de la produktado bezonas ĝeneralan interŝanĝrimedon. La juro estas nur la oficiala agnosko de la fakto.

Ni vidis ke la ekzemplo de la mono kiel prezentado de la valoro atinginta sian konstituadon estis elektita de s-ro Prudono nur por povi enŝteliĝi sian tutan instruon pri la interŝanĝeblo, tio signifas por pruvi ke ĉiu varo taksata laŭ siaj produktadkostoj devas fariĝi mono. Ĉio ĉi estus tre bela, se ne ekzistus la eta malbono ke ĝuste oro kaj arĝento en sia eco de monero (kiel valorsigno)⁵⁷ estas de ĉiuj varoj la solaj kiuj ne estas determinataj de siaj produktadkostoj; kaj tio estas tiom ĝusta ke en la cirkulado ili anstataŭiĝeblas per papero. Tiom longe kiom oni observas certan rilaton inter la bezonoj de la cirkulado kaj la kvanto de la elspesita mono, egale ĉu tiu estas paper-, or-, platen- aŭ kupro-mono, tiam ne temas pri konservado de rilato inter la entenata valoro (produktadkostoj) kaj la nominala valoro de la mono. Sen ajna dubo, en la internacia trafiko la mono, kiel ĉiu alia varo, estas determinata de la labortempo. Sed ankaŭ oro kaj arĝento estas en la internacia trafiko interŝanĝrimedoj kiel produktoj, ne kiel mono, t.e. ili perdas tiun karakteron de „firmeco kaj aŭtenteco”, de la „suverena konsekriĝo” kiuj formas laŭ s-ro Prudono ilian specifan karakteron. Ricardo tiom bone komprenis tiun veron ke, kvankam li bazas sian tutan sistemon sur la valoron determinatan de la labortempo kaj deklaras: „oro kaj arĝento havas, kiel ĉiu alia varo, nur valoron en rilato al la labortempo kiu necesas por produkti kaj surmerkatigi ilin” – li tamen aldonas ke la valoro de la *mono* estas determinata ne de la labortempo fiksita en ĝia materio, sed de la leĝo de propono kaj postulo.

„Kvankam la papero ne havas internan valoron, tamen, se oni limigas ĝian kvanton, ĝia interŝanĝvaloro povas egali al la valoro de metalmono en sama sumo aŭ al la ingoto taksita laŭ sia monvaloro. Tute same, sekve al la sama principo, t.e. per tio ke oni limigas la kvanton de mono, subvaloraj moneroj povas cirkuli en la valoro kiun ili havas se ilia pezo kaj ilia enhavo estus tiuj preskribitaj de la leĝo, sed ne laŭ la interna valoro de la pura metalo kiun ili enhavas. Pro tio ni trovas en la historio de la angla mono ke nia metalmono neniam malplivaloriĝis en la sama proporcio kiel ĝi estis falsita. La kaŭzo

⁵⁶<(ĉiumomente): enmeto de la tradukinto>

⁵⁷<(kiel valorsigno): enmeto de la tradukinto>

kuŝas en tio ke ĝi estis neniam pliigita en la proporcio de sia malplivaloriĝo.” (Ricardo, saml. [II, p. 206–207])

J[ean]-B[aptiste] Say rimarkigas pri tiu teoremo de Ricardo:

„Tiu *ekzemplo* devus, kiel ŝajnas al mi, sufiĉi por konvinki la aŭtoron ke la bazo de ĉia valoro ne estas la laborkvanto necesa por produktado de varo, sed la bezono kiun oni sentas je ĝi, kune kun ĝia malabundo.”

Tiel la mono, kiu por Ricardo jam ne estas valoro determinata de la labortempo kaj kiun J.-B. Say pro tio prenas kiel ekzemplon por konvinki Ricardo-n ke la aliaj valoroj ankaŭ ne povas esti determinataj de la labortempo – tiel tiu mono, kiun J.-B. Say prenas kiel ekzemplon de valoro ekskluzive determinatan de propono kaj postulo, fariĝas por s-ro Prudono la tipa ekzemplo de apliko de la valoro konstituita – de la labortempo.

Por veni al la fino: Se la mono ne estas „valoro konstituita” de la labortempo, tiam ĝi povas havi ankoraŭ multe malpli komunan kun la ĝusta „proporcieco” de s-ro Prudono. Oro kaj arĝento estas ĉiam interŝanĝeblaj, ĉar ili havas la apartan funkcion servi kiel universala interŝanĝilo, kaj tute ne ĉar ili troviĝas en proporcia kvanto en la tutaĵo de la havaĵoj: aŭ, por esprimi tion eĉ pli bone, ili estas ĉiam proporciaj, ĉar ili el ĉiaj varoj sole servas kiel mono, kiel universala interŝanĝilo, egale en kiu proporcio ilia kvanto troviĝas al la tutaĵo de la havaĵoj.

„La mono troviĝanta en cirkulado povas neniam ekzisti sufiĉe por transflui; ĉar se vi malpliigas ĝian valoron, vi pliigas en la sama proporcio ĝian kvanton, kaj per la pliigo de ĝia valoro vi malpliigos ĝian kvanton.” (Ricardo [II, p. 205])

„Kia konfuzego estas la politika ekonomio!” elkrias s-ro Prudono. [I, p. 72]

„Damnita mono! elkrias komike komunisto” (tra la buŝo de s-ro Prudono). „Same bone direblus: damnita tritiko! damnitaj vinberplantoj! damnitaj ŝafoj! ĉar same kiel oro kaj arĝento ĉia *komerca valoro* devas akiri sian skrupule precizan determinadon.” [I, p. 73]

La ideo, atribui al ŝafoj kaj vinberplantoj la econ de mono, ne estas nova. En Francio ĝi apartenas al la jarcento de Ludoviko la 14-a. En tiu epoko, kiam la mono komencis trudi sian ĉiopovecon, oni plendis pri la

malplivaloriĝo de ĉiuj aliaj varoj kaj sopiris la momenton en kiu ĉia „komerca valoro” akiru sian skrupule precizan determinadon, povu fariĝi mono. Jam ĉe Boisguillebert, unu el la plej malnovaj ekonomikistoj de Francio, ni trovas jenan frazon:

„Tiam la mono, danke al tiu nemezurebla alfluo de konkurantoj, de la varoj reenmetitaj en sian ĝustan valoron, estos remetita en siajn naturajn limojn.” (,*Économistes financiers du dix-huitième siècle*”, p. 422, eld. Daire.)

Oni vidas: La unuaj iluzioj de la burĝaro estas ankaŭ ĝiaj lastaj.

b) La laborkromaĵo

„Oni trovas en la eseoj pri politika ekonomio la sekvan trivialan hipotezon: Se la prezo de ĉiuj aĵoj estus duobligita ... Kvazaŭ la prezo de ĉiuj aĵoj ne estus la rilato de la aĵoj kaj kvazaŭ eblus duobligi proporciojn, rilaton, leĝon!” (Prudono, vol. I, p. 81)

La ekonomikistoj falis en tiun eraron, ĉar ili ne komprenis la ĝustan aplikon de la „leĝo de proporcio” kaj de la „konstituita valoro”.

Bedaŭrinde oni trovas en la verko de s-ro Prudono mem, vol. I, p. 110, tiun trivialan hipotezon ke, „se la salajro kreskus ĝenerale, la prezo de ĉiuj aĵoj kreskus”. Kiel pinto de malbonŝanco, se oni trovas en la eseoj pri politika ekonomio la koncernan frazon, oni trovas tie mem ankaŭ ĝian klarigon.

„Se oni diras ke la prezo de ĉiuj varoj kreskas aŭ malkreskas, tiam oni ĉiam ekskludas unu aŭ la alian el la varoj: La ekskludita varo estas kutime la mono aŭ la laboro.” (,*Encyclopaedia Metropolitana or Universal Dictionary of Knowledge*”, vol. IV, artikolo „*Political Economy*” de Senior, Londono 1836. Vidu ankaŭ pri tiu esprimo J. St. Mill, „*Essays on Some Unsettled Questions of Political Economy*”, Londono 1844, kaj Tooke, „*A History of Prices, etc.*”, Londono 1838.)

Ni iru nun al la *dua apliko* de la „konstituita valoro” kaj de aliaj proporcioj, kies sola eraro estas, esti malmulte proporciitaj; kaj ni vidu ĉu s-ro Prudono tie estas pli bonŝanca ol en la *transformado* de ŝafoj *en monon*.

„Aksiomo unuanime agnoskita de la ekonomikistoj diras ke ĉia

laboro devas rezultigi kromaĵon. Tiu frazo validas por mi absolute kaj ĝenerale vera: Ĝi estas la kompletigo de la leĝo de proporcieco, kiun oni povas konsideri la sumo de ĉia ekonomia scienco. Sed mi petas la ekonomikistojn je pardono; La principo ke ĉia laboro devas rezultigi kromaĵon, havas en ilia teorio nenian sencon kaj ne *pruveblas*.” (Prudono [I, p. 73])

Por prui ke ĉia laboro devas rezultigi kromaĵon, s-ro Prudono personigas la socion, li faras ĝin *persono socio*, socio kiu estas neniel la socio de la personoj, ĉar ĝi havas siajn apartajn leĝojn kiuj havas nenion komunan kun la personoj el kiuj ĝi konsistas; ĝi havas ankaŭ sian „propran menson”, kiu ne estas la menso de la komunaj homoj, sed menso kiu ne havas la komunan saĝon. S-ro Prudono riproĉas al la ekonomikistoj ne esti komprenintaj la personecon de tiu komunumo. Ni havas la plezuron kontraŭmeti al li la sekvan frazon de usona ekonomikisto kiu riproĉas al la aliaj ekonomikistoj ĝuste la malon:

„Al la morala *individuo* (*the moral entity*), al la gramatika estaĵo (*the grammatical being*), nomata socio, oni atribuis ecojn kiuj konsistas nur en la iluzio de tiuj kiuj faras el vorto aĵon ... Tio kaŭzis multajn malfacilaĵojn kaj bedaŭrindajn erarojn de la politika ekonomio.” (Th[omas] Cooper, „*Lectures on the Elements of Political Economy*”, Columbia 1826)

„Tiu principo de la laborabundo” daŭrigas s-ro Prudono, „ĝustas koncerne individuojn nur ĉar ĝi eliras el la socio, kiu tiel donas al ili la bonfaron de iliaj propraj leĝoj.” [I, p. 75]

Ĉu s-ro Prudono volas diri per tio nur ke la produktado de la individuo en la socio superas tiun de la izolita individuo? Ĉu li volas paroli pri tiu troabundo da produktaĵo de la asociitaj individuoj super tiu de la ne asociitaj individuoj? Se estas tiel, tiam ni povas citi al li cent ekonomikistojn kiuj eldiris tiun simplan veron sen la tuta mistikismo en kiun s-ro Prudono vualas sin. Tiel ekz-e s-ro Sadler:

„La komuna laboro donas rezultojn kiujn la individua laboro neniam povas estiĝi. Pro tio, laŭ la mezuro en kiu la homaro pliiĝas laŭnombre, la produktoj de la unuiĝinta laboro ege superos la sumon kiu estiĝas el la simpla sumigo de la homnombra pliiĝo ... En la meĥanikaj industrioj kiel sur scienca kampo ĉiu unuopulo povas hodiaŭ fari en unu tago pli ol izolita individuo dum sia tuta vivo. La matematika aksiomo ke la ĉiomo estas la sumo de la partoj, estas

malĝusta ĉe aplikado al nia temo. Koncerne la laboron, tiun grandan pilieron de la homa ekzistado (*the great pillar of human existence*), eblas diri ke la produkto de la komunaj klopodoj ege superas tion kion izolitaj klopodoj de unuopuloj iam ajn kapablas produkti.” (Th[omas] Sadler, „*The Law of Population*”, Londono 1830)

Ni revenu al s-ro Prudono. La laborabundo, diras li, trovas sian klarigon en la persono socio. La vivagado de tiu persono sekvas leĝojn kiuj kontraŭdiras la leĝojn kiuj determinas la agadon de la homoj kiel individuoj; tion li volas pruvi per „*faktoj*”.

„La malkovro de nova ekonomia procedo povas neniam doni al la inventinto avantaĝon kiu estus egala al tiu kiun ĝi donas al la socio ... Oni rimarkis ke la fervojaj entreprenoj estas multe malpli riĉfonto por la entreprenistoj ol por la ŝtato ... La mezuma prezo de la vartransportoj per ĉaro estas po 18 centonoj por tuno kaj kilometro de kaj al stokejo. Oni kalkulis ke ĉe tiu prezo ordinara fervoj-entrepreno povus fari eĉ ne 10 elcentoj da neta profito, rezulto kiu preskaŭ egalas al tiu de ĉartransporta entrepreno. Sed ni supozu ke la rapido de transporto per fervojo rilatas al tiu de ĉartransporto kiel 4 : 1, tiam, ĉar en la socio la tempo mem estas valoro, ĉe sama prezo la fervojo prezentos fronte al la ĉartransporto gajnon de 400 elcentoj. Tamen tiu eksterordinara, por la socio tre reala gajno tute ne realiĝas en la sama proporcio por la transportentrepreno, kiu, dum ĝi donas al la socio avantaĝon de 400 elcentoj, mem ricevas eĉ ne 10 elcentojn. Ni supozu fakte, por fari la aferon ankoraŭ pli palpebla, ke la fervojo fiksas sian tarifon je 25 centonoj, dum tiu de la transporto per ĉaro restas 18, tiam ĝi tuj perdus ĉiujn siajn vartransportojn. Sendantoj kaj ricevantoj, ĉiuj, se necese revenos al la malnovaj pumpumkestoj. Oni lasos stari la lokomotivon: Socia avantaĝo de 200 elcentoj estos oferata al privata perdo de 35 elcentoj. La kaŭzo de tio facile kompreneblas: La avantaĝo kiun donas la rapideco de la fervojo, estas pure socia, kaj ĉiu unuopulo partoprenas en ĝi nur en la plej malgranda mezuro (ni ne forgesu ke temas en tiu ĉi momento nur pri vartransporto), dum la perdo trafas la konsumanton rekte kaj persone. Socia avantaĝo, egala al 400, prezentigas por la individuo, se la socio konsistas nur el miliono da homoj, $\frac{4}{10.000}$, dum perdo de 33 elcentoj por la konsumanto supozigus socian deficiton de 33 milionoj.” (Prudono [I, p. 75–76])

Eble ankoraŭ akcepteblus, ke s-ro Prudono esprimas kvaroblan

rapidon per 400 elcentoj de la origina rapido; sed se li rilatigas la elcentojn de la rapido kun la elcentoj de la profito kaj volas esti interrilaton inter du aferoj, kiuj ĉiu por si ja mezureblas per elcentoj, sed sendepende de tio ne havas komunan mezuron, tio signifas esti rilaton inter la elcentoj kaj preterlasi la aferojn mem.

Elcentoj estas ĉiam elcentoj. 10 elcentoj kaj 400 elcentoj estas kunmezureblaj, ili rilatas inter si kiel 10 : 400; pro tio, konkludas s-ro Prudono, 10-elcenta profito validas kvardekoble malpli ol kvarobla rapido. Por savi la ŝajnon, li diras, ke por la socio la tempo estas la valoro (time is money). Tiu eraro venas el tio ke li malprecize memoras ke ekzistas rilato inter valoro kaj labortempo, kaj li havas nenion pli urĝan por fari ol egaligi la labortempon kun la transporttempo, t.e. li identigas la kelkajn hejtistojn, trajnestrojn ktp, kies labortempo estas nenio alia ol la transporttempo, kun la tuta socio. Tiel la rapido fariĝas subite kapitalo, kaj tiel li tute pravas diri: „Avantaĝo de 400 elcentoj estas oferata al perdo de 33 elcentoj.” Post starigi tiun strangan frazon kiel matematikisto, li klarigas ĝin al ni kiel ekonomikisto.

„Socia avantaĝo, egala al 400, prezentas por la individuo, kiam la socio konsistas nur el miliono da homoj, $\frac{4}{10.000}$.” Konsentite; sed temas ne pri 400, sed pri 400 elcentoj, kaj avantaĝo de 400 elcentoj prezentas por la individuo 400 elcentojn, ne pli kaj ne malpli. Kia ajn estas la kapitalo, la dividendoj kalkuliĝas ĉiam en la rilato de 400 elcentoj. Kion faras s-ro Prudono? Li prenas la elcentojn por la kapitalo, kaj kvazaŭ li timus ke lia konfuzaĵo ne estus „palpebla”, ne sufiĉe klara, li daŭrigas:

„Perdo de 33 elcentoj por la konsumanto antaŭkondiĉus socian deficiton de 33 milionoj.” 33 elcentoj da perdo por la konsumanto restas 33 elcentoj da perdo por miliono da konsumantoj. Kiel s-ro Prudono povas do racie diri ke ĉe perdo de 33 elcentoj la socia deficiito estas 33 milionoj, dum li konas nek la socian kapitalon nek eĉ nur la kapitalon de unu sola interesito? Do, al s-ro Prudono ne sufiĉis konfuzi *kapitalon* kaj *elcentojn*, li ankoraŭ superas sin per tio ke li identigas la *kapitalon* investitan en entreprenon kun la *nombro* da interesitoj.

„Ni supozu efektive, por fari la aferon ankoraŭ pli palpebla”, certan kapitalon. Socia profito de 400 elcentoj, distribuita al miliono da partoprenantoj, el kiuj ĉiu partoprenas per unu franko, rezultas kvar fankojn da profito pokape kaj ne 0,0004, kiel s-ro Prudono asertas. Same, perdo de 33 elcentoj por ĉiu partoprenanto prezentas socian

deficiton de 330.000 frankoj kaj ne de 33 milionoj ($100 : 33 = 1.000.000 : 330.000$).

Ravita de sia teorio de la persono socio, s-ro Prudono forgesas fari la dividon per 100. Li tiel alvenas ĉe 330.00 frankojn da perdo, sed 4 frankoj pokape faras por la socio 4.000.000 frankojn da profito. Restas por la socio neta profito de 3.670.000 frankoj. Tiu preciza kalkulo pruvas ĝuste la malon de tio kion s-ro Prudono volis pruvi: nome ke profito kaj perdo de la socio tute ne rilatas en inversa rilato al profito kaj perdo de la individuoj.

Post kiam ni tiel korektis tiujn simplajn kalkulerarojn, ni rigardu nun la konsekvencojn al kiuj oni devus veni, se oni volus por la fervojoj preni kiel bazon la rilaton de rapido kaj kapitalo, kiel s-ro Prudono donas ĝin, sen la kalkuleraroj. Ni supozu ke kvaroble pli rapida transporto kostas kvaroble pli, tiam tiu transporto ne donus malpli da profito ol la transporto per ĉaro, kiu okazas kvaroble pli malrapide kaj kostas kvaroble malpli. Se do la ĉartransporto prenas 18 centonojn, tiam la fervojo povus preni 72 centonojn. Tio estus laŭ „matematika precizeco” la konsekvenco de la premiso de s-ro Prudono, se oni korektas la kalkulerarojn. Sed jen li diras al ni subite ke, se la fervojo prenis anstataŭ 72 centonojn nur 25, ĝi tuj perdus ĉiujn siajn vartransportojn. Estas decidite, oni devas reveni al la malnova pumpumkesto. Se ni tamen devas doni konsilon al s-ro Prudono, tiam tiun, en sia „*Programme de l'association progressive*” ne forgesi la dividon per 100. Sed bedaŭrinde oni ne povas atendi ke nia konsilo estos aŭdata, ĉar s-ro Prudono estas tiom ravita de sia „progres” kalkulo, kiu respondas al lia „progres” asocio”, ke li kun granda emfazo elkrias:

„Mi montris jam en la dua ĉapitro, ĉe la solvo de la antinomio de la valoro, ke la avantaĝo de ĉia utila malkovro estas senkompare malpli granda por la inventinto, kiom ajn li faras, ol por la socio; mi liveris la pruvon pri tio *ĝis matematika precizeco!*”

Ni revenu al la fikcio de la persono socio, kiu havis neniun alian celon ol pruvi la simplan fakton ke nova invento kiu produktigas per la sama laborkvanto pli grandan kvanton da varoj, malaltigas la merkaptoprezon de la produkto. La socio ricevas per tio gajnon, ne per tio ke ĝi akiras pli da interŝanĝvaloro, sed ke ĝi ricevas pli da varoj por la sama valoro. Koncerne la inventinton, la konkurenco efikas ke lia profito iom post iom malaltiĝas ĝis la ĝenerala nivelo de la profitoj. Ĉu

s-ro Prudono pruvis tiun frazon, kion li volis? Ne. Sed tio ne malhelpas lin riproĉi al la ekonomikistoj ke ili ne liveris tiun pruvon. Por pruvi al li la malon, ni citu nur Ricardo-n kaj Lauderdale-on; Ricardo, la kapo de la skolo kiu determinas la valoron laŭ la labortempo, Lauderdale, unu el la plej decidaj defendantoj de la determinado de la valoro per propono kaj postulo. Ambaŭ starigis la saman teoremon.

„Per tio ke ni konstante altigas la facilecon de la produktado, ni konstante malpliigas la valoron de kelkaj antaŭe produktatajn aĵojn, kvankam ni per tiu rimedo ne nur pliigas la nacian riĉecon, sed ankaŭ la eblecon produkti por la estonteco ... Ekde kiam ni per maŝinoj aŭ per nia natursciencaj konoj devigas la naturfortojn plenumi la laboron kiun ĝis tiam faris la homo, sekve de tio la interŝanĝvaloro de la produkto falas. Se necesus dek homoj por turni grenmuelilon, kaj oni malkovrus ke per vento aŭ akvo la laboro de tiuj dek homoj ŝpareblas, tiam la faruno, la produkto de la muelila laboro, ekde tiu momento falus en proporcio de la sumo de ŝparita laboro, kaj la socio estus riĉiĝinta je la plena valoro de la aĵoj kiujn la laboro de tiuj dek homoj povas produkti, ĉar la fondusoj destinitaj al la vivtenado de la laboristoj per tio suferintus eĉ ne la plej etan malpliigon.” (Ricardo [II, p. 59])

Lauderdale siavice diras:

„La profito de la kapitaloj devenas ĉiam el la cirkonstanco ke ili transprenas al si parton de la laboro kiun la homo devus fari per siaj manoj, t.e. ke ili plenumas laboron trans la personaj klopodoj de la homo, kiun li mem ne kapablas plenumi. La malgranda profito kiun ĝenerale la posedantoj de la maŝinoj ricevas, eble vekos dubojn pri la ĝusteco de tiu opinio. Vaporpumpilo transportas ekz-e en unu tago pli da akvo el karbminejo ol tricent homoj povus porti sur sia dorso, eĉ se ili farus sitelĉenon, kaj estas nenio dubo ke ĝi anstataŭas ilian laboron je multe malpli grandaj kostoj. La samo veras por ĉiuj maŝinoj. La ĝisnuna homlaboro, en kies lokon ili venis, ili devas plenumi je malpli alta prezo ... Supozate ke oni donis patenton al la inventinto de maŝino kiu faras la laboron de kvar, tiam klaras – ĉar la ekskluziva privilegio malebligas ĉian konkurencon, escepte tiun kiun efikas la laboro de la laboristoj –, ke la salajro de tiuj laboristoj dum la tuta daŭro de la privilegio estos la mezurilo de la prezo kiun la inventinto determinos por siaj produktoj: t.e., por certigi al si la mendojn, li postulos iomete malpli ol la salajron por la laboro kiun

lia maŝino anstataŭas. Sed ekde kiam la privilegio eksas, aliaj samspecaj maŝinoj estas muntitaj kaj konkurencas kun la lia. Tiam li fiksis sian prezon laŭ la ĝenerala principo, per tio ke li dependigas ĝin de la kvanto de la maŝinoj. La profito de la investitaj fondusoj ..., kvankam la rezulto de anstataŭigita laboro, reguliĝas fine ne laŭ la valoro de tiu laboro, sed kiel en ĉiuj aliaj kazoj laŭ la konkurenco inter la kapitalposedantoj, kaj la alteco de la profito estas ĉiam determinata per la proporcio de la kvanto de kapitaloj tiucele disponeblaj al la postulo je ili.” [p. 119, 123, 124, 125 kaj 135]

Lastinstance do, tiom longe kiom la profito pli grandas ol en aliaj industribranĉoj, ekzistos kapitaloj kiuj ĵetos sin al la nova industrio, ĝis kiam la profitkvoto falis al la ĝenerala nivelo.

Ni vidis kiel la ekzemplo de la fervojo tute ne taŭgis por prilumi la fikcion de la persono socio. Tamen s-ro Prudono aŭdace daŭrigas sian paroladon:

„Post klarigo de tiuj punktoj, nenio estas pli facila ol la klarigo kial la laboro devas lasi kromaĵon al ĉiu produktanto. [I, p. 77]

Kio nun sekvas, apartenas al la klasika antikveco. Ĝi estas poezia rakonto kiu havas la celon ripozigi la leganton post la klopodo kiun certe kaŭzis al li la precizeco de la antaŭaj matematikaj demonstraĵoj. S-ro Prudono donas al sia persono socio la nomon *Prometeo* kaj gloras ties farojn jene:

„Komence Prometeo vekigis, estiĝinta el la sino de la naturo, al vivo de nenifarado plena de instigoj ktp ktp. Prometeo eklaboras, ekde la unua tago; en la unua tago de la dua kreado, la produkto de Prometeo, tio estas lia riĉaĵo, lia bonfarto, egalas al dek. En la dua tago Prometeo dividas sian laboron, kaj lia produkto fariĝas egala al cent. Je la tria tago kaj la sekvaj tagoj Prometeo inventas maŝinojn, malkovras novajn ecojn en la korpoj, novajn fortojn en la naturo ... Ĉe ĉiu paŝo kiun lia industria agado faras, la nombro de lia produktaĵo kreskas kaj anoncas al li pliigon de feliĉo. Kaj ĉar fine por li konsumado estas produktado, tial klaras ke ĉiu tago de konsumo, ĉar li konsumas nur la produkton de la antaŭa tago, liveras produktkromaĵon por la venonta tago.” [I, p. 77–78]

Tiu Prometeo de s-ro Prudono estas stranga sanktulo, same malforta pri logiko kiel pri politika ekonomio. Se li instruas al ni nur kiel la

labordivido, la apliko de maŝinoj, la ekspluatado de la naturfortoj kaj de la tehnikaj sciencoj pliigas la produktadforton de la homoj kaj donas kromaĵon kompare kun tio kion produktas la izolita laboro, tiu nova Prometeo havas nur la malbonŝancon ke li venas tro malfrue. Sed ekde Prometeo komencas paroli pri produktado kaj konsumado, li fariĝas efektive groteska. Konsumado signifas por li produkti; li konsumas sekvatage tion kion li produktis la tagon antaŭe; tiel li estas ĉiam unu tagon antaŭa. Tiu taga antaŭeco estas lia „laborkromaĵo”. Sed per tio ke li konsumas sekvatage kion li produktis la tagon antaŭe, li certe devis dum la unua tago, kiu ne havis antaŭtagon, labori por du tagoj, por havi en la sekvo unu tagon da antaŭeco. Kiel Prometeo en la unua tago, kiam ekzistis nek labordivido nek maŝinoj nek aliaj konoj pri naturfortoj ol tiu de la fajro, povis ricevi tiun kromaĵon? Kiel ni vidis, la demando, per tio ke ĝi estas retroŝovita „ĝis la unua tago de la dua kreado”, ne progresis eĉ per unu paŝo. Tiu maniero klarigi la aferojn palptuŝas samtempe la grekan kaj la hebrean, ĝi estas mistika kaj alegoria samtempe, ĝi permesas al s-ro Prudono nepre anonci:

„Mi pruvis teorie kaj per faktoj la principon ke ĉiu laboro devas lasi kromaĵon.” [I, p. 79]

La faktoj estas la fama progrese kalkulo; la teorio estas la mito pri Prometeo.

„Sed”, daŭrigas s-ro Prudono, „tiu principo, kiu staras tiom firme kiom teoremo de aritmetiko, tute ne realiĝas por ĉiuj. Dum per la progreso de la komuna laboro la labortago de ĉiu unuopa laboristo rezultas ĉiam pli grandan produkton kaj dum pro tio en nepra sekvo la laboristo ĉe sama salajro ĉiutage devus fariĝi pli riĉa, en la socio ekzistas tavoloj kiuj riĉiĝas, kaj aliaj kiuj estas pereantaj.” [I, p. 79–80]

En la jaro 1770 la loĝantaro de la Unuiĝinta Regno Grand-Britujo estis 15 milionoj, la produktanta loĝantaro 3 milionoj. La produktadkapablo de la tehnikaj produktadfortoj respondis proksimume al loĝantaro de 12 milionoj; sekve ekzistis sume 15 milionoj da produktantaj fortoj. Do, la produktadkapablo rilatis al la loĝantaro kiel 1 : 1 kaj la tehnika produktadkapablo al la produktadkapablo de la homa laboro kiel 4 : 1.

1840 la loĝantaro estis ne pli ol 30 milionoj, la produktanta loĝantaro estis 6 milionoj, dum la tehnika produktadkapablo kreskis al 650

milionoj, do ĝi rilatis al la ĉioma loĝantaro kiel 21 : 1 kaj al la produktadkapablo de la homa laboro kiel 108 : 1.

Do, en la angla socio, la labortago gajnis en sepdeĵ jaroj kromaĵon de 2.700 elcentoj je produktadkapablo, t.e. en la jaro 1840 la labortago produktis dudeksepoble pli ol en 1770. Laŭ s-ro Prudono oni devus starigi la demandon jene: Kial la angla laboristo de 1840 ne estis dudeksepoble pli riĉa ol tiu de 1770? Por starigi tian demandon, oni devas kompreneble premisi ke la angloj povis produkti tiun riĉaĵon sen la historiaj kondiĉoj sub kiuj ĝi estis produktita, kiel: akumulado de privataj kapitaloj, moderna labordivido, maŝinreĝimo, anarĥia konkurenco, salajrosistemo, unuvorte ĉiuj aferoj kiuj baziĝas sur la klasa kontraŭdiro. Ĝuste tiuj estis nome la ekzistadkondiĉoj por la disvolviĝo de la produktadfortoj kaj de la laborkromaĵo. Do, por atingi tiun disvolviĝon de la produktadfortoj kaj tiun laborkromaĵon estis necese ke ekzistis klasoj kiuj profitis kaj aliaj kiuj estis pereantaj.

Kio estas do lastinstance tiu de s-ro Prudono revekita Prometeo? Ĝi estas la socio, ĝi estas la sociaj rilatoj, bazitaj sur la klaskontraŭdiro. Tiuj rilatoj ne estas tiuj de individuo al individuo, sed tiuj de laboristo al kapitalisto, de farmisto al grundproprietulo ktp. Forstreku tiun rilatojn, kaj vi forstrekis la tutan socion; via Prometeo estas jam nur fantomo sen brakoj kaj kruoj, t.e. sen maŝinreĝimo, sen labordivido, al kiu unuvorte mankas ĉio kion vi origine donis al li por ke li atingu tiun laborkromaĵon.

Se do sufiĉis en la teorio kompreni la formulon de la laborkromaĵo kun s-ro Prudono en la senco de la egaleco, sen konsidero al la nunaj kondiĉoj de la produktado, tiam devus sufiĉi en la praktiko fari inter la laboristoj egalan disdividon de ĉiuj ĝis hodiaŭ akiritaj riĉaĵoj, sen ŝanĝi ion ajn ĉe la hodiaŭaj produktadkondiĉoj. Tiu disdivido certe ne certigus al la unuopaj koncernatoj eksterordinare grandan bonstaton.

Sed s-ro Prudono ne estas tiom pesimisma, kiel oni eble povus kredi. Ĉar la proporcieco estas por li ĉio, li devas vole aŭ nevole vidi en la prete donita Prometeo, t.e. en la hodiaŭa socio, komencon de realiĝo de lia favorata ideo.

„Sed ankaŭ ĉie la progreso de la riĉaĵo, t.e. la *proporcieco de la valoroj*, estas la reganta leĝo; kaj se la ekonomikistoj kontraŭargumentas al la plendoj de la socialista partio per la konstanta kreskado de la nacia riĉaĵo kaj per la pliboniĝoj en la situacio eĉ de

la plej malfeliĉaj klasoj, tiam ili per tio, sen antaŭsenti tion, anoncas veron kiu estas la kondamno de iliaj teorioj.” [I, p. 80]

Kio estas en realo la komuna havaĵo, la nacia riĉaĵo? La riĉaĵo de la burĝaro, sed ne tiu de ĉiu unuopa burĝo. Nu bone; la ekonomikistoj faris nenion alian ol liveri la pruvon ke sub la nun ekzistantaj produktadkondiĉoj la riĉaĵo de la burĝaro disvolviĝis kaj ankoraŭ devas kreski. Koncerne la laboristajn klasojn, estas ankoraŭ tre disputata demando, ĉu ilia situacio pliboniĝis pro la pliiĝo de la laŭdire publika riĉaĵo. Se la ekonomikistoj citas al ni kiel apogon por sian optimismon la ekzemplon de la anglaj kotonlaboristoj, tiam ili konsideras ties situacion nur en la maloftaj momentoj de industria prospero. Tiuj momentoj de prospero rilatas al la epokoj de krizo kaj stagnado en la „ĝusta proporcieco” de 3 : 10. Sed eble la ekonomikistoj, kiam ili parolis pri plibonigoj, volis paroli pri la milionoj da laboristoj kiuj devis pereji en Orienta Hindio por ke la unu miliono kaj duono da laboristoj dungitaj en la sama industrio en Anglio havu tri jarojn da prospero je dek.

La portempa partopreno en la kreskado de la nacia riĉaĵo estas io alia. La fakto de la portempa partopreno trovas sian klariĝon en la teorio de la ekonomikistoj. Ĝi estas tute ne ilia „kondamno”, kiel diras s-ro Prudono, sed ilia konfirmo. Se estus io kondamnenda, tio estus certe la sistemo de s-ro Prudono, kiu reduktus, kiel ni montris, spite al la kreskado de la riĉaĵo, la laboriston al la minimuma salajro. Nur per tio ke li reduktus lin al la minimuma salajro, li plenumus aplikon de la ĝusta proporcieco de la valoroj, de la „valoro konstituita” per la labortempo. Ĝuste ĉar la salajro pro la konkurenco fluktuas super aŭ sub la prezo de la vivrimedoj necesaj por konservado de la laboristo, tiu povas certagrade partopreni en la disvolviĝo de la socia riĉaĵo aŭ ankaŭ pereji en la mizero. Tio estas la tuta teorio de la ekonomikistoj, kiuj pri tio ne aldonas sin al iluzioj.

Post siaj longaj forvagadoj al la demando de la fervojoj, al la Prometeo, la nova socio rekonstituenda surbaze de la „konstituita valoro”, s-ro Prudono koncentriĝas, la sento superfortas lin, kaj li elkrias en patreca tono:

„Mi petegas la ekonomikistojn, ke ili momenton en la profundo de sia koro, malproksime de la antaŭjuĝoj kiuj konfuzas ilin, kaj sen konsidero al la oficoj kiujn ili okupas aŭ alstrebas, al la interesoj

kiujn ili servas, al la voĉoj kiujn ili varbas, al la distingoj kiuj plaĉas al ilia vanteco, demandu sin kaj respondu, ĉu ĝis hodiaŭ la principo, ke ĉiu laboro devas lasi kromaĵon, aperis al ili kun tiu sinsekvo de premisoj kaj sekvoj, kiun ni malkovris.” [I, p. 80]

DUA ĈAPITRO

La metafiziko de la politika ekonomio

§ 1. La metodo

Ni troviĝas nun meze de Germanio! Ni devos okupiĝi pri metafiziko, kie kaj dum ni okupiĝas pri politika ekonomio. Kaj ankaŭ en tio ni sekvas nur la „kontraŭdirojn” de s-ro Prudono. Li ankoraŭ ĵus devigis nin paroli angle, fariĝi mem iomete anglo. Nun la scenejo ŝanĝiĝas. S-ro Prudono transmetas nin en nian amatan patrolandon kaj devigas nin ree aperi en nia eco de germano.

Se la anglo transformas homojn en ĉapelojn, tiam la germano la ĉapelojn en ideojn. La anglo estas Ricardo, la riĉa bankisto kaj elstara ekonomikisto. La germano estas Hegelo, simpla profesoro ĉe la universitato de Berlino.

Ludoviko la 15-a, la lasta absoluta reĝo kaj la reprezentanto de la perejo de la franca reĝeco, havis propran kuraciston kiu estis la unua ekonomikisto de Francio. Tiu kuracisto, tiu ekonomikisto, reprezentis la ontan kaj certan triumfon de la franca burĝaro. La kuracisto Quesnay faris la politikan ekonomion scienco; li resumis ĝin en sia fama „*Tableau économique*”. Apud la mil kaj unu komentoj kiuj aperis pri tiu tabelo ni posedas unu de Quesnay mem. Tiu estas la „Analizo de la ekonomia tabelo”, kun anekso de „*sep gravaj rimarkoj*”.

S-ro Prudono estas dua doktoro Quesnay. Li estas la Quesnay de la metafiziko de la politika ekonomio.

Nu, laŭ Hegelo, la metafiziko, la tuta filozofio, resumiĝas en la metodo. Ni devas do provi klarigi la metodon de s-ro Prudono, kiu estas almenaŭ same obskura kiel la „Ekonomia tabelo”. Ni devos do sekvigi sep pli aŭ malpli gravajn rimarkojn. Se s-ro doktoro Prudono ne kontentas pri niaj rimarkoj, li ludu la abaton Baudeau kaj donu mem la „Klarigon de la ekonomia-metafizika metodo”.

Unua rimarko

„Ni ne donas historion laŭ la ordo de la tempo, sed laŭ la sekvo de la ideoj. La ekonomiaj fazoj aŭ kategorioj aperas en siaj manifestiĝoj jen samtempe, jen en inversa vico ... La ekonomiaj teorioj havas ne malpli sian logikan sinsekvon kaj sian strukturon en la racio; tiun ordon ni flatas nin esti malkovrinta.” (Prudono, Vol. I, p. [145–] 146)

Tutcerte s-ro Prudono volis ektimigi la francojn, per tio ke li ĵetis al ili hegelajn frazojn al la kapo. Ni devas do trakti pri du viroj: unue pri s-ro Prudono kaj poste pri Hegelo. Per kio s-ro Prudono distingiĝas antaŭ la aliaj ekonomikistoj? Kaj kiun rolon ludas Hegelo en la politika ekonomio de s-ro Prudono?

La ekonomikistoj prezentas la burĝajn produktadkondiĉojn, labordividon, krediton, monon ktp kiel fiksajn, senŝanĝajn, eternajn kategoriojn. S-ro Prudono, kiu trovas tiujn kategoriojn tute pretajn, volas klarigi al ni la agon de fariĝo kaj genero de tiuj kategorioj, principoj, leĝoj, ideoj, pensoj.

La ekonomikistoj klarigas al ni, kiel oni produktas sub la supre donitaj kondiĉoj; sed kion ili ne klarigas, estas, kiel tiuj kondiĉoj mem produktiĝas, t.e. la historian moviĝon kiu naskas ilin. S-ro Prudono, kiu alprenas tiujn kondiĉojn kiel principojn, kiel kategoriojn, kiel abstraktajn pensojn, devas nur meti tiujn pensojn en certan ordon, kiuj troviĝas jam en alfabeto vico fine de ĉiu eseo pri politika ekonomio. La materialoj de la ekonomikisto estas la movata kaj movanta vivo de la homoj; la materialoj de s-ro Prudono estas la dogmoj de la ekonomikistoj. Sed ekde kiam oni ne sekvas la historian evoluon de la produktadkondiĉoj – kaj la kategorioj estas nur ties teoria esprimo –; ekde kiam oni vidas en tiuj kategorioj nur ideojn estiĝintajn per si mem, pensojn sendependajn de la realaj kondiĉoj, oni estas vole aŭ nevole devigata transloki la originon de tiuj pensoj en la moviĝon de la pura racio. Kiel la pura, eterna, senpersona racio produktas tiujn pensojn? Kiel ĝi faras por produkti ilin?

Se ni havas la sentimecon de s-ro Prudono koncerne la hegelismon, ni dirus: Ĝi distingas sin en si mem de si mem. Kion tio signifas? Ĉar la senpersona racio havas ekster si nek grundon sur kiu ĝi povas ekstari, nek objekton al kiu ĝi povus kontraŭstariĝi, nek subjekton kun kiu ĝi povus ligiĝi, ĝi vidas sin devigata transkapiĝi kaj sin mem poni, oponi

kaj komponi – pozicio, opozicio, kompozicio⁵⁸. Por paroli greke, ni havas tezon, antitezon kaj sintezon. Por tiuj, kiuj ne konas la hegelan lingvon, ni sekvigas la konsekran formulon: aserto, negado, negado de la negado. Tion oni nomas paroli. Estas vere ke tio ne estas la hebrea, kun permeso de s-ro Prudono; sed ĝi estas la lingvo de tiu pura racio disigita de la individuo. Anstataŭ la ordinaran individuon kaj ĝian ordinaran manieron paroli kaj pensi, ni havas nur tiun ordinaran manieron per si mem, sen la individuo.

Ĉu mirige ke en lasta abstraktigo – ĉar temas pri abstraktigo, ne pri analizo – ĉiu aĵo prezentiĝas kiel logika kategorio? Ĉu mirige, ke, se oni iom post iom lasas ĉion fali kio estas la individueco de domo, se oni abstraktas la konstrumaterialojn el kiuj ĝi konsistas, la formon kiu distingas ĝin, oni havas fine antaŭ si nur korpon; ke, se oni abstraktas la konturojn de la korpo, oni havas fine nur spacon; ke, se oni fine abstraktas la dimensiojn de tiu spaco, oni havas fine nenion plu ol la kvanton per si mem, la logikan kategorion de la kvanteco? Se ni tiel konsekvence abstraktas, ĉian subjekton, ĉiajn ĝiajn vivantajn aŭ nevivantajn laŭdirajn akcidencojn, homojn aŭ aĵojn, tiam ni havas rajton diri ke en lasta abstrakto restas jam nur la logikaj kategorioj kiel substanco. Tiel la metafizikistoj, kiuj iluzias analizi pere de tiaj abstraktadoj, kaj kiuj, ju pli ili malproksimiĝas de la objektoj, des pli kredas trapenetri ilin – tiuj metafizikistoj siaflanke prave diras ke la aferoj de tiu ĉi mondo estas nur brodaĵoj sur teksaĵo, kies logikaj kategorioj estas ilia kanvaso. Jen ni havas la diferencon inter la filozofo kaj la kristano. La kristano konas nur karniĝon de la *logos* <vorto>, spite al la logiko; la filozofo tute ne finiĝas kun la karniĝoj. Ke ĉio kio ekzistas, ke ĉio kio vivas sur la tero kaj en la akvo, redukteblas per abstraktado al logika kategorio, ke tiamaniere oni povas dronigi la tutan realan mondon en la mondo de abstraktaĵoj, la mondo de la logikaj kategorio – kiu miras pri tio?

Ĉio, kio ekzistas, ĉio, kio vivas sur la tero kaj en la akvo, ekzistas nur, vivas nur pere de ia moviĝo. Tiel la moviĝo de la historio produktas

⁵⁸En la originalo: „... zu ponieren, zu opponieren und zu komponieren – Position, Opposition, Komposition. En tiu vico, la unua vorto estas en la germana neologismo, kiun mi transprenis tia (poni); la vorton kompozicio anstataŭ komponaĵo estas zamenhofa, kaj mi transprenis ĝi simple por konservi la samfinaĵecon de la vicigitaj vortoj. -vl

la sociajn rilatojn⁵⁹, la industria moviĝo donas al ni la industriajn produktojn ktp.

Same kiel ni transformis per abstraktado ĉiun aĵon en logikan kategorion, oni bezonas nur abstrakti ĉian distingan econ de la diversaj moviĝoj por atingi la moviĝon de la abstrakta stato, al la pure formala moviĝo, al la pure logika formulo de la moviĝo. Se oni jam trovis en la logikaj kategorioj la esencon de ĉiuj aĵoj, tiam oni iluzias trovi en la logika formulo de la moviĝo la *absolutan metodon*, kiu ne nur klarigas ĉiujn aĵojn, sed kiu entenas ankaŭ la moviĝon de la aĵoj.

Tiu estas la absoluta metodo, pri kiu Hegelo diras:

„La metodo estas la absoluta, la sola, la plej alta, senfina forto, al kiu neniu aĵo povas rezisti. Ĝi estas la tendenco de la racio retrovi, reekkoni sin mem en ĉiu aĵo.” („Logik”, Vol. III, [p. 320–321])

Se ĉiu aĵo estas reduktita al logika kategorio kaj ĉiu moviĝo, ĉiu produktada ago al la metodo, tiam sekvas el tio, ke ĉiu kunteksto de produktoj kaj produktado, de aĵoj kaj moviĝoj reduktiĝas al aplikata metafiziko. Kion Hegelo faris por la religio, la juro ktp, tion s-ro Prudono provas fari por la politika ekonomio.

Kio estas do tiu absoluta metodo? La abstraktado de la moviĝo. Kio estas la abstraktado de la moviĝo? La moviĝo en abstrakta stato. Kio estas la moviĝo en abstrakta stato? La pure logika formulo de la moviĝo aŭ la moviĝo de la pura racio. En kio konsistas la moviĝo de la pura racio? Starigi sin, sin kontraŭstarigi al si mem, kaj fine restarigi sin en unu,⁶⁰ formuli sin kiel tezon, antitezon, sintezon, aŭ fine: starigi sin⁶¹, negi sin kaj negi la negaĵon.

Kiel la racio faras por prezenti sin kiel difinitan kategorion, meti sin? Tio estas la afero de la racio mem kaj de ĝiaj apologetoj.

Sed, fine atinginte meti sin kiel tezon, tiu tezo disfendiĝas, per tio ke ĝi kontraŭmetas sin al si mem, en du kontraŭdirajn pensojn, en pozitivon kaj negativon, en jeson kaj neon. La batalo de tiuj du antagonismaj, en la antitezo entenataj elementoj konsistigas la dialektikan moviĝon. La

⁵⁹<(1847) rapports>

⁶⁰En la germana: Sich zu setzen, sich sich selbst entgegensetzen, und schließlich wieder sich mit sich selbst in eins zu setzen ...

⁶¹(firmigi sin). -vl

jes fariĝas ne, la ne fariĝas jes, la jes fariĝas samtempe jes kaj ne, la ne fariĝas samtempe ne kaj jes; tiamaniere la du kontraŭecoj tenas sin en ekvilibro, neŭtraligas sin, kompensiĝas⁶². La kunfandiĝo de tiuj du kontraŭdiraj pensoj konsistigas novan penson, ilian sintezon. Tiu nova penso siavice disfendiĝas en du kontraŭdirajn pensojn, kiuj siavice formas novan sintezon. El tiu generada laboro elkreskas grupo da pensoj. Tiu pensgrupo sekvas la saman dialektikan moviĝon kiel simpla kategorio kaj havas kiel antitezon kontraŭdiran grupon. El tiuj du pensgrupoj estiĝas nova pensgrupo, la sintezo el ambaŭ.

Kiel el la dialektika moviĝo de la simplaj kategorioj estiĝas la grupo, tiel el la dialektika moviĝo de la grupoj estiĝas la vico (serio) kaj el la dialektika moviĝo de la vicoj la tuta sistemo.

Oni apliku tiun metodon al la kategorioj de la politika ekonomio, kaj oni havas la logikon kaj la metafizikon de la politika ekonomio, aŭ alivorte: Oni tradukis la ekonomiajn kategoriojn, kiujn konas ĉiuj, en malmulte konatan lingvon, en kiu ili aspektas kvazaŭ ili ĵus elsaltus brilnove el pura racikapo; tiel tiuj kategorioj ŝajnas generi unu la alian, interĉeniĝi kaj almembriĝi, pere de la nura agado de la dialektika moviĝo. La leganto tamen ne devas timi tiun metafizikon kun ĝia tuta strukturo de kategorioj, grupoj, serioj kaj sistemoj. Malgraŭ la tuta peza laboro per kiu s-ro Prudono klopodas surgrimpri la altaĵojn de tiu *sistemo de kontraŭdiro*, li tamen ne sukcesas iri trans la unuaj du ŝtupoj de la simpla tezo kaj antitezo; kaj eĉ tiujn li nur dufoje surgrimpis, kaj ĉe tiu okazo li krome foje falis sur la dorson.

Ĝis nun ni ankaŭ nur klarigis la hegelan dialektikon; ni vidos poste, kiel s-ro Prudono sukcesas redukti ĝin al la plej mizera stato. Tiel por Hegelo, ĉio kio okazis aŭ ankoraŭ okazas, estas precize tio kio okazas en lia propra pensado. Tiel la filozofio de la historio estas jam nur la

⁶²En la germana: „heben sich auf”. La germana verbo „aufheben” – lauvorte: „levi” – havas du signifojn: „konservi” kaj „nuliĝi”, kaj, pri du aferoj, „sich aufheben”: kompensiĝi. La hegela uzado de tiu vorto uzas ambaŭ kontraŭajn signifojn samtempe en la nova hegela nocio de sintezo (en kiu la antaŭaj paŝoj de la dialektika moviĝo samtempe „nuliĝas” kaj „konserviĝas” kaj tiel kompensiĝas. Esperanta ekvivalento eble estus, se ne „kompensiĝi”: „nuligkonservi”. Markso elektis por sia franca versio: „se paralyse”, do „paraliziĝas”, kio tamen ne tute ekvivalentas kun la hegela „sich aufheben”. -vl

historio de la filozofio, de lia propra filozofio. Jam ne ekzistas „historio laŭ la ordo de la tempo”, sed jam nur la „sinsekvo de la ideoj en la racio”. Li kredas povi konstrui la mondon pere de la moviĝo de la penso, dum li nur rekonstruas la pensojn kiuj troviĝas en ĉies kapo kaj klasas ilin laŭ la absoluta metodo.

Dua rimarko

La ekonomiaj kategorioj estas nur la teoriaj esprimoj, la abstraktaĵoj de la sociaj produktadkondiĉoj. S-ro Prudono kiel vera filozofo transkapigas la aferojn kaj vidas en la realaj kondiĉoj nur la karniĝon de tiuj principoj, de tiuj kategorioj, kiuj, kiel s-ro Prudono, la filozofo, ree diras al ni, dormetis en la sino de la „senpersona racio de la homaro”.

S-ro Prudono, la ekonomikisto, tute bone komprenis ke la homoj produktas tukojn, teksaĵojn, silkajojn sub certaj produktadrilatoj. Sed kion li ne komprenis, estas, ke tiuj certaj sociaj rilatoj estas same produktoj de la homoj kiel tukoj, teksaĵoj ktp. La sociaj rilatoj estas dense ligitaj kun la produktadfortoj. Kun la akiro de novaj produktadfortoj la homoj ŝanĝas sian produktadmanieron, kaj kun la ŝanĝo de la produktadmaniero, la maniero gajni siajn vivrimedojn, ili ŝanĝas ĉiujn siajn sociajn rilatojn. El la manmuelilo rezultas socio kun feŭdaj sinjoroj, el la vapormuelilo rezultas socio kun industriaj kapitalistoj.

Sed la samaj homoj, kiuj formas la sociajn rilatojn laŭ sia materia produktivo⁶³, formas ankaŭ la principojn, la ideojn, la kategoriojn laŭ siaj sociaj rilatoj.

Do, tiuj ideoj, tiuj kategorioj estas same ne eternaj kiel la rilatoj kiujn ili esprimas. Ili estas *historiaj, pereemaj, provizoraj produktoj*.

Ni vivas meze de konstanta moviĝo de kreskado de la produktadfortoj, de detruado de sociaj rilatoj, de estiĝo de ideoj; senmova estas nur la abstraktado de la moviĝo – „*mors immortalis*”⁶⁴.

⁶³<(1847) productivité matérielle; (1885), 1892 kaj 1895 produktadmaniero>

⁶⁴„Morto senmorta”. -vl

Tria rimarko

La produktadkondiĉoj de ĉiu socio formas tutaĵon. S-ro Prudono rigardas la ekonomiajn kondiĉojn kiel same multajn sociajn fazojn kiuj sin reciproke kreas, el kiuj unu rezultas de la alia, kiel la antitezo el la tezo, kaj kiuj en sia logiga sinsekvo realigas la senpersonan racion de la homaro.

La sola malbonaĵo ĉe tiu metodo estas tiu ke s-ro Prudono, ekde kiam li volas esplori iun unuopan el tiuj fazoj, ne povas klarigi ĝin sen reveni al la aliaj sociaj kondiĉoj, kvankam li tiujn ankoraŭ ne igis estiĝi pere de sia dialektika moviĝo. Se s-ro Prudono poste pere de la pura racio transiras al la kreado de la aliaj fazoj, tiam li kondutas kvazaŭ li havus antaŭ si novnaskitajn infanojn, kaj forgesas ke tiuj estas same malnovaj kiel la unua.

Tiel por atingi la konstituiĝon de la valoro, kiu laŭ li estas la bazo de ĉia ekonomia evoluo, li ne povis malhavi la labordividon, la konkurencon ktp. Sed en la *serio*, en la *racio* de s-ro Prudono, en la *logika sinsekvo*, tiuj kondiĉoj ankoraŭ tute ne ekzistas.

Ekde kiam oni konstruas la konstruaĵon de ideologia sistemo per la kategorioj de la politika ekonomio, oni distordas la membrojn de socia sistemo. Oni transformas la diversajn partajn pecojn de la socio en same multajn sociojn per si, el kiuj unu aperas post la alia. Kiel la logika formulo de la moviĝo, la sinsekvo, de la tempo povas efektive sole klarigi la socian korpon, en kiu ĉiuj rilatoj samtempe ekzistas kaj sin reciproke subtenas?

Kvara rimarko

Ni vidu nun, al kiaj ŝanĝoj s-ro Prudono submetas la dialektikon de Hegelo, ekde kiam li aplikas ĝin al la politika ekonomio.

Por s-ro Prudono, ĉia ekonomia kategorio havas du flankojn, bonan kaj malbonan. Li rigardas la kategoriojn kiel la filistro rigardas la grandajn homojn de la historio: *Napoleono* estas granda homo, li faris multan bonon, li faris ankaŭ multan malbonon.

La *bona flanko* kaj la *malbona flanko*, la *avantaĝo* kaj la *malavantaĝo* kune konsistigas por s-ro Prudono la *kontraŭdiron* en ĉiu ekonomia kategorio.

Solvenda problemo: konservi la bonan flankon kaj forigi la malbonan flankon.

La sklaveco estas ekonomia kategorio kiel ia alia. Ĝi havas do ankaŭ siajn du flankojn. Ni ne haltu ĉe la malbona flanko kaj ni parolu pri la bela flanko de la sklaveco. Ĝuste komprenate, temas ĉi tie nur pri la rekta sklaveco, pri la sklaveco de la nigrulo en Surinamo, en Brazilo, en la sudaj ŝtatoj de Usono⁶⁵.

La rekta sklaveco estas la angulŝtono de la burĝa industrio, same kiel la maŝinoj ktp. Sen sklaveco nenio kotono; sen kontono nenio moderna industrio. Nur la sklaveco donis al la kolonioj ilian valoron; la kolonioj kreis la mondkomercon; kaj la mondkomercio estas la kondiĉo de la grandindustrio. Tiel la sklaveco estas ekonomia kategorio de plej alta graveco.

Sen la sklaveco Usono, la plej progresinta lando, transformiĝus en prapatran landon. Oni forviŝu Usonon el la mondmapo, kaj oni havas la anarhion, la kompletan pereon de la komercio kaj de la moderna civilizacio. Malaperigu la sklavecon, kaj vi forviŝas Usonon el la mondmapo.⁶⁶

Tiel la sklaveco ĉiam ludis rolon, ĉar ĝi estas ekonomia kategorio, en la institucioj de la popoloj. La modernaj popoloj nur sciis maski la sklavecon en siaj landoj, dum ili enkondukis ĝin malkaŝe en la Novan Mondon.

Kiel s-ro Prudono faros por savi la sklavecon? Li metos la *problemon*: konservi la bonan flankon de tiu ekonomia kategorio kaj ekstermi la malbonan.

⁶⁵En la originalo: Nordameriko (en la senco de Usono). -vl

⁶⁶Tio tute ĝustis por la jaro 1847. Tiam la mondkomercio de Usono limiĝis ĉefe al la importado de enmigrantoj kaj de industriproduktoj kaj la eksporto al kotono kaj tabako, do al produktoj de la suda sklavlaboro. La nordaj ŝtatoj produktis ĉefe grenon kaj viandon por la sklavŝtatoj. Nur post kiam la nordo produktis grenon kaj viandon por eksporto kaj krome fariĝis industrilando kaj ekde tiam estiĝis al la usona kotonmonopolo en Hindio, Egiptio, Brazilo ktp potenca konkurenco, la forigo de la sklaveco ebligis. Kaj eĉ tiam ĝi sekvigis la ruiniĝon de la sudo, kiu ne sukcesis anstataŭigi la malkaŝan nigrulsklavecon per la kaŝita sklaveco de hindaj kaj ĉinaj kulioj. F. E.

Hegelo ne bezonas meti problemojn. Li konas nur la dialektikon. S-ro Prudono havas el la hegela dialektiko nur la parolmanieron. Lia propra dialektika metodo konsistas el la dogmeca distingo de bono kaj malbono.

Ni prenu foje s-ron Prudono mem kiel kategorion; ni esploru lian bonan kaj lian malbonan flankon, liajn avantaĝojn kaj liajn malavantaĝojn.

Se li havas antaŭ Hegelo la avantaĝon meti problemojn, kiujn li rezervas al si solvi por la plej bona bono de la homaro, li havas la malavantaĝon de kompleta sterileco, ekde kiam temas pri naski novan kategorion per la agado de la dialektika generado. Tio kio konsistigas la dialektikan moviĝon, estas ĝuste la apudekzistado de la du kontraŭaj flankoj unu apud la alia, ilia disputo kaj ilia dissolviĝo en novan kategorion. Ekde kiam oni nur metas la problemon ekstermi la malbonan flankon, oni distranĉas la dialektikan moviĝon. Jam ne estas la kategorio, kiu ĉi tie, sekve al sia kontraŭdira naturo, metas kaj kontraŭmetas sin; estas pli ĝuste s-ro Prudono, kiu tiras sin inter la du flankoj alen kaj reen, dislaboras kaj turmentas sin.

Tiel kaptita en sakstrato, el kiu malfacilas liberiĝi per permesitaj rimedoj, s-ro Prudono faras subite veran gigantan fortosalton, kiu unusalte transmetas lin en novan kategorion. Kaj nun, antaŭ liaj mirigitaj okuloj, senvualiĝas la *sinsekvo en la racio*.

Li prenas ian ajn kategorion kaj atribuas al ĝi arbitre la econ forigi la malavantaĝojn de la kategorio kiun li devas blanklavi. Tiel, la impostoj, se ni kredas s-ron Prudono, forigas la malavantaĝojn de la monopollo; la komerca bilanco la malavantaĝojn de la imposto; la grundposedo la malavantaĝojn de la kredito.

Tiel pritraktante unu post la alia la ekonomiajn kategoriojn kaj farante el unu la kontraŭvenenon de la alia, s-ro Prudono sukcesas produkti, per tiu miksamaso de kontraŭdiroj kaj kontraŭrimedoj por kontraŭdiroj, du volumojn da kontraŭdiroj, kiujn li tute prave titolas: „Sistemo de la ekonomiaj kontraŭdiroj”.

Kvina rimarko

„En la absoluta racio ĉiuj ĉi ideoj ... estas same simplaj kaj ĝeneralaj ... Efektive ni atingas la sciencon per tio ke ni konstruas niajn ideojn

al ia strukturo. Sed la vero per si mem estas sendependa de tiuj dialektikaj figuroj kaj libera de la kombinaĵoj de nia spirito.” (Prudono, Vol., II, p. 97)

Jen ni vidas subite, pere de turniĝo en la kontraŭan direkton, kies sekreton ni nun konas, la metafizikon de la politika ekonomio fariĝinta iluzio! Neniam s-ro Prudono parolis pli vere. Tutcerte, ekde la momento en kiu la procezo de la dialektika moviĝo reduktiĝas al la simpla procedo kontraŭmeti bonon kaj malbonon, meti problemojn kiuj kondukas al ekstermado de la malbono kaj al kategorio kiel kontraŭveneno kontraŭ la alia, ekde tiam la kategorioj jam ne agas per si mem; la ideo „jam ne *funkcias*”, jam ne estas vivo en ĝi. Ĝi nek metas sin nek dismetas sin en kategoriojn. La sinsekvo de la kategorioj transformiĝis en nuran strukturon. La dialektiko jam ne estas la moviĝo de la pura racio. Jam ne ekzistas dialektiko, entute ekzistas jam nur pura moralo.

Kiam s-ro Prudono parolis pri la *sinsekvo en la menso*, pri la *logika intersekvo de la kategorioj*, li pozitive deklaris ke li ne volas doni la *historion laŭ la ordo de la tempo*, tio signifas laŭ s-ro Prudono la historian sinsekvon, en kiu la kategorioj *manifestiĝis*. Ĉio okazis tiam laŭ li en la *pura etero de la racio*. Ĉio devis deduktiĝi el tiu pura etero pere de la dialektiko. Nun, kiam temas pri tio, transigi tiun dialektikon en la praktikon, la racio lasas lin sola. La dialektiko de s-ro Prudono superruzas la dialektikon de Hegelo, kaj tiel s-ro Prudono devas informi nin ke la ordo, en kiu li donas al ni la ekonomiajn kriteriojn, jam ne estas la ordo, en kiu ili disen disvolviĝas. La ekonomiaj evoluoj jam ne estas la evoluoj de la pura racio.

Kion do envere donas al ni s-ro Prudono? La veran historion, ĉu tio signifas laŭ la kompreno de s-ro Prudono la sinsekvon, en kiu la kategorioj en la tempa ordo *revelaciĝis*? Ne. Ĉu la historion tian kia ĝi plenumiĝas en la ideo mem? Eĉ malpli. Do, nek la profanan historion de la kategorioj nek ilian sanktan historion! Kian historion do li donas al ni? La historion de siaj propraj kontraŭdiroj. Ni vidu kiel ili marŝas kaj trenas post si s-ron Prudono.

Antaŭ ol komenci tiun esploradon, kiu kaŭzas la sesan gravan rimarkon, ni devas fari ankoraŭ iun malpli gravan rimarkon.

Ni supozu foje kun s-ro Prudono, ke la reala historio laŭ la tempordo estas la historia sinsekvo en kiu la ideoj, la kategorioj, la principoj

revelaciigis.

Ĉiu principo havis sian jarcenton en kiu ĝi senvualiĝis. La aŭtoritatecprincipo ekz-e havis la 11-an jarcenton, kiel la principo de individuismo la 18-an. Konsekvence la jarcento apartenis al la principo, ne la principo al la jarcento. Alivorte: La principo faras la historion, ne la historio la principon. Se oni fine demandas sin, por savi principojn kaj historion: kial tiu principo revelaciigis ĝuste en la 11-a aŭ en la 18-a jarcento kaj ne en ajna alia, tiam oni vidas sin nepre devigata esplori detale, kiaj estis la homoj de la 11-a kaj tiuj de la 18-a jarcento, kiaj estis iliaj reciprokaj bezonoj, iliaj produktadfortoj, ilia produktadmaniero, la krudmaterialo de ilia produktado, kiaj fine estis la rilatoj de homo al homo, kiuj rezultis el ĉiuj ĉi ekzistadkondiĉoj. Esplori ĉiujn ĉi demandojn, ĉu tio ne signifas esplori la realan, profanan historion de la homoj de ĉiu jarcento, prezenti tiujn homojn kvazaŭ ili estus samtempe aŭtoroj kaj aktoroj de sia propra dramo? Sed ekde tiu momento, en kiu oni prezentas la homojn kiel la aktorojn kaj aŭtorojn de ilia propra historio, oni revenis per ĉirkaŭvojo al la reala elirpunkto, ĉar oni lasis fali la eternajn principojn de kiuj oni eliris.

Sed s-ro Prudono eĉ ne sufiĉe kuraĝis antaŭiri sur la oblikva vojeto kiun elektas la ideologo, por atingi la grandan ĉefstraton de la historio.

Sesa rimarko

Ni eniru kun s-ro Prudono la oblikvan vojeton.

Ni supozu ke la ekonomiaj rilatoj, konsiderataj kiel *senŝanĝaj leĝoj*, kiel *eternaj principoj*, kiel *idealaj kategorioj*, ekzistis pli frue ol la aktivaj kaj agantaj homoj; ni supozu eĉ ke tiuj leĝoj, tiuj principoj, tiuj kategorioj dormetis ekde la komenco de la tempo „en la senpersona racio de la homaro”. Ni vidis jam, ke ĉe tiaj senŝanĝaj, neŝanĝeblaj eternecoj jam ne ekzistas historio: se entute, historio ekzistas en la ideo, t.e. la historio kiu speguliĝas en la dialektika moviĝo de la pura racio. Sed per tio, ke s-ro Prudono diras, ke en la dialektika moviĝo la ideoj jam ne „*diferenciĝas*”, li forstrekis la ombron de la moviĝo same kiel la moviĝon de la ombro, per kiu oni eble ankoraŭ povintus fari ion kio aspektus kiel historio. Anstataŭ tio li atribuas al la historio sian propran senpovecon, li kulpigas ĉion, eĉ la francan lingvon.

„Do ne precize ĝustas”, diras s-ro Prudono, la filozofo, „kiam oni diras ke io okazas, ke io estas produktata: En la civilizacio kiel en la

universo ĉio ekzistas, ĉio efikas ekde ĉiam ... *Same okazas kun la tuta sociaekonomio.*” (Vol. II, p. 102)

Tiom gigantas la krea forto de la kontraŭdiroj kiuj *efikas* sur s-ron Prudono kaj efikigas lin, ke li tie, kie li volas klarigi la historion, vidas sin devigata fornei ĝin, ke, tie kie li volas klarigi la sinsekvon de la sociaj kondiĉoj, li neas ke *io povas okazi*, ke, kie li volas klarigi la produktadon en ĉiuj iliaj fazoj, li kontestas ke *io povas esti produktata*.

Laŭ s-ro Prudono tiel do ekzistas nek historio nek sinsekvo de la ideoj, kaj tamen lia libro ankoraŭ ekzistas; kaj ĝuste tiu libro estas, laŭ liaj vortoj, „*la historio laŭ la sinsekvo de la ideoj*”. Kiel trovi formulon – ĉar s-ro Prudono estas la formululo –, kiu permesas al li *unusalte* transiri ĉiujn siajn kontraŭdirojn?

Tiucele li inventis novan racion, kiu estas nek la pura kaj virga absoluta racio nek la ĝenerala racio de la homoj kiuj aperas kaj agas en la diversaj jarcentoj, sed la tute aparta racio, la racio de la socio kiel persono, de la *homaro* kiel subjekto, kiu sub la plumo de s-ro Prudono prezentiĝas foje kiel „*genio de la socio*”, kiel „*ĝenerala racio*” kaj en lasta linio „*racio de la homaro*”. Tiu racio provizita per tiom da nomoj tamen perfidiĝas ĉiuokaze kiel la individua racio de s-ro Prudono kun sia bona kaj sia malbona flanko, siaj kontraŭvenenoj kaj siaj problemoj.

„La homa racio ne kreas la veron”, kiu kaŝas sin en la profundoj de la absoluta, eterna racio. Ĝi povas nur senvualigi ĝin. Sed la veroj, kiujn ĝi ĝis nun senvualigis, estas nekompletaj, nealireblaj kaj sekve kontraŭdiraj. Do, ankaŭ la ekonomiaj kategorioj mem estas nur veroj malkovritaj kaj senvualigitaj de la genio de la socio, kaj pro tio ili estas ankaŭ nekompletaj kaj portas en si la ĝermon de la kontraŭdiro. Antaŭ s-ro Prudono, la genio de la socio vidis nur la *kontraŭdirajn elementojn*, sed ne la unuecan *sintezan formulon*, kiuj ambaŭ kuŝas samtempe en la *absoluta racio*. Sed la ekonomiaj kondiĉoj estas nenio alia ol la realiĝo sur tero de tiuj nesufiĉaj veroj, de tiuj nekompletaj kategorioj, de tiuj reciproke kontraŭdiraj nocioj, kaj pro tio ankaŭ ili estas kontraŭdiraj en si mem kaj prezentas la du flankojn, el kiuj unu estas bona, la alia malbona.

Trovi la tutan veron, la nocion en ĝia tuta pleneco, la sintezan formulon kiu kompensas⁶⁷ la kontraŭdiron, tio estas la tasko de la genio

⁶⁷Kompensi ĉi tie en la senco de la hegela dialektika sistemo, „kompanse

de la socio. Pro tio en la imago de s-ro Prudono tiu sama genio de la socio estis pelata de unu kategorio al la alia, sen ke ĝi ĝis nun, kun la tuta baterio de siaj kategorioj, sukcesis per siaj klopodoj akiri de dio, la absoluta racio, sintezan formulon.

„Unue la socio (la genio de la socio)⁶⁸ starigas unuan fakton, unuan *hipotezon* ..., veran antinomion, kies kontraŭecaj rezultoj evoluas en la socia ekonomio sammaniere kiel ĝiaj konsekvencoj povintus deduktiĝi en la spirito; tiel ke la industria evoluo, ja sekvante la deduktadon de la ideoj, dividas sin en du direktojn, tiun de la utila kaj tiun de la detruaj efikoj ... Por harmonie konstitui tiun duvizaĝan principon kaj por kompensi tiun kontraŭdiron, la socio eligas el tiu *duan*, kiun baldaŭ sekvas tria, kaj tio estos la *vojo de la genio de la socio*, ĝis kiam ĝi post elĉerpiĝo de ĉiuj siaj kontraŭdiroj – mi premisas, kio tamen ne estas pruvita, ke la kontraŭdiro en la homaro iam finiĝos – per salto revenas al siaj antaŭaj pozicioj kaj solvas ĉiujn siajn taskojn en *unu sola formulo*.” (Vol. I, p. 133)

Kiel antaŭe la *kontraŭdiro* transformiĝis en *kontraŭvenenon*, tiel nun la *tezo* fariĝas *hipotezo*. La interŝanĝo de vortoj ne povas mirigi nin ĉe s-ro Prudono. La racio de la homaro, kiu tute ne estas pura, ĉar ĝia horizonto estas limigita, renkontas ĉiupaŝe novajn solvendajn taskojn. Ĉiu nova tezo, kiun ĝi malkovras en la absoluta racio kaj kiu estas la negado de la antaŭa tezo, fariĝas por ĝi sintezo, kiun ĝi sufiĉe naive opinias esti la solvo de la koncerna tasko. Tiel tiu racio turmentas sin en ĉiam novaj kontraŭdiroj, ĝis kiam ĝi venas al la fino de tiuj kontraŭdiroj kaj rimarkas ke ĉiuj ĝiaj tezoj kaj sintezoj estas nenio alia ol hipotezoj kiuj kontraŭdiras sin mem. En sia perplekso „la homa racio, la genio de la socio, revenas per salto al ĉiuj siaj antaŭaj pozicioj kaj solvas ĉiujn siajn taskojn en unu sola formulo”. Tiu sola formulo estas cetere la vera malkovro de s-ro Prudono. Ĝi estas la *konstituita valoro*.

Oni faras hipotezojn nur rilate al certa celo. La celo kiun unuavice metis al si la genio de la socio, kiu parolas tra la buŝo de s-ro Prudono, estis la ekstermado de la malbono el ĉiu ekonomia kategorio, por restigi nur bonon. Por li, tiu bono estas la plej alta bonaĵo, la vera praktika celo la *egaleco*. Kaj kial la genio de la socio preferis la egalecon al la malegaleco, al la frateco, al la katolikismo, mallonge al ĉiu alia

nuligi kaj konservi” en la sintezo de la kontraŭdiroj. -vl

⁶⁸<(la genio de la socio): enmeto de Markso>

principo? Ĉar „la homaro realigis tian kvanton da apartaj hipotezoj unu post la alian, nur kun konsidero al pli alta hipotezo”, kiu ĝuste estas la egaleco. Alivorte: ĉar la egaleco estas la idealo de s-ro Prudono. Li iluzias al si ke la labordivido, la kredito, la kunlaborado en la⁶⁹ laborejo, mallonge ĉiuj ekonomiaj kondiĉoj estis inventitaj nur por favori la egalecon, kaj tamen ili fine rezultigis nur malutilon al ĝi. Se la historio kaj la fikcio de s-ro Prudono kontraŭdiras sin ĉiupaŝe, tiam tiu konkludas ke ekzistas kontraŭdiro. Sed se ekzistas kontraŭdiro, ĝi ekzistas nur inter lia fiksa ideo kaj la realaj okazaĵoj.

Ekde nun la bona flanko de ekonomia rilato estas ĉiam tiu kiu fortigas la egalecon, la malbona tiu kiu neas ĝin kaj fortigas la malegalecon. Ĉiu nova kategorio estas hipotezo de la genio de la socio por ekstermado de la malegaleco kreita de la antaŭa hipotezo. Unuvorte: La egaleco estas la *origina intenco*, la *mistika tendenco*, la *providenca celo*, kiun la genio de la socio havas ĉiam antaŭ siaj okuloj, turniĝante en la cirklo de la ekonomiaj kontraŭdiroj. Pro tio la *providenco* estas la lokomotivo kiu pli bone movas la ekonomian ilaron de s-ro Prudono ol lia aereca, pura racio. Li dediĉis al la providenco tutan ĉapitron kiu sekvas al tiu pri la impostoj.

Providenco, providenca celo, jen la granda vorto kiun oni uzas hodiaŭ por klarigi la iron de la historio. Fakte tiu vorto klarigas nenion. Ĝi estas ne pli ol retorika formo, unu el la multaj manieroj parafrazi la faktojn.

Estas fakto ke la grundposedo en Skotlando ricevis novan valoron per la evoluo de la industrio, tiu industrio malfermis al la lano novajn merkatojn. Por produkti la lanon grandskale, oni devis transformi la kampojn en paŝtejojn. Por realigi tiun transformadon, oni devis koncentri la bienojn. Por koncentri la bienojn, oni devis forigi la malgrandajn farmaĵojn, forpeli milojn da farmistoj el ilia hejmlando kaj anstataŭigi ilin per kelkaj paŝtistoj kiuj gardas milionojn da ŝafoj. Tiel la grundposedo en Skotlando, sekve al sinsekvaj transformadoj, havis la rezulton ke homoj estis anstataŭitaj de ŝafoj. Oni diru nun, ke estis la providenca celo de la institucio de grundposedo en Skotlando, anstataŭigi homojn per ŝafoj, kaj oni praktikis providencan historion.

Certe, la tendenco al egaleco estas propra al nia jarcento. Kiu nun

⁶⁹<... kunlaborado en la ...: enmeto de la tradukintoj>

diras, ke la antaŭaj jarcentoj kun komplete malsamaj bezonoj, produktadrimedoj ktp efikis providence por la realigo de egaleco, tiu unue substituas la rimedojn kaj la homojn de nia jarcento al la homoj kaj rimedoj de la antaŭaj jarcentoj kaj miskonas la historian moviĝon per kiu la sinsekvaj generacioj transformis la rezultojn atingitajn de la generacioj antaŭ ili. La ekonomikistoj scias tre bone ke la sama aĵo kiu estas por iu prilaborita produkto, estas por alia nur krudmaterialo por nova produktado.

Oni supozu, kiel s-ro Prudono faras, ke la genio de la socio kreis, aŭ pli ĝuste improvzis, la feŭdajn sinjorojn kun la providenca intenco transformi la *tributkampulojn* en *respondecajn* kaj *egalecajn* laboristojn, kaj oni subŝovis celojn kaj personojn, inde je la providenco kiu enkondukis en Skotlando la grundproprieton por fari al si la malican plezuron anstataŭigi homojn per ŝafoj.

Sed ĉar s-ro Prudono sentas por la providenco tiom teneran intereson, ni atentigas lin pri la „Historio de la politika ekonomio” de s-ro Villeneuve-Bargemont, kiu same postkuras providencan celon. Tiu celo jam ne estas la egaleco, sed la katolikismo.

Sepa kaj lasta rimarko

La ekonomikistoj procedas strange. Laŭ ili ekzistas nur du specoj de institucioj, artefaritaj kaj naturaj. La institucioj de la feŭdismo estas artefaritaj institucioj, tiuj de la burĝaro naturaj. Ĉe tio ili similas al la teologoj kiuj ankaŭ distingas du specojn de religio. Ĉiu religio kiu ne estas ilia, estas inventaĵo de la homoj, dum ilia propra religio estas revelacio de Dio. Kiam la ekonomikistoj diras ke la nunaj kondiĉoj – la kondiĉoj de la burĝa produktado – estas naturaj, tiam ili komprenigas per tio ke ili estas kondiĉoj en kiuj la produktado de riĉaĵo kaj la disvolvado de produktadfortoj okazas laŭ la naturleĝoj. Per tio, tiuj kondiĉoj mem estas naturleĝoj sendependaj de la influo de la tempo. Ili estas eternaj leĝoj kiuj devas ĉiam regi la socion. Per tio ekzistis historio, sed ĝi jam ne ekzistas; historio ekzistis, ĉar feŭdaj institucioj ekzistis kaj ĉar oni trovas en tiuj institucioj produktadkondiĉojn tute malsamajn ol tiuj de la burĝa socio kiujn la ekonomikistoj volas konsiderigi kiel naturajn kaj sekve eternajn.

Ankaŭ la feŭdismo havas sian proletaron – la servuton, kiu entenis ĉiujn ĝermojn de la burĝaro. Ankaŭ la feŭda produktado havis du

antagonismajn elementojn, kiujn oni ankaŭ nomas *bona* kaj *malbona flanko* de la feŭdismo, sen konsideri ke estas ĉiam la malbona flanko kiu fine venkas super la bona flanko. Estas la malbona flanko kiu naskas la moviĝon, kiu faras historion, per tio ke ĝi estigas la batalon. Se tempe de la regado de la feŭdismo la ekonomikistoj, ravitaj de la kavaliraj virtoj, de la bela harmonio inter rajtoj kaj devoj, de la patriarĥa vivo en la urboj, de la florado de la hejminduŝtro en la kamparo, de la evoluo de la induŝtro organizita en korporacioj, ĵurgildoj, gildoj, unuvorte de ĉio kio konsistigas la belan flankon de la feŭdismo, starigintus al si la problemon ekstermi ĉion kio makulas tiun bildon – servuto, privilegioj, anarĥio –, kien ili atingus per tio? Oni neniigintus ĉiujn elementojn kiuj kaŭzis la batalon, oni sufokintus la ĝermantan disvolviĝon de la burĝaro. Oni starigintus al si la absurdan problemon forstreki la historion.

Kiam la burĝaro superis, oni demandis nek pri la bona nek pri la malbona flanko de la feŭdismo. La produktadfortoj, kiuj evoluis pro ĝi sub la feŭdismo, fariĝis iliaj. Ĉiuj malnovaj ekonomiaj formoj, la privatjuraj rilatoj, kiuj respondis al ĝi, la politika stato kiu estis la oficiala esprimo de la malnova socio, estis rompataj.

Se oni do volas ĝuste prijuĝi la feŭdan produktadon, tiam oni devas rigardi ĝin kiel produktadmanieron bazitan sur la kontraŭdiro. Oni devas montri kiel la produktadfortoj disvolviĝis samtempe kun la disputo de la klasoj, kiel unu el tiuj klasoj, la malbona flanko, la socia malbono, ĉiam kreskis, ĝis kiam la materiaj kondiĉoj de ĝia emancipiĝo estis maturiĝintaj. Ĉu tio ne diras sufiĉe klare, ke la produktadmaniero, la kondiĉoj en kiuj la produktadfortoj evoluis, tute ne estis eternaj leĝoj, sed kongruas al certa evolustato de la homoj kaj de la produktadfortoj kaj ke ŝanĝo okazinta en la produktadfortoj de la homo nepre alkondukas ŝanĝon en iliaj produktadrilatoj? Ĉar unuavice necesas ne esti ekskluditaj de la fruktoj de la civilizacio, de la akiritaj produktadfortoj, tial fariĝas necese rompi la hereditajn formojn en kiuj ili estis kreitaj. Ekde tiu momento la revolucia klaso fariĝas konservativa.

La burĝaro komencas kun proletaro, kiu mem siavice estas restaĵo de la proletaro⁷⁰ de la feŭdismo. Dum sia historia evoluo la burĝaro necese disvolvas sian antagonisman karakteron, kiu ĉe sia unua apero montriĝas pli aŭ malpli kaŝita, ekzistas nur en latentaj stato. Laŭ la

⁷⁰<En la dediĉekzemplerio staras ĉi tie la randrimarko: de la classe travailleur [de la laboranta klaso]>

mezuro de la evoluo de la burĝaro en ĝia sino evoluas nova proletaro, moderna proletaro: Batalo disvolviĝas inter la proleta klaso kaj la burĝa klaso, batalo kiu, antaŭ ol esti ĉe ambaŭ flankoj sentata, rimarkita, aprezata, komprenata, koncedata kaj fine laŭte proklamita, esprimas sin provizore nur en partaj kaj preterpasaj konfliktoj, en detruadoj. Aliflanke, se ĉiuj membroj de la moderna burĝaro havas la saman intereson, tiom ke ili konsistigas klason fronte al alia klaso, ili havas kontraŭajn antagonismajn interesojn, ekde kiam ili mem staras unu kontraŭ la alia. Tiu interes-kontraŭeco devenas el la ekonomiaj kondiĉoj de ilia burĝa vivo. Pro tio, ĉiutage fariĝas pli klara, ke la produktadkondiĉoj, en kiuj la burĝaro moviĝas, havas ne unuecan, simplan karakteron, sed ambiguan; ke en la samaj kondiĉoj, en kiuj produktiĝas riĉaĵo, produktiĝas ankaŭ la mizero; ke en la samaj kondiĉoj, en kiuj la disvolviĝo de la produktadfortoj okazas, disvolviĝas subpremforto; ke tiuj kondiĉoj produktas la *burĝan riĉaĵon*, t.e. la riĉaĵon de la burĝa klaso, nur sub konstanta neniigo de la riĉaĵo de unuopaj membroj de tiu klaso kaj sub kreado de ĉiam kreskanta proletaro.

Ju pli tiu kontraŭeca karaktero montriĝas, des pli la ekonomikistoj, la sciencaj reprezentantoj de la burĝa produktado, troviĝas en kontraŭdiro kun sia propra teorio, kaj diversaj skoloj formiĝas.

Ni havas la fatalismajn ekonomikistojn, kiuj estas en sia teorio same indiferentaj pri tio kion ili nomas la malbonon de la burĝa produktadmaniero, kiel la burĝaro mem estas en la praktiko pri la suferoj de la proletoj, kiuj helpas al ili akiri la riĉaĵojn. En tiu fatalisma skolo ekzistas klasikuloj kaj romantikuloj. La klasikuloj, kiel Adam Smith kaj Ricardo, reprezentas burĝaron kiu, ankoraŭ en batalo kun la restaĵoj de la feŭda socio, laboras nur por forpurigi la feŭdajn makulojn en la ekonomiaj rilatoj, pliigi la produktadfortojn kaj doni al industrio kaj komerco novan movoforton. La proletaro partoprenanta en tiu batalo, sorbata de tiu febreca laboro, konas nur preterpasajn, hazardajn suferojn, konsideras ilin mem tiaj. La ekonomikistoj, kiel Adam Smith kaj Ricardo, kiuj estas la historiistoj de tiu epoko, havas nur la mision pruvi, kiel la riĉaĵo estas akirata sub la kondiĉoj de la burĝa produktado, formuli tiujn kondiĉojn en kategorioj, en leĝoj kaj pruvi kiom tiuj leĝoj, tiuj kategorioj por produktado de la riĉaĵoj superas la leĝojn kaj kategoriojn de la feŭda socio. La mizero estas en iliaj okuloj nur la doloro kiu akompanas ĉian naskon, en la naturo kiel en la industrio.

La romantikuloj apartenas al nia epoko, en kiu la burĝaro troviĝas en rekta kontraŭeco kun la proletaro, kie la mizero kreskas en same granda abundo kiel la riĉaĵo. La ekonomikistoj tiam fanfaronas orgoje kiel fatalistoj kaj el la alteco de sia starpunkto ĵetas fieran rigardon de malestimo al la homaj maŝinoj kiuj produktas la riĉaĵon. Ili ripetas ĉiujn eldirojn faritajn de siaj antaŭuloj, sed la indiferenteco, kiu ĉe tiuj estis naiveco, fariĝas ĉe ili koketado.

Poste venas la *humaneca skolo*, kiu afliktiĝas pro la malbona flanko de la hodiaŭaj produktadkondiĉoj. Tiu provas, por trankviligi sian konsciencon, kiom eble plej eŭfemisme prezenti la realajn kontrastojn; ĝi bedaŭras sincere la mizeron de la proletaro, la senbridan konkurencon de la burĝoj inter si; ĝi konsilas al la laboristoj esti moderaj, labori diligente kaj generi malmultajn infanojn; ĝi rekomendas al la burĝoj pripensadon en ilia produktademo. La tuta teorio de tiu skolo konsistas el senfinaj distingo inter teorio kaj praktiko, inter la principoj kaj la rezultoj, inter la ideo kaj la apliko, inter la enhavo kaj la formo, inter la esenco kaj la realo, inter la juro kaj la fakto, inter la bona kaj la malbona flanko.

La homama skolo estas la perfektigita humana skolo. Ĝi neas la neceson de la kontraŭeco, ĝi volas burĝigi ĉiujn homojn; ĝi volas realigi la teorion en tio ke ĝi distingiĝas de la praktiko kaj ne inkludas la antagonismon. Kompreneble estas facile en la teorio abstrakti la kontraŭdirojn kiujn oni renkontas ĉiupaŝe. Tiu teorio fariĝus tiam la idealigita realo. La homamantoj volas do konservi la kategoriojn kiuj estas la esprimo de la burĝaj kondiĉoj, sen la kontraŭdiro, kiu estas ilia esenco kaj nedisigebla de ili. Ili iluzias serioze kontraŭbatali la burĝan praktikon, kaj ili estas pli burĝaj ol la aliaj.

Kiel la ekonomikistoj estas la sciencaj reprezentantoj de la burĝa klaso, tiel la *socialistoj* kaj *komunistoj* la teoriistoj de la klaso de la proletaro. Tiom longe kiom la proletaro ankoraŭ ne estas sufiĉe evoluinta por konstitui sin kiel klason, kaj la batalo de la proletaro kun la burĝaro pro tio ankoraŭ ne havas politikan karakteron; tiom longe kiom la produktadfortoj ankoraŭ en la sino de la burĝaro mem ne estas sufiĉe evoluintaj por lasi travi la materiajn kondiĉojn necesajn por la liberigo de la proletaro kaj por la formado de nova socio – tiom longe tiuj teoriistoj estas nur utopiistoj kiuj, por respondi al la bezonoj de la subpremataj klasoj, elpensas sistemojn kaj serĉas regeneradan sciencon. Sed en la mezuro laŭ kiu la historio progresas kaj kun ĝi la batalo de la

proletaro pli klare konturiĝas, ili jam ne bezonas serĉi la sciencan en sia kapo; ili devas nur ekkompreni tion kio okazas antaŭ iliaj okuloj, kaj fariĝi la organo de tio. Dum ili serĉas la sciencan kaj faras nur sistemojn, dum ili estas ĉe la komenco de la batalo, ili vidas en la mizero nur la mizeron sen vidi la revolucion renversan flankon en ĝi, kiu renversos la malnovan socion. Ekde tiu momento la scienco fariĝas konscia produkto de la historia moviĝo, kaj ĝi ĉesis esti doktrina, ĝi fariĝis revolucia.

Ni revenu al s-ro Prudono.

Ĉiu ekonomia kondiĉo havas bonan kaj malbonan flankon; tiu estas la sola punkto en kiu s-ro Prudono ne frapas sin mem en la vizaĝon. La bonan flankon li vidas emfazita de la ekonomikistoj, la malbonan akuzata de la socialistoj. Li pruntas el la ekonomikistoj la neceson de la eternaj kondiĉoj; li pruntas de la socialistoj la iluzion, vidi en la mizero nur la mizeron. Li konsentas kun ambaŭ, ĉe kio li provas apogi sin sur la sciencan. La scienco reduktiĝas por li al la nana amplekso de scienca formulo; li estas homo ĉasanta formulojn. Laŭ tio, s-ro Prudono flatas sin esti farinta la kritikon de la politika ekonomio kaj de la komunismo – li staras profunde sub ambaŭ. Sub la ekonomikistoj, ĉar li kiel filozofo, kiu havas magian formulon ĉemane, kredas povi permesi al si eniri en la pure ekonomiajn detalojn; sub la socialistoj, ĉar li havas nek sufiĉan kuraĝon nek sufiĉan komprenon por levi sin, eĉ se nur spekulante, super la burĝan horizonton.

Li volas esti la sintezo, kaj li estas kunmetita eraro.

Li volas kiel homo de la scienco ŝvebi super burĝoj kaj proletoj; li estas nur la etburĝo, kiu estas konstante ĵetata alen kaj reen inter la kapitalo kaj la laboro, inter la politika ekonomio kaj la komunismo.

§ 2. Labordivido kaj maŝinoj

La labordivido malfermas laŭ s-ro Prudono la vicon da ekonomiaj disvolviĝoj.

Bona flanko de la labordivido:

„Laŭ sia esenco, la labordivido estas la reĝimo laŭ kiu la egaleco de la kondiĉoj kaj inteligentecoj realiĝas.” (Vol. I, p. 39)

Malbona flanko de la labordivido:

„La labordivido fariĝis por ni fonto de la mizero.” (Vol. I, p. 94)

Variaĵo:

„La laboro, per tio ke ĝi dividas sin laŭ la leĝo, kiu estas ĝia propra kaj la plej nobla kondiĉo de ĝia fekundeco, atingas la negadon de siaj celoj kaj kompensas sin mem.” (Vol. I, p. 94)

Solvenda problemo:

Trovi „la rekonponiĝon”, „kiu forigas la neelteneblon de la divido kaj ĉe tio konservas ĝiajn utilajn efikojn.” (Vol. I, p. 97)

La labordivido estas laŭ s-ro Prudono eterna leĝo, simpla kaj abstrakta kategorio. Do, ankaŭ la abstraktaĵo, la ideo, la nura vorto devas sufiĉi al li por klarigi la labordividon en la diversaj epokoj de la historio. La kasto, la gildoj, la manufakturo, la grandindustrio, ĉio devas esti klarigita per la simpla vorto „*dividi*”. Oni unue bone studu la sencon de la vorto „*dividi*”, kaj oni jam ne bezonas esplori la multajn influojn kiuj en ĉiu epoko donis certan karakteron al la labordivido.

Oni efektive multe tro simpligas la aferojn, se oni reduktas ilin al la kategorioj de s-ro Prudono. La historio ne procedas tiel kategorie. Necesis en Germanio tutaj tri jarcentoj por starigi la unuan gravan labordividon – nome la disigon de urbo kaj kamparo. Laŭ la mezuro en kiu nur tiu rilato de la urbo al la kamparo modifiĝas, modifiĝas la tuta socio. Por rigardi nur tiun unu flankon de la labordivido, ĝi donas al ni jen la antikvajn respublikojn, jen la kristanan feŭdismon, jen la malnovan Anglujon kun ĝiaj grundbaronoj, jen la modernan Anglion kun ĝiaj kotonbaronoj (cotton-lords). En la 14-a kaj 15-a jarcentoj, kiam ankoraŭ ne ekzistis kolonioj, kiam Ameriko ankoraŭ ne kaj Azio nur pere de Konstantinoplo ekzistis por Eŭropo, kiam la Mediteraneo estis ankoraŭ la centro de la komerca agado, la labordivido havis tute alian karakteron, tute alian aspekton ol en la 17-a jarcento, kiam hispanoj, portugaloj, holandanoj, angloj, francoj estis starigintaj koloniojn en ĉiuj mondpartoj. La amplekso de la merkato, ĝia fizionomio donis al la labordivido en la diversaj epokoj fizionomion, karakteron, kiun oni

penus dedukti el la nura vorto „*dividi*”, el la ideo, el la kategorio de „*divido*”.

„Ĉiuj ekonomikistoj depost Adam Smith”, diras s-ro Prudono, „atentigis pri la avantaĝoj kaj neelteneblaĵoj de la leĝo de divido, sed ĉe tio emfazis multe pli la unuajn ol la lastajn, ĉar tio kongruis pli bone al ilia optimismo, kaj sen ke iu el ili iam ajn demandintus sin, kio povus esti la neelteneblaĵoj de leĝo ... Kiel la sama principo, strikte sekvata en siaj konsekvencoj, kondukas al diametre kontraŭaj efikoj? Eĉ ne unu ekonomisto, nek antaŭ nek post Adam Smith, iam ajn rimarkis ke ĉi tie ekzistas solvenda problemo. Say iras ĝis agnoski ke en la labordivido la sama kaŭzo, kiu efikas la avantaĝon, sekvigas ankaŭ la malutilon.” [I, p. 95–96]

Adam Smith vidis multe pli antaŭen ol s-ro Prudono opinias. Li ja bone vidis, ke „en realo la diverseco de la naturaj talentoj inter la individuoj estas multe pli malgranda ol ni kredas. Tiuj tiel diversaj dispozicioj, kiuj ŝajnas distingi la membrojn de la diversaj profesioj, homojn, kiuj jam eniris la maturan aĝon, estas ne tiom la *kaŭzo* ol la *efiko* de la labordivido.” [Smith. saml., I., p. 33–34] Origine ŝarĝportisto distingiĝas malpli de filozofo ol ĉenhundo de grejhundo. Estas la labordivido kiu malfermis la abismon inter ambaŭ. Ĉio ĉi ne malhelpas s-ron Prudono aserti en alia loko ke Adam Smith havis nenian ideon pri la neelteneblaĵoj kiujn la labordivido efikas; kaj aserti ke J[ean]-B[aptiste] Say rekonis *la unua* „ke en la labordivido la sama kaŭzo kiu efikas la avantaĝon sekvigas ankaŭ la malutilon”

Ni aŭdu tamen Lemontey; *suum cuique <al ĉiu la sia>*.

„S-ro J.-B. Say faris al mi la honoron adopti en sia elstara verko pri politika ekonomio la principon *kiun mi* en la fragmento” pri la morala influo de la labordivido „*unue presentis*. La iomete frivola titolo de mia libro sendube ne permesis al li citi min. Mi trovas nur tiun klarigon por la silento de verkisto kiu estas tro riĉa je propra fonduso por nei tiom modestan pruntaĵon.” (Lemontey, *Œuvres complètes*, Vol. I, p. 245, Parizo 1840)

Ni donu al li tiun justecon: Lemontey sprite prezentis la malbonajn sekvojn de la labordivido tia kia ĝi okazas hodiaŭ, kaj s-ro Prudono sciis nenion aldoni. Sed ĉar ni jam, pro la kulpo de s-ro Prudono, pritraktis la demandon de la unueco, ni rimarkigu preterpase, ke tre longe antaŭ Lemontey kaj dek-sep jarojn antaŭ Adam Smith, la disĉiplo de Adam

Ferguson, tiu lasta ege klare detaligis tiun punkton en ĉapitro kiu pritraktas speciale la labordividon.

„Oni povus eĉ dubi ĉu la ĝenerala kapablo de nacio en rilato al la progreso de la tehniko kreskas. En pluraj branĉoj de la tehniko la celo estas perfekte atingita, ankaŭ se ili estas komplete senigitaj je kunefiko de la racio kaj de la sento, kaj la nescio estas same la patrino de la industrio kiel de la superstiĉo. Meditado kaj fantazio estas submetitaj al devojiĝoj; sed la kutimo movi la piedon aŭ la manon dependas nek de tiu ĉi nek de tiu. Tiel eblus diri ke la perfekteco de la manufakturlaboro konsistas en tio ke la spiriton oni faris superflua kaj la metiejo funkciigata sen kunlaborado de la kapo konsidereblas kiel meĥanismo kies unuopaj partoj estas homoj ... La generalo povas sperti pri militarto, dum la merito de la soldato limiĝas al plenumado de kelkaj man- kaj pied-movoj. La unua povas esti gajninta kion la alia perdis ... En periodo en kiu ĉio estas disigita, eĉ la arto pensi povas fariĝi aparta profesio.” (A. Ferguson, *„Essai sur l'histoire de la société civile”*, Parizo 1783 [II, p. 134, 135 kaj 136])

Por fini nian literaturan deflankiĝon, ni eksplicite kontestas ke „ĉiuj ekonomikistoj emfazis multe pli la avantaĝojn ol la malavantaĝojn de la labordivido”. Sufiĉas nomi Sismondi.

Tiel s-ro Prudono, koncerne la avantaĝojn de la labordivido, havas nenion alian por fari ol pli aŭ malpli bombaste parafrazi la ĝeneralajn kaj ĝenerale konatajn dirojn.

Ni vidu nun, kiel li deduktas de la labordivido, komprenata kiel ĝenerala leĝo, kiel kategorio, kiel ideo, la *neelteneblaĵojn* kiuj estas ligitaj kun ĝi. Kiel okazas ke tiu kategorio, tiu leĝo enkludas malegalan distribuadon de la laboro, malavantaĝe al la egaleca sistemo de s-ro Prudono?

„Per tiu solena horo de la labordivido komencas la ŝtormvento blovi sur la homaron. La progreso okazas ne por ĉiuj en egala kaj unueca maniero ... Ĝi komencas per tio, ekkapti malgrandan nombron da privilegiuloj ... Tiu prefero de personoj flanke de la progreso estas tio kio kredigis tiom longe je la natura kaj providenca malegaleco de la vivkondiĉoj, naskis la kastojn kaj konstruis ĉiujn sociojn hierarhie.” (Prudono, Vol. I, p. 94)

La labordivido kreis la kastojn: Sed la kastoĵoj estas ja la neelteneblaĵoj de la labordivido; do la labordivido kreis la neelteneblaĵojn. *Quod erat demonstrandum* <Jen kio estis pruvenda>. Se oni volas pluiri kaj demandi, kio instigis la labordividon krei la kastoĵojn, la hierarĥiajn konstituciojn kaj la privilegiojn, tiam s-ro Prudono respondos: la progreso. Kaj kio instigis la progreson? La baro. La baro, por s-ro Prudono, estas la prefero de personoj flanke de la progreso.

Post la filozofio la historio – sed nek la priskriba nek la dialektika, sed la kompara historio. S-ro Prudono komparas la libropresiston de hodiaŭ kaj la libropresiston de la mezepoko, la laboriston de la gigantaj uzinoj de Creusot kaj la kamparan forĝiston, la verkiston niatempan kaj la verkiston mezepokan, kaj li lasas la pesiltason sinki favore al tiuj kiuj pli aŭ malpli apartenas al la labordivido kian kreis aŭ heredigis la mezepoko. Li kontraŭmetas la labordividon de historia epoko al labordivido de alia historia epoko. Ĉu estas tio kion s-ro Prudono devis fari? Ne. Li devis montri al ni la neelteblaĵojn de la labordivido ĝenerale, de la labordivido kiel kategorio. Kial cetere insisti pri tiu parto de la Prudonaj verkoj, dum, kiel ni vidos, li mem iom poste revokas ĉiujn tiujn laŭdirajn disvolviĝojn?

„La unua efiko de la dispecigita laboro”, daŭrigas s-ro Prudono, „post la *malmoraligo de la animo*, estas la longigo de la labortago, kiu kreskas en inversa rilato al la sumo de la elspezita inteligento ... Sed ĉar la daŭro de la labortago ne povas superi dek-ses ĝis dek-ok horojn, tial ekde la momento, en kiu la kompensaĵo jam ne preneblas en formo de tempo, ĝi estas prenata ĉe la prezo, kaj la salajro sinkos ... Fakte estas, kaj nur rimarkigendas ĉi tie, ke la *ĝenerala konscienco* ne taksas la laboron de laborejestro kaj tiun de helpulo kiel samvalorajn. La malaltigo de la prezo de labortago fariĝas *per tio* neceso, tiel ke la laboristo, post kiam lia animo estas deprimita per humiliga laboro, ne povas alie ol esti trafita ankaŭ en sia korpo per la malalteco de la kompensaĵo.” [I, p. 97–98]

Ni pretervidu la logikan valoron de tiuj silogismoj, kiujn Kanto nomus devojigaj paralogismoj.

Jen la enhavo:

La labordivido reduktas la laboriston al humiliga funkcio. Al tiu humiliga funkcio respondas malmoraligita animo. Al tiu malmoraligita

animo respondas ĉiam kreskanta salajromalaltigo. Kaj por pruvi ke tiu salajromalaltigo respondas al malmoraligita animo, s-ro Prudono asertas por trankviligi sian konsciencon, ke estas la ĝenerala konscienco kiu volas tion. Ĉu la animo de s-ro Prudono estas parto de la ĝenerala konscienco?

La maŝinoj estas por s-ro Prudono „la logika malo de la labordivido” [I, p. 135], kaj helpe de sia dialektiko li komencas transformi maŝinon en *laborejon*.

Post kiam li primisis la modernan laborejon (la fabrikon)⁷¹, por rezultigi la mizeron el la labordivido, s-ro Prudono premisas la mizeron kreitan de la labordivido por alveni al la fabriko kaj povi prezenti tiun kiel la dialektikan negacion de tiu mizero. Post kiam li atribuis al la laboristo, en morala rilato, *humiligan funkcion*, en korpa rilato malaltecon de salajro, post kiam li metis la laboriston sub la *dependecon de la laborejestro* kaj reduktis lian laboron al la *rezulto de helpulo*, li kulpigas denove fabrikon kaj maŝinojn, por *humiligi* la laboriston, per tio ke li donas al li *majstron* [I, p. 164], kaj kompletigas lian humiligon per tio ke li lasas lin sinki „de la rango de metiisto al tiu de *helpisto*” [I, p. 164]. Bela dialektiko! Kaj se li almenaŭ haltus ĉe tio; sed ne, li bezonas novan historion de la labordivido; ne plu por dedukti el ĝi la kontraŭdirojn, sed por rekonstrui siamaniere la fabrikon. Por atingi tion, li vidas sin devigata forgesi ĉion kion li diris pri la labordivido.

La laboro organiziĝas kaj dividiĝas diverse, laŭ la laboriloj pri kiuj ĝi disponas. La manmuelilo implicas alian labordividon ol la vapormuelilo. Signifas frapi la historion en la vizaĝon se oni komencas per la labordivido ĝenerale, por en la sekvo veni al speciala produktadinstrumento, la maŝinoj.

La maŝinoj estas same nenia ekonomia kategorio kiel la bovo kiu tiras la plugilon, ili estas nur produktadforto. La moderna fabriko, kiu baziĝas sur la apliko de maŝinoj, estas socia produktadrilato, ekonomia kategorio.

Ni vidu nun, kiel la aferoj okazas en la brila imago de s-ro Prudono.

„En la socio, la apero de la maŝinoj kaj de ĉiam novaj maŝinoj estas la antitezo, la kontraŭformulo de la laboro: Ĝi estas la *protesto* de la

⁷¹<(la fabrikon): enigo de la tradukintoj. En la sekvaj paĝoj la termino atelier (laborejo) uzata de Markso estas tradukita plej ofte per fabriko.>

genio de la industrio kontraŭ la *dispecigita kaj hommurda laboro*. Kio fakte estas maŝino? *Maniero kunigi la diversajn partojn de la laboro*, kiun la labordivido disigis. Ĉiu maŝino difineblas kiel kunigo de diversaj operacioj ... Do, ni havas en la maŝino la *restarigon de la laboristo* ... La maŝinoj, kiuj en la politika ekonomio metas sin kontraŭe al la labordivido, reprezentas la sintezon, kiu en la homa spirito kontraŭmetas sin al la analizo ... La divido dividis nur la diversajn partojn de la laboro, per tio ke ĝi lasis al ĉiu unuopulo dediĉi sin al la specialaĵo kiu plej konvenis al li. La fabriko grupigas la laboristojn laŭ la rilato de ĉiu parto al la tutaĵo ..., ĝi enkondukas la principon de aŭtoritato en la laboron .. Sed tio ne sufiĉas. La *maŝino* aŭ la *fabriko*, post kiam ĝi humiligis la laboriston per tio ke ĝi donis al li majstron, kompletigas lian humiligon per tio ke ĝi lasas lin fali el la rango de metiisto al tiu de helpisto ... La periodo, kiun ni travivas en tiu ĉi momento, tiu de la maŝinoj, distingiĝas per aparta karaktero, la *dunglaboro*⁷² ... Dunglaboro estas *laŭ la dato posta* al labordivido kaj interŝanĝo.” [I, p. 135, 136, 161 kaj 164]

Simpla rimarko por s-ro Prudono. La divido de la diversaj laborpartoj, kiu donas al ĉiu la eblecon dediĉi sin al la specialaĵo kiu plej konvenas al li, divido, kiun s-ro Prudono datas je la komenco de la mondo, ekzistas ne antaŭ la moderna industrio sub la regado de konkurenco.

S-ro Prudono donas al ni poste pli ol „interesan genealogion” [I, p. 161] por pruvi ke la fabriko estiĝis el la labordivido kaj la dunglaboro el la fabriko.

1. Li premisas homon kiu „rimarkis” ke oni pliigas la produktadfortojn, „se oni disigas la produktadon en ties diversajn partojn kaj plenumigas ĉiun per aparta laboristo” [I, p. 161].

2. Tiu homo „kaptas la fadenon de tiu ideo kaj diras al si ke, se li estigas konstantan grupon da laboristoj, elektitaj por la aparta celo kiun li *planas*, li tiam ricevus pli konstantan produktaĵon ktp.” [I, p. 161]

3. Tiu homo faras al aliaj homoj *proponon*, por ke ili kaptu lian ideon kaj la fadenon de lia ideo.

4. Tiu homo „agas komence de la industrio kun siaj *kamaradoj*, kiuj

⁷²En la germana: Lohnarbeit, laŭvorte: salajrolaboro, ĝenerale tradukita per „dunglaboro”. -vl

fariĝis poste liaj laboristoj, sur la *bazo de egaleco*.” [I., p. 163]

5. „Efektive evidentas ke tiu origina egaleco devis baldaŭ malaperi vide al la avantaĝa pozicio de la majstro kaj al la dependeco de la dunglaboristo.” [I., p. 163]

Jen ree ekzemplo de la *historia* kaj *priskriba metodo* de s-ro Prudono.

Ni esploru nun el historia kaj ekonomia vidpunkto, ĉu la fabriko aŭ la maŝino enkondukis la *aŭtoritatprincipon* en la socion efektive post la labordivido; ĉu ĝi unuflanke rerajtigis la laboriston, kvankam li estis aliflanke submetita al la aŭtoritato; ĉu la maŝino estas la rekomponiĝo de la dividita laboro, ĝia *sintezo* kontraŭa al la *analizo* de la laboro.

La socio kiel tutaĵo havas komune kun la interno de fabriko ke ankaŭ ĝi havas sian labordividon. Se oni prenas la labordividon en moderna fabriko kiel ekzemplon, por apliki ĝin al la tuta socio, tiam sendube tiu socio estus plej bone organizita por produktado de sia riĉaĵo, kiu havus nur unu solan entrepreniston kiel gvidanton, kiu laŭ antaŭe fiksita ordo disdonas la funkciojn inter la diversaj membroj de la komunumo. Sed tute ne estas tiel. Dum ene de la moderna fabriko la labordivido estas ĝisdetale regulata de la aŭtoritato de la entreprenisto, la moderna socio konas nenian alian regulon, nenian alian aŭtoritaton por la divido de la laboro ol la liberan konkurencon.

Sub la prapatra reĝimo, sub la reĝimo de la kasto, de la feŭda kaj gilda sistemo, labordivido ekzistis en la tuta socio laŭ certaj reguloj. Ĉu tiuj reguloj estis ordonitaj de iu leĝdonanto? Ne. Estiĝintaj origine el la kondiĉoj de la materia produktado, ili estis nur multe pli poste deklaritaj kiel leĝo. Tiel, tiuj diversaj formoj de labordivido fariĝis same multaj bazoj de sociaj organizaĵoj. La labordivido en la laborejo, siavice, estis en ĉiuj ĉi sociordoj tre malmulte evoluinta.

Eblas starigi kiel ĝeneralan regulon: Ju malpli la aŭtoritato regas la labordividon ene de la socio, des pli la labordivido disvolviĝas ene de la laborejo kaj des pli ĝi estas submetita al la aŭtoritateco de unuopulo. Laŭ tio, la aŭtoritato en la laborejo kaj tiu en la socio staras, rilate la labordividon, en *inversa rilato* unu al la alia.

Nun necesas rigardi kia estas tiu laborejo en kiu la laboroj estas tre disigitaj, kie la tasko de ĉiu laboristo estas reduktita al tre simpla operacio kaj kie la aŭtoritato, la kapitalo grupigas kaj gvidas la

laboristojn. Kiel estiĝis tiu laborejo, tiu fabriko? Por respondi tiun demandon ni devas ekzameni kiel la proprasenca manufakturingustrio disvolviĝis. Mi parolas ĉi tie pri tiu industrio kiu ankoraŭ ne estas la moderna granda industrio kun siaj maŝinoj, sed kiu jam ne estas plu la industrio de la mezepoko nek la hejmindustrio. Ni ne iru tro en la detalon; ni volas nur konstati kelkajn ĉefajn punktojn por montri kiel oni per formuloj oni ankoraŭ ne faras historion.

Unu el la plej nemalhaveblaj kondiĉoj por estiĝo de la manufakturingustrio estis la akumulado de la kapitaloj, faciligita per la malkovro de Ameriko kaj la importo de ties noblaj metaloj.

Estas sufiĉe pruvita, ke la pliiĝo de la interŝanĝrimedoj sekvigis unuflanke la malplivalorigon de la salajroj kaj grundrentoj kaj aliflanke la pliiĝon de la industriaj profitoj. Per aliaj vortoj: Ju tiom, kiom la klaso de la grundposedantoj kaj la klaso de la laboristoj, la feŭdaj sinjoroj kaj la popolo sinkis, des tiom leviĝis la klaso de la kapitalistoj, la burĝaro.

Estis krome aliaj cirkonstancoj kiuj samtempe kontribuis al la disvolviĝo de la manufakturingustrio: la pliiĝo de la surmerkatingitaj varoj ekde kiam la komunikado kun Orientindio per marvojo ĉirkaŭ la Kabo de Bonespero estis kreita, krome la kolonisistemo kaj la disvolvado de la markomercio.

Alia flanko ankoraŭ ne sufiĉe honorata en la historio de la manufakturingustrio estas la eksigo de la multaj sekvantaroj de la feŭdaj sinjoroj, kies subordigitaj membroj fariĝis vagabondoj, antaŭ ol eniri la laborejon. Preskaŭ universala vagabondeco antaŭis la kreadon de la laborejo transiĝanta en fabrikon, en la 15-a kaj 16-a jarcentoj. La laborejo trovis krome potencon apogon en la multaj kamparanoj, kiuj pro la transformado de kampoj en herbejojn kaj pro la progresoj en la terkulturo kiuj necesigis malpli da laboristoj por prilaborado de la kampoj, estis konstante elservigitaj kaj tra tutaj jarcentoj fluis en la urbojn.

La kreskado de la merkatoj, la akumulado de kapitaloj, la ŝanĝoj okazintaj en la socia pozicio de la klasoj, amaso da personoj kiuj estis senigitaj je siaj enspezfontoj – tio estas same multaj historiaj antaŭkondiĉoj por la estiĝo de la manufakturo. Ne estis, kiel s-ro Prudono diras, amikecaj interkonsentoj kaj similaj, kiuj unuigis la homojn en laborejojn kaj fabrikojn. Eĉ ne en la sino de la malnovaj gildoj elkreskis la manufakturo. Estis la komercisto kiu fariĝis la ĉefo de

la moderna laborejo, kaj ne la malnova gildestro. Preskaŭ ĉie regis akra batalo inter manufakturo kaj metio.

La akumulado, la koncentriĝo de laboriloj kaj laboristoj antaŭiris la disvolviĝon de la labordivido ene de la laborejo. Manufakturo konsistis multe pli en la kunigo de multaj laboristoj kaj de multaj metioj en unu saman lokon, en salonegon sub komando de kapitalo, ol en la dissolvado de la laboroj kaj adaptado de speciala laboristo al tre simpla tasko.

La utilo de fabriklaborejo konsistis multe malpli en la propradira labordivido ol en la cirkonstanco ke oni laboris pli grandskale, ŝparis multajn senutilajn kostojn ktp. Ankoraŭ fine de la 16-a kaj komence de la 17-a jarcento la holanda manufakturo apenaŭ konis la dividon de la laboro.

La evoluo de la labordivido premisas la kuniĝon de la laboristoj en unu laborejo. Eĉ ne ekzistas unu sola ekzemplo, nek en la 16-a nek en la 17-a jarcento, por tio ke la diversaj branĉoj de unu sama metio estis praktikataj dise, ke sufiĉintus unuigi ilin en unu lokon por per tio estigi tutpretan fabriklaborejon. Sed post kiam la homoj kaj la laboriloj estis jam unuigitaj, la labordivido reproduktiĝis tia, kia ĝi ekzistis dum la tempo de la gildoj, kaj nepre speguliĝas interne de la fabriklaborejo.

Por s-ro Prudono, kiu vidas la aferojn starante sur la kapo, se li entute vidas ilin, la labordivido en la senco de Adam Smith antaŭas la fabriklaborejon, kiu estas ĝia vera ekzistkondiĉo.

La *maŝinoj* en la propra senco datas de la fino de la 18-a jarcento. Nenio absurda ol vidi en la maŝinoj la *antitezon* de la labordivido, la *sintezon*, kiu restarigas la unuecon en la dipecigitan laboron.

La maŝino estas kunigo de laborinstrumentoj kaj tute ne ligo de la laboroj por la laboristo mem.

„Se per la labordivido ĉiu aparta laborado estas reduktita al la manipulado de simpla instrumento, tiam la kunigo de ĉiuj tiuj instrumentoj movataj de unu sola motoro konsistigas maŝinon.” (Babbage, *„Traité sur l'économie des machines, etc.”*, Parizo 1833 [p. 230].

Simplaj iloj; akumulado de iloj; kunmetitaj iloj; ekmovo de kunmetita ilo per unu sola manmotoro, la homo; ekmovo de tiuj instrumentoj per la naturfortoj; maŝinoj; sistemo de maŝinoj kiuj havas

nur unu motoron; sistemo de maŝinoj kiuj havas aŭtomatan motoron – jen la evoluo de la maŝino.

La koncentriĝo de la produktadinstrumentoj kaj la labordivido estas same nedisigeblaj unu de la alia kiel surkampe de la politiko la centriĝo de la publikaj potencoj kaj la divido de la privatintereso. Anglio kun sia koncentriĝo de la grundo, de tiu instrumento de la kamplaboro, havas ankaŭ la labordividon en la kampkulturo kaj la aplikon de maŝinaro ĉe la terkulturo. Francio, kiu havas la dividon de la instrumento, de la grundo⁷³, la parcelsistemon, havas ĝenerale nek labordividon en la kampkulturo nek aplikadon de maŝinoj en la terkulturo.

Por s-ro Prudono la koncentriĝo de la laborinstrumentoj estas la negacio de la labordivido. En realo ni trovas ree la malon. Laŭ la mezuro en kiu la koncentriĝo de la laboriloj evoluas, ankaŭ la labordivido evoluas kaj inverse. Tiu estas la kaŭzo pro kiu ĉiu granda invento en la meĥanika teĥniko sekvigas pli grandan labordividon kaj ĉiu kresko de la labordivido siavice estigas novajn meĥanikajn inventojn.

Ni ne bezonas memorigi ke la grandaj progresoj de la labordivido en Anglio komencis post la invento de la maŝinoj. Tiel la teksistoj kaj la ŝpinistoj estis plejparte terkulturistoj, kiajn oni renkontas ankoraŭ en postrestintaj landoj. La invento de la maŝinoj finis la disigon de la manufakturindustrio disde la kampkulturindustrio. Teksistoj kaj ŝpinistoj, antaŭe kunaj en unu familio, estis disigitaj per la maŝino. Danke al la maŝino la ŝpinisto povas loĝi en Anglio, dum la teksisto samtempe vivas en Orientindujo. Antaŭ la invento de la maŝinoj la industrio de lando etendiĝis ĉefe sur la krudmaterialoj kiujn produktis ĝia propra grundo: tiel en Anglio lano, en Germanio lino, en Francio silko kaj lino, en Orienhindio kaj en Nordafriko kotono ktp. Danke al apliko de maŝinoj kaj de vaporo la labordivido povis tiom etendiĝi ke la grandindustrio, apartiĝinta de la nacia grundo, dependas sole nur de la mondkomerco, de la internacia interŝanĝo, de internacia labordivido. Mallonge, la maŝino tiom efikas sur la labordivido ke, se ĉe fabrikado de ia objekto troviĝis la rimedo por produkti partojn de ĝi meĥanike, ĝia fabrikado tuj apartiĝas en du fabrikojn sendependajn unu de la alia.

Ĉu necesas ankoraŭ paroli pri la *providenca* kaj homama celo, kiun

⁷³<(de la grundo): enmeto de la tradukintoj>

s-ro Prudono malkovras en la invento kaj origina apliko de la maŝino?

Kiam en Anglio la merkato akiris tian evoluon ke la manlaboro jam ne povis sufiĉi al ĝi, oni sentis la bezonon je maŝinoj. Oni nun pensis pri aplikado de la meĥanika scienco, kiu en la 18-a jarcento ekzistis jam preta.

La fabriko kun vaporreĝimo stampis sian aperon per agoj kiuj tute ne estis homamaj. Infanoj estis instigitaj al laboro per vipo; ili fariĝis objekto de ŝakrado; oni faris kontraktojn kun orfejoj. Oni nuligis ĉiujn leĝojn pri lernotempo de la laboristoj, ĉar oni, por uzi la ŝvelajn parolojn de s-ro Prudono, jam ne bezonis la *sintezajn* laboristojn. Fine, ekde 1825 preskaŭ ĉiuj novaj inventoj estis la rezulto de kolizioj inter laboristoj kaj entreprenistoj, kiu ĉiapreze strebis malplivalorigi la faksciojn de la laboristo. Post ĉiu nova iom grava striko estiĝis nova maŝino. La laboristo vidis en la aplikado de la maŝinoj tiom malmulte specon de rehabilitiĝo, ian *restariĝon*, kiel s-ro Prudono nomas tion, ke li en la 18-a jarcento tre longe rezistis al la estiĝanta regado de la vaporeŭtomatoj.

„Wyatt”, diras D-ro Ure, „estis inventinta la artefaritajn ŝpinfingrojn” (la tri vicojn da kanelitaj cilindroj) longe antaŭ Arkwright. La ĉefa malfacilaĵo konsistis ne tiom en la inventado de memaganta meĥanismo ... La malfacilaĵo konsistis ĉefe en la disciplino, necesa por ke la homoj rezignu siajn malregulajn kutimojn ĉe la laboro kaj identigu sin kun la senŝanĝa reguleco de la moviĝo de granda memaganta maŝino. Sed inventi disciplinkodeksojn adaptitan al la bezonoj, al la rapideco de la aŭtomata sistemo kaj sukcese obeigi ĝin, estis entrepreno inda je Herkulo. Jen la nobla verko de Arkwright.”

Resume, la enkonduko de la maŝinoj kreskigis la dividon de la laboro ene de la socio, simpligis la laboron de la laboristo ene de la laborejo, koncentris la kapitalon kaj dispecigis la homon.

Kiam s-ro Prudono volas esti ekonomikisto kaj por momento lasi flanke la „disvolvadon laŭ la vico de la pensoj, laŭ la strukturo de la racio”, tiam li serĉas sian instruon ĉe Adam Smith, en tempo kiam la aŭtomata fabriko nur estiĝis. Efektive, kia diferenco inter la divido de la laboro, kia ĝi ekzistis tempe de Adam Smith kaj kiam ni vidas en la aŭtomata fabriko! Por bone kapti ĝin, sufiĉas citi kelkajn tekstojn el la „Filozofio de la manufakturo” de D-ro Ure.

„Kiam Adam Smith skribis sian neforgeseblan verkon pri la esencaj

traĵtoj de la politika ekonomio, la aŭtomata industrisistemo estis ankoraŭ apenaŭ konata. La divido de la laboro ŝajnis al li prave la granda principo de la perfektigo en la manufakturo. Li montris ĉe la fabrikado de la nadloj, kiel laboristo, kiu perfektigas per la okupigo pri unu sama objekto, fariĝas pli efika kaj malpli kosta. En ĉiu branĉo de la manufakturo li vidis, kiel laŭ tiu principo certaj faradoj, kiel la tranĉado de latundratoj en samajn pecojn, fariĝas facile plenumeblaj; kiel aliaj laboroj, ekz-e la produktado kaj almeto de la nadlokapoj, estas relative pli malfacilaj: li konkludis el tio do, ke oni povas adapti al ĉiuj tiuj faradoj ĉiun laboriston kies salajro respondas al lia lerteco. Tiu *adaptado* estas la esenco de la labordivido. Sed tio, kio tempe de D-ro Smith povis servi kiel trafa ekzemplo, povas hodiaŭ nur erarigi la publikon koncerne la realan principon de la fabrikindustrio. Efektive la divido aŭ pli ĝuste la adaptado de la laboroj al la diversaj individuaj kapabloj ne kongruas kun la operacia plano de la aŭtomata fabriko: male, ĉie, kie procezo postulas grandan lertecon kaj neŝanceliĝan manon, oni forigas ĝin de tro lerta kaj ofte je diversaj malregulaĵoj inklinita laboristo, por transdoni ĝin al aparta meĥanismo, kies aŭtomata aktiveco estas tiom bone reguligita, ke infano povas kontroli ĝin.

La principo de la aŭtomata sistemo konsistas do en tio, anstataŭigi la manlaboron per la meĥanika laboro kaj la labordividon inter la metiistoj per la diserigo de la procezo en la partojn kiuj konsistigas ĝin. Laŭ la sistemo de la manlaboro la homa laboro estis ĝenerale la plej kosta elemento de produkto; sed laŭ la aŭtomata sistemo ni vidas la lertajn manlaboristojn iom post iom anstataŭitaj de simplaj maŝinkontrolistoj.

La malforteco de la homa naturo estas tiom granda ke, ju pli lerta la laboristo, li fariĝas des pli postulema kaj malpli facile traktebla kaj sekve malpli taŭga por meĥanika sistemo, en kies funkciado liaj kapricaj ideoj povas nur kaŭzi konsiderindan malutilon. La ĉeftasko de la hodiaŭa fabrikisto konsistas do en tio, per ligo de scienco kaj kapitalo redukti la aktivecon de siaj laboristoj al tio ke ili uzu sian atenton kaj sian lertecon, ecojn, kiujn ili tre perfektigas en sia junaĝo *se oni laborigas ilin ekskluzive pri unu certa objekto*.

Laŭ la sistemo de gradado de la laboro necesas plurjara lerntempo antaŭ ol okuloj kaj mano fariĝu sufiĉe lertaj por plenumi certajn meĥanikajn artifaĵojn; sed laŭ la sistemo kiu diserigas procezon per

tio ke ĝi dividas ĝin en ĝiajn unuopajn esencajn partojn, kaj kiu plenumigas ĉiujn ĝiajn partojn per aŭtomata maŝino, oni povas konfidi tiujn elementajn partojn al persono kun mezuma talento post mallonga provtempo; oni povas eĉ en urĝaj kazoj meti tiun personon de unu maŝino al alia, laŭ bontrovo de la fabrikdirektoro. Tiaj ŝanĝoj staras en evidenta kontraŭdiro kun la malnova rutino, kiu dividas la laboron kaj igas unu laboriston fabriki nadlokapojn, alian akriigi nadlopintojn, okupiĝo kies enuiga monotoneco nervozigas ilin ... Sed laŭ la principo de la *egaligo* aŭ la aŭtomata sistemo la kapabloj de la laboristo estas submetitaj nur al agrabla ekzerco ktp ... Ĉar lia agado konsistas en tio, kontroli la laboron de bone reguligita meĥanismo, li povas lerni ĝin en mallonga tempo; per tio ke li transigas sian laboron de unu maŝino al alia, li ŝanĝas sian agadon kaj disvolvas siajn ideojn, per tio ke li pensas pri la ĝeneralaj kombinaĵoj kiuj rezultas el lia laboro kaj el tiu de liaj kolegoj. Tiel tiu enpremado de la kapabloj, tiu striktigo de la ideoj, tiu stato de perturbo de la korpa evoluo, kiuj ne senkiale estas atribuitaj al la labordivido, sub ordinaraĵoj ne povas okazi en sistemo de *egaleca divido de la laboroj*.

La konstanta celo, la tendenco de ĉia perfektigo de la teĥniko, efektive iras en la direkton kiom eble plej superfluigi la laboron de la homo aŭ malpliigi ĝian prezon, per tio ke oni anstataŭigas la laboron de plenkreskaj laboristoj per la laboro de virinoj kaj infanoj, aŭ la lertan laboron per kruda laboro ... Tiu tendenco, dungi jam nur infanojn kun viglaj okuloj kaj lertaj fingroj anstataŭ spertajn laboristojn, montras, ke la lerneja dogmo pri la divido de la laboro laŭ la diversaj gradoj de lerteco estas definitive forĵetita de niaj kleraj fabrikistoj.” (André Ure, „*Philosophie des manufactures ou économie industrielle*”, vol. I, ĉap. 1])

Tio, kio karakterizas la labordividon en la moderna socio, estas la fakto ke ĝi generas la specialaĵojn, la fakulojn kaj kun ili la fakidiotismon.

„Admiro kaptas nin”, diras Lemontey, „kiam ni vidas ĉe la klasikuloj la saman personon distingiĝi kiel filozofo, poeto, oratoro, historiisto, pastro, ŝtatisto kaj militestro. Niaj animoj ektimas vide al tiom ampleksa kampo. Ĉiu limigas hodiaŭ sian teritorion kaj enfermiĝas en ĝi. Mi ne scias ĉu per tiu dispeciĝo la kampo grandiĝas, sed mi ja bone scias ke la homo malgrandiĝas.” [Lemontey, l.c., p. 213]

Kio karakterizas la laboron en la meĥanika fabriko estas, ke ĝi perdis ĉian specialan karakteron. Sed ekde la momento, en kiu ĉia aparta evoluo ĉesas, sentiĝas la bezono je universaleco, la strebo al ĉiufanka evoluo de la individuo. La aŭtomata fabriko forigas la specialistojn kaj la fakidiotismon.

S-ro Prudono, kiu komprenis eĉ ne tiun revolucion flankon de la aŭtomata fabriko, faras paŝon returne kaj proponas al la laboristo produkti ne nur la dekduonon de nadlo, sed iom post iom ĉiujn dek-du partojn. La laboristo atingus tiel la sciencon kaj la konscion de la nadlo. Tio estas unuvorte la sinteza laboro de s-ro Prudono. Neniu kontestos ke fari moviĝon antaŭen kaj alian returnen ankaŭ signifas fari sintezan moviĝon.

Resume, s-ro Prudono ne transiras la idealon de la etburĝo. Por realigi tiun idealon, li ne ekhavas alian ideon ol rekonduki nin al la metia submajstro aŭ maksimume al la metia majstro de la mezepoko. Sufiĉas, diras li ie en sia libro, esti farinta unu solan fojon en sia vivo majstroverkon, esti sin unu solan fojon sentinta homo. Ĉu tio ne estas forme kiel enhave la majstroverko postulata de la gildoj de la mezepoko?

§ 3. Konkurenco kaj monopol

Bona flanko de la konkurenco:

„La konkurenco apartenas same esence al la laboro kiel la divido ... Ĝi estas necesa por la *alkonduko de la egaleco*.” [I, p. 186 kaj 188]

Malbona flanko de la konkurenco:

„La principo estas la negado de si mem. Ĝia plej certa efiko estas, pereigi tiujn kiujn ĝi kuntrenas.” [I, p. 185]

Ĝenerala konsidero:

La neelteneblaĵoj, kiujn ĝi sekvigas, devenas same kiel la bono kiun ĝi sekvigas ..., ambaŭ logike el la principo.” [I, p. 185–186]

„Serĉi la principon de *perado*, kiu devas deduktiĝi el leĝo kiu staras pli alte ol la libereco mem”. [I, p. 185]

Solvenda tasko:

Variaĵo:

„do ne povas temi ĉi tie pri forigi la konkurencon, io same malebla kiel la forigo de la libereco; temas pri tio, trovi la ekvilibron, mi diras volonte la *policon*, de ĝi.” [I, p. 233]

S-ro Prudono komencas per defendi la eternan neceson de la konkurencio kontraŭ tiuj kiuj volas anstataŭigi ĝin per la konkuremo⁷⁴.

Ne ekzistas „konkuremo sen celo”, kaj ĉar „la objekto de ĉia pasio estas nepre analoga al la pasio – virino por la amanto, potenco por la ambiciulo, oro por la avarulo, laŭrokrono por la poeto – tiel la objekto de la industria konkuremo estas nepre la *profito*. La konkuro estas nenio alia ol la konkurencio mem. [I, p. 187]

La konkurencio estas la konkuremo rilate al profito. Ĉu la industria konkuremo estas nepre la konkuremo rilate al la profito, t.e. la konkurencio? S-ro Prudono pravas tion, per tio ke li asertas ĝin. Ni vidis: aserti signifas por li pruvi, kiel premisi signifas nei.

Se la senpera *objekto* de la amanto estas la virino, tiam la senpera objekto de industria konkuremo estas la produkto kaj ne la profito.

La konkurencio estas ne la industria konkuremo, sed la komerca. Hodiaŭ la industria konkuremo ekzistas nur koncerne komercon. Ekzistas eĉ fazoj en la ekonomia vivo de la popoloj, kie ĉiuj estis kaptitaj de ia ekstazo fari profiton sen produkti. Tiu spekulada ekstazo, kiu periode revenas, malkaŝas la veran karakteron de la konkurencio, kiu provas eskapi la neprajn kondiĉojn de la industria konkuremo.

Se oni dirintus al metiisto de la 14-a jarcento, ke oni forigos la privilegiojn kaj la tutan feŭdan organizitecon de la industrio, por anstataŭigi ĝin per la industria konkuremo, nomata konkurencio, li respondintus al vi, ke la privilegioj de la diversaj korporacioj, ĵurgildoj, gildoj konsistigas ĝuste la organizitan konkurencon. S-ro Prudono esprimas sin ne pli bone, kiam li asertas, „ke la konkuremo estas nenio alia ol la konkurencio”. [II, p. 187]

„Dekretu, ke ekde la 1-a de januaro 1847 laboro kaj salajro estu garantiata por ĉiu, kaj tuj al la altgrada streĉiteco de la industrio

⁷⁴ La Fourieristoj. F. E.

sekvos eksterordinara malstreĉiĝo.” [I, p. 189]

Anstataŭ premison, pozicion kaj negacion ni havas nun dekreton, kiun S-ro Prudono dekretas eksplicite por pruvi la neceson de la konkurenco, de ĝia eterneco kiel kategorio ktp.

Se oni iluzias ke necesas nur dekretoj por eliri el la konkurenco, oni neniam liberiĝos el ĝi. Kaj se oni iras ĝis proponi la forigon de la konkurenco ĉe konservado de la salajro, tiam oni proponas dekreti sensencaĵon. Sed la popoloj ne evoluas laŭ reĝa ordono. Antaŭ ol fabriki tiajn dekretojn, ili devas ĝisfunde ŝanĝi almenaŭ siajn industriajn kaj politikajn ekzistadkondiĉojn, sekve sian tutan ekzistadon.

S-ro Prudono respondos per sia neskuebla impertinenteco, ke tiu estas premo de „transformiĝo de nia naturo sen historiaj antaŭkondiĉoj” [I, p. 191] kaj ke li havas la rajton „*elkludi* [saml.] nin el la diskuto”, ni ne scias surbaze de kia dekreto.

S-ro Prudono ne scias ke la tuta historio estas konstanta transformiĝo de la homa naturo.

„Ni restu ĉe la faktoj. La franca revolucio estis farita same por la industria kiel por la politika libereco; kaj kvankam Francio, ni diru tion malkaŝe, en la jaro 1789 ne ekkonis ĉiujn konsekvencojn de la principo kies realigon ĝi postulis, ĝi trompiĝis nek pri siaj deziroj nek pri siaj atendoj. Kiu provus nei tion, tiu perdas en miaj okuloj la rajton je kritiko. Ni neniam disputos kun kontraŭulo kiu asertas principe la libervolan eraron de dudek-kvin milionoj da homoj ... Se la konkurenco ne estus principo de la socia ekonomio, dekreto de la sorto, neceso de la homa animo, kial oni ne pensis, anstataŭ forigi korporaciojn kaj ĵurgildojn kaj gildojn prefere pri tio restarigi ĉion ĉi?” [I, p. 191–192]

Ĉar do la francoj de la 18-a jarcento forigis korporaciojn kaj gildojn anstataŭ modifi ilin, tial la francoj de la 19-a jarcento devas modifi la konkurencon anstataŭ forigi ĝin. Ĉar la konkurenco en Francio ekregis kiel konsekvenco de la historiaj bezonoj, tiu konkurenco de la 19-a jarcento devas ne esti forigata surbaze de aliaj historiaj bezonoj. S-ro Prudono, kiu ne komprenas ke la estigo de la konkurenco estis ligita kun la reala evoluo de la homoj de la 18-a jarcento, faras el la konkurenco

neceson de la *homa animo en malfidelaj landoj*⁷⁵. Kion li farintus el la Granda Colbert por la 17-a jarcento?

Post la revolucio venis la nuna stato de la aferoj. S-ro Prudono elprenas ankaŭ el ĝi faktojn por montri la eternecon de la konkurenco, per tio ke li pravas ke ĉiuj industrioj, en kiuj tiu kategorio estas ne sufiĉe evoluinta, kiel kampkulturo, troviĝas en pli malalta, kaduka stato.

Diri, ke ekzistas industrioj kiuj ankoraŭ ne estas sur la alteco de la konkurenco, ke aliaj troviĝas ankoraŭ sub la nivelo de la burĝa produktado, estas sensenca babilado kiu neniel pravas la eternecon de la konkurenco.

La tuta logiko de s-ro Prudono resumiĝas jene: La konkurenco estas socia rilato, en kiu ni hodiaŭ disvolvas niajn produktadfortojn. Estas vere ke li ne donas al tiu vero logikajn disvolvadojn, sed formojn, kaj tre ofte sufiĉe strangajn formojn, dirante ke la konkurenco estas la industria konkuremo, la hodiaŭa maniero esti libera, la respondeco en la laboro, la konstituiĝo de la valoro, kondiĉo por la veno de la egaleco, principo de la socia ekonomio, dekreto de la sorto, neceso de la homa animo, inspiro de la eterna justeco, la libereco en la divido, la divido en la libereco, ekonomia kategorio.

„*Konkurenco kaj asocio* apogas unu la alian. Tute ne ekskludante unu la alian, ili eĉ ne disiĝas. Kiu diras konkurenco, jam premisas *komunan celon*; la konkurenco do ne estas la *egoismo*, kaj estas la bedaŭrinda eraro de la socialismo ke ĝi vidis en ĝi la renverson de la socio.” [I, p. 223]

Kiu diras konkurenco, diras komuna celo, kaj tio pravas unuflanke ke konkurenco estas la asocio, aliflanke ke konkurenco ne estas egoismo. Kaj ĉu tiu kiu diras *egoismo*, ne diras ankaŭ komuna celo? Ĉiu egoismo okazas en la socio kaj pere de la socio. Ĝi antaŭkondiĉas do la socion, tio signifas komunajn celojn, komunajn bezonojn, komunajn produktadrimedojn ktp ktp. Ĉu do estas pura hazardo, se la konkurenco kaj la asocio, pri kiuj parolas la socialistoj, eĉ ne disiĝas?

La socialistoj tre bone scias ke la nuna socio baziĝas sur konkurenco. Kial ili riproĉus al la konkurenco ke ĝi renversas la hodiaŭan socion, la socion kiun ili mem volas renversi? Kaj kial ili riproĉus al la

⁷⁵En la originalo latine: „*in partibus infidelium*” („*en malfidelaj landoj*”). -

konkurenco ke ĝi renversos la estontan socion, en kiu ili vidas male la renversion de la konkurenco?

S-ro Prudono diras pli sube, ke la konkurenco estas la *kontraŭo de la monopolo* kaj sekve ne povas esti la *kontraŭo de la asocio*.

La feŭdismo troviĝis ĉe sia apero en kontraŭdiro al la patriarĥeca monarĥio; sed ĝi troviĝis en nenia kontraŭdiro al la konkurenco, kiu ankoraŭ tute ne ekzistis. Ĉu el tio sekvas ke la konkurenco ne troviĝas en kontraŭdiro al la feŭdismo?

Fakte socio, asocio estas nomoj kiujn eblas doni al ĉiaj socioj, al la feŭda same kiel al la burĝa socio, kiu estas la asocio bazita sur konkurenco. Kiel do povas ekzisti socialistoj, kiuj kredas povi refuti la konkurencon per la sola vorto asocio? Kaj kiel s-ro Prudono mem povas voli defendi la konkurencon kontraŭ la socialismo per tio ke li nomas ĝin per la sola vorto asocio?

Ĉio kion ni diris ĝis nun, konsistigas la bonan flankon de la konkurenco, kian s-ro Prudono komprenas ĝin. Ni transiru nun al la fia flanko, tio signifas al la negativa flanko de la konkurenco, al ĝiaj neelteneblaĵoj, al tio kion ĝi entenas je detruaj, renversaj, je malutilaj ecoj.

La pentraĵo kiun s-ro Prudono skizas pri ĝi havas ion ja nigran.

La konkurenco generas la mizeron, ĝi nutras la internan militon, ĝi „ŝanĝas la naturajn zonojn”, intermiksas la etnojn, detruas la familiojn, koruptas la publikan konsciencon, ĝi „renversas la nociojn de praveco, de justeco”, de la moralo, kaj, kio estas eĉ pli malbona, ĝi detruas la honestan kaj liberan komercon kaj eĉ ne donas kompanse la *sintezan valoron*, la fiksitan kaj honestan prezon. Ĝi elrevigas ĉiujn, eĉ la ekonomikistojn; ĝi troigas ĝis detrui sin mem.

Laŭ ĉio kion s-ro Prudono prezentas je malbonaĵoj, por liaj principoj kaj liaj iluzioj, por la rilatoj de la burĝa socio, ĉu povas ekzisti elemento pli demoraliza, pli detrua ol la konkurenco?

Ni konsciis ke la konkurenco fariĝas ĉiam pli detrua por la burĝaj *rilatoj*, ju pli ĝi incitas al febra kreado de novaj produktadfortoj, tio signifas de la materialaj kondiĉoj de nova socio. El tiu vidpunkto la malbona flanko de la konkurenco havas almenaŭ sian bonon.

„La konkurenco kiel pozicio aŭ ekonomia fazo, konsiderata laŭ sia

estiĝo, estas la necesa rezulto ... de la teorio de la malpliigo de la produktadkostoj.” [I, p. 235]

Por s-ro Prudono la cirkulado de la sango ŝajnas esti konsekvenco de la teorio de Harvey.

„La *monopolo* estas la necesa fino de la konkurenco, kiun ĝi kreas per konstanta negado de si mem. Tiu kreado de la monopolo estas jam pravigo ... La monopolo estas la natura kontraŭdiro de la konkurenco ... Sed ekde kiam la konkurenco estas necesa, ĝi inkludas la ideon de la monopolo, ĉar la monopolo estas iel la sidejo de ĉia konkuranta individueco.” [I, p. 236 kaj 237]

Ni ĝojas kun s-ro Prudono ke li almenaŭ unufoje povas bone apliki sian formulon de tezo kaj antitezo. Ĉiuj scias ke la moderna monopolo estas kreata de la konkurenco mem.

Koncerne la enhavon, s-ro Prudono tenas sin je poeziaj bildoj. La konkurenco faras „el ĉiu subfako de la laboro kvazaŭ suverenecon, kie ĉiu individuo starigas sin en sia forto kaj sendependeco”. [I, p. 186] La monopolo estas „la *sidejo* de ĉia konkuranta individueco”. La suvereneco estas almenaŭ same bela kiel la sidejo.

S-ro Prudono parolas nur pri la moderna monopolo, kiu estas kreata de la konkurenco, sed ni ĉiuj scias ke la konkurenco estiĝis el la feŭda monopolo. Tiel la konkurenco estis origine la kontraŭo de la monopolo kaj ne la monopolo la kontraŭo de la konkurenco. La moderna monopolo estas do ne simpla antitezo, sed male la vera sintezo.

Tezo: la feŭda monopolo, antaŭulo de la konkurenco.

Antitezo: la konkurenco.

Sintezo: la moderna monopolo, kiu estas la negacio de la feŭda monopolo, laŭ tio ke ĝi antaŭkondiĉas la regadon de la konkurenco, kaj kiu estas la negacio de la konkurenco, laŭ tio ke ĝi estas monopolo.

Tiel la moderna monopolo estas la burĝa monopolo, la sinteza monopolo, la negacio de la negacio, la unueco de la kontraŭdiroj. Ĝi estas la monopolo en sia pura, normala, racia stato. S-ro Prudono troviĝas en kontraŭdiro kun sia propra filozofio, kiam li deklaras la burĝan monopolon la monopolo en kruda, *simplisma*, kontraŭdira, spasmema stato. S-ro Rossi, kiun s-ro Prudono ripete citas pri la monopolo, ŝajnas esti pli bone kaptinta la sintezecon de la burĝa monopolo.

En sia „*Cours d'économie politique*” li distingas inter artefarita kaj natura monopolo. La feŭdaj monopoloj, deklaras li, estas artefaritaj, tio signifas arbitraj; la burĝaj monopoloj estas naturaj, tio signifas raciaj.

La monopolo estas bonaĵo, argumentas s-ro Prudono, ĉar ĝi estas ekonomia kategorio, emanaĵo de la „senpersona racio de la homaro”. La konkurenco estas ankaŭ bonaĵo, ĉar ankaŭ ĝi estas ekonomia kategorio. Sed kio ne estas bona, estas la maniero de realigo de la monopolo kaj de la konkurenco. Kio estas ankoraŭ pli malbona, estas, ke konkurenco kaj monopolo sin voras reciproke: Kion fari? Oni serĉu la sintezon de tiuj du ideoj, elŝiru ĝin el la sino de Dio, kie ĝi kuŝas de antaŭ la pratempo.

En la praktiko de la vivo oni trovas ne nur konkurencon, monopolon kaj ilian disputon, sed ankaŭ ilian sintezon, kiu ne estas formulo, sed moviĝo. La monopolo generas la konkurencon, la konkurenco generas la monopolon. La monopolistoj faras konkurencon inter si, la konkurantoj fariĝas monopolistoj. Kiam la monopolistoj limigas la konkurencon per partaj asocioj, tiam la konkurenco kreskas inter la laboristoj, kaj ju pli la amaso de proletoj kreskas fronte al la monopolistoj de iu nacio, des pli senbrida fariĝas la konkurenco inter la monopolistoj de la diversaj nacioj. La sintezo estas tia ke la monopolo povas konserviĝi nur per tio ke ĝi konstante eniras la konkurencebatalon.

Por fari la dialektikan transiron al la impostoj, kiuj venas post la *monopolo*, s-ro Prudono rakontas al ni pri la *genio de la socio*, kiu, post kiam ĝi iris *sentime sian zigzagan vojon*, post kiam ĝi,

„*senpente kaj senhezite, per sekura paŝo, alvenis ĉe la angulo de la monopolo*, ĵetas *melankolian* rigardon malantaŭ si kaj post profunda pripensado impostigas ĉiujn objektojn de la produktado kaj kreas tutan administran organizaĵon, por ke *ĉiuj pozicioj estu liverotaj al la proletaro kaj pagotaj de la viroj de la monopolo*”. [I, p. 284–285]

Kion diri pri tiu *genio*, kiu promenas zigzage sen esti matenmanĝinta? Kaj kion pri tiu promenado, kiu celas nenion alian ol neniigi la burĝojn per impostoj, dum ĝuste la impostoj havas la celon doni al la burĝoj la rimedojn por teni sian pozicion kiel dominantaj klaso?

Por nur preterpase montri la manieron, kiel s-ro Prudono mistraktas la ekonomiajn detalojn, sufiĉas indiki ke laŭ li la *konsumimposto* estas enkondukita en la intereso de egaleco kaj por helpi la proletaron.

La konsumimposto plene evoluis nur post la venko de la burĝaro. En la manoj de la industrikapitalo – tio signifas de la modera kaj ŝparema riĉaĵo, kiu konservas, reproduktas kaj pligrandigas sin per rekta ekspluatado de la laboro – la konsumimposto estis rimedo ekspluati la frivolan, vivoĝuan, malŝpareman riĉaĵon de la grandsinjoroj, kiuj faris nenion ol konsumi. James Stewart tre bone disvolvis tiun originan celon de la konsumimposto en sia „*Inquiry into the Principles of Political Economy*”, kiun li publikigis dek jarojn antaŭ Adam Smith.

„En la pura monarĥio”, diras li, „la princoj ŝajnas en certa rilato ĵaluzaj pri la kreskado de la havaĵoj kaj pro tio impostas tiujn kiuj riĉiĝas – imposto je produktado. En la konstitucia regado ili trafas ĉefe tiujn kiuj malriĉiĝas – impostoj je konsumo. Tiel la monarĥoj impostas la industrion ..., ekzemple la kapimposto kaj la havaĵimposto (taille) estas proporciaj al la supozata riĉaĵo de tiuj kiuj estas submetitaj al ili. Ĉiu estas impostata laŭ la gajno kiun li faras laŭ la pritakso. En konstituciaj landoj oni kutime impostas la konsumon.” [II, p. 190–191]

Ĉiu estas impostata laŭ tio kion li elspezas.

Koncerne la logikan sinsekvon de la impostoj, de la komerca bilanco, de la kredito – en la kapo de s-ro Prudono –, ni rimarkigu nur ke la angla burĝaro, ricevinta politikan gravecon sub Vilhelmo de Oranio, kreis tuj novan impostsistemon, ŝtatŝuldojn kaj la sistemon de protektadganaĵoj, ekde kiam ĝi kapablis libere disvolvi siajn ekzistadkondiĉojn.

Tiu indiko sufiĉu por doni al la leganto ĝustan ideon pri la profundemaj disertadoj de s-ro Prudono pri polico aŭ impostoj, komerca bilanco, kredito, komunismo kaj loĝantaro. Ni ŝatus vidi la kritikon – eĉ plej indulgan –, kiu kapablas serioze diskuti pri tiuj ĉapitroj.

§ 4. La grundproprieto aŭ la rento

En ĉiu historia epoko la proprieto evoluis alie kaj sub tute diversaj sociaj kondiĉoj. Difini la burĝan proprieton signifas do nenion alian ol prezenti ĉiujn sociajn kondiĉojn de la burĝa produktado.

Voli doni difinon de la proprieto kiel de sendependa rilato, de aparta kategorio, de abstrakta kaj eterna ideo, povas esti nenio alia ol iluzio de

la metafiziko aŭ de la jursistemo.

S-ro Prudono, kiu ŝajnas paroli pri la proprieto ĝenerale, pritraktas nur la *grundpropieton*, la *grundrenton*.

„La origino de la grundpropieto estas, por tiel diri, eksterekonomia: Ĝi baziĝas sur konsideroj de la psikologio kaj de la moralo, kiuj havas nur tre malproksiman rilaton kun la produktado de la riĉaĵoj.” (Vol. II, p. 269)

Per tio s-ro Prudono deklaras sin nekapabla kompreni la ekonomian originon de grundpropieto kaj de rento. Li konfesas ke tiu nekapablo devigas lin rifuĝi al konsideroj de psikologio kaj de moralo, kiuj, kvankam ili ja „havas nur tre malproksiman rilaton kun la produktado de la riĉaĵoj”, tamen havas tre proksiman rilaton al la strikteco de lia historia horizonto. S-ro Prudono asertas ke la origino de la grundpropieto entenas ion *mistikan* kaj *misteran*. Nu, en la origino de la grundpropieto vidi misteron, do transformi la rilaton de la produktado al la distribuo de la produktadrimedoj en misteron, ĉu tio ne signifas, por uzi la vortojn de s-ro Prudono, rezigni ĉian pretendon pri ekonomia scienco?

S-ro Prudono

„*limigas* sin memoriĝi, ke en la sepa epoko de la ekonomia evoluo – tiu de la *kredito* –, kie la fikcio malaperigis la realon, la homa agado estis minacata perdiĝi en la malpleno, fariĝis necesa, *religi la homon pli forte al la naturo*: Nu bone, la rento estis la prezo por tiu nova kontrakto.” (Vol. II, p. 265)

La viro kun la kvardek taleroj jam antaŭsupozis sian Prudonon:

„Kun permeso, s-ro Kreanto: Ĉiu estas mastro en sia mondo; sed vi neniam kredigos min ke tiu, en kiu ni troviĝas, estas el vitro.”

En via mondo, kie la kredito estis rimedo *perdiĝi en la malpleno*, eblas ke la grundpropieto fariĝis necesa *por religi la homon al la naturo*. En la mondo de la reala produktado, kie la grundpropieto ekzistas ĉiam antaŭ la kredito, la *horror vacui* <*la timo antaŭ la malpleno*> de s-ro Prudono ne povas okazi.

Post koncedo de la rento, kia ajn estas cetere ĝia origino, farmisto kaj grundpropietulo intertraktas kontraŭdire. Kia estas la fina rezulto de tiuj intertraktadoj? Alivorte: Kiu estas la mezuma alteco de la rento? Ni aŭdu kion s-ro Prudono diras:

„La teorio de Ricardo respondas al tiu demando. Komence de la socio, kiam la homo, novulo sur la tero, havis antaŭ si nenion ol gigantajn arbarojn, kiam la grundo estis ankoraŭ nemezurebla kaj la industrio nur estiĝanta, la rento devis esti nula. La tero, ankoraŭ ne prilaborita, estis uzobjekto, ĝi ankoraŭ ne estis interŝanĝvaloro: ĝi estis komuna, ne socia. Iom post iom la pliigo de la familioj kaj la progreso de la terkulturado instruis alte taksi la valoron de la grundo. La laboro donis al la grundo ĝian valoron: tiel estiĝis la rento. Ju pli da fruktoj kampo kapablis porti per la sama kvanto da laboro, des pli alta ĝi estis taksata; ankaŭ estis ĉiam la strebado de la posedantoj alproprigi al si la tutaĵon de la fruktoj de la grundo, malpli la salajro de la farmisto, t.e. malpli la produktadkostoj. Tiel la proprieto postsekvas la laboron, por forpreni de ĝi ĉion kio en la produkto superas la realajn kostojn. Ĉar la proprietulo plenumas mistikan taskon kaj reprezentas kontraŭ la interezkampulo la komunumon, tial la farmisto estas en la celoj de la providenco nenio alia ol respondeca laboristo, kiu devas raporti al la socio pri ĉio kion li ricevas pli ol sian pravan salajron ... Laŭ esenco kaj celo la rento estas do instrumento de la distribuanta justeco, unu el la mil rimedoj kiujn la genio de la ekonomio aplikas por atingi la egalecon. Ĝi estas giganta katastro, kontraŭdire starigita de farmisto kaj grundproprietulo, sed ĉe kio ĉiu konflikto estas ekskludita en pli alta intereso, kaj kies fina rezulto estos la kompensado de la posedo de la tero inter la ekspluatantoj de la grundo kaj la industriistoj ... Necesis io ne malpli grava ol tiu magio de la proprieto por elŝiri el la interezkampulo la kromaĵon de la produkto, kiun li ne povas alie ol konsideri sia kaj kies ekskluziva estiginto li konsideras sin. La rento, aŭ, por pli bone esprimi tion, la grundproprietulo, rompis la terkulturan egoismon kaj kreis solidarecon kiujn nenia potenco, nenia divido de la grundo povintus naski ... Nun, kiam la morala efiko de la grundproprietulo estas atingita, restas plenumi la disdividon de la rento.” (II, p. 270–272)

Tiu tuta vortdraŝaĵo reduktiĝas unue al jeno: Ricardo diras ke la kromaĵo de la prezo de la terkulturaj produktoj super iliaj produktadkostoj, inkluzive la kutiman kapitalgajnon kaj kapitalinterizon, donas la mezurilon por la rento. S-ro Prudono faras tion pli bone; li intervenigas la grundproprietulon kiel *deus ex machina*, kiu elŝiras el la *interezkampulo* la tutan kromaĵon de lia produktaĵo super la produktadkostoj. Li uzas la intervenon de la grundproprietulo por

klarigi la grundproprieton, tiun de la rentisto por klarigi la renton. Li respondas al la demando per tio ke li faras la saman demandon kaj pliigas ĝin ankoraŭ per silabo.

Ni rimarkigu krome, ke, se s-ro Prudono difinas la renton per la diverseco de la fekundeco de la grundo, li donas al ĝi novan originon, ĉar la grundo, antaŭ ol esti taksita laŭ la diversaj gradoj de fekundeco, estis laŭ li „ne interŝanĝvaloro, sed komuna”. Kio do fariĝis tiu fikcio, pri la rento kiu originas el la *neceso rekonduki* la homon, kiu estis *minacata perdiĝi en la senfinecon de la malpleno, al la tero*?

Ni senigu nun la instruon de Ricardo je la providencaj, alegoriaj kaj mistikaj diroj, en kiujn s-ro Prudono tiel zorge envolvis ĝin.

La rento, en la senco de Ricardo, estas la grundproprieto en sia burĝa formo: tio signifas la feŭda proprieto, kiu submetiĝis al la kondiĉoj de la burĝa produktado.

Ni vidis, ke laŭ la instruo de Ricardo la prezo de ĉiuj objektoj estas definitive determinata de la produktadkostoj, inkluzive la industrian profiton, alivorte: de la aplikata labortempo. En la manufakturingustrio la prezo de la produkto akirita per la minimumo da laboro reguligas la prezon de ĉiuj aliaj samnaturaj varoj, kondiĉe ke oni povas senlime pliigi la plej malmultekostajn kaj plej produktivajn laborrimedojn kaj ke la libera konkurenco sekvigas merkatprezon, tio signifas, komunan prezon por ĉiuj samspecaj produktoj.

En la kampkultura industrio estas male la prezo de la produkto estigita per la plej granda kvanto de laboro kiu reguligas la prezon de ĉiuj samspecaj produktoj. Unue oni ne povas, kiel en la manufakturingustrio, laŭplaĉe pliigi la produktadinstrumentojn de sama produktivo, tio signifas la same fekundajn terenojn. Krome oni transiras, en la grado laŭ kiu la loĝantaro kreskas, al tio, prilabori grundon de malpli granda kvalito aŭ investi en la saman kampon novan kapitalon, kiu estas relative malpli produktiva ol la unue investita. Ambaŭkaze oni aplikas pli grandan kvanton da laboro por akiri relative malpli grandan produkton. Ĉar la bezono de la loĝantaro necesigas tiun pliigon de la laboro, tial la produkto de la grundo prilaborita per pli altaj kostoj trovas same bone sian necesan vendon kiel tiu prilaborita per pli malaltaj kostoj. Ĉar la konkurenco kompensas la merkatprezon, la produkto de la pli bona grundo estas same alte pagata kiel tiu de la malpli bona grundo. La kromaĵo de la prezo de la produktoj de la pli bona grundo super iliaj

produktadkostoĵ konsistigas ĝuste la renton. Se oni disponus ĉiam pri grundo aŭ terenoj de sama fekundeco, se oni, kiel en la manufakturindustrio, povus ĉiam uzi la plej malmultekostajn kaj pli produktivajn maŝinojn aŭ se la duaj kapitalinvestoj produktus same multon kiel la unuaj, tiam la prezo de la kampkulturaj produktoj estus determinata de la prezo de la fruktoj produktitaj per la plej bonaj produktadinstrumentoj, kiel ni vidis ĉe la prezo de la manufakturproduktoj. Sed ekde tiu momento ankaŭ la rento estus for.

Se la instruo de Ricardo⁷⁶ validu ĝenerale, tiam necesas ke la diversaj industribranĉoj estu malfermitaj al la kapitalo; ke forte evoluinta konkurenco inter la kapitalistoj efektivigis samecon en la profitoj; ke la farmisto estas nur industria kapitalisto kiu, se li devas investi sian kapitalon en la grundo de malpli granda kvalito⁷⁷, atendas profiton egalan al tiu kiun lia kapitalo donus en ia ajn manufakturo; ke la kampkulturo funkcias laŭ la sistemo de la grandindustrio; fine ke la grundproprietulo mem interesiĝas jam nur pri la monrezulto.

Povas okazi, kiel en Irlando, ke la rento ankoraŭ tute ne ekzistas, kvankam la farmsistemo estas plej altgrade evoluinta. Ĉar la rento estas la kromaĵo ne nur super la salajro, sed ankaŭ super la kapitalprofito, tial ĝi ne povas ekzisti en landoj kie la enspezo de la grundproprietulo estas nur simpla depreno de la salajro.

La rento do, anstataŭ fari el la mastrumanto de la grundo, la farmisto, *simplan laboriston* kaj elŝiri „al la interezkampulo la kromaĵon de la produkto kiun li ne povas alie ol konsideri sia”, starigas kontraŭ la grundproprietulo, ne la sklavon, la servutulon, la tributulon, la salajrulon, sed la industrian kapitaliston⁷⁸, kiu ekspluatas la grundon

⁷⁶<En la dediĉekzemplero estas ĉi tie la vortoj enigitaĵ: – les prémisses une fois accordées – [– post kiam la antaŭkondiĉoj estas akceptitaj –]>

⁷⁷<En la dediĉekzemplero la vortoj ... à des terrains inférieurs ... [en terenoj de malpli granda kvalito] estas korektitaj al à la terre ... [en la grundo]>

⁷⁸<En la eldono de 1847 sekvas post „...”, la industrian kapitaliston...” – anstataŭ la ĉi tie starantaj vortoj du sendependaj frazoj: La propriété foncière, une fois constituée en rente, n'a plus en sa possession que l'excédant sur les frais de production, déterminés non seulement par le salaire, mais aussi par le profit industriel. C'est donc au propriétaire foncier que la rente arrachait une partie de son revenu. [La grundproprietulo, post kiam ĝi estas konstituita kiel rento, disponas jam

pere de siaj salajruloj kaj kiu pagas nur la kromaĵon super la produktadkostoj, inkluzive de la kapitalprofito, kiel fermaĵon al la grundproprietulo. Tiel daŭris longan tempon ĝis kiam la feŭda farmisto estis anstataŭigita per la industria kapitalisto. En Germanio tiu transformiĝo komencis nur en la lasta triono de la 18-a jarcento. Nur en Anglio tiu rilato inter industria kapitalisto kaj grundposedanto estas komplete evoluinta.

Tiom longe kiom ekzistis nur la *intereskampulo* de s-ro Prudono, rento ne ekzistis. Ekde kiam rento ekzistas, la kampulo ne estas la farmisto, sed la laboristo estas la kampulo de la farmisto. La malaltigo de la laboristo, kiu ludas jam nur la rolon de simpla tagsalajrulo, de salajrulo laboranta por la industria kapitalisto, la apero de la industria kapitalisto, kiu praktikas la kampkulturon kiel ĉian alian fabrikadon, la transformado de la grundproprietulo el eta suvereno en ordinaran uzuriston: tio estas la diversaj kondiĉoj kiuj trovas sian esprimon en la rento.

La rento en la senco de Ricardo signifas la transformadon de la patriarĥa terkulturo en la industrian, la aplikadon de la industria kapitalo al la grundo, la delokadon de la burĝaro de la urboj al la kamparo. Anstataŭ *religi la homon al la naturo*, la rento ligis nur la ekspluatadon de la tero al la konkurenco. Post kiam ĝi estis konstituita kiel rento, la grundposedo estas mem *rezulto de la konkurenco*, ĉar ekde tiam ĝi dependas de la merkataloro de la kampkulturaj produktoj. Kiel rento la grundposedo estas movebla kaj fariĝas komercaĵo. La rento estas ebla nur ekde la momento en kiu la evoluo de la urba industrio kaj la socia organizo kreita de ĝi devigas la grundposedanton rigardi nur la komercan profiton, la monrezulton de siaj kampkulturaj produktoj, vidi en sia grundposedo fine nenion alian ol monmaŝinon. La rento disigis la grundposedanton tiom komplete de la grundo, de la naturo, ke li eĉ ne bezonas koni siajn terenojn, kiel ni vidas en Anglio. La farmisto siavice, la industria kapitalisto kaj la kamlaboristo, ili ne estas pli ligitaj al la grundo, kiun ili mastrumas, ol la entreprenisto kaj la laboristo en la industrio al la kotono aŭ la ŝaflano kiujn ili prilaboras. Ili sentas sin

nur pri la kromaĵo super la produktadkostoj, kiuj estas determinataj ne nur de la salajro, sed ankaŭ de la industria profito. La rento do elŝiris al la grundproprietulo parton de lia enspezo.] En la germana eldono de 1885, 1892 kaj 1895 la plibonigoj, kiujn entenis la dediĉekzemplerio, estis evidente konsideritaj.>

ligitaj al nenio alia ol al la prezo de sia mastrumado, al la monenspezo. Pro tio la lamentadoj de la reakciaj partioj, kiuj animprofunde krias sopirante la revenon de feŭdismo, de la bela pratriarĥeca vivo, de la simplaj moroj kaj grandaj virtoj de niaj antaŭuloj.

La submeto de la grundo sub la leĝojn kiuj regas ĉiujn aliajn industriojn estas kaj ĉiam estos la objekto de interesita lamentado. Tiel eblas diri ke la rento fariĝis la movforto kiu ĵetis la idilion en la moviĝon de la historio.

Ricardo, kiu premisas la burĝan produktadon kiel necesan por determinado de la rento, tamen aplikas la ideon de grundrento al la grundposedo de ĉiuj epokoj kaj ĉiuj landoj. Tio estas la eraro de ĉiuj ekonomikistoj kiuj prezentas la kondiĉojn de la burĝa produktado kiel eternajn.

S-ro Prudono transiras de la providenca celo de la rento, kiu konsistas laŭ li en la transformado de la kampulo en *respondecan laboriston*, al la egalecprincipo.

La rento estiĝas, kiel ni vidis, per la *sama prezo* de la produktoj de terenoj de *malsama fekundeco*, tiel ke hektolitro da greno, kiu kostis 10 frankojn, vendiĝas je 20 frankoj, se la produktadkosto por pli malbona grundo estas 20 frankoj.

Tiom longe, kiom la bezono devigas aĉeti ĉiujn surmerkatigitajn terkulturajn produktojn, la merkaptoprezento estas determinata de la kosto de la plej multekostaj produktoj. Tiu kompensado de la prezo, rezultanta el la konkurenco kaj ne el la malsama fekundeco de la grundo, estas do kiu havigas al la posedanto de la pli bona grundo por ĉiu hektolitro kiun lia farmisto vendas, renton de 10 frankoj.

Ni supozu ke la prezo de la greno estas determinata de la labortempo necesa por ĝia estigo, tiam la hektolitro da greno produktita sur la pli bona grundo estas tuj vendata je 10 frankoj, dum tiu produktita sur la pli malbona grundo kostas 20 frankoj. Laŭ tiu supozo, la mezuma merkaptoprezento estos 15 frankoj, dum ĝi estas laŭ la leĝo de la konkurenco 20 frankoj. Se la mezuma prezo estus 15 frankoj, tiam tute ne temus pri distribuado, nek pri egaleca nek ia alia, ĉar rento ne ekzistus. La ekzisto de rento devenas nur de tio ke la hektolitro da greno, kiu kostis al la produktisto 10 frankojn, estas vendata je 20 frankoj. S-ro Prudono supozas la egalecon de la merkaptoprezento ĉe malegalaj produktadkosto,

por atingi la egalecan distribuadon de la produkto de malegaleco.

Ni komprenas ke ekonomikistoj, kiel Mill, Cherbuliez, Hilditch kaj aliaj, postulis ke la rento estu transigita al la ŝtato pro nuligo de la impostoj. Tio estas la malkaŝa esprimo de la malamo, kiun la industria kapitalisto sentas kontraŭ la grundposedanto, kiu estas al li senutila, superflua aĵo en la radaro de la burĝa produktado.

Sed pagigi la hektolitron da greno unue per 20 frankoj, por poste fari ĝeneralan distribuadon de la 10 frankoj kiujn oni tro prenis de la konsumantoj, tio estas sufiĉa kialo por la *socia genio* sekvi *sian zigzagan vojon melankolie* kaj enrompi sian kapon ĉe ia *angulo*.

La rento fariĝas sub la manoj de s-ro Prudono

„giganta katastro, kontraŭdire estigita inter farmisto kaj grundposedanto ... en pli alta intereso, kaj kies fina rezulto estos la kompensado de la terposedo inter la ekspluatantoj de la grundo kaj la industriisto.” [II, p. 271]

Nur ene de la kondiĉoj de la ekzistanta socio, ia ajn katastro starigita per la rento havos praktikan valoron.

Ni pruvis ke la farmaĵo pagata de la farmisto al la posedanto esprimas preskaŭ precize la renton nur en la landoj kie komerco kaj industrio estas plej evoluintaj. Ofte tiu farmaĵo entenas krome la interezon kiu estas pagata al la posedanto por la kapitalo investita en la terenon. La situo de la terenoj, la proksimeco de urboj kaj ankoraŭ multaj aliaj cirkonstancoj efikas sur la alteco de la rento. Jam tiuj kialoj sufiĉus por prezenti la malprecizecon de katastro bazita sur la rento.

Aliflanke la rento ne povas servi kiel konstanta mezurilo por la grado de fekundeco de tereno, ĉar la moderna apliko de ĥemio povas ĉiumomente ŝanĝi la naturon de la tereno kaj ĉar ĝuste hodiaŭ la geologiaj konoj komencas revolucii la tutan antaŭan taksadon de la relativa fekundeco: Antaŭ apenaŭ dudek jaroj, oni kulturis en la orientaj graflandoj de Anglio vastajn, ĝis tiam nekultivitajn regionojn, ĉar oni nur lastdate lernis aprezi la ligitcon inter la humo kaj la konsisto de la subgrundo.

Tiel ni vidas kiel la historio, anstataŭ liveri en la rento pretan katastro, konstante ŝanĝas, komplete revolucias la ekzistantan katastro.

Fine la fekundeco ne estas nur tiom natura eco kiel oni povus kredi: ĝi estas dense ligita kun la respektivaj sociaj kondiĉoj. Parcelo povas esti tre fekunda por grenkultivado, kaj tamen la merkaptoprezon povas decidi la kulturiston transformi ĝin en artefaritajn herbejojn kaj tiel fari ĝin malpli fekunda.

S-ro Prudono inventis sian katastroon, kiu valoras eĉ ne tiom kiom la ordinara katastro, por atribui realecon al la *providence egaleca celo*.

„La rento”, daŭrigas s-ro Prudono, „estas la interezo pagata por kapitalo kiu neniam pereas, nome la grundo. Kaj kiel tiu kapitalo ne kapablas je ia ajn pligrandiĝo, koncerne la materion, sed nur je senfina plibonigo en la uzado, tial okazas ke, dum la interezo aŭ la profito de prunto (mutuum) pro la abundo de kapitaloj konstante strebas fali, la rento sekve al la perfektigo de la industrio kaj de la de ĝi kaŭzita plibonigo de la grundmastrumado konstante strebas altiĝi ... Tio estas, laŭ sia esenco, la rento.” (Vol. II, p. 265)

Ĉi tie s-ro Prudono vidas en la rento ĉiujn apartaĵojn de la interezo, escepte ke ĝi devenas de kapitalo de speciala speco. Tiu kapitalo estas la tero, eterna kapitalo, „kiu ne kapablas je ia ajn pligrandiĝo, koncerne la materion, sed nur je senfina plibonigo en la uzado”. En la progresanta evoluo de la civilizacio la interezo havas konstantan tendencon fali, dum la rento strebas konstante altiĝi. La interezo falas pro la abundeco de kapitaloj; la rento altiĝas kun la perfektigo de la tekniko, kiu sekvigas ĉiam pli bonan ekspluatadon de la grundo.

Tio estas en sia esenco la opinio de s-ro Prudono.

Ni esploru unue, kiom ĝustas ke la rento estas la interezo de kapitalo.

Por la grundposedanto mem la rento reprezentas la interezon de la kapitalo kiun kostis al li la parcelo aŭ kiun li ricevus ĉe ĝia vendo. Sed ĉe aĉeto aŭ vendo de la parcelo li aĉetas aŭ vendas nur la renton. La prezo kiun li pagas por akiri la renton, reguliĝas laŭ la ĝenerala interezkvoto kaj havas nenion por fari kun la naturo de la rento kiel tia. La interezo de la en parceloj investitaj kapitaloj estas ĝenerale malpli alta ol la interezo de kapitaloj investitaj en komerco aŭ industrio. Tiel por tiu, kiu ne distingas la interezon kiun la parcelo prezentas por la posedanto disde la rento mem, la interezo por la en la grundo investita kapitalo falas eĉ pli ol la interezo de la aliaj kapitaloj. Sed temas ne pri la aĉet- aŭ vendo-prezo, pri la merkatovaloro de la rento, pri la kapita-

ligita rento, sed pri la rento mem.

La farmaĵo povas enteni krom la veran renton ankaŭ la interezon por la kapitalo investita en la grundon. Tiam la grundposedanto ricevas tiun parton de la farmaĵo ne kiel grundposedanto, sed kiel kapitalisto; tio tamen ne estas la vera rento pri kiu ni devas paroli.

Tiom longe, kiom la grundo ne estas ekspluatata kiel produktadrimedo, tiom longe ĝi ne estas kapitalo. La grundkapitaloj same bone pliigeblas kiel la aliaj produktadrimedoj. Oni aldonas, por paroli kun s-ro Prudono, neniom al la materio, sed oni pliigas la parcelojn kiuj servas kiel produktadrimedoj. Oni bezonas nur investi pliajn kapitalojn en parcelojn jam transformitajn en produktadrimedojn, por pliigi la grundkapitalon, sen aldoni ion al la grundmaterialo, tio signifas la etendiĝo de la grundo. La grundmaterialo de s-ro Prudono estas la grundo en sia limiteco. Koncerne la eternecon kiun li atribuas al la grundo, ni ne kontraŭas ke ĝi havas tiun econ kiel materio. La grundkapitalo estas same malmulte eterna kiel ĉiu alia kapitalo.

Oro kaj arĝento, kiu rezultas interezon, estas same daŭremaj kaj eternaj kiel la grundo. Kiam la prezo de oro kaj arĝento falas, dum tiu de la grundo altiĝas, tio certe ne estas kaŭzita de ĝia pli aŭ malpli eterna naturo.

La grundkapitalo estas fiksa kapitalo, sed la fiksa kapitalo eluziĝas same kiel la cirkulantaj kapitaloj. La plibonigoj de la grundo bezonas reproduktadon kaj konservadon. Ili daŭras nur certan tempon kiel ĉiuj aliaj plibonigoj kiuj servas por transformi la naturmaterialon en produktadrimedojn. Se la grundkapitalo estus eterna, certaj regionoj prezentus hodiaŭ tute alian aspekton. La roma Campagna, Sicilio, Palestino montriĝus tute en la brilo de sia iama abundeco.

Ekzistas eĉ kazoj kie la grundkapitalo povas malaperi, eĉ se la grund-plibonigoj restas.

Unue tio okazas ĉiam kiam la vera rento malaperas pro la konkurenco de novaj pli fekundaj⁷⁹ terposedaĵoj; krome la plibonigoj, kiuj en certa epoko havas valoron, perdas tiun ekde la momento en kiu ili fariĝis ĝeneralaj pro la evoluo de la agromio.

La reprezentanto de la grundkapitalo ne estas la grundposedanto, sed

⁷⁹<(1847) de ... plus fertiles [fekundaj]; (1885, 1892 kaj 1895) pli fekundaj>

la farmisto. La enspezo, kiun la grundo donas kiel kapitalo, estas la interezo kaj la profito de la entreprenisto, sed ne la rento. Ekzistas terposedaĵoj kiuj donas tiun interezon kaj profiton, sed ne donas renton.

Resume la grundo, laŭ tio ke ĝi donas interezon, estas grundkapitalo, kaj kiel grundkapitalo ĝi ne donas renton, ne konsistigas la grundposedon. La rento rezultas el la sociaj rilatoj, sub kiuj la kampkulturado okazas. Ĝi ne povas esti sekvo de la pli aŭ malpli konkreta, pli aŭ malpli daŭrema naturo de la grundo. La rento devenas de la socio kaj ne de la grundo.

Laŭ s-ro Prudono la „plibonigo de la mastrumado de la grundo” – la sekvo „de la perfektigo de la tekniko” – estas la kaŭzo de la konstanta kreskado de la rento. Tiu plibonigo kelkfoje male malaltigas ĝin.

En kio konsistas ĝenerale ĉia plibonigo, en la kampkulturo aŭ en la industrio? En tio, produkti per la sama laboro pli, per malpli da laboro same multe aŭ eĉ pli. Danke al tiuj plibonigoj la farmisto ne bezonas apliki pli grandan kvanton da laboro por relative malgranda produkto. Li ne bezonas rifuĝi al pli malbona grundo, kaj la kapitalsumoj iom post iom investitaj en la saman kampon restas same produktivaj. Do, tiuj plibonigoj, anstataŭ, kiel diras s-ro Prudono, konstante kreskigi la renton, estas, male, same multaj portempaj malhelpoj de ĝia kresko.

La anglaj grundposedantoj de la 17-a jarcento rimarkis tion tiel bone ke ili defendis sin kontraŭ ĉia progreso en la kampkulturo, pro timo vidi sian enspezon malgrandigita. (Vidu Petty, angla ekonomikisto el la tempo de Karlo la 2-a.)

§ 5 Strikoj kaj laboristkoalicioj

„Ĉia kresko de la salajroj povas havi nenian alian efikon ol kreskon de la prezoj de greno, de vino ktp, la efikon de ĝenerala prezaltiĝo. Ĉar kio estas la salajro? Ĝi estas la kostprezo de la greno ktp; ĝi estas la plena prezo de ĉia aĵo. Ni iru ankoraŭ pli antaŭen. La salajro estas la proporcieco de la elementoj kiuj konsistigas la riĉaĵon kaj kiuj estas ĉiutage reproduktive konsumataj de la amaso de laboristoj. Nu, duobligi la salajron ... signifas do, atribui al ĉiu produktanto pli grandan parton ol lian produkton, kio estas kontraŭdiro; kaj se la altigo etendiĝas nur sur malgranda nombro da industrioj, tiam tio signifas kaŭzi ĝeneralan perturban en la interŝanĝo, per unu vorto, *prezaltiĝegon* ... Ne eblas, deklaras mi, ke laborhaltigoj kiuj sekvigas

la salajroaltigojn, ne kondukas al *ĝenerala prezaltiĝo*: Tio estas same certa, kiel duoble du estas kvar.” (Prudono, Vol. I, p. 110 kaj 110)

Ni kontestas ĉiujn ĉi asertojn, escepte tiun ke duoble du estas kvar.

Unue ne ekzistas *ĝenerala prezaltiĝo*. Se la prezo de ĉiuj aĵoj kreskas samtempe kun la salajroj duoble, tiam tio ne estas ŝanĝo en la prezoj, sed ŝanĝo en la esprimoj.

Krome, ĝenerala altiĝo de la salajroj povas neniam alkonduki pli aŭ malpli ĝeneralan prezaltiĝon de la varoj. Efektive, se ĉiuj industrioj dungas la saman kvanton da laboristoj en proporcio al la fiksa kapitalo (al la laboriloj kiujn ili uzas), tiam ĝenerala altiĝo de la salajroj kaŭzus ĝeneralan malaltiĝon de la profitoj, kaj la merkaptoprezon de la varoj ne suferus ŝanĝon.

Sed ĉar la proporcio de manlaboro al la fiksa kapitalo en la diversaj industrioj estas malsama, ĉiuj industribranĉoj, kiuj aplikas relative pli grandan fiksan kapitalon kaj malpli da laboristoj, estos pli aŭ malpli frue devigataj malaltigi la prezon de siaj varoj. Male, se la prezo de ilia varo ne falas, ilia profito leviĝas super la mezuman profitkvoton. La maŝinoj ne estas salajruloj. La ĝenerala kresko de la salajroj do trafos tiujn industriojn malpli, kiuj aplikas, kompare kun aliaj, pli da maŝinoj ol da laboristoj. Sed ĉar la konkurenco havas ĉiam la tendencon kompensi la profitojn, profitoj kiuj leviĝas super la mezuman kvoton povas esti nur provizoraj. Tiel, ĝenerala kresko de la salajroj, kun la escepto de kelkaj fluktuaĵoj, sekvigas, anstataŭ laŭ s-ro Prudono ĝeneralan prezaltiĝon, pli ĝuste falon de la merkaptoprezoj de la varoj kiuj estas produktataj precipe de maŝinoj.

La kresko kaj malkresko de la profito kaj de la salajroj esprimas nur la proporcion en kiu kapitalistoj kaj laboristoj partoprenas en la produkto de la labortago, sen influŝi, en la plej multaj kazoj, la prezon de la produkto. Sed ke „laborhaltigoj kiuj sekvigas salajroaltigon, kondukas al ĝenerala prezaltiĝo, eĉ al prezaltiĝego” [I, p. 111] – estas ideoj kiuj povas fondi nur en la cerbo de nekomprenata poeto.

En Anglio la strikoj estis regule instigo al invento kaj apliko de novaj maŝinoj. La maŝinoj estis, oni rajtas aserti tion, la armilo kiun la kapitalistoj aplikas por disbati la ribelon de tiu laboro kiu bezonas lertecon. La *self-acting mule*, la plej granda invento de la moderna

industrio, cedigis la ribelantajn ŝpinistojn. Se sindikatoj⁸⁰ kaj strikoj havus nenian alian efikon ol tiun veki meĥanikajn novigojn, ili jam per tio gigante influintus la evoluon de la industrio.

„Mi trovas”, daŭrigas s-ro Prudono, „en artikolo publikigita de s-ro Léon Faucher ... en septembro 1845 ke la anglaj laboristoj de kelke da tempo okupiĝas malpli pri *koalicioj* – certe progreso, pro kiu oni povas nur gratuli ilin –, ke tamen tiu pliboniĝo en la moralo de la laboristoj devenas precipe de ilia ekonomia klereco. Ne de la fabrikisto, elkriis dum amaskunveno en Bolton ŝpinejlaboristo, dependas la salajroj; en la tempoj de malbona aferirado la majstroj estas kvazaŭ nur la vipo kiun la neceso uzas, kaj ĉu ili volas aŭ ne, ili devas vipi. La regulanta principo estas la rilato de propono kaj postulo, kaj la majstroj ne posedas la povon ... Respekton!”⁸¹, elkrias s-ro Prudono, „jen bone edukitaj laboristoj, modelaj laboristoj” ktp ktp ktp. „Tiu mizero mankis ankoraŭ al Anglio: Ĝi ne transpaŝos la Kanalon”⁸².” (Prudono, vol. I, p. 261 kaj 262)

El ĉiuj urboj de Anglio, Bolton estas tiu kie la radikalismo estas plej evoluinta. La laboristoj de Bolton estas konataj kiel tiom revoluciaj kiom nur iel eble. Dum la granda agitado kontraŭ la grendoganaĵoj la anglaj fabrikistoj kredis povi alfronti la grundposedantojn per tio ke ili uzis la laboristojn. Sed la interesoj de la laboristoj estis ne malpli kontraŭaj al la fabrikistoj ol la interesoj de la fabrikistoj al tiuj de la grundposedantoj, kaj tiel la fabrikistoj devis kompreneble ĉiam malvenki en la laboristaj amaskunvenoj. Kion ili faris do? Por savi la ŝajnon, ili organizis amaskunvenojn, kiuj konsistis grandparte el laborejgvidantoj, el la malgranda nombro da laboristoj fidelaj al ili kaj el la veraj *amikoj de la komerco* mem. Se tiam la realaj laboristoj provis partopreni en tio, kiel en Bolton kaj Manĉestro, por protesti kontraŭ tiuj artefaritaj manifestacioj, oni malpermesis al ili la eniron kun la deklaro ke temas pri *ticket-meeting*. Oni komprenas per tio kunvenojn ĉe kiuj nur personoj kun enirkartoj estas allasitaj. Tamen la murafiŝoj anoncis publikajn kunvenojn. Ĉiufoje kiam tia kunveno okazis, la fabrikistaj gazetoj faris pompan, detalan raporton pri la paroladoj faritaj dum ĝi. Kompreneble estis la laborejgvidantoj kiuj faris ilin. La londonaj gazetoj reproduktis ilin laŭvorte. Al s-ro Prudono okazas la malbonŝanco opinii

⁸⁰<(1847) coalitions [koalicioj]>

⁸¹Originale: 'A la bonne heure' <Respekton>.

⁸²Temas pri la Manika Kanalo, la markolo inter Anglujo kaj Francujo. -vl

la laborejgvidantojn ordinaraj laboristoj, kaj li eksplicite malpermesas al ili transpaŝi la Kanalon.

Se en la jaroj 1844 kaj 1845 la strikoj altiris malpli la rigardon ol antaŭe, tio okazis pro tio ke tiuj estis la unuaj jaroj de prospero por la angla industrio depost 1837. Tamen eĉ ne unu el la *sindikatoj* malfondiĝis.

Ni aŭdu nun la laborejgvidantojn de Bolton. Laŭ ili la fabrikistoj ne estas la mastroj de la salajro, ĉar ili ne estas mastroj de la prezo de la produktoj, kaj ili ne estas mastroj de la prezo de la produktoj, ĉar ili ne estas mastroj de la mondmmerkato. Pro tio, ili komprenigas, oni ne faru koaliciojn kiuj havas la celon trudi al la mastroj⁸³ salajroaltigon. S-ro Prudono siavice malpermesas koaliciojn al ili pro timo ke koalicio sekvigus kreskon de la salajroj, kiu sekvigus ĝeneralan prezaltiĝegon. Ni ne bezonas emfazi ke en unu punkto la laborejgvidantoj kaj s-ro Prudono estas en perfekta harmonio: en tio, ke kresko de la salajroj egalas al kresko de la produkt[prezoj]⁸⁴.

Sed ĉu la timo de prezaltiĝego estas la vera kaŭzo de la malamo de s-ro Prudono? Ne. Li koleretas kontraŭ la laborejgvidantoj de Bolton nur ĉar ili determinas la valoron per *propono kaj postulo* kaj fajfas pri la *konstituita valoro*, pri la valoro atingintan sian konstituiĝon, pri la konstituiĝo de la valoro, kiu entenas en si la *konstantan interŝanĝebilon* kaj ĉiujn aliajn *proporciecojn de la rilatoj* kaj *rilatojn de la porporciecoj*, kun krome la providenco kiel aldono.

„La striko de la laboristoj estas kontraŭleĝa, kaj estas ne nur la punleĝaro kiu disponas tion, sed ankaŭ la ekonomia sistemo, la neceso de la ekzistanta ordo ... Ke ĉiu unuopa laboristo havas liberan disponon pri sia persono kaj sia brako, povas esti tolerata; sed ke la laboristoj impertinentas perforti la monopolon pere de koalicioj, tion la socio ne povas toleri.” (Vol. I, p. 334 kaj 335)

S-ro Prudono volas prezenti al ni artikolon de la punleĝaro kiel ĝeneralan kaj necesan rezulton de la kondiĉoj de la burĝa produktado.

En Anglio la koalicioj estas permesataj per parlamenta akto, kaj estis la ekonomia sistemo kiu devigis la parlamenton anonci tiun permeson

⁸³<(1847) aux maîtres [al la majstroj], ĉi tie en la senco de: fabrikestroj>

„Maître” signifas kaj majstro kaj mastro. -vl

⁸⁴Laŭvorte: „kresko de la produktoj”. -vl

leĝe. Kiam en la jaro 1825 la parlamento sub la ministro Huskisson devis ŝanĝi la leĝaron, por pli kaj pli harmoniigi ĝin kun la stato de la aferoj devenintaj el la libera konkurenco, ĝi devis nepre nuligi ĉiujn leĝojn kiuj malpermesis la koaliciojn de la laboristoj. Ju pli la moderna industrio kaj la konkurenco evoluas, des pli da elementoj aperas kiuj estigas kaj apogas koaliciojn; ekde kiam la koalicioj fariĝis ekonomia fakto, ampleksiĝante ĉiutage, jam ne povas daŭri longe ĝis kiam ili fariĝas ankaŭ leĝa fakto.

Do, la artikolo de la franca punleĝaro⁸⁵ pravas, maksimume, ke la moderna industrio kaj la konkurenco sub la Konstituanto kaj la imperio ankoraŭ ne estis sufiĉe evoluintaj.

La ekonomikistoj kaj la socialistoj⁸⁶ interkonsentas pri unu sola punkto: kondamni la koaliciojn. Sed ili pravigas sian kondamnon diverse.

La ekonomikistoj diras al la laboristoj: Ne koaliciu. Per koaliciado vi malhelpas la regulan iradon de la industrio, malebligas al la fabrikistoj plenumi la mendojn, perturbas la komercon kaj rapidigas la enpenetradon de la maŝinoj kiuj superfluigas vian laboron kaj devigas vin akcepti ankoraŭ pli malaltan salajron. Cetere via faro estas vana; via salajro estas ĉiam determinata de la proporcio de la serĉataj manoj al la proponataj manoj. Kaj estas same ridinda kiel danĝera faro, ribeli kontraŭ la eterna leĝoj de la politika ekonomio.

La socialistoj diras al la laboristoj: Ne koaliciu, ĉar kion vi fine gajnos ĉe tio? Ĉu salajroaltigon? La ekonomikistoj pruvos al vi ĝis evidenteco ke al gajno de malmultaj pfenigoj, kiujn vi en la plej bona okazo povas atingi por mallonga tempo, sekvos daŭra malsukceso. Lertaj oratoroj pruvos al vi ke vi bezonas jarojn por reatingi per salajroaltigo nur la kostojn kiujn vi devis elspezi por organizado kaj konservado de la koalicioj. Ni, en nia eco de socialistoj, diras al vi, ke, sendepende de la mondemandado, vi tamen estos la laboristoj, kiel la mastroj restos ĉiam la mastroj, poste kiel antaŭe. Pro tio, neniajn koaliciojn, nenian politikon; ĉar koalicii, ĉu tio ne signifas fari politikon?

⁸⁵Laŭvorte: „des Code pénal <(franca) punleĝaro>.

⁸⁶Tio signifas: la tiamaj, la Fourier-istoj en Francio, la Owen-istoj en Anglio. *F. E.*

La ekonomikistoj volas ke la laboristoj restu en la socio tia kia ĝi formiĝis kaj kia ili desegnis kaj sigelis ĝin en siaj manlibroj.

La socialistoj volas ke ili ne okupiĝu pri la malnova socio, por des pli bone eniri la novan socion, kiun ili ellaboris por ili kun tiom da antaŭzorgo.

Malgraŭ ambaŭ, malgraŭ la manlibroj kaj utopioj, la laboristaj koalicioj neniun momenton ĉesis evolui kaj kreski kun la evoluo kaj la kresko de la moderna industrio. Tio estas hodiaŭ tiom la kazo ke la evolugrado de la koalicioj en iu lando signas precize la rangon kiun ĝi havas en la hierarkio de la mondmerkato. Anglio, kie la industrio estas plej evoluinta, posedas la plej ampleksajn kaj plej bone organizitajn koaliciojn.

En Anglio oni ne limiĝis al partaj koalicioj, kiuj havis nenian alian celon ol momentan strikon kaj kun ĝi malaperis. Oni kreis konstantajn koaliciojn, sindikatojn⁸⁷, kiuj servas al la laboristoj en iliaj bataloj kun la entreprenistoj kiel defendilo. Kaj nun ĉiuj ĉi lokaj sindikatoj trovas kolektiĝan punkton en la *National Association of United Trades*, kies centra komitato sidas en Londono kaj nombras jam 80.000 membrojn. Tiuj strikoj, koalicioj kaj sindikatoj naskiĝis samtempe kun la politikaj bataloj de la laboristoj, kiuj nun sub la nomo de ĉartistoj formas grandan politikan partion.

La unuaj provoj de la laboristoj *asociiĝi* inter si alprenas ĉiam la formon de koalicioj.

La grandindustrio kunvenigas amason da homoj inter si ne konataj en unu lokon. La konkurenco fendas ilin laŭ iliaj interesoj; sed la konservado de la salajro, tiu komuna intereso kontraŭ ilia mastro⁸⁸, unuigas ilin en unu komuna penso de rezistado – *koalicio*. Tiel la koalicio havas ĉiam duoblan celon, tiun nuligi la konkurencon inter la laboristoj, por povi fari al la kapitalisto ĝeneralan konkurencon. Kvankam la unua celo de la rezistado estis nur la konservado de la salajroj, la komence izolitaj koalicioj formiĝas en la mezuro laŭ kiu la kapitalistoj siavice grupiĝas por subpremado, kaj fronte al la ĉiam

⁸⁷Laŭvorte: *trades unions* <sindikatoj>, en la sekvo: sindikatoj. -vl

⁸⁸Originale: Meister (mastro), verŝajne erare elfrancigita de *maître*, kiu signifas ankaŭ kaj speciale ĉi tie: mastro. -vl

unuiginta kapitalo la konservado de la asocioj fariĝas por ili pli necesa ol tiu de la salajro. Tio veras tiom, ke la anglaj ekonomikistoj estas tute mirigitaj vidi kiel la laboristoj ofertas grandan parton de sia salajro favore al asocioj, kiuj en la okuloj de la ekonomikistoj estis starigitaj nur favore al la salajro. En tiu batalo – vera interna milito – ĉiuj elementoj unuiĝas kaj disvolviĝas por venonta batalo. Alveninte ĉe tiu punkto, la koalicio alprenas politikan karakteron.

La ekonomiaj kondiĉoj unue transformis la amason de la loĝantaro en laboristojn. La potenco de la kapitalo kreis por tiu amaso komunan situacion, komunajn interesojn. Tiel tiu amaso estas jam klaso fronte al la kapitalo, sed ankoraŭ ne por si mem. En la batalo, kiun ni markis nur en kelkaj fazoj, tiu amaso spertas sian kunecon, konstituas sin kiel klaso por si mem. La interesoj, kiujn ĝi defendas, fariĝas klasintereso. Sed la batalo de klaso kontraŭ klaso estas politika batalo.

Koncerne la burĝaron ni devas distingi du fazojn: tiun, dum kiu ĝi konstituis sin kiel klaso sub regado de la feŭdismo kaj de la absoluta monarĥio, kaj tiun, kie ĝi, jam konstituita kiel klaso, renversis la feŭdan potencon kaj la monarĥion, por aliformi la socion al burĝa socio. La unua el tiuj fazoj estis la pli longa kaj postulis la pli grandajn klopodojn. Ankaŭ la burĝaro komencis per partaj koalicioj kontraŭ la feŭdaj sinjoroj.

Oni faris multajn esplorojn por laŭspuri la diversajn historiajn fazojn kiujn la burĝaro trairis de la urba komunumo ĝis sia konstituiĝo kiel klaso.

Sed se temas pri tio, precize raporti pri la strikoj, koalicioj kaj la aliaj formoj en kiuj la proletoj antaŭ niaj okuloj plenumas sian organiziĝon kiel klaso, iuj estas kaptitaj de vera timo, dum aliaj montras *transcendan* malestimon.

Subpremata klaso estas la vivkondiĉo de ĉiu socio bazita sur klaskontraŭeco. La liberigo de la subpremata klaso inkludas do necese la kreadon de nova socio. Se la subpremata klaso devas povi liberigi sin, tiam necesas ke oni atingis ŝtupon sur kiu la jam akiritaj produktadfortoj kaj la validaj sociaj institucioj jam ne povas ekzisti unu apud la alia. El ĉiuj produktadinstrumentoj la plej granda produktadforto estas la revolucia klaso mem. La organiziĝo de la revoluciaj elementoj kiel klaso antaŭkondiĉas la pretan ekziston de ĉiuj produktadfortoj kiuj entute povis disvolviĝi en la sino de la malnova socio.

Ĉu tio signifas, ke post la renverso de la malnova socio ekzistos nova klasregado kiu pintas en nova politika potenco? Ne.

La kondiĉo de la liberiĝo de la laboranta klaso estas la forigo de ĉia klaso, kiel la kondiĉo de la liberiĝo de la tria ordo, de la burĝa ordo, estis la forigo de ĉiuj ordoj⁸⁹.

La laboranta klaso dum sia evoluo anstataŭigos la malnovan burĝan socion per asocio, kiu ekskludas la klasojn kaj ilian kontraŭdiron, kaj jam ne ekzistos vera politika potenco, ĉar ĝuste la politika potenco estas la oficiala esprimo de la klasintereso ene de la burĝa socio.

Intertempe la kontraŭdiro inter proletaro kaj burĝaro estas batalo de klaso kontraŭ klaso, batalo kiu, atinginte sian plej altan esprimon, signifas totalan revolucion. Cetere ĉu miri ke socio bazita sur klaskontraŭdiro kondukas al la brutala *kontraŭdiro*, al la kolizio homo kontraŭ homo kiel lasta solvo?

Oni ne diru ke la socia moviĝo ekskludas la politikan. Ne ekzistas politika moviĝo kiu ne estus samtempe ankaŭ politika.

Nur ĉe ordo de la aferoj, en kiu ne ekzistas klasoj nek klaskontraŭdiro, la sociaj evoluoj ĉesos esti politikaj revolucioj. Ĝis tiam, antaŭ ĉia ĝenerala novformiĝo de la socio la lasta vorto de la socia scienco ĉiam tekstos:

„Batalo aŭ morto; sanga milito aŭ la nenio.
Tiel senkompate stariĝas la demando.”

George Sand

⁸⁹Ordoj ĉi tie en la historia senco de la ordoj de la feŭda ŝtato, ordoj kun difinitaj kaj limigitaj privilegioj. La revolucio de la burĝaro forigis la ordojn kune kun iliaj privilegioj. La burĝa socio konas jam nur *klasojn*. Estis do ja kontraŭdira al la historio se oni nomis la proletaron „kvara ordo”. *F. E.*

Karlo Markso: Pri P. J. Prudono [Letero al J. B. v. Schweitzer]

Londono, la 24-an de januaro 1865

Estimata Sinjoro!

Mi ricevis hieraŭ leteron, en kiu vi petis de mi detalan juĝadon pri Prudono. Tempomanko ne permesas al mi kontentigi vian deziron. Krome mi disponas ĉi tie pri neniuj el liaj skribaĵoj. Sed por montri al vi mian bonan volon, mi rapide surpaperigas mallongan skizon. Vi povas poste plibonigi, aldoni, ellasi, mallonge: fari per ĝi tion kio ŝajnas al vi bona.

Mi ne memoras la unuajn provojn de Prudono. Lia lerneja laboraĵo pri la „*Langue universelle*” [„*Universala lingvo*”] montras, kiom senĝene li kuraĝis aliri problemojn por kies solvo mankis al li ankoraŭ la unuaj bazaj konoj.

Lia unua verko „*Qu'est-ce que la propriété?*” [„Kio estas la proprieto?”] estas nepre lia plej bona verko. Ĝi estas epokfara, se ne per nova enhavo, tamen ja per la nova kaj aŭdaca maniero diri ion malnovan. En la verkoj de la francaj socialistoj kaj komunistoj, kiujn li konis, la „*propriété*” estis kompreneble ne nur diverse kritikata, sed ankaŭ utopie „*kompensita*”. Prudono rilatas en tiu verko al Saint-Simon kaj Fourier proksimume kiel Fojerbaĥo al Hegelo. Kompare kun Hegelo, Fojerbaĥo estas ja malriĉa. Tamen li estis epokfara *post* Hegelo, ĉar li *emfazis* certajn punktojn malagrablajn por la kristana konscio kaj gravaj por la progreso, kiujn Hegelo lasis en mistika duonlumo.

Se mi rajtas esprimi min tiel, en tiu verko regas ankoraŭ la forta muskolaro de la prudona stilo. Kaj mi konsideras ĝian stilon ĝia ĉefa merito. Oni vidas ke eĉ tie, kie li reproduktas nur ion malnovan, Prudono trovas memstare; ke tio, kion li diras, estis al li mem nova kaj

konsiderata nova. Provoka spitemo, kiu tuŝas la ekonomian „plejsanktaĵon”, sprita paradokseco, per kiu li primokas la ordinaran burĝomenson, disŝira juĝo, amara ironio, de tempo al tempo tralumanta profunda kaj vera sento de indigno pri la fieco de la ekzistantajo, revolucia seriozeco - per ĉio ĉi, „*Qu'est-ce que la propriété?*” elektumis kaj donis grandan impulson ĉe sia unua apero. En strikte scienca historio de la politika ekonomio tiu verko estus apenaŭ menciinda. Sed tiaj sensaciaj skribaĵoj ludas en la sciencoj same bonan rolon kiel en la romanliteraturo. Oni prenu ekz-e la verkon de *Malthus* pri „*Population*”. En sia unua eldono ĝi estas nenio ol „*sensational pamphlet*”, krome *plagiato* de komenco ĝis fino. Kaj tamen, kiom da impeto donis tiu *Paskvilo pri la homa gento*!

Se mi havus antaŭ mi la verkon de Prudono, tiam facile pruveblus lia *unua maniero*. En la paragrafoj kiujn li mem konsideris la plej gravaj, li imitas la traktadon de *Kanto* pri la *antinomioj* - tiu estis la sola germana filozofo kiun li tiam konis el tradukoj - li postlasas la fortan impreson ke li, kiel *Kanto*, konsideras la solvon de la antinomioj kiel ion kio troviĝas „*transe*” de la homa kompreno, t.e. pri kio lia propra kompreno restas neklara.

Sed malgraŭ ĉia ŝajna ĉielsturmado oni trovas jam en „*Qu'est-ce que la propriété?*” la kontraŭdiron ke Prudono unuflanke kritikis la socion el la starpunkto kaj per la okuloj de franca parcelkulturisto (poste etburĝo), aliflanke per la mezurilo kiun li heredis de la socialistoj.

La mankhava flanko de la verko aludiĝis jam en ĝia titolo. La demando estis tiom malĝuste metita ke ĝi ne ĝuste respondeblis. La antikvaj „*proprietrilatoj*” estis transiĝintaj en la *feŭdajn*, la feŭdajn en la „*burĝajn*”. Tiel la historio mem plenumis sian kritikon pri la estintaj *proprietrilatoj*. Tio, pri kio vere temis por Prudono, estis la ekzistanta *modern-burĝa proprieto*. La demando, kio estas tiu, respondeblis nur per kritika analizo de la „*politika ekonomio*”, kiu entenus la tutaĵon de tiuj *proprietrilatoj*, ne en sia *jura* esprimo kiel *volrilatoj*, sed en sia reala formo, t.e. kiel produktadrilatoj. Sed per tio ke Prudono interplektis la tutaĵon de tiuj ekonomiaj rilatoj en la ĝeneralan juran ideon „la proprieto”, „la propriété”, li ne povis iri trans la respondo kiun donis *Brissot* per la samaj vortoj en simila verko jam antaŭ 1789: „*La propriété c'est le vol*” [„*Proprieto estas ŝtelo*”].

En la plej bona okazo tio kondukas nur al tio, ke la burĝaj-juraj ideoj

de „ŝtelo” trafas ankaŭ la propran „*honestan*” akiron de la burĝo. Aliflanke Prudono implikiĝis, ĉar la „ŝtelo” kiel perforta rompo de proprieto *premis la proprieton*, en diversaj fantaziaĵoj malklaraj al li mem pri la *vera burĝa proprieto*.

Dum mia restado en Parizo, 1844, mi persone ekrilatis kun Prudono. Mi mencias tion ĉi tie, ĉar mi certgrade kunkulpas lian „*sophistication*” kiel la angloj nomas la falsadon de komerca artiklo. Dum longaj, ofte tranoktaj debatoj mi infektis lin je lia granda malutilo per hegelismo, kiun li ja ne povis bone studi pro lia nerego de la germana lingvo. Tio, kion mi komencis, daŭrigis post mia elpelo el Parizo s-ro *Karl Grün*. Tiu, kiel instruisto pri germana filozofio havis ankoraŭ la avantaĝon antaŭ mi, ke li mem nenion komprenis pri tio.

Mallonge antaŭ apero de lia dua grava verko „*Philosophie de la misère* ktp”, Prudono mem anoncis tion al mi en tre detala letero, en iu troviĝas i.a. la vortoj: „*J'attends votre férule critique.*” [„*Mi atendas vian severan kritikon.*”] Tiu tamen trafis lin baldaŭ en maniero (en mia verko „*Misère de la philosophie* etc.”, Parizo 1847), kiu ĉesigis nian amikecon por ĉiam.

El la ĉi tie dirito vi vidas ke la „*Philosophie de la misère ou Système des contradictions économiques*” de Prudono envere nur entenis la respondon al la demando: „*Qu'est-ce que la propriété?*” Li estis efektive komencinta siajn ekonomiajn studojn nur post apero de tiu verko; li estis malkovrinta ke la demando starigita de li ne respondeblis per *atakparolado*, sed nur per *analizo* de la moderna „*politika ekonomio*”. Li samtempe provis dialektike prezenti la *sistemon* de la ekonomiaj kategorioj. Li volis anstataŭigi la nesolveblajn „*antinomiojn*” de *Kanto* per la *Hegela „kontraŭdiro”* kiel disvolvadrivedo. Por prijuĝo de lia duvoluma dikventra verko mi devas referenci mian kontraŭverkon. Mi montras en tiu i.a. kiom malmulte li penetris en la sekreton de la scienca dialektiko; kiel li aliflanke dividas la iluziojn de la spekulativa filozofio, per tio ke li, *anstataŭ kompreni la ekonomiajn kategoriojn kiel teoriajn esprimojn de historiaj produktadrilatoj kongruaj kun certa evoluŝtupo de la materia produktado*, disfantazias ilin en praekzistantajn, *eternajn ideojn*, kaj kiel li sur tiu ĉirkaŭvojo revenas al la starpunkto de la burĝa ekonomio.⁹⁰

⁹⁰ „Se la ekonomikistoj diras, ke la nunaj kondiĉoj - la kondiĉoj de la burĝa produktado estas *naturaj*, ili per tio komprenigas ke ili estas kondiĉoj en

Mi montras krome, kiom mankhava kaj parte eĉ lernejaneca estis lia kono de la „politika ekonomio”, kies kritikon li entreprenis, kaj kiel li, kune kun la utopiistoj, ĉaspelas tielnomatan „*sciencon*”, per kio li volas apriorie elfantazii formulon por la „solvo de la sociala demando”, anstataŭ ĉerpi la *sciencon* el la kritika ekkono de la historia moviĝo, moviĝo kiu mem produktu la *materiajn kondiĉojn de la emancipiĝo*. Sed nome mi montras kiel Prudono restas malklara, malĝusta kaj duona pri la bazo de la tutaĵo, la *interŝanĝvaloro*, ke li deklaras la utopiisman interpreton de la valorteorio de Ricardo kiel la bazon de nova scienco. Pri lia ĝenerala starpunkto mi resume juĝas jene:

„Ĉiu ekonomia rilato havas bonan kaj malbonan flankon; tio estas la sola punkto en kiu s-ro Prudono ne frapas sin mem en la vizaĝon. La bonan flankon li vidas emfazata de la ekonomikistoj, la malbonan akuzata de la socialistoj. Li pruntas de la ekonomikistoj la neceson de eternaj kondiĉoj; li pruntas de la socialistoj la iluzion vidi en la mizero nur la mizeron (anstataŭ rimarki en ĝi la revolucion, detruan flankon kiu renversos la malnovan socion)⁹¹. Li konsentas kun ambaŭ, ĉe kio li provas apogi sin sur la scienco. La scienco reduktiĝas por li al la nana amplekso de scienca formulo; li estas la homo ĉasanta formulojn. Laŭ tio s-ro Prudono flatas sin esti doninta la kritikon de la politika ekonomio same kiel tiun de la komunismo - li staras profunde sub ambaŭ. Sub la ekonomikistoj, ĉar li kiel filozofo, kiu havas ĉemane magian formulon, kredas sin kapabla pritrakti la pure ekonomiajn detalojn; sub la socialistoj, ĉar li havas nek sufiĉan kuraĝon nek sufiĉan komprenon leviĝi, eĉ se nur spekule, super la burĝan horizonton ... Li volas kiel homo de la scienco ŝvebi super burĝoj kaj proletoj; *li estas nur la etburĝo*, kiu estas konstante ĵetata alen kaj reen inter la politika ekonomio kaj la komunismo.”⁹²

Kvankam tiu juĝo sonas akre, mi devas ankoraŭ nuntempe subskribi ĉiun vorton de ĝi. Sed samtempe oni konsideru ke tiam, kiam mi deklaris la libron de Prudono la kodekso de la socialismo kaj de la

kiuj la produktado de la riĉaĵo kaj la disvolvado de la produktadfortoj okazas laŭ la naturleĝoj. Per tio, tiuj kondiĉoj mem estas *naturleĝoj* sendependaj de la influo de la tempo. Ili estas *eternaj* leĝoj kiuj devas ĉiam regi la socion. Per tio, historio ekzistis, sed jam ne ekzistas.” (p. 113 de mia verko.)

⁹¹La interkrampan teksteron Markso aldonis al tiu ĉi artikolo.

⁹²I.c. p. 119, 120. [en la Esperanta eldono: p. 120-121. -vI]

etburĝo kaj teorie pruvis tion, Prudono estis ankoraŭ akuzita kiel ultrarevoluciulo de politikaj ekonomikistoj kaj de socialistoj samtempe. Pro tio mi poste neniam partoprenis en la kriaĉado pri lia „*perfido*” de la revolucio. Ne estis lia kulpo, se li, miskomprenata de aliaj kiel komence de li mem, ne plenumis malpravajn esperojn.

En la „*Philosophie de la misère*”, ĉiuj mankoj de la Prudona prezentmaniero, kontraste al la „*Qu'est-ce que la propriété?*” okulfrapas tre malfavore. La stilo estas ofte tia kian la francoj nomas *ampoulé* [bombasta]. Bombasta spekulca galimatio, intencata esti germanece filozofia, aperas regule kie la franca mens-akreco ĉesas ĉe li. Ĉarlatana, memlaŭdaĉa, fanfaroni tona, nome la konstanta malagrabila babilado pri kaj falsa pompado per „scienco”, akre sonas konstante en la orelo de la leganto. Anstataŭ la reala varmo kiu tralumas la unuan verkon, ĉi tie li en certaj lokoj deklamas sin sisteme en ian kvazaŭfebron. Aldone la naŭze mallerta ŝajnigo de klereco de la aŭtodidakto, kies komenca fiereco pri originala mempensado estas jam rompita kaj kiu nun kiel parvenuo de la scienco kredas sin devigata pavi per tio kio li ne estas kaj kion li ne havas. Krome la pensmaniero de la etburĝo, kiu atakas ekzemple homon kiel *Cabet* - respektinda pro sia praktika pozicio pri la franca proletaro - en maldece brutala, nek akra nek profunda, nek eĉ ĝusta maniero, sed aliflanke obeeme kondukas ekz-e antaŭ iu *Dunoyer* (nu, ja „ŝtatkonsilisto”), kvankam la tuta graveco de tiu *Dunoyer* konsistis en la komika seriozeco per kiu li tra tri dikaj, neelteneble enuigaj volumoj predikis la rigorismon, kiun *Helvetius* karakterizis jene: „*On veut que les malheureux soient parfaits*” (Oni postulas ke la malfeliĉuloj estu perfektaj).

La Februara Revolucio venis tre maloportune por Prudono, ĉar li ĵus kelkajn semajnojn antaŭe nerefuteble pruvis ke „*la erao de la revolucioj*” estas por ĉiam pasinta. Lia interveno en la nacia asembleo, kvankam li montris malmultan komprenon pri la ekzistantaj kondiĉoj, meritis ĉian laŭdon. Post la junia ribelo tio estis ago de granda kuraĝo. Ĝi havis krome la bonan sekvon ke s-ro *Thiers* en sia kontraŭparolado kontraŭ la proponoj de Prudono, kiu poste aperis en aparta publikigaĵo, pruvis al tuta Eŭropo, sur kia piedestalo de etinfana kateĥismo staris tiu spirita kolono de la franca burĝaro. Fronte al s-ro *Thiers*, *Prudono* ŝvelis efektive al prakoloso.

La Prudona malkovro de la „*crédit gratuit*” [„senintereza kredito”] kaj la „popolbanko” (*banque du peuple*) kiu baziĝis sur ĝi, estis liaj

lastaj ekonomiaj „faroj”. En mia skribaĵo „*Zur Kritik der Politischen Oekonomie*” [„*Pri la kritiko de la politika ekonomio*”], kajero 1, Berlino 1859 [p. 59-64], troviĝas la pruvo ke la teoria bazo de lia opinio fontas el miskompreno de la unuaj elementoj de la burĝa „politika ekonomio”, nome de la rilato de la varoj al la *mono*, dum la praktika superstrukturo estis nura reproduktaĵo de multe pli malnovaj kaj multe pli bone ellaboritaj planoj. Ke la kreditsistemo, tute kiel ĝi servis ekz-e komence de la 18-a kaj poste ree en la 19-a jarcento en Anglio por transigi la havaĵon de unu klaso al la alia, sub certaj ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj povas servi por akcelado de la emancipiĝo de la laboranta klaso, pri tio estas neniam dubo, tio estas memkomprenebla. Sed konsideri la *intersezportan kapitalon* kiel la *ĉefan formon de la kapitalo*, sed voli fari el aparta aplikado de la kreditsistemo, laŭdira forigo de la interezo, la bazon de la socia transformado, tio estas ja *etburĝa*⁹³ fantazio. Oni trovas tiun fantazion do fakte ankaŭ pli elpadita jam en la *ekonomiaj ĉefparolantoj de la angla etburĝaro de la deksepa jarcento*. La polemiko de Prudono kun Bastiat (1850) pri la intersezporta kapitalo staras multe sub la „*Philosophie de la misère*”. Li sukcesas esti batita eĉ de Bastiat, kaj eksplodas en burleskan kvereladon kiam lia kontraŭulo tuŝas lin.

Antaŭ kelkaj jaroj Prudono verkis premian verkon - mi kredas instigite de la registaro de Laŭzano - pri la „impostoj”. Tie eĉ la lasta spuro de genieco estingiĝas. Restas nenio ol la ĝisosta etburĝo⁹⁴.

Koncerne la politikajn kaj filozofiajn verkojn de Prudono, en ĉiuj montriĝas la sama kontraŭdira, ambigua karaktero kiel en la ekonomiaj laboraĵoj. Tamen ili havas nur lokan francan valoron. Sed liaj atakoj kontraŭ religio, ekzlezio ktp havas grandan lokan meriton en tempo kiam la francaj socialistoj kredis konvena, superi per religieco la burĝan volterismon de la 18-a kaj la germanan sendiecon de la 19-a jarcento. Se Petro la Granda disbatis la rusan barbarecon per barbareco, Prudono faris sian plej bonan per tio ke li renversis la francan frazadon per frazado.

Sed oni devas nomi ne malbonaj skribaĵoj, sed fiaĵoj, tamen fiaĵoj kongruaj kun la etburĝa starpunkto, lian verkon pri la „*Coup d'état*” [„*Ŝtatrenverso*”], en kiu li koketas kun L. Bonaparte, strebas efektive plaĉigi lin al la francaj laboristoj kaj lian lastan verkon kontraŭ

⁹³Originale: spießbürgerliche (filistra, etburĝa). -vl

⁹⁴Originale: *petit bourgeois tout pur* [ĝisosta etburĝo].

Pollando, en kiu li praktikas kretenan cinikecon honore al la caro.

Oni ofte komparis Prudonon kun Rusoo. Nenio povas esti pli malĝusta. Li similas pli al Nic[olas] Linguet, kies „Théorie des loix civiles” estas cetere tre genia libro.

Prudono emis nature al dialektiko. Sed ĉar li neniam komprenis la vere sciencan dialektikon, li sukcesis nur sofistikon. Fakte tio rilatis kun lia etburĝa starpunkto. La etburĝo estas kiel la historiisto *Raumer* kunmetita el „unuflanke kaj aliflanke”. Tiel en siaj ekonomiaj intereso, kaj *pro tio* en sia politiko, siaj religiaj, sciencaj kaj artaj opinioj. Tiel en sia moralo, tiel en everything [en ĉio]. Li estas la vivanta kontraŭdiro. Se ĉe tio li estas, kiel Prudono, spritulo, li baldaŭ lernas ludi per siaj propraj kontraŭdiroj kaj ellaboras ilin laŭ la cirkonstancoj al foje skandalaj, foje brilaj paradoksaĵoj. Scienca ĉarlatanismo kaj politika adaptiĝemo estas nedisiĝeblaj de tia starpunkto. Restas nur unu mova motivo, la *vanteco* de la subjekto, kaj temas, kiel ĉe ĉiuj vantuloj, jam nur pri la sukceso de la momento, pri la taga furoro. Tiel estingiĝas nepre la simpla morala takto, kiu ĉiam detenis ekz-e Rusoon for de ĉia eĉ ŝajna kompromiso kun la ekzistantaj potencoj.

Eble la posteularo karakterizos la nunan fazon de la franceto per tio, ke Louis Bonaparte estis ĝia Napoleono kaj Prudono ĝia Ruso-Voltero.

Vi devas nun mem transpreni la respondecon pri tio ke vi, tiom baldaŭ post la morto de la homo, taskis min pri la rolo de la mortintjuĝisto.

Sindone via

Karlo Markso

La tradukinto: Pri tiu ĉi eldono

Mi havis du motivojn traduki kaj aperigi tiun verkon de Markso: unue, ĉar ĝi estas la unua verko en kiu la juna Markso kunigis siajn filozofiajn kaj ekonomikajn konceptojn en koheran tutaĵon, kaj due, ĉar la „prudonismo”, kontraŭ kiu li argumentas, tute ne estas limigita al la epoko de la frua Markso, sed estas en plej diversaj formoj kaj nomoj daŭre vigla kiel tiam, ankaŭ en Esperantujo, kie tiu ĉi verko povus kontribui al konsciiĝo pri niaj propraj ideoj kaj vekti fruktodonajn diskutojn ...

Kvankam Markso verkis la tekston en la franca – por li ja fremda lingvo –, mi bazis mian tradukon sur la germana eldono, kies traduko estis farita de du gravaj germanaj socialdemokratoj, plurloke ŝanĝita laŭ rimarkoj de Markso mem kaj kontrolita kaj printotita de Frederiko Engelso, kiu plej intimis kun ĉiuj diversaj verkadepokoj de sia amiko Markso. En kazo de dubo mi tamen plurfoje uzis la franclingvan tekston por komparo.

La leteron de Markso „Pri P. J. Prudono [Letero al J. B. v. Schweitzer], fine de la libro, mi tradukis el la germana originalo, same kiel la antaŭparolojn de Frederiko Engelso.

La antaŭparolon de Henri Mougin, kiun mi tradukis el la franca, mi decidis enpreni ĉi tie, kvankam lia stilo kaj prezentmaniero ne spiras nian aktualecon, ĉar li tamen donas interesajn klarigojn pri Prudono, kiuj aldoniĝas al la Marksa analizo kaj konfirmas ĝin.

Mi estus dankema pri indikoj de eraroj en tiu ĉi libro, eliminendaj en estonta reeldono.

*Vilhelmo Lutermano,
Pedro Betancourt, Kubo, aŭgusto 2009*

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvapaĝe listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

– **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, 2008

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

– **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Eddy Raats: La longa vojaĝo**. Travivaĵoj de etulo, 2009

- **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009 (tiu ĉi libro).

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Karlo Markso: La mizero de la filozofio; Pri J. P. Prudono
kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj Henri Mougin
tradukitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS), 2009

Enpaĝigita de Monda Asembleo Socia (MAS) -vl
per OpenOffice 3.0.1
kaj litertiparo DejaVu Serif (10 pt)
sub Mandriva-Linukso 2009.1
en Pedro Betancourt, Kubo,
en aŭgusto 2009

Presita en Germanio 2009

ISBN 978-2-918300-08-3